# ESPERANTOLOGIO
# ESPERANTO STUDIES

*EES*

**Kajero 5 2011 Issue No. 5**

*Redaktas* *Editor*

Christer Kiselman

*Redakta komitato* *Editorial Board*

| | |
|---|---|
| Detlev Blanke | Sergej Kuznecov |
| Probal Dasgupta | Haitao Liu |
| Michel Duc Goninaz | Ingrid Maier |
| Sabine Fiedler | Geraldo Mattos |
| Gotoo Hitosi | Marc van Oostendorp |
| Wim Jansen | Humphrey Tonkin |
| Ilona Koutny | John C. Wells |
| Erich-Dieter Krause | Yamasaki Seikô |

KAVA-PECH Dobřichovice (Prago/Prague)

Upsala universitato Uppsala University

***Esperantologio / Esperanto Studies***
estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de esperanto.

La revuo estos publikigata en du formoj, tamen enhave identaj: presita sur papero kaj rete alirebla.

La paperan version publikigas la eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio.

La komputilreta versio estas publikigata de Upsala universitato sub la respondeco de profesoro Ingrid Maier. Ĝi estas alirebla ĉe la retadreso

`www2.math.uu.se/esperanto`

Por konservi la eblecojn de referenco la artikoloj publikigitaj en la retversio ne estos ŝanĝitaj dum la tempo de la nuna redaktoro. Sed ĉiu aŭtoro rajtas verki aldonajn notojn al sia jam publikigita artikolo. Tiuj aldonoj povos enhavi korektojn, komentojn kaj novajn referencojn.

Pri prezoj kaj sendokostoj bonvolu informiĝi ĉe

`www.kava-pech.cz/esperanto`

aŭ kontaktu `info@kava-pech.cz`

***Esperantologio / Esperanto Studies***
is an international journal on all phenomena relating to Esperanto. It publishes articles based on original studies of the linguistic, historical, literary, psychological, sociological, and political aspects of Esperanto.

The journal is published in two versions, which are identical in content: a print version and an electronic version.

The print version is published by KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prague), Czechia.

The electronic version is published by Uppsala University under the responsibility of Professor Ingrid Maier. It is available at the URL

`www2.math.uu.se/esperanto`

In the interest of scholars, the articles published in the electronic version will not be changed during the present editor's tenure. But every author may add an appendix to her or his published paper. Such appendices may contain corrections, comments, and new references.

For prices and postage please consult

`www.kava-pech.cz/english`

or contact `info@kava-pech.cz`

ISBN 978-80-87169-25-4 (p) ISSN 1404-4749 (e)

## Konsiloj al aŭtoroj

Manuskriptojn verkitajn cele al publikigo en EES oni sendu al la redaktoro per komputilreta poŝto, prefere kiel LaTeX-dosieron, ĉe `kiselman@math.uu.se`

Se tio ne eblas, sendu la tekston kiel retpoŝtan leteron aŭ surpapere al

Christer Kiselman
Upsala universitato, Poŝtkesto 480
SE-751 06 Uppsala, Svedio.

Ĉiu artikolo estos submetita al juĝado de du spertuloj, kiuj restos nekonataj de la verkinto.

La bibliografio estu je la fino, kaj entekstaj referencoj al ĝi laŭ nomo, jaro kaj paĝnumero: Zamenhof (1983:365) aŭ (Zamenhof 1983:365) depende de la kunteksto. La donitaĵoj aperu en la bibliografio tiel:

Wüster, Eugen (1955). La terminoj "esperantologio" kaj "interlingvistiko". *Esperantologio* **1**(4), 209–214.

Zamenhof, L. L. (1983). *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj.* Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Fotorepreso de la eldono publikigita de Ferdinad Hirt & Sohn en Lepsiko 1929.)

## Guidelines for authors

Manuscripts intended for publication in EES should be sent to the editor by e-mail, preferably as a LaTeX file, at `kiselman@math.uu.se`

If this is not possible, then please send the text as a regular e-mail letter or a manuscript on paper to

Christer Kiselman
Uppsala University, P. O. Box 480
SE-751 06 Uppsala, Sweden.

The journal applies a refereeing system: every contribution is sent to two referees, whose identity will remain unknown to the author.

Put the bibliography at the end and refer to it in the text by name, year, and page number: Zamenhof (1983:365) or (Zamenhof 1983:365) depending on the context. Please give bibliographical details according to the following models:

Wüster, Eugen (1955). La terminoj "esperantologio" kaj "interlingvistiko". *Esperantologio* **1**(4), 209–214.

Zamenhof, L. L. (1983). *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj.* Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Reprint of the edition published by Ferdinad Hirt & Sohn in Leipzig, 1929.)

KAVA-PECH

Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Praha)

ISBN 978-80-87169-25-4 (p) ISSN 1404-4749 (e)

Produktita en Ĉeĥio / Produced in Czechia

2011

# ESPERANTOLOGIO
# ESPERANTO STUDIES

*EES*

**Kajero 5** **2011** **Issue No. 5**

Enhavo / Contents

**Christer Kiselman:** Salutvorto de la redaktoro . . . . . . . . . . 3

**Christer Kiselman:** A word from the editor . . . . . . . . . . 5

**Kadoja Hidenori:** La strukturo de Esperanto kiel faktoro por certigi ĝian funkcion rilate al Lingvaj Rajtoj: ĉefe pri la koncepto de lingvolernado kaj pri konscio de lingva normo . . . 7–27

Pri tiu ĉi revuo; About this journal . . . . . . . . . . 28

**Leif Nordenstorm:** Recenzo pri nova germanlingva biografio de Zamenhof verkita de Andreas Künzli . . . . . . . . . . 29–35

**Vilmos Benczik:** La esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj . . . . . . . . . . 37–59

**Humphrey Tonkin:** Organizaj strukturoj kaj la estonteco de Esperanto . . . . . . . . . . 61–67

**Spomenka Štimec:** Unu hindunia infanlibro en Eŭropo, tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio . . . . . . . . . . 69–78

**Christer Kiselman:** Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof . . . . . . . . . . 79–149

Korektoj al EES 4 . . . . . . . . . . 150

La paperan version publikigas / Print version published by
KAVA-PECH, Dobřichovice

La elektronikan version publikigas / Electronic version published by
Upsala universitato / Uppsala University

Redaktoro / Editor

Christer KISELMAN, Uppsala University, Department of Mathematics, P. O. Box 480, SE-751 06 Uppsala, Sweden. ⟨kiselman@math.uu.se⟩

Redakta komitato / Editorial Board

Detlev BLANKE, Otto-Nagel-Straße 110, DE-12683 Berlin, Germany. ⟨detlev@blanke-info.de⟩

Probal DASGUPTA, Linguistic Research Unit, Indian Statistical Institute, 203 B. T. Road, IN-700108 Kolkata, India. ⟨probal53@yahoo.com⟩

Sabine FIEDLER, Universität Leipzig, Geisteswissenschaftliches Zentrum, Beethovenstraße 15, DE-04107 Leipzig. ⟨sfiedler@rz.uni-leipzig.de⟩

Michel DUC GONINAZ, Val Saint-Georges, Chemin de l'Échelle, FR-13100 Aix-en-Provence, France. ⟨michelduc@aliceadsl.fr⟩

GOTOO Hitosi, Tohoku University, Faculty of Arts and Letters, Department of Linguistics, Sendai, JP-981 Japan. ⟨gothit@sal.tohoku.ac.jp⟩

Wim JANSEN, Universiteit van Amsterdam, Leerstoelgroep Theoretische Taalwetenschap, Spuistraat 210, NL-1012VT Amsterdam, The Netherlands. ⟨w.h.jansen@uva.nl⟩

Ilona KOUTNY, Adam Mickiewicz Universitato, Lingvistika Instituto, Międzychodzka 5, PL-60-371 Poznań, Poland. ⟨ikoutny@amu.edu.pl⟩

Erich-Dieter KRAUSE, Semmelweisstraße 7, DE-04103 Leipzig, Germany. ⟨edklexik@t-online.de⟩

Sergej KUZNECOV, Tverskaja 19-67, RU-103050 Moskva, Russian Federation. ⟨s-ku@rambler.ru⟩

Haitao LIU, School of International Studies, Zhejiang University, No. 866 Yuhangtang Road, CN-310058, Hangzhou, P. R. China. ⟨lhtzju@gmail.com⟩

Ingrid MAIER, Uppsala University, Department of Modern Languages, P. O. Box 636, SE-751 26 Uppsala, Sweden. ⟨ingrid.maier@moderna.uu.se⟩

Geraldo MATTOS, Rua João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba, PR, Brazil. ⟨geraldomattos@netpar.com.br⟩

Marc VAN OOSTENDORP, Meertens Instituut, Joan Muyskenweg 25, NL-1096 CJ Amsterdam, The Netherlands. ⟨Marc@vanOostendorp.nl⟩

Humphrey TONKIN, University of Hartford, Office of the President Emeritus, Mortensen Library, West Hartford, CT 06117-1599, USA. ⟨tonkin@mail.hartford.edu⟩

John C. WELLS, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, UK. ⟨j.wells@ucl.ac.uk⟩

YAMASAKI Seikô, JP-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japan. ⟨syama@qf6.so-net.ne.jp⟩

# Salutvorto de la redaktoro

Kara leganto

Estas ĝojo prezenti al vi la kvinan kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas kvin originalajn studojn kaj unu recenzon. Ĉiuj estas verkitaj en esperanto ĉi-foje.

⋆

Kadoja Hidenori verkis tre originalan kaj interesan studon pri esperanto kiel planlingvo bazita sur lingvaj rajtoj. Li konvinke montras al ni la severajn postulojn kiujn la lingvaj rajtoj metas al la lingvo. Oni povus eĉ diri ke li pruvas per *Reductio ad absurdum* ke la lingvaj rajtoj ne povas servi kiel bazo por la nuna ĉiutaga esperanto. Ĉiuokaze lia artikolo estas grava kontribuaĵo al la diskuto pri la diferenco inter planlingvoj kaj neplanitaj lingvoj.

⋆

Andreas Künzli verkis (denove) monumentan libron, ĉi-foje biografion pri Zamenhof en la germana. Leif Nordenstorm recenzas ĝin.

⋆

La sekvantaj kvar verkoj estas bazitaj sur prelegoj 2010-07-22 en Havano, kadre de la 33-a Esperantologia konferenco, kiu estis parto de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto. Ili aperas ĉi tie esceptokaze.

La unua el tiuj ĉi kvar tekstoj estas teoria kaj pensinstiga studo fare de Vilmos Benczik pri la esperantlingva literaturo kaj ties loko inter aliaj literaturoj. Unu el liaj temoj estas la diskretigo de lingvaj esprimoj.

⋆

Humphrey Tonkin skribas pri la organizaj strukturoj de la Esperanto-movado; temas pri kritika prezento historia same kiel pri rigardo estontecen.

⋆

Spomenka Štimec partoprenis en kultura interŝanĝo inter Eŭropo kaj la Hinda Unio kaj rakontas al ni pri tiu projekto, kies realigon helpis la Eŭropa unio.

⋆

Fine Christer Kiselman prezentas variantojn de esperanto antaŭ la publikigo en 1887 same kiel post tiu jaro. Temas pri la Lingwe uniwersala de 1878, la Lingvo universala de 1881, la Lingvo internacia de 1887, reformpropono de 1894, la Fundamento de Esperanto de 1905, kaj proponoj faritaj en 1906–1908.

⋆

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1 (1999).

La revuo estas ia daŭrigo de la revuo *Esperantologio*, kiun Paul Neergaard (1907–1987) redaktis kaj eldonis dum la jaroj 1949–1961. Aperis ses kajeroj ampleksantaj entute 424 paĝojn.

Tamen en la nuna revuo ni komprenas per la termino *esperantologio* pli vastan sciokampon ol oni faris en tiu de Neergaard.

⋆

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon!

*Christer Kiselman*

# A word from the Editor

Dear Reader:
It is a pleasure to present to you the fifth issue of *Esperanto Studies*! It contains five original articles and one review. All are written in Esperanto this time.

⋆

Kadoja Hidenori has written a very original and interesting study on Esperanto as a planned language based on Language Rights; he convincingly exhibits the severe requirements that Language Rights impose on the language. One could even say that he proves by *Reductio ad absurdum* that Language Rights cannot serve as a basis for present-day spoken Esperanto. In any case, his article is an important contribution to the ongoing discussion on the differences between planned languages and unplanned languages.

⋆

Andreas Künzli published (again) a monumental work, this time a biography on Zamenhof in German. Leif Nordenstorm reviews it.

⋆

The next four articles are based on lectures given on July 22, 2010, in Havana, during the 33rd Esperantology Conference there, which was a part of the 95th Universal Congress of Esperanto. They appear here as an exception.

The first of these four texts is a theoretical and thought-provoking study by Vilmos Benczik on literature in Esperanto and its place among literatures in other langugages. Discretization of language expressions is one of his themes.

⋆

Humphrey Tonkin writes on the organizational structures of the Esperanto movement—this is a critical historical presentation as well as a look into the future.

⋆

Spomenka Štimec took part in a cultural interchange between Europe and India and tells us about this project, the realization of which was supported by the European Union.

⋆

Finally, Christer Kiselman presents variants of Esperanto before and after its publication in 1887. More precisely, it is about the *Lingwe uniwersala* of 1878, the *Lingvo universala* of 1881, the *Lingvo internacia* of 1887, a reform proposal of 1894, the *Fundamento* of 1905, and proposals made during the years 1906–1908.

⋆

For the editorial policy of the journal, please see the first issue.

The journal is a kind of continuation of the journal *Esperantologio*, which Paul Neergaard (1907–1987) edited and published during the years 1949–1961. Six issues were published, comprising a total of 424 pages.

However, in the present journal, we use the term *esperantologio* 'Esperanto Studies' in a wider sense than one did in Neergaard's journal.

⋆

I hope you will enjoy reading these articles!

*Christer Kiselman*

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 7–27

# La strukturo de Esperanto kiel faktoro por certigi ĝian funkcion rilate al Lingvaj Rajtoj: ĉefe pri la koncepto de lingvolernado kaj pri konscio de lingva normo*

KADOJA Hidenori

*Resumo*
La aŭtoro unue montras ke la teoria universala bazo unusola ebla por Esperanto kaj la movado estas lingvorajtoj, kaj starigas novan koncepton, *laŭlingvorajta valoro*. Ekster la Esperanto-movado ĝenerale oni signifigas la ideon lingvorajto, ke ĉiu homo tenas rajton uzi la lingvojn kiujn tiu deziras uzi. Sed la movado evolue rekreis la ideon por ke tiu signifu ke homoj havas rajton komuniki demokratie, egale. Tiel la movado bazis sin sur la rekreita koncepto de lingvorajtoj, kaj ĝi akiris *laŭlingvorajtan valoron*. El ĉi tiu vidpunkto la aŭtoro indikas kelkajn problemojn teoriajn, kritike al la ĝisnuna kaj nuntempa Esperanta movado.

La unua problemo estas komprenomaniero de Esperanta lernado kaj instruado. En la movado tre verŝajne preskaŭ ĉiuj kredas ke ju pli multe da lernado kaj kapablo Esperanta, des pli bone. La penso tute ne pravas, kaj kontraŭas la movadan bazon, *laŭlingvorajtan valoron*. Ĉar multe da lernado kaj la granda kapablo postulas lernantojn tro multe da resurso por lerni, t.e. tempo, mono kaj lernokapablo. Tio grandigas malegalecon inter Esperantaj uzantoj. Alivorte la Esperanta movado devas celi ĝustan nivelon de lernado kaj instruado, kiu ne devas esti troa.

Pri lernoresurso la aŭtoro temigas ankaŭ necesecon de Esperanto-vorta kaj uzmaniera faciligado. Nuntempa Esperanto estas tro forte eŭropigita, ne nur pri latin- aŭ grek-originaj vortoj malfacilaj, sed ankaŭ pri kutimesprimo kaj komunikadaj reguloj, ekzemple saluto per manpremo. Tiaj elementoj ege malaltigas la laŭlingvorajtan valoron. Tial ni devas rekrei tiajn vortojn kaj esprimojn uzante nur bazajn facilajn vortojn, kaj neŭtrale deeŭropigi la komunikmanieron.

Sensocioseksigado de Esperanto estas ankaŭ necesa. Seksa duismo, ekzemple en pronomoj kaj priseksaj esprimoj, kaj seksisma ideologio en la sufikso *-in-* kontraŭas homrajton, kiu estas la teoria bazo de la movado. Esperanta movado sur la bazo de unu el la homrajtoj, nome lingvorajtoj, devas transformi Esperanton por ne nei aliajn homrajtojn, kiel foresto de seksa diskriminacio.

Ĉi-tiel por teni laŭlingvorajtan valoron, Esperanta movado devos pensi pri problemaj fenomenoj, kiuj kontraŭas laŭlingvorajtan valoron. Por planlingvo kiel Esperanto lingva regulismo estas vere nemalhavebla. Ĝenerale en la diskuto pri neplanlingvoj, lingva regulismo funkcias nedemokratike kaj aŭtoritatisme. Alie priskribismo kiu respektas lingovoŝanĝojn *naturajn* estas lingvodemokratia. Sed pri la planlingvo Esperanto, tute male. La Esperanta movado, kiu havas objektivan bazon,

*Ĉi tiu teksto estas traduko de japanlingva teksto, kiu aperis en *Japana Esperantologio* n-ro 3 (2008:109–126); samtempe ĝi estas reviziita per aldono aŭ anstataŭigo de esprimoj, vortoj kaj piednotoj.

laŭlingvorajtan valoron, devas ĉiam esti lingvoregulisma por teni la bazon. Por altigi tiun valoron, ni devos fari senfine pli da esploro estontece. La aŭtoro provis komenci tion per tiu ĉi kontribuo montrante kelkajn konkretajn problemerojn.

*Abstract. The structure of Esperanto as a factor for attaining its goal in relation to Linguistic Rights.* By KADOYA Hidenori
The author first shows that the only theoretical and universal basis of Esperanto and the Esperanto movement lies in linguistic rights, and then proposes a new concept, *value for linguistic rights.* Outside of the Esperanto movement, the concept of linguistic rights is used to mean that everyone, under certain circumstances, keeps the right to write and speak the language which the person wishes. However, the Esperanto movement has evolved and re-created the notion to mean that people have rights to communicate in an equal and democratic way, i.e., the movement has established its own foundation upon the concept of linguistic rights. Owing to that, the movement has succeeded in acquiring a universal value. Standing on such an understanding of the movement's circumstances, the author critically indicates several theoretical defects inherent in the movement hitherto.

The first problem lies in the way of understanding Esperanto learning and teaching. In the movement it seems that almost all persons concerned believe that the more eagerly one learns Esperanto and the more the person acquires an ability to use it, the better. This belief is irrelevant and contradicts the basis of the movement, that is, a value of linguistic rights, since attaining a high level of the linguistic skills postulates that the learner should expend extraordinary resources for learning, namely time and money and have available ability. This precondition enlarges inequality among Esperanto users. Therefore the Esperanto movement must identify an appropriate level of learning and teaching, whose excess should be avoided.

In relation to learning resources, the author points to the necessity of the easier Esperanto vocabulary and phrase construction. The current Esperanto is exceedingly Europeanized, not only in the words with latin-greco-originated stems, but also in idioms and communication norms, e.g., greeting by handshaking. These elements seriously lessen the value of linguistic rights, so that it is necessary to deconstruct those words and phrases, utilizing limited fundamental stems, and to de-Europeanize communication customs.

De-gendering Esperanto is also indispensable. Sexual dualism, for example in pronouns and sex-related expressions, and sexist ideology in the suffix *-in-* contradicts human rights. The Esperanto movement, whose foundation derives from one of the human rights, viz. lingusitic rights, must transform Esperanto so as not to deny the other human rights, such as absence of gender discrimination, etc.

In order that the Esperanto movement may serve the value of linguistic rights, it needs to reconsider problematic phenomena that are inconsistent with the value of linguistic rights. For planned languages like Esperanto, linguistic prescriptivism is indeed indispensable. In general, in non-planned language, linguistic prescriptivism works non-democratically as authoritarianism. On the contrary, descriptivism, which has respect for *natural* linguistic alteration, conforms with linguistic democracy. But concerning the planned language Esperanto, the reverse is the case. The Esperanto movement, whose objective basis is a value of linguistic rights, must always support linguistic prescriptivism in order to keep the foundation. We have

to keep on investigating this subject to achieve the value. The author's contribution is to begin the attempt, analyzing some of the main problems.

## 1. La situo de problemoj

La celoj de la Esperanto-movado estas lerni, utiligi, kaj disvastigi la lingvon. Sur la fono de la movadanoj, kiuj dediĉas tempon kaj monon por la celoj de Esperanto, funkcias la juĝo, ke ili laboras por io valora kaj signifohava. Krom tiuj kiuj rilatas al Esperanto nur por sia privata ĝuo, ekzemple por lingvistika interesiĝo pri la lingvo, multaj aliaj konsideras, ke la valoro kaj signifo de Esperanto havas socian karakteron. Ekzemple, Japana Esperanto-Instituto klarigas en la informilo titolita "Kio estas Esperanto?",[1] ke Esperanto estas "internacia lingvo neŭtrala kaj facile lernebla", kaj ke ĝi celas "funkcii kiel ponto inter lingvoj kaj kulturoj". Tiuj ĉi klarigoj staras sur la juĝo, ke "neŭtraleco" kaj "ponto inter lingvoj kaj kulturoj" havas socian valoron, kaj tial la Esperanto-movado devas esti progresigita en tiu ĉi socio. Do, sur la bazo de la Esperanto-movado kuŝas klara juĝo pri la valoro, kaj la juĝo estas komuna al multaj parolantoj kaj movadanoj de la lingvo. La nuna studo celas teorie reesplori la nunan staton de la Esperanto-movado, starante sur la konscio, ke la juĝo fakte troviĝas. Ni esploros la nunan staton de Esperanto kaj la instruadon, kiu situas en la kerno de la Esperanto-movado.

Mi konsideras, ke tia reesploro necesas, ĉar la nuna Esperanto-movado havas tendencon aparte emfazi la valoron kiu donas al la lingvo socian signifon. Kaj la tendenco ŝajne donas al la Esperanto-movado fundan deformiĝon kaj kontraŭdiron. Alivorte, la nuna Esperanto-movado iras sen teoria fundamento, kaj sen strebo konstrui la fundamenton. Tial en la interno de la movado naskiĝis memkontraŭdiroj, kiujn mi traktos sube.

Kion ni povas diri, kiam ni kontrolas la nunan staton de la Esperanto-movado, surbaze de la teoria fundamento de la Esperanto-movado? En tiu ĉi studo mi traktos parte la problemon. Mi celas emfazi la gravecon de teorio en la Esperanto-movado, kaj doni novan vidpunkton al la ideo de Lingvaj Rajtoj kaj ĝenerale al la Esperanto-movado.

## 2. La rilato inter Lingvaj Rajtoj kaj Esperanto: Lingvaj Rajtoj kiel teoria bazo

Unu el la grandaj ŝanĝoj kiujn spertis la Esperanto-movado tuj antaŭ la sojlo de la 21-a jarcento, estas verŝajne la enkonduko de la koncepto de Lingvaj Rajtoj en la teorian principaron de la movado. Lingvaj Rajtoj estas aro da konceptoj, kiuj garantias la rajtojn de komunikado al la parolantoj de

[1] `http://www.jei.or.jp/hp/esp_kai.htm`

minoritataj lingvoj en multlingva kaj plurlingva socio, rezulte de la movado de la minoritato, kiu estas devigita vivi en socia malavantaĝo. Kiel ni vidos ĉi sube, la konceptaro estas uzata por montri la socian justecon de la Esperanto-movado.

Tamen la konceptaro estas varia laŭ la diskutantoj. Ekzemple, Robert Phillipson k.a. fokusis la unuan (gepatran) lingvon kaj montras la enhavon de garantiindaj Lingvaj Rajtoj (kompilita de studgrupo pri Lingvaj Rajtoj, 1999:123).[2] Laŭ la difino, unue staras la koncepto *rajto uzi sian unuan lingvon.* La uzo de la unua lingvo kaj la agnosko de la rajto uzi ĝin estas konsiderataj kiel tre gravaj kondiĉoj por teni individuan identecon. Kiam homo komencas formi mondkoncepton post sia naskiĝo, la unua lingvo[3] estas rimedo, kiu ebligas al ni havi nian dignan proprecon. Tio ĉi estas konsiderata kiel la bazo por aserti, ke Lingvaj Rajtoj devas esti kalkulataj kiel unuj el la homaj rajtoj. Toŝikazu Suzuki (2000:8) provizore difinas Lingvajn Rajtojn: "Lingvaj Rajtoj estas rajtoj kiuj garantias kaj ne malpermesas al homoj kaj al homgrupoj uzi iun ajn preferatan lingvon en la socia vivo." Laŭ la argumento de T. Suzuki la enhavo de la rajtoj estas "vivi en la socio" per "preferata lingvo", ne nur per la unua lingvo.

Ĉiuokaze, la celo de Lingvaj Rajtoj estas reakirigi al la parolantoj de minoritataj lingvoj, kiuj estas socie diskriminaciataj longtempe, identecon kaj samajn sociajn rajtojn kiel la parolantoj de la majoritataj lingvoj. Sed tiu ĉi koncepto de Lingvaj Rajtoj, kiu estas teorie prava, tuj renkontas malfacilan muron, kiam oni intencas politike trakti la aferon por efektive garantii la rajtojn. Ĉar, ĝenerale dirite, lingvo esence ne povas ekzisti kaj funkcii en unu persono nek en eta homgrupo, kaj ĉar lingvo ĉiam bezonas multe da "samlingvanoj", la garantiado estas efektivigita nur se la minoritata lingvo estos intence lernata kaj uzata de ne-parolantoj de la koncerna lingvo. Nome, Lingvaj Rajtoj efektiviĝas ne "en unu homo" sed "inter homoj".

Ekzemple, por plene garantii la rajtojn de la uzantoj de la aina lingvo en Japanio, oni devas prepari sociajn cirkonstancojn en kiuj la ain-lingvanoj povas ĝui servojn medicinajn, publikajn kaj edukon universitat-nivelan en la aina lingvo. Por efektivigi tion, multaj parolantoj de la japana lingvo, kiu

[2] A. Ĉiuj homoj
1. rajtas sin identigi kun la gepatra lingvo (aŭ kun pluraj gepatraj lingvoj), kaj la identigo povas esti agnoskita kaj respektata de aliaj homoj,
2. rajtas lerni sia(j)n gepatra(j)n lingvo(j)n kiel parola(j)n kaj skriba(j)n lingvo(j)n. (Tio signifas, ke minoritataj homoj rajtas edukiĝi en la gepatra lingvo.),
3. rajtas uzi la gepatran lingvon en preskaŭ ĉiuj publikaj lokoj (inkluzive de lernejoj).
B. Ĉiuj homoj povas fariĝi parolantoj de du lingvoj: gepatra kaj oficiala, en la lando, kie la gepatra ne estas oficiala lingvo. (Se ili havas du gepatrajn lingvojn, ili povas fariĝi parolantoj de tri lingvoj.)
C. La ŝanĝo de gepatra lingvo estas libervola, ne deviga.

[3] Pri la difino kaj funkcio de la unua lingvo, vidu Skutnabb-Kangas (2000:104).

estas majoritata en la lando, devas lerni la ainan lingvon aŭ konsenti elspezon por interpretado kaj tradukado. Tio ĉi estas fizike malfacila.[4] Fakte, la uzantoj de minoritataj lingvoj ne estas nur ain-lingvanoj. Ekzemple, la multiĝo kaj diversiĝo de enmigrintoj eksplode grandigos la laboron kaj koston. La koncepto de rajto postulas universalecon. Do, ankaŭ Lingvaj Rajtoj devas esti politike garantiataj eĉ al unu persono. La malebleco de (supre dirita) garantio de Lingvaj Rajtoj en multlingva cirkonstanco estas problemo tenata ankaŭ de Eŭropa Unio (EU), kiu celas egalrajte trakti la lingvojn de la membro-ŝtatoj (laŭ mia opinio la lingva politiko de EU nepre fiaskos). Pro tiu ĉi "absoluta malebleco" Esperanto povas havi signifan rolon en la garantiado de Lingvaj Rajtoj.

En la *Manifesto de Prago de la Movado por la Internacia Lingvo Esperanto*[5] lanĉita en la jaro 1996, ni povas vidi kiel reagis la homoj kiuj havas gvidan rolon en la Esperanto-movado al la nove aperinta koncepto de Lingvaj Rajtoj. En "5. Lingvaj Rajtoj", troviĝas priskribo:

> Ni asertas, ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por Lingvaj Rajtoj.

Kaj en "7. Homa emancipiĝo":

> Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homa komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Tiel la manifesto bazigas la signifon de Esperanto sur rajtoj.[6] Nome, ĝi argumentas ke, kiel "universala komunikilo", Esperanto povas malgrandigi la "potencodiferencojn inter la lingvoj", kaj la malegaleco inter diversaj lingvo-parolantoj proksimiĝas al estingo, kaj tiel kontribui al la garantio de Lingvaj Rajtoj. La strukturo de la argumento ŝajne ne havas rompon, sed troviĝas granda diferenco inter la difino pri Lingvaj Rajtoj supre montrita kaj la lingvo-rajtiga plano de la Manifesto de Prago.

R. Phillipson kaj aliaj konsideras grava, ke ĉiuj povas ĝui publikajn servojn en sia unua lingvo sur la sama nivelo de la parolantoj de supera lingvo, sed la Manifesto de Prago proponas uzi Esperanton en plurlingva cirkonstanco, anstataŭ la unua lingvo. La unuaj celas "levi" malsuperan lingvon al la nivelo de supera lingvo, sed la lasta celas "limigi" la uz-sferon de supera lingvo al la

[4] Tamen kiam ni traktos la minoritatajn lingvojn, ni devas konsideri prioritaton. Ekzemple, la uzantoj de ne-voĉa lingvo, nome man-lingvo, estas komplete apartigitaj de la komunikada rimedo de majoritata voĉa lingvo. Do, ni bezonas unue trakti tiun ĉi aferon.

[5] Vidu `http://www.jei.or.jp/hp/materialo/prago_j.htm` (originalo kaj japanlingva traduko).

[6] Tiun ĉi punkton Kadoja (2006a) traktas el pli vasta vidpunkto. Tamen estu atenta pri tio, ke la sfero en kiu Esperanto utilas por garantii Lingvajn Rajtojn estas tre limigita.

sama nivelo de malsupera lingvo, per la uzo de ponto-lingvo (Esperanto) en la loko kie troviĝas parolantoj de malsamaj lingvoj. Kiel ni jam supre vidis, "levi" ne povas eviti absolutan fiaskon. Do, limigi la uz-sferon de supera lingvo estas racia solvo.

La Manifesto de Prago konsideras, ke (prefere) oni ne insistu "uzi sian unuan lingvon" en multlingva cirkonstanco, se oni povas efektive komunikadi kun respekto egale al ĉiuj lingvoj. Tiu ĉi sinteno staras eĉ kontraŭ la "rajto uzi lingvon kiun oni volas uzi, por sia socia vivo, sen iaj ajn malhelpoj". Nome, la bazo de la Manifesto de Prago estas "rajto komunikadi egalrajte", sed ne "rajto uzi lingvon kiun oni volas uzi". Tiu ĉi bazo unu paŝon progresigis la koncepton de Lingvaj Rajtoj, kiu naskis vidpunkton trakti lingvon de la flanko de rajtoj. En tiu ĉi moderna epoko, en kiu homoj facile moviĝas de lando al lando, se ĉiuj homoj insistus la rajton ĉiam uzi lingvon kiun oni volas uzi, oni devus ĉiam akompanigi interpretistojn, aŭ ĉiuj homoj devus lerni ĉiujn lingvojn. Sed tio faros Lingvajn Rajtojn malefektivigeblaj surpaperaĵoj. La Manifesto de Prago venkis la supre menciitan "absolutan maleblecon" per kreiva ŝovado de la koncepto de rajtoj al rajto egalrajte komunikadi.[7] Tiu ĉi "ŝovado" ne difektas la rilaton inter la unua lingvo kaj la identeco de la uzantoj. Ĉar ni ne povas pensi, ke la identeco de la uzantoj estas difektita, se ĝi estas sufiĉe agnoskita socie kaj ne estas devigata grandan malavantaĝon, eĉ se ĝia uz-sfero en la socio estas relative limigita.

## 3. Lingvaj Rajtoj kiel kriterio de valoro: pri valoro por Lingvaj Rajtoj

La universalan valoron kiun Esperanto havas por garantii rajtojn de lingvo kaj komunikado mi nomu *valoro por Lingvaj Rajtoj*, alivorte *laŭlingvorajta valoro*.

Esperanto povas provizi al la uzantoj diversajn valorojn, inkluzive valoron por kontentigi (privatan) ĝuon. La enkonduko de la koncepto de *valoro por Lingvaj Rajtoj* ebligas al ni konscie distingi la multajn valorojn kiujn Esperanto havas.[8]

[7] Pri la neceso ŝovi kaj interpreti Lingvajn Rajtojn al la rajto de komunikado legu Kadoja (2006b). Kaj, la maniero por interŝanĝi ideojn nomata "komunikado" ĝenerale havas konsiderindan problemon. Ĉar lingvo estas nur unu elemento de komunikado, "elekto de konvena lingvo" estas nur unu necesa kondiĉo por efektivigi egalrajtan komunikadon.

[8] Ekzemple, kiam movadanoj de Esperanto montras pozitivan flankon de Esperanto kaj rekomendas la lingvon, ili kutimas arbitre montri diversajn valorojn (ekzemple, Esperanto utilas por garantii rajtojn; Esperanto estas interesa; per Esperanto oni povas vojaĝi malmultekoste, k.t.p.). La koncepto de valoro por Lingvaj Rajtoj funkcios por distingi la valorojn.

Ĉar Esperanto estas planita lingvo, troviĝas du faktoroj kiuj donas al ĝi valoron por Lingvaj Rajtoj kaj ebligas al ĝi esti utila por garantii Lingvajn Rajtojn. La unua estas ke principe Esperanto ne havas homojn kiuj parolas ĝin kiel la unuan lingvon (denaskaj parolantoj). La alia estas ĝia facileco por lernado.[9]

La facileco signifas, ke la kosto kiun oni devas prepari kaj dediĉi por ellernado de la lingvo, estas relative malgranda. La kosto por lernado estas dividebla en kelkajn elementojn. Nome, kapablo, tempo kaj mono. La rezulto de lingvolernado ricevas influon de: lingva kapablo de la koncerna lernanto; tempo dediĉebla al la lernado; kaj sufiĉa monrimedo, kiu ebligas al la lernanto dediĉi longan tempon kaj prepari bonan situacion por lernado. Tio, ke la kosto estas malgranda, signifas, ke la grando de la preparita kaj dediĉita kosto ne tre influas al tio, ĉu la lernanto povas atingi iun nivelon kaj akiros iugradan lingvokapablon. Minimuma lernokosto estas necesa al ĉiuj homoj, same kiel ĉiuj bezonas minimuman materialon por teni la vivon. Kaj eĉ se ne ĉiuj, multaj homoj povas prepari minimuman lernokoston. Do, lingvo kiu postulas malmulte da kosto por lernado povas relative egale garantii la atingon de la lernado. Nome, egaleco de ŝanco garantias la egalecon de rezulto.

La valoro por Lingvaj Rajtoj kiun Esperanto havas donas al la lingvo funkcion kiu ebligas pli egalrajtan komunikadon. La funkcio venas de la manko de la homoj kiuj parolas ĝin kiel la unuan lingvon kaj la malgranda kosto por lernado. Kaj pli grave estas, ke ju pli malgranda estas la kosto por lernado, des pli la egalrajtiga funkcio de Esperanto estos efektivigita sur alta nivelo, kaj des pli la valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj estos atingita sur alta nivelo. Tiuj ĉi karakteroj de Esperanto preparas necesan kondiĉon por ebligi komunikadon kiu kontentigas Lingvajn Rajtojn.[10]

Tiu ĉi socia bazo de Esperanto, nome la mekanismo kiu naskas universalan valoron de Esperanto, estas ekstreme simpla. Kvankam ofte ĝi ne estas konsciata, por movadaj aktivuloj ĝi estas preskaŭ memkomprenebla. Sed, laŭ mia vido, troviĝas granda distanco inter la nuna reala stato de la Esperanto-movado kaj la teoria bazo de Esperanto. Al mi ŝajnas, ke la movado ne ĉiam iras kun atento al la valoro por Lingvaj Rajtoj, kiu donas socian kaj etikan bazon al la disvastigo de Esperanto, kaj al la mekanismo kiu naskas valoron por Lingvaj Rajtoj. Alivorte, la "realo" kontraŭdiras al la "ideo". Tiu

[9]Estas konate per spertoj, ke Esperanto estas rimarkinde facile lernebla kompare al aliaj lingvoj, pro la malgranda kvanto de memorendaj aferoj, danke al ĝia simpligita gramatiko kaj sistema vortofarado. Sed, hodiaŭ ni bezonas vastan kaj pozitivan studon pri tio: kiomgrade kaj en kiu senco la lernado estas facila.


[10]Bonvolu atenti, ke temas nur pri necesaj kondiĉoj. Komunikado kiu garantias Lingvajn Rajtojn ne povas efektiviĝi nur per uzo de Esperanto. Krom lingvo, estas aliaj faktoroj por komunikado kiuj kontentigas Lingvajn Rajtojn. La temo: *Kio estas la komunikado garantianta la Lingvajn Rajtojn* devas esti kalkulita kiel unu el la taskoj de teoriaj studoj de la Esperanto-movado.

ĉi kontraŭdiro aperas plej evidente en la sinteno de la Esperanto-movado kaj Esperanto-parolantoj pri la lernado de la lingvo. Pri tiu ĉi punkto ni traktu en la sekvanta sekcio.

## 4. Sinteno pri lernado de Esperanto laŭ la vidpunkto de la valoro por Lingvaj Rajtoj: faltruo en la koncepto de laŭgrada progreso de lernado

Kio estas la sinteno pri Esperanto-lernado kiu kontraŭas al la teoria bazo de Esperanto traktita en la lasta sekcio? Koncize dirite, tio estas la pensmaniero: "Lernado de Esperanto valoras. Do ju pli multe ni lernos, kaj ju pli lerta lingvo-uzanto ni fariĝos, des pli alta valoro estos atingita." Laŭ tiu ĉi penso, relative alta lingva nivelo estas laŭdata, respektata kaj revata, sed male, relative malalta nivelo estas konsiderata kiel konkerenda stato. Kie, tamen, troviĝas problemo en tiu ĉi tre ĝenerala pensmaniero?

La penso, ke lerni intensive kaj akiri altan lingvan nivelon estas bona afero, kondukas nin al la sinteno pli alte taksi lingvo-uzantojn kiuj atingis altan nivelon per "intensiva lernado" kaj per "amasa dediĉo de energio-materialoj por lernado", proporcie al ilia nivelo de lingvo-uzo.





*Figuro 1.* Koncepto de laŭgrada progreso de lernado.

Tion ĉi oni povas nomi *koncepto de laŭgrada progreso de lernado* (figuro 1). Ekzemple, Lingva Ekzameno kaj Beletra Konkurso, kiuj estas konstante okazigitaj de Esperanto-organizaĵoj, verŝajne celas publike laŭdi altnivelajn

lingvo-uzantojn, per la konkursado (kaj tiel stimuli lernantojn al pli alta nivelo).[11]

En la fono de tiuj ĉi eventoj videblas la koncepto de laŭgrada progreso de lernado. Tamen, tiuj ĉi pensmaniero kaj la eventoj estas kontraŭdiraj, se oni staras sur la sinteno por laŭeble grandigi la valorojn por Lingvaj Rajtoj, kiuj estas sociaj bazoj de Esperanto.[12] "Laŭeble intensive lerni Esperanton" signifas, ke oni preparas kaj ŝutas al la lernado multe pli grandan kvanton da kosto ol "minimume necesan". Tamen en tiu okazo la atingota valoro por Lingvaj Rajtoj nepre pli malgrandiĝos. Ju pli multe da (aŭ superflua) energio-materialo oni ŝutos, des pli la valoro por Lingvaj Rajtoj malaltiĝos, eĉ se oni gajnos tre altan kapablon por lingvo-uzado.




*Figuro 2.* Reduktiĝo de la valoro por Lingvaj Rajtoj.

Ĉe la komenco de lernado (la origino en figuro 2) la atingita valoro por Lingvaj Rajtoj estas 0. Komence, ju pli altan lingvan kapablon oni akiros, des pli alta fariĝos la atingita valoro por Lingvaj Rajtoj. Sed kiam la kvanto de energio-materialo por lernado venas al la punkto $V$, la valoro por Lingvaj Rajtoj atingas la maksimumon, kaj poste la valoro daŭre malaltiĝas laŭ la grandiĝo de la konsumkvanto de energio-materialo por lernado. Tio ĉi estas

[11] Eĉ se Esperanta beletro celas "kunekziston de facilaj esprimoj kaj profunde literaturaj valoroj de la lingvo", Beletra Konkurso distingas kaj juĝas "beletran Esperanton" disde "ordinara Esperanto". Ĝi enkondukas en la Esperanto-movadon kaj ĝian lernadon la koncepton "beletreco" kaj starpunkton kiuj estas tute indiferentaj al garantiado de Lingvaj Rajtoj.

[12] Ĉi tie mi traktas ĝenerale la sintenon de la Esperanto-movado, sed ne tiun de individuo. Estas tre varie, kion unuopaj homoj atendas de Esperanto, kaj kiel agi por la lingvo. Mi montras problemojn de la Esperanto-movado surbaze de la socia fundamento kiun la movado manifestas.

rezulto de la *troa aŭtoritateco kaj potenco* montrotaj en la posta sekcio. Ni konsideru konkrete. Novaj lernantoj, kiuj progresas en la lingvo paŝon post paŝo, spertos egalrajtan komunikadon en multlingva cirkonstanco, kaj forte sentos kun miro, ke ilia sfero de komunikado pli kaj pli grandiĝas. Tio ĉi estas la fenomeno kiun donas al ili la atingo de la valoro por Lingvaj Rajtoj. Tiam ili rimarkos, ke la kvanto de energio-materialo por lingvolernado necesa por atingi certan nivelon de komunikado en "ordinaraj fremdaj lingvoj" estas multe pli granda ol tiu por la lernado de Esperanto. Sed kiam la sumo de energio-materialo por lernado superos la punkton $V$ en la figuro 2, ilia sento perdiĝos (ĉar la proporcio de konsumita energio kaj la atingo en la lernado de Esperanto fariĝas malgranda aŭ sama kiel tiu de ordinaraj lingvoj). Konstante lerni dekojn da jaroj, ellegi ĉiujn klasikaĵojn kaj posedi ĉiuj Zamenhofajn esprimojn aldonas nenion al la valoro por la Lingvaj Rajtoj. Ĉar nur tre malmultaj homoj disponas pri la granda kvanto da energio-materialo por la lernado. Do, tio ĉi kontraŭstaras al la egalrajteco kiun la Esperanto-movado volas realigi.

Troviĝas ankaŭ alia problemo ĉe "alta kapablo de lingvo-uzo", kiu ebligas al la lerta parolanto stari sur supera pozicio en la komunikado. Ĉar lertaj parolantoj povas regi la komunikadon laŭ sia volo, utiligante "riĉajn" esprimojn, abundan vorto-provizon, fluan paroladon, pri kiuj ne disponas novaj lernantoj de Esperanto. Tio ĉi signifas akiradon de potenco en la komunikado. La diferenco de la nivelo de lingvo-uzo estas la diferenco de potenco en komunikado. Ju pli la diferenco grandiĝos, kaj ju pli la supereco altiĝos, lerta uzanto senkonscie akiros "troan potencon" en komunikado. En la komunikado garantianta Lingvajn Rajtojn, tiu potenco malhelpas la efektiviĝon de la rajtoj.[13] Alivorte, "alta nivelo de lingvo-uzo", kiu estas por la efektivigo de la valoro por Lingvaj Rajtoj, ekhavas inversan funkcion. Tial post la punkto $V$ en figuro 2, la valoro por Lingvaj Rajtoj konstante malgrandiĝas.[14]

Tiu ĉi fenomeno estas la sama kiel tio, ke ne-denaskaj parolantoj malkuraĝiĝas antaŭ denaskaj parolantoj de la unua lingvo, kaj falas sur malavantaĝan staton en komunikado. En la fono de tiu ĉi fenomeno kuŝas senkon-

[13]Kompreneble homoj kiuj havas "troan" nivelon de lingvo-uzo, kontribuas ekzemple por verkado de lerniloj, kaj havas gravan rolon en la Esperanto-movado totale. En tiu senco ili kontribuas al la valoro por Lingvaj Rajtoj. Por ne nuligi la kontribuon, ili tamen devas konscii pri sia potenco en la kampo de komunikado, kaj atente zorgi, ke ili ne mis-uzu la avantaĝon. Vidu piednoton 15.

[14]Kelkaj kiuj vidis ĉi tiun figuron, demandis la aŭtoron: "Kiel vi povas montri la punkton $V$, t.e. la plej propran kvanton de lernado kaj lingvo-kapablo. La punkto estas tute arbitra kaj sensenca, se vi ne povas montri tion, ĉu ne?". Kompreneble konkretigi la punkton $V$ estas ne facile, kaj mi ne estas plene preta tuj fari tion (miaj ideoj estas parte montritaj en la sekvantaj sekcioj). Sed oni povas atesti *la teorian ekziston* de $V$, kaj ĉi tiu studo celas atentigi la Esperanto-movadano pri tio. Alivorte ĉi tiu tezo donas al la movado ĝis nun nekonatan novan taskon gravan, kiu koncernas Lingvajn Rajtojn.

scia diferenco de potenco, kiun la denaskaj parolantoj ne intencas havi. Oni emas konsideri, ke inter la uzantoj de Esperanto ne naskiĝas la potenca rilato kiun oni spertas inter la parolantoj de neplanitaj lingvoj, ĉar Esperanto estas lingvo kiun ĉiuj devas lerni por posedi. Sed tiu ĉi penso kaŝas la potencan rilaton kiu fakte troviĝas inter la uzantoj de Esperanto. Estas certe, ke inter la uzantoj de Esperanto ne troviĝas tia potenco-rilato, kian oni vidas inter la uzantoj de neplanitaj lingvoj, sed fakte alispeca potenco-rilato kreiĝas ĉefe pro "diferenco de la niveloj de lingvo-uzo". Ĉu Esperanto-uzantoj kun malalta lingva nivelo ne ŝrumpiĝos antaŭ altnivelaj uzantoj?[15] En Esperanta komunikado, lertaj uzantoj ĝuas la "profiton", ke ili povas pli altkvalite kaj pli laŭvole esprimi sin ol mallertaj uzantoj. Tiu ĉi malekvilibra rilato fariĝas faktoro kiu malhelpas atingon al la valoro de Lingvaj Rajtoj. Do, la Esperanto-movado bezonas havi instruplanon per kiu oni celu la punkton $V$ en figuro 2.[16] Ni devas forlasi la antaŭjuĝon, ke "des pli bone, ju pli multe ni lernos kaj ju pli lerta ni fariĝos". Ni devas klare koncepti, ke la antaŭjuĝo kontraŭas al la valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj. Estas tre grave, ke ni nepre ne forgesu la ekirpunkton kian valoron Esperanto-lernado havas, kiam ni volas rapide atingi altan lingvonivelon.

Mi ripetas, ke unuopaj homoj rajtas libere ŝuti kiom ajn grandan kvanton da kosto por lerni Esperanton, ne por la valoro de Lingvaj Rajtoj sed por sia propra celo (ekzemple por memkontentiĝi per realigo de laŭeble alta nivelo de lingvo-uzo). Tamen tiuj personoj devas esti akre kritikitaj, se ili konsideras sian altan lingvonivelon, akiritan per granda kvanto da kosto, "realigo de valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj", aŭ enkorpigo de "universala valoro". Ignori la diversecon de la "valoro de Esperanto", kaj konfuzi la realigon de valoro por Lingvaj Rajtoj kun volo al (privata) valoro, kiu tute ne havas universalecon, estas kvazaŭ ago, kiu nuligas la valoron por Lingvaj Rajtoj.

Do, se la Esperanto-movado havas sian bazon en la efektivigo de la valoro por Lingvaj Rajtoj, ni devas senĉese kaj kritike reekzameni nin surbaze de la teoria fundamento, por ke ni ne vidu pozitive la ŝuton de granda kvanto da

[15] Laŭ mia sperto, estas ne malofte, ke la vorto "komencanto" estas uzata por moki iun. Tiu ĉi diskriminacio, klasifiki la lingvo-uzantojn laŭ ilia lingva nivelo, rekte kontraŭas al la ideo de la Esperanto-movado. Tamen en mia proksimo mi ne vidas kritikon al tiu diskriminacia sinteno. Kredeble, tio ĉi rezultis el la fakto, ke regas la Esperanto-movadon la koncepto de laŭgrada progreso de lernado, kiu malalte taksas "esti nova lernanto".

[16] Kelkaj eble havos la sekvantan demandon. "Jaron post jaro ekde kiam la lernantoj komencis lerni Esperanton, ili *nature* fariĝas pli lertaj kaj kapablaj Esperanto-uzantoj. Ĉu ili ankaŭ estas malhelpantoj kontraŭ Lingvaj Rajtoj?" Certe iuj spertiĝos grade kaj povos fariĝi kapablaj. Sed kiel oni povas ekscii el la ekzisto de la esprimo *eterna komencanto*, fariĝi pli lerta kaj kapabla ne eblas sen konscia konsumado de energio-materialo por la lernado. Alie, laŭ ĉi tiu studo, ankaŭ tiaj laŭtempaj lertuloj povos funkcii kiel kontraŭantoj de Lingvaj Rajtoj, se ili komunikadas lingve kaj psikologie premante malpli kapablajn Esperanto-uzantojn. Pli lertaj, t.e. relative pli fortaj uzantoj havas devon konscie ne fari tion, kio akompanas longan Esperanto-uzantecon, se ili subtenas gardi Lingvajn Rajtojn.

energio-materialo al la lernado, kaj por ke la lernado de Esperanto ne devojiĝu al "efektivigo de la valoroj ne por Lingvaj Rajtoj", sub la slogano de "deziro al la valoro por Lingvaj Rajtoj". Tiu ĉi konfuzo de "diversaj valoroj" kutime okazas senmalice kaj senkonscie. Ne estas troigo, ke mi diras, ke Esperanto-lernantoj ekspluatas la Esperanto-movadon, nome ke ili havas subkonscian volon modifi la lernadon de Esperanto al "realigo de privata valoro". Ni bezonas atentigi lernantojn de Esperanto pri tiu ĉi logo. Mi diru, ke seriozaj kaj bonkoraj Esperanto-lernantoj estas "atentindaj estaĵoj".

Kompreneble, celi kulturajn atingojn en la procezo de la Esperanto-movado (ekzemple, disvolviĝon de literaturo, lertiĝon en lingvo-uzo) ne devas esti neite. Sed se la kulturaj atingoj fariĝos ekskluzive ĉefaj celoj, la atingoj (kromaj derivaĵoj) povas kontraŭstari kaj erozii la originan celon (valoro por Lingvaj Rajtoj). Kulturaj atingoj plenumitaj de unuopuloj fakte havas "valoron". Sed tiu ĉi valoro estas "privata valoro" nur por manpleno da "riĉaj" homoj, kiuj povas ĝui la kulturajn atingojn. (Por novaj Esperanto-lernantoj tiuj ĉi "kulturaj atingoj" estas aĵoj nur por gape rigardi.) Se, rezulte de "altaj kulturaj atingoj", kreiĝas cirkonstanco (tro potencaj Esperanto-uzantoj) kiu malhelpas komunikadon por Lingvaj Rajtoj, la Esperanto-movado perdas sian signifon. Ni devas venki tiun ĉi problemon, kiun la Esperanto-movado ne klare konceptas pro manko de sufiĉa teoria esploro.

Ĝisnuna argumento sugestas, ke unue ni ekzamenu la nunan staton de la Esperanto-movado kaj la instruado, surbaze de ĝia teoria fundamento,[17] kaj ke ni ĉiam serĉu la vojon kiu ebligas maksimume malgrandigi la koston por lernado kaj maksimume grandigi la valoron por Lingvaj Rajtoj. Por tio gravas trovi ekvilibran punkton inter la valoro por Lingvaj Rajtoj kaj la kosto por lernado. Lerni aŭ lernigi la lingvon senkonsidere la punkton, estas tre danĝera ago, kiu subfosas la bazon de la Esperanto-movado.

Tiu ĉi ekzamenado pri la koncepto de Esperanto-lernado estas nur unu parto de la reekzamenado pri la nuna stato de Esperanto surbaze de la valoro por Lingvaj Rajtoj. Krom la koncepto de lingvolernado, mi montru du esplorindajn problemojn.

Unu el ili estas la uzo de idiotismoj kaj malfacilaj vortoj, kiuj estas senpripense enkondukitaj el grandaj naciaj lingvoj. Ni rekonstatu, ke Esperanto estas facile lernebla pro la planiteco kaj pro tio, ke ĝi ne havas privilegiajn denaskajn parolantojn. Tiuj ĉi karakteroj naskis la valoron de Esperanto por Lingvaj Rajtoj, kaj donis al Esperanto universalan kaj etikan bazon. Do, ni devas atenti, ke la facileco kaj malmultekosteco laŭeble ne perdiĝu, dum ni disvastigas kaj utiligas Esperanton. Sed, la nuna stato ne estas tia. Ekzemple nunaj eŭropaj lingvoj komune posedas multajn abstraktajn vortojn venintajn de la latina kaj greka lingvoj. Ankaŭ Esperanto senkritike enkondukis

[17] Vidu Kadoja (2004:8–9, 2001:83–88).

la vortojn. Ĉar ili ne estas vortoj faritaj per kunmetado de bazaj radikoj, ili estas "luksaj vortoj", kiujn oni devas aparte lerni.[18]. Ekzemple, *etnografio, diplomatio, filozofio, kilometro*, k.t.p. Ĉar la signifo de tiuj ĉi vortoj estas malvasta, ili ne estas utilaj por formi novajn vortojn. Kaj ili ne estas ofte uzataj. Do, lerno-efikeco de tiuj vortoj estas mizere malgranda. Nome "luksaj vortoj" formas faktoron kiu difektas la facilecon kaj malmultekostecon de Esperanto-lernado.

Tiu ĉi influo de modernaj eŭropaj lingvoj ne estas limigita nur pri vortoj. Idiotismoj kaj diversaj formalaj reguloj por komunikado eniris en Esperanton, kaj donis ne-necesajn ŝarĝojn al Esperanto-lernado (Kadoja 2001:87−88). Ekzemple, la maniero de saluto (ekzemple manpremo), idiotismoj prenitaj el grandaj lingvoj, ekzemple la esprimo *de tempo al tempo*.[19]

Kiam ni ekzamenas la staton de Esperanto el la vidpunkto de la valoro por Lingvaj Rajtoj, aperas antaŭ ni alia flanko, kiun ni devas rigardi. Tio estas, ke Lingvaj Rajtoj apartenas ĝenerale al (homaj) rajtoj, kaj ke la rajtoj lingvaj kaj ceteraj homaj devas malhavi kontraŭdiron inter si. Se la Esperanto-movado havas sian bazon sur garantiado de la rajtoj, kaj se ĝi volas firme resti sur tiu bazo, ĝi ne povas ignori nek helpi atencojn kontraŭ iuj ajn rajtoj.

Se ĝi metas sian bazon sur Lingvaj Rajtoj, sed restas indiferenta al la atenco kontraŭ rajtoj ne-lingvaj, ĝia bazo sur Lingvaj Rajtoj fariĝas ne valida.

Unu problemo kondukita de la supra argumento estas el-genr-igo de Esperanto. La nuna Esperanto montras virinecon per aldono de sufikso *-in-*, kaj premisas seksan dualecon.[20] Nome ĝi havas ideologion[21] (antaŭjuĝon), ke oni povas klasifiki la homojn en la du kategoriojn viran kaj virinan (vidu Jamauĉi 2000, Sakura 2006 k.a.). Tiu ĉi karaktero kontraŭas al la egalrajteco de seksoj (rajto por egaleco), kaj ni bezonas serĉi alternativan esprimon, same kiel en la okazo de "malfacilaj vortoj" supre menciitaj. La pronomoj por la tria persono *li/ŝi* kaj vortoj formitaj per sufikso *-in-*, ekzemple *patrino/onklino*, ne estas esceptoj (Kadoja 2001:84–86). Aldone, la atentigo, ke "oni ne povas esprimi la koncepton (ŝi/onklino) sen indiko de la sekso", erare vidas la situon de la

[18] Vidu "Esperantaj vortoj kiujn mi ne ŝatas uzi", http://www3.ocn.ne.jp/~gthmhk/trmnr.html/#hazime . Tiu ĉi TTT-paĝo proponas ankaŭ anstataŭajn esprimojn kaj estas bona kaj utila paĝo por akiri informojn pri la koncerna temo. Laŭ la vidpunkto de tiu ĉi studo, kiu montris la valoron por Lingvaj Rajtoj kiel kriterion de Esperanto, tiu ĉi paĝaro prefere nomiĝu "Esperantaj vortoj kiujn oni devas ne uzi".

[19] La demando, kiel montri la signifon *de tempo al tempo* sen la idiotismo, estas facile solvebla. Ĉar ni havas diversajn anstataŭantojn por esprimi. Ekzemple, *unu aŭ du fojojn semajne*, *ne ofte*, *nemultfoje* k.t.p. La problemo kuŝas en tio, ke sen provi aliajn esprimojn oni restas nur sur elekto kiu kontraŭas al la valoro por Lingvaj Rajtoj.

[20] Vidu Itoigaŭa (2005) pri diskuto de ekstreme genrigita lingvo. La aŭtoro analizas la hispanan detalege sociolingvistike sur la bazo de genro-studoj.

[21] Bonvolu rememori *transgenrecon*, *inter-sekson* kaj komplike mult-tavolan strukturon de sekso. La ideo, ke oni povas ignori seksan minoritaton pro la absoluta minoritateco, estas diskriminacia, ĉar ĝi intence forpelas el la socio homojn kun certa karaktero.

problemo. La problemo troviĝas ne en tio, *kiel* ni esprimu la vorton *ŝi*, sed en tio, *kial* ni intencas fari la esprimon *ŝi*. Havi ideologion, ke ĉiuj homoj estas divideblaj en du partojn, viro/virino, kaj esprimi virinan genron per aldono de sufikso — tio ĉi estas duobla eraro, kaj formas seksan diskriminacion, kiu estas unu el la fundamentaj atencoj al homaj rajtoj. Ĉar la moderna socio staras sur dogmoj, nome seksa dualismo kaj ali-seks-am-ismo, naskiĝis tiu ĉi diskriminacio, kiu estas enkondukita ankaŭ en lingvojn. Fundamenti Esperanton per homaj rajtoj kaj doni al ĝi altan etikon kaj unversalecon nepre postulas de la homoj kiuj okupiĝas pri la Esperanto-movado ke ili rigardu diversajn diskriminaciojn en la moderna socio kaj kritike reekzamenu ne nur la lingvan sed la tutan socian vivon.

## 5. Ĝenerala rilato inter lingva demokratismo kaj lingva normo

Kiel ni vidis supre, kiam ni prilumas la Esperanto-movadon kaj ĝian nunan staton per la vidpunkto de la valoro por Lingvaj Rajtoj, kondukiĝas la principo, unuvorte ke la Esperanto-movado devas "montri lingvan normon" al la lingvo Esperanto. Tiu ĉi principo ŝajnas surpriza en la kunteksto de ĝenerala diskuto pri Lingvaj Rajtoj kaj lingva demokratismo, sed natura, se ni konsideras la jam konstatitan valoron de Esperanto por Lingvaj Rajtoj kaj ĝia facileco por lernado kaj malmultekosteco. "Montri normon" estas la karakterizaĵo kiun donas al Esperanto la valoron de Lingvaj Rajtoj en la Esperanto-movado. Do, kio estas "devi montri normon"?

La normo de lingvo konsistas el multaj faktoroj. Krom vortoprovizo kaj gramatikaj reguloj, apartenas al la faktoraro ankaŭ "adekvate" konsulti la socian kuntekston en kiu troviĝas komunikado en la koncerna lingvo. Tamen oni ne ĉiam obeas al unu sama normo, ĉar la lingva aktivado estas sub la forta influo de atributo (socia klaso, edukiteco, sekso) al kiu la lingvo-uzanto apartenas. Kiam la lingvo-uzantoj rimarkas la diferencon, okazas kontraŭstaro rilate al la lingva normo. Precipe, kiam la normo de homoj, kies socia kaj politika forto estas malgranda, ekregas la alian normon, la kontraŭstaro fariĝas plej akra. Se la homgrupo kun granda potenco povas etikedi la lingvan normon de la malpli forta homgrupo aŭ minoritato "devojiĝo" aŭ "pseŭdonormo", la kontraŭstaro pri lingva normo ne aperas sur socia scenejo. Sed kiam oni konstatas, ke la "devojiĝo" estas vaste akceptita kiel kutima uzo, okazas arda disputo, kiu normo estas "ĝusta" aŭ "ortodoksa/justa" (la disputo ofte fariĝas unuflanka akuzo fare de la grupo kiu povas regi amaskomunikilojn).

Kiam oni juĝas, kia devas esti la lingvo kaj kiel ĝi estu uzata, nome, kiam oni decidas la normon, nepre kuŝas demando de valoro. Sen iu ajn kriterio oni ne povas fari juĝon pri la demandoj. Tamen, kutime la kriterio ne estas klare

konceptita de la juĝantoj. Rilate al tiu ĉi punkto, unue ni vidu neplanitajn lingvojn, kaj pristudu iliajn konsciojn de normo kaj la fonon sur kiu troviĝas ilia kriterio de valoro.

En granda mezuro ekzistas du starpunktoj kiam oni diskutas pri la normo de neplanitaj lingvoj. Unu el ili estas priskribismo, kiu deklaras sin valoro-neŭtrala. Tiu ĉi starpunkto konsideras, ke oni ne povas montri kriterion por juĝi absolutan ĝustecon, kaj rigardas, ke ĉiuj esprimoj efektive nun uzataj estas egalvaloraj, ĝustaj kaj konformaj al la propra normo. Inter la malsamaj normoj ne troviĝas rilato supera-malsupera nek ĝusta-malĝusta. Tiu ĉi starpunkto klare montras sin en la frazo "La normo ne estas aĵo, kiun decidas registoj aŭ iuj kleruloj" (Kunihiro 2000:26-27). Ĝia "kriterio de valoro" estas demokratismo kaj egalrajtismo, ĉar ĝi traktas ĉiujn lingvojn kaj la parolantojn samvalore. La pensmaniero, ke lingvo ne estas propraĵo de malmultaj politikistoj kaj intelektuloj sed posedaĵo de ĉiuj (publiko), enhavas ideon, kies "ĝusta kriterio" estas egalrajtisimo. Ĉi tie ni devas esti atentaj pri tio, ke la valoro de demokratismo origine tute ne havas rilaton kun la lingvo mem. Ĝi estas valoro elektita kaj importita por konstrui lingvan normon de ekstere, nome, de kriterio referencata kaj konsiderata kiel kriterio universale valora en la komunumo de moderna socio.

La alia starpunkto en la koncepto de normo de neplanitaj lingvoj estas aŭtoritatisma normismo, nome, ke ĉiuj devas obei al la "ĝuste" starigita normo. Tiu ĉi pensmaniero referencas diversajn "aŭtoritatajn normojn" kiel fontojn de la ĝusteco, kaj akuzas esprimojn kiuj situas ekster la normo, kiel erarojn kaj devojiĝojn. Juĝi ĝustecon per la fama ŝtato-lingva vortaro, per esploristoj de la koncerna lingvo, per grandaj verkistoj, kaj per klasikaj verkoj, apartenas al tiu ĉi aŭtoritatismo-normismo. La gramatiko priskribisme konstruita povas aliformiĝi al iu aŭtoritata normaro. Samas ankaŭ juĝi lingvon per "beleco", kaj laŭdi iujn esprimojn "belaj".[22] Sed tiu ĉi "ĝusteco" karakterize ne povas eviti arbitrecon. Ekzemple, la lingvaj normoj montritaj de vortaroj, de "la oficiala studkomitato pri la japana lingvo", kaj de akademio, staras sur "ĝisnuna uz-maniero" kaj "origina difino kaj uzo de vortoj". Sed nenio objektive montras, kiam estas la tempo "ĝisnuna". Estas klare, ke la normoj venas nur de la flanko de aŭtoritatulo kaj aŭtoritata organizaĵo (Jasuda 2006:99).

Estas memkompreneble kaj oni ne bezonas diskuti kiu el la du starpunktoj estas preferinda. Ĉar lingvo estas publika ilo, se la lingva normo estas en la arbitraj manoj de iu socia grupo, oni povos juĝi ĉiutagajn esprimojn de popolanoj "malĝustaj", kaj perforte alĝustigi ilin. Fakte tio okazis

[22]Ekzemple, jam fiaskis la opinioj kiuj arbitre decidis "puran japanan" kaj deklaris la disvolvon de "ĝusta japana" kaj "bela japana". Vidu ekzemple la argumenton de Kaŭaguĉi k.a. (2005) kontraŭ Saitoo Takaŝi.

en la historio (ekzemple perforta "alĝustigo" kaj "normigo" de tiel nomataj "dialektoj").

*Tabelo 1.* Normo en neplanitaj lingvoj.

| | | |
|---|---|---|
| **priskribismo** | arbitreco, plasteco, kaj relativeco de lingvo estas antaŭkondiĉoj | lingvo-demokrata |
| **normismo** | arbitreco, plasteco, kaj relativeco de lingvo estas neataj | disciplinema, aŭtoritatema |

La lingva demokratismo, kiu havas sian bazon sur efektiva uzo de la lingvo, relativigas idiotismon kaj la valoron de la normo. Tamen, se ni vidas la aferon sur individua starpunkto, ĝi regas nin de supre, same kiel aŭtoritatismo-normismo. Ekzemple, kiel rezulto de amasa uzo de individuoj, naskiĝas idiotismoj, kaj kiam ili ekapartenos al normo, individuoj preskaŭ ne povas laborigi sian kreemon nek intencon. Unuj el la sennombraj furoraj esprimoj mortos, kaj kelkaj aliaj estos fiksitaj en ĉiutagan uzon, kaj poste normiĝos. La potenco de amaskomunikiloj kaj politiko ne povas grandskale interveni la procezon, krom escepta okazo de diktatura reĝimo. Kvankam la priskribismo traktas la normon lingvo-demokratisme, la lingva normo naskiĝas en homamaso, "ekstere" de la unuopaj uzantoj. Unuopuloj estas devigitaj nur akcepti ĝin.

## 6. Konscio pri lingva normo en la Esperanto-movado

En la antaŭa sekcio ni vidis la staton de lingva demokratismo en la normo de la neplanitaj lingvoj. Tamen, se ni ĝenerale rigardas la lingvan situacion en la nuna socio, kaj eĉ se la lingva normo estas demokratisma, la fenomenoj de lingvaj diskriminacioj konstante kreiĝas (Maŝiko 2002). La kritiko kontraŭ lingva imperiismo kaj kontraŭ lingva diskriminacio traktis tiun ĉi situacion. Kiel mi diris, Esperanto havas universalan signifon kaj valoron nur en tiu ĉi punkto, ke ĝi povas nuligi lingvan diskriminacion inter malsamaj lingvo-parolantoj, nome, ĝi havas almenaŭ parte funkcion por trakti Lingvajn Rajtojn kaj la koncepton de lingva diskriminacio, kiuj estas iloj por kritiki lingvan imperiismon.

Tiun ĉi valoron de Esperanto subtenas la planiteco, logikeco, relativa facileco kaj malgranda lerno-kosto, kiujn ebligas la fakto, ke Esperanto ne estas parolata kiel ies unua (gepatra) lingvo. Tiuj ĉi karakterizaĵoj, eĉ en limigita skalo, ebligas al la uzantoj de la lingvo efektivigi la garantion de Lingvaj Rajtoj. Do, se ni juĝas la normon de Esperanto laŭ lingvo-demokratismo, ni alvenas al la konkludo, ke ĝia kriterio staras nur sur unu punkto, ĉu ĝi

utilas por teni la "facile lerneblan econ" kaj "malmultekostecon".[23] Tial, la priskribisma sinteno, kiun ni traktis en la lasta sekcio, nome, juĝi ĝustecon laŭ la kriterio, ĉu la esprimo estas vaste uzata, estas kontraŭ al lingva demokratismo almenaŭ pri Esperanto. Se ni metos la bazon de la kriterio sur tion, ĉu la esprimo estas vaste uzata aŭ kiomgrade ĝi kutimiĝis, Esperanto komplikiĝos same kiel neplanitaj lingvoj, ekzemple la japana, kaj nepre perdiĝos la karakterizaĵoj de Esperanto kiuj ebligas la garantion de Lingvaj Rajtoj.

Tio ĉi estas la unua karakterizaĵo kiun la normo de Esperanto enhavas. Kaj la punkto kiu diferencigas Esperanton al neplanitaj lingvoj estas tio, ke ni povas ekzameni la normon. Malsame al la neplanitaj lingvoj, en la okazo de Esperanto, unuopaj personoj povas juĝi sub la lumo de Esperanta normo, ĉu la esprimo estas ĝusta kaj akceptebla.[24] En la okazo de neplanitaj lingvoj "ĝusteco" troviĝas en la grado de kutimiĝo aŭ agnosko de aŭtoritatulo, nome, ekster unuopuloj. *Sed la normo de Esperanto troviĝas en la interno de unuopuloj.* Tiu ĉi karakterizaĵo kiun la normo de Esperanto enhavas, preskaŭ ne estas agnoskita en la Esperanto-movado, kaj tial iuspeca tordiĝo estas portita en la Esperanto-movadon. Mi montru konkretajn ekzemplojn.

"Facila Frazfarado" de Saka Tadaŝi, aperigata ĉiunumere sur la organo de Japana Esperanto-Instituto (JEI), *La Revuo Orienta*, provizas utilan lernomaterialon al la Esperanto-lernantoj japanaj. Kredeble tiu ĉi estas la plej multe legata lernilo en la lando. La rolo de lingvo-lernilo estas "montri kaj klarigi normon". Do, tiu ĉi seria lernilo sur la organo de JEI estas la plej utila materialo por mezuri ĝeneralan konscion pri lingva normo en Esperantujo. En tiu ĉi serio la legantoj tradukas la taskon prezentitan antaŭe, kaj la gvidanto korektas kaj komentas la tradukaĵon. En la komentoj troviĝas jenaj frazoj: "Tio ĉi ne estas kutima esprimo", "Oni ne diras tiel", krom "Oni ne povas diri tiel", "Tio ĉi estas eraro".[25] La lastaj du komentoj estas donitaj al esprimoj kiuj kontraŭas al Esperanta gramatiko, aŭ kies logiko estas di-

[23]En la Esperanto-movado kaj en studoj pri Esperanto fojfoje oni prenas Zamenhofan ekzemplon kiel la bazon de la normo. Tio ĉi tamen povas difekti la karakterizaĵon de lingva demokratismo, kiu donas al Esperanto universalan valoron. Ĉar oni povas perdi la facilecon en lernado per normigo de Zamenhofa ekzemplaro. Ni devas kritike ekzameni la "religiecan kredon" al Zamenhofaj ekzemploj. Vidu ankaŭ la piednoton 26.

[24]Tiu ĉi karakterizaĵo ebligas al la uzantoj kreeme evoluigi la lingvon. Vidu Kadoja (2004).

[25]Ekzemple, "Oni ankaŭ povas diri 'mezuras sian korpan pezon, mezuras sian korpopezon', sed ne diras 'mezuras sian pezon, pesas sian korpan pezon' (Saka 2006b:14, kontribuinto ne montrota, same poste), " 'senti' estas kutime uzata por 'senti ĝojon/malĝojon, doloron, varmon/malvarmon, odoron k.t.p. Do, la esprimo 'senti libron interesa' donas strangan impreson al aŭdantoj. En la sama kialo la esprimo 'mi sentis grandan intereson' ne estas uzata ĝenerale. La esprimo 'Mi estis tre interesa' estas eraro" (Saka 2006a:31). La problemo estas tia montro-maniero de la normo. Per "tiel ne diras" kaj "esprimo kutime ne uzata" oni juĝas iujn esprimojn "ne preferindaj". Ni devas serioze konsideri la signifon de la fenomeno.

fektitaj. La antaŭaj du montras, ke la esprimo ĝenerale ne estas uzata. La sinteno juĝi iun esprimon "malĝusta" laŭ la kriterio de "ĝeneraleco" almenaŭ ne estas aŭtoritatisma, sed konvenciisma. Tiu ĉi sinteno unuavide ŝajnas esti konvena al lingva demokratismo, kaj preferinda laŭ la lingva normo. Sed kuŝas problemo, ke ĝi ignoras la diferencon de la karakterizaĵoj inter planita kaj neplanitaj lingvoj, kaj ke ĝi misaplikas konscion de normo de neplanitaj lingvoj al planita lingvo. Ni devas rigore eviti enkondukon de konvenciismo en Esperanton, ĉar, kiel mi jam montris, ĝi difektas la fonton de la universala valoro de Esperanto, nome facilecon de lernado.[26] En la tabelo 2 vi vidos la karakterizaĵon de la starpunkto de Esperanto pri normo-kompreno (estu atentaj pri la diferenco al la tabelo 1).

*Tabelo 2.* Normo en planita lingvo.

| | | |
|---|---|---|
| **priskribismo** | agnoskas arbitran ŝanĝiĝon kaj akumuladon de konvencio de lingvo | nuligas karakterizaĵojn de planita lingvo |
| **normismo** | rifuzas arbitran ŝanĝiĝon kaj akumuladon de konvencio de lingvo | konservas karakterizaĵojn de planita lingvo/ lingvodemokratisma |

Konciza respondo al la demando, kia devas esti la normo de lingvo, povas esti "lingva demokratismo". Sed la enhavo de "esti laŭ lingva demokratismo" estas tute malsama inter neplanitaj lingvoj kaj planita lingvo kiel Esperanto. Oni akiras planitan lingvon per konscia lernado. Oni deziras al planita lingvo funkcii kiel ponto-lingvo kaj labori por efektivigo de lingva demokratio. Kontraste al tio, oni akiras neplanitan lingvon per senkonscia lernado. La lingvo funkcias kiel ĉiutaga komunikilo. Tiu ĉi diferenco estas grava, kiam ni decidos la lingvo-demokratisman normon. Rezulte de tiu ĉi diferenco, la signifo de priskribismo kaj konvenciismo fariĝas inversa por planita kaj neplanitaj lingvoj. Se ni konfuze decidos la normon sen klara konscio pri tiu ĉi diferenco, la karakterizaĵoj de planita lingvo senfine proksimiĝas al tiuj de ne

[26]Unu nepra rezulto de Lingvaj Rajtoj en la kampo de planlingvo estas normismo. En la 4-a sekcio mi kritikis "troan potencon", kaj tio povus ŝajne esti kontraŭdiro kompare kun la gardado de normismo. Ĉar normismo estas ofte realigita aŭtoritatece de-supre perforte. Sed tio estas tuta miskompreno. Gardi normismon en Esperantujo signifas gardi Zamenhofan Fundamenton, aŭ evoluigi kaj transformi la lingvon en la kadro de la Fundamento, kiu estas unusola aŭtoritato. Sed tio ne signifas senpense obei Fundamenton (vidu ekzemple la supran diskuton pri idiotismo, sekso kaj luksaj vortoj). Tiel oni povos eviti dogmismon, kiu nur laŭvorte obeas Fundamenton. Kritikendaj estas homoj, kiuj malebligas laŭlingvorajtan komunikadon, konscie kaj nekonscie, uzante lingvokapablecon kaj ekspluatante Fundamenton.

planitaj lingvoj, kaj la planita lingvo perdos la valoron por Lingvaj Rajtoj kaj la kondiĉon kiu ebligas garantion de Lingvaj Rajtoj.[27] La kritika esploro en tiu ĉi studo pri Esperanto estas unu el la bazaj laboroj por eviti tion.

*Tabelo 3.* La bazoj de normoj de planita lingvo kaj neplanitaj lingvoj.

| planita lingvo (Esperanto) | neplanitaj lingvoj (naciaj lingvoj) |
|---|---|
| **demokratisma, konforma al Lingvaj Rajtoj** | |
| Lingvaj Rajtoj, rajto por komunikado (normismo) | respekto al ekzemploj, idiotismoj kaj efektiva uzo akumuliĝintaj el ĉiutaga uzo (priskribismo) |
| **nedemokratisma, malkonforma al Lingvaj Rajtoj** | |
| respekto al ekzemploj, idiotismoj kaj efektiva uzo akumuliĝintaj el ĉiutaga uzo (priskribismo) | devigo / agnosko fare de aŭtoritato (vortaro), potenco (normismo) |

Doni al Esperanto la fundamenton de valoro por Lingvaj Rajtoj fariĝos la bazo por decidi la normon kaj ĝian priskribon. Ni bezonas esplori ne nur la ĝis-nunan staton de Esperanto kaj la movadon, sed ankaŭ havi perspektivon, kiel progresigi la movadon kaj kia lingvo Esperanto devas esti. Tiu ĉi studo, kiu komenciĝis ĉe la valoro por Lingvaj Rajtoj, devas esti pliprofundigita.

[27] La principo "esti normisma por konservi la valoron por Lingvaj Rajtoj" kondukas nin al la ideo, ke ni evitu facilaniman enkondukon de novaj vortoj kaj idiotismoj. Tiu ĉi ideo tamen ne kontraŭstaras al la lingva kresko de Esperanto, nek al ĝia beletra kaj kultura evoluo. La alta povo de vorto-farado, la gramatiko kaj vortoprovizo jam ekzistanta plene kontentigas la neceson de beletraj esprimoj (ekzemple, parto de la verkoj de L. L. Zamenhof ŝajnas esti pionira provo. Same estas la alternativa esprimo por diskriminaciaj vortoj, kaj novaj esprimoj naskitaj en ĉiutaga komunikado). Montri la kreemon en la kadro de jam ekzistantaj rimedoj, tra provoj kaj eraroj, kaj tiel kontribui al la altigo de la valoro por la Lingvaj Rajtoj, estas la propra stilo de Esperanto. Ekzemple, ni serĉu esprimojn freŝajn, belajn, kaj facile kompreneblajn. Beletraĵo, kiu troviĝas ekster la "kadro de konservado de la valoro por Lingvaj Rajtoj" ne rajtas nomi sin Esperanta-beletro (kiel unu parto de la Esperanto-movado). Rezulte de la "kreemaj" provoj por "beletra esprimo" kaj ĉiutaga komunikado, se amasiĝos idiotismoj kaj novaj vortoj en Esperanto, kaj se la esprimoj fariĝos normo, la kosto por lernado de Esperanto konstante altiĝos, kaj la valoro por Lingvaj Rajtoj reduktiĝos. Kaj fine, se la valoro por Lingvaj Rajtoj nuliĝos, la Esperanto-movado perdos sian etikan kaj universalan bazon por la ekzisto.

## 7. Konkludo

La aŭtoro diskutis kaj demonstris jenajn tezojn sociolingvistike.

1. La Esperanto-movado kreeme rekonstruis la nocion Lingvaj Rajtoj, ke ĝi signifu, ke unu celo de Lingvaj Rajtoj estas interalie komuniki pli egale. Pro tiu ĉi fakto la movado sukcesis bazi sin sur universala fundamento etika kaj akiris universalan valoron.

2. Sekve, la movado devas ĉiam konformiĝi al sia bazo, t.e. al Lingvaj Rajtoj. Ekzemple en la instruado kaj lernado de Esperanto oni devas scii, ke la sinteno taksi alte tro altan uzokapablon de Esperanto kontraŭas la bazon kaj detruas la valoron.

3. La movado devas teni aŭ transformi Esperanton por ke Esperanto plej plenigu la Lingvajn Rajtojn kaj ne neu aliajn homrajtojn. Konkrete, grave estas tra deeŭropigado k.t.p. plej faciligi kaj sendiskriminaciigi Esperanton, kaj neŭtraligi komunikadon en la movado.

4. Kontraŭ la ĝenerala kompreno, ke *priskribismo* estas lingvo-demokratisma, Esperanto funkcias plej demokratisme en *normismo.* Inter planita lingvo kaj ne planita lingvo, lingva demokratio aperas en tute inversa kondiĉo.

### Referencoj

Itoigaŭa Miki (2005). "La estonteco de la engenrigita lingvo" [Teksto en la japana]. *Sociolingvistiko* (*Syakaigengogaku*), V, 85–103.

Jamauĉi Toŝio (2000). *Limo de sekso* [Teksto en la japana]. Tokio.

Jasuda Toŝiaki (2006). *Politiko de vortaro. Kio estas lingva normo?* [Teksto en la japana]. Tokio.

Kadoja Hidenori (2001). "Lingva diskriminacio kaj Esperanto" [Teksto en la japana]. *Sociolingvistiko* (*Syakaigengogaku*), I, 83–88.

Kadoja Hidenori (2004). "Faltruo de la esperanta movado – de malica normismo al rekreado de Esperanto" [Teksto en la japana]. **En:** *Raportoj en la studkunsido de Japana Esperanto-Instituto 2004*, 8–9.

Kadoja Hidenori (2006a). "De la lingva rajto al planlingvo" [Teksto en la japana]. **En:** Maŝiko Hidenori (red.), *Lingvo, povo, diskriminacio. Emancipado de informo – malfortuloj el la vidpunkto de lingva rajto*, pp. 107–130. Sangenŝa, Tokio.

Kadoja Hidenori (2006b). "De la lingva rajto al la komunikada rajto" [Teksto en la japana]. *Homrajtoj* **21**, n-ro 183, 78–83.

Kaŭaguĉi Rjoo k.a. (2005). *Kiu posedas la japanan lingvon?* [Teksto en la japana]. Tokio: Joŝikaŭa koobunkan.

Kunihiro Tecuja (2000). "Normismo kaj priskribismo" [Teksto en la japana]. *Lingvo (Gekkan gengo)*, majo, pp. 24–31.

Maŝiko Hidenori (2002). *Politika sociologio de lingvo* [Teksto en la japana]. Tokio: Sangenŝa.

Maŝiko Hidenori (2006). "Enkonduko al politika sociologio de vortaro" [Teksto en la japana]. *Sociolingvistiko* (*Syakaigengogaku*), VI, pp. 77–94.

Saka Tadaŝi (2006a). "Facila Frazfarado" [Teksto en la japana]. *La Revuo Orienta*, junio.

Saka Tadaŝi (2006b). "Facila Frazfarado" [Teksto en la japana]. *La Revuo Orienta*, aŭgusto-septembro.

Sakura Tomomi (2006). *Sociologio de seks-identeca disordo* [Teksto en la japana]. Tokio: Gendaiŝokan.

Skutnabb-Kangas, Tove (2000). *Lingva mortigadego en edukado aŭ mondskala diverseco kaj homrajtoj?* [Teksto en la angla]. Mahwah, NJ: L. Erlbaum Associates.

Studgrupo de Lingvaj Rajtoj (red.) (1999). *Rajto al lingvo. Kio estas lingvaj rajtoj?* [Teksto en la japana]. Tokio: Sangenŝa

Suzuki Toŝikazu (2000). *Strukturo de Lingva Rajto – ĉefe pri la regiono de angl-usonaj leĝoj* [Teksto en la japana]. Tokio: Seebundoo.

Kadoja Hidenori estas prelegisto en Cujama Ŝtata Kolegio de Teknologio en Japanio. La ĉefa faka kampo de la verkinto estas la mezepoka eŭropa sociekonomia historio, precipe en Nordio; dua fako estas sociolingvistiko kaj esperantologio. Redaktoro de la fakrevuo *Syakaigengogaku* (*Sociolingvistiko*) ekde 2001. Ĉefverkoj: *Vikinga epoko*, eldonejo de Kioto-universitato, Kioto, 2006; "La strukturo de lego-skribo-kapablo", *Sociolingvistiko*, IX, 2009, pp. 17–42. La aŭtoro verkas ankaŭ en la kampo de edukosociologio kaj homrajtoeduko.

*Laboreja adreso de la aŭtoro:* 708-8509, Tuyama-si, Numa, JP-624-1 Japanio
*Retadreso:* `kadoya@tsuyama-ct.ac.jp`

Ricevita 2009-11-20. Prilaborita versio ricevita 2010-04-04. Akceptita 2010-06-01

# Pri tiu ĉi revuo

La unua kajero de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* estis publikigita en 1999 kaj prezentita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino samjare. La dua kajero aperis en 2001, la tria en 2005 kaj la kvara en 2009.

Kun la nuna kvina kajero la revuo publikigis entute dudek tri originalajn studojn kaj sep recenzojn, ampleksantajn entute 464 paĝojn. El tiuj tridek kontribuaĵoj dudek tri estas en esperanto, kvar en la angla, du en la germana kaj unu en la franca.

La unua kaj dua kajeroj estas havigeblaj de Christer Kiselman; la tria kaj kvara de KAVA-PECH.

⋆

# About this journal

The first issue of the journal *Esperantologio / Esperanto Studies* was published in 1999 and presented at the Universal Congress of Esperanto in Berlin that year. The second issue appeared in 2001, the third in 2005 and the fourth in 2009.

With this fifth issue, the journal has published a total of twenty-three original studies and seven reviews, comprising a total of 464 pages. Of these thirty contributions, twenty-three are in Esperanto, four in English, two in German and one in French.

The first two issues can be obtained from Christer Kiselman; the third and fourth from KAVA-PECH.

⋆

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 29–35

# Recenzo pri nova germanlingva biografio de Zamenhof verkita de Andreas Künzli

Leif Nordenstorm

Andreas Künzli (2010). *L. L. Zamenhof (1859–1917). Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die „jüdische Frage“ in Ost- und Westeuropa.* Jüdische Kultur 23. Wiesbaden: Harassowitz Verlag. 538 + 24 pp.

## Enkonduko

Abunde aperis biografioj pri L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto. Ni povas ekzemple mencii la biografiojn de Privat (1920, 2007), Drezen (1928–1930, 1991), Boulton (1962, 1980), Holzhaus (1969), Maimon (1978), Ludovikito (1982), Cherpillod (1997), Centassi & Masson (2001), Banet-Fornalowa (2001), Nordenstorm & Lörnemark (2007), Romaniuk & Wiśniewski (2009) kaj Korĵenkov (2009). Tiu ĉi pli ol kvincentpaĝa germanlingva verko de Andreas Künzli malsimilas al multaj aliaj biografioj, kaj per sia dikeco, kaj ĉar ĝi celas akcenti la judecon de Zamenhof, kaj ankaŭ celas utiligi faktojn pri la historio de orienta Eŭropo kaj ĝia etne miksita loĝantaro por kompreni la vivon kaj verkon de L. L. Zamenhof.

## Historia fono

El la 38 ĉapitroj ni elektu nur kelkajn por pli profunde trastudi. La dua ĉapitro temas pri la pragepatroj kaj nomo de Zamenhof kaj pri lia identeco. La aŭtoro prezentas nombron da pragepatroj de Zamenhof ekde la praavo Zeev-Vol′f, kolektinte faktojn el la verkoj kaj leteroj de Zamenhof mem, el prizamenhofaj libroj, sed ankaŭ el ĝenerala juda genealogia esplorado. Zamenhof asertis ke lia familia nomo havas germanan pasintecon, ke lia patrio estas Litovujo, ke li mem estas ruslanda hebreo kaj filo de la pola lando. Li ne nomis sin polo.

La aŭtoro ankaŭ diskutas la malsamajn formojn de la personaj kaj familia nomo de L. L. Zamenhof. Ni komprenas ke L. L. Zamenhof havis komplikan identecon, ĉar lia familia nomo havis kaj havas multajn diverslingvajn formojn.[1] Eble pro tio ĝi ordinare estas mallongigita kiel L. L. (Tamen en paĝo 165 ĝi estas elskribita kiel Lejzer-Ludwig.)

[1] Árpád Rátkai (2009) faris detalan studon pri tiuj nomformoj.

La tria ĉapitro prezentas kelkajn trajtojn de la historioj de Rusio kaj Pollando kaj la juda demando en la epoĥo de naciismo. Kiam Rusio, Prusio kaj Aŭstrio dispartigis Pollandon-Litovion en 1772 kaj 1795, la landoj tiel transprenis i.a. polajn kaj judajn loĝantarojn, kiuj fariĝis minoritatoj en la imperioj. Tiel estiĝis polaj kaj judaj "demandoj" en Rusio, tio estas demandoj pri la rolo de la menciitaj popoloj, en kia grado ili havu apartan identecon kaj en kia grado ili adaptiĝu al la rusa plimulto. Tuj post la aneksado de la ekspolaj teritorioj judaj komercistoj povis aliĝi al la gildoj de rusaj kolegoj. Dum Nikolao la unua la emancipado tamen haltis. La liberaliĝo en 1856 kondukis ne nur al deziro pri plua emancipado de la judoj, sed ankaŭ al kontraŭjudaj agadoj. Dum la regado Aleksandro la tria ekde 1881 okazis ĉiam pli akraj pogromoj kontraŭ judoj. Künzli detale priskribas la ĉiam variajn kondiĉojn de la judoj en Rusio, grava por kompreno de la verko kaj ideologio de Zamenhof.

La ĉapitro pri la ekzemplo Belostoko (Бѣлостокъ en la tiama rusa ortografio; nun la urbo troviĝas en Pollando kun la pola nomo Białystok, esperante Bjalistoko) komparas la Zamenhofan priskribon pri la urbo kun alifontaj faktoj. En 1859, la naskiĝjaro de Zamenhof, la loĝantaro de la urbo estis 16 500, el kiuj pli ol 10 000 estis judoj. Künzli observis ke Zamenhof, en sia letero al Borovko, tamen menciis la judojn post la mencio de rusoj, poloj kaj germanoj, inter la naciecoj loĝantaj en la urbo. Pri la kaŭzo oni povas nur diveni. Pro la malfermo de fervoja linio tra la urbo, tiu ĉi rapide kreskis kaj fariĝis komercista centro. En la gubernioj en tiu ĉi regionoj judaj entreprenistoj respondecis pri 48–91 % de la komerca vendosumo. Tio tamen tute ne signifas ke ĉiuj judoj estis riĉaj. La plej multaj judoj estis proletoj, el kiuj multaj estis senlaboraj kaj malriĉaj. La nejudoj estis miksaĵo de poloj, rusoj, germanoj, litovoj, tataroj, belorusoj, ciganoj kaj aliaj. En grandaj regionoj la loĝantaro estis tiel miksita ke la diversaj popoloj konsideris la aliajn nepuraj. La malamikeco estis plej akra inter edukitaj judoj kaj needukitaj rusoj. Tio ĉi estis la antaŭhistorio de la pogromo en Belostoko en 1906, kiu siavice estas antaŭhistorio necesa por vere kompreni la kongresajn paroladojn de Zamenhof, lian laboron pri homaranismo kaj la strebadon por pli forte organizi la Esperanto-movadon.

En la ĉapitro pri hejmo, familio kaj patro oni ekzemple povas legi pri la rusamo inter la belostokaj judoj. Multaj judoj volis pliproksimiĝi al la rusoj por emancipiĝi. Ili volis lasi la jidan kaj eble ankaŭ la hebrean lingvon, kaj meti la rusan en ilian lokon. La patro Mordechai Zamenhof apartenis al tiu ĉi movado. Li ŝanĝis — aŭ kompletigis — sian judan nomon al Markus Zamenhof. Lia filo Lejzer-Ludwig, kiu ankaŭ havis kaj judan kaj kristanan nomojn, estis edukita uzi la rusan kaj ami Rusion. Tamen la malamikeco de kelkaj rusoj kaŭzis fortan elreviĝon al li kaj al aliaj apartenantaj al la rusama movado. Tial ni povas konstati ke lingvaj demandoj, kaj demandoj

pri lingvoj, etneco kaj identeco estis gravaj dum la infanaĝo de Zamenhof. Tio verŝajne igis lin komenci pensi pri fina solvo de la lingva problemo, kiam la ĝistiamaj provoj solvi ĝin montriĝis senutilaj.[2]

## Zamenhof, judismo kaj homaranismo

Alian radikon pri la vivoverkoj de Zamenhof — Esperanto kaj homaranismo — ni trovas en la mesiismo de judismo. Zamenhof en letero al Émile Javal (1839–1907) en 1905 kaj en intervjuo en *Jewish Chronicle* en 1907 parolas pri la taskoj de la juda popolo peri monoteismon, Dion, justecon kaj fratecon al la tuta homaro. La Berlina juda religihistoriisto Gershom Scholem (1897–1982) priskribis la judan mesiismon kiel antaŭenirantan kaj renovigan forton, kiu havas vizion pri la estonteco kaj kiun influas utopia inspiro.

En tiu ĉi rilato ni menciu ankaŭ hilelismon-homaranismon. En 1901 Zamenhof prezentis novan projekton, la novan religion hilelismo. Same kiel Esperanto estu pontolingvo inter la diversaj naciecoj, hilelismo estus pontoreligio. La fundamento de hilelismo estu eldiro de la saĝulo Hillel: "Kion vi ne amas, ne faru al via proksimulo." La plano de Zamenhof — ke hilelismo unue fariĝu pontoreligio, kaj poste transprenu la rolon de aliaj religioj, kaj tiel por ĉiam liberigu la judojn de ilia sorto — tute ne fariĝis populara inter la esperantistoj. La projekto ricevis la pli neŭtralan nomon homaranismo,[3] sed ĝi tamen ne sukcesis populariĝi, nek inter esperantistoj nek ekster la movado. (La eble sola escepto estas la japana nova religio Oomoto, kiuj pluportas la ideojn de homaranismo.)

Aparte interesa estas la ĉapitro pri la kredo, volo kaj esenco de Zamenhof. La aŭtoro konstatas ke Zamenhof perdis sian religian kredon je la aĝo de 15 aŭ 16 jaroj. Sekvo de tio estis vivokrizo. Adoleska krizo fakte estas tute natura afero, sed Zamenhof neniam retrovis la mosean kredon kiun li perdis dum sia adoleskeco. La kreado de homaranismo estis por Zamenhof ebleco reteni la kredon je Dio kaj nominalan judecon samtempe nomante sin "liberpensa juda homarano". Senreligieco por Zamenhof ne estis idealo. Li tamen konstatis ke tiuj homoj kiuj perdis sian kredon bezonas neŭtrale homan etikon. Homaranismo povus esti tia etiko. Kvankam multaj esperantistoj kontraŭis la Zamenhofan ideon pri komuna kvazaŭreligio, Zamenhof ĝis sia morto estis forte konvinkita ke hilelismo/homaranismo estas la solvo de naciaj kaj religiaj problemoj kaj ke ĝi fine venkos.[4]

En tiu ĉi recenzo estas eble resumi nur kelkajn el la 38 ĉapitroj. En multaj ĉapitroj la leganto povas legi pri la ekesto de Esperanto, la lingvo mem, la traduka laboro de Zamenhof, la unuaj Esperanto-kongresoj kaj la tieaj

[2] Pri la juda fono de Zamenhof vidu ankaŭ Sadan (2010).
[3] Künzli uzas en sia libro la terminon *Allmenschentumsethik* por la homaranismo.
[4] Pri hilelismo kaj homaranismo vidu ankaŭ Kiselman (2010).

paroladoj de Zamenhof. Ni povas legi ankaŭ pri kritiko kontraŭ Zamenhof, Esperanto kaj hilelismo, pri liaj lastaj jaroj kaj lia morto.

## Sciencaj komentoj

La aŭtoro Andreas Künzli studis slavan filologion, orienteŭropan historion kaj internacian juron. Li verkis universitatan diplom-laboraĵon pri Esperanto kaj interlingvistiko en Cara Rusio kaj Sovetio kaj pli ol milpaĝan libron *Universalaj Lingvoj en Svislando* (Künzli 2006), giganta verko laŭde recenzita en *Esperantologio / Esperanto Studies* fare de Gonçalo Neves (2009). Li dum multaj jaroj diversmaniere aktivis en la Esperanto-movado kaj tial bone konas la movadon de interne.

Sur paĝoj 350–365 ni trovas la bibliografion de la verko. Unu paĝo prezentas originalajn verkojn de L. L. Zamenhof, kvar paĝoj biografiajn librojn kaj artikolojn pri Zamenhof, du paĝoj verkojn pri la historio de Esperanto kaj aliaj planlingvoj, kvar paĝoj diversajn artikolojn, ĉefe esperantlingvajn, tri kaj duona paĝoj artikolojn — ĉefe germanlingvajn, sed ankaŭ kelkajn rusajn — pri la historio de Rusio, Polio, Litovio kaj de la judoj, kaj pri lingva filozofio kaj sociologio k.t.p., unu paĝo prezentas interretajn fontojn.

Andreas Künzli do ellaboris la verkon ne per informserĉado el nepresitaj fontoj, sed per kolektado de faktoj el eldonitaj verkoj. Tio neniel malpliigas la valoron de la verko, ĉar — laŭ mia scio — neniu antaŭe tiel funde analizis la vivon kaj verkojn de Zamenhof en la lumo de la historio de la orienteŭropaj judoj. La aŭtoro kunordigis la laborojn de aliaj personoj en allogan tuton.

Künzli estas esperantisto. Ĉu tio influas lian verkadon pri Zamenhof? La diskutado kelkloke estas iom emociplena. Zamenhof tamen mem estis emociplena homo, kies emocioj igis lin krei lingvon kaj religion. Ankaŭ la kritikoj kontraŭ hilelismo/homaranismo estis emociplenaj. Tial eĉ scienca verko pri li montras emocion, eĉ se ĝi nur citas diversajn fontojn kaj seke analizas ilin.

Kiam la aŭtoro priskribas pogromojn kaj persekutojn kontraŭ judoj dum naziismo oni ja povas vidi ke la aŭtoro kontraŭas la persekutantojn. Li tamen konsekvence prezentas la fontojn de ĉiuj siaj informoj.

Kompreneble nek la aŭtoro nek la recenzanto povas komenti la sciencecon de ĉiu unuopa informfonto. En la tridekkvara ĉapitro, kiu temas pri familianoj mortintaj en la Varsovia geto kaj en Treblinka, Künzli naŭfoje citadas el *La familio Zamenhof* de Banet-Fornalowa (2000). La ĉapitro tamen ne estas nura resumo de tiu libro, ĉar Künzli kelkfoje komparas ties informojn kun aliaj fontoj. En la retpaĝo `www.yadvashem.org` oni ekzemple povas serĉi informojn pri unuopaj mortintoj en la koncentrejoj, el kiuj ses personoj kun la familia nomo Zamenhof.

## Kritiko

La celo de la libro estas tre laŭdinda. Por kompreni la projekton Esperanto, ĝian iniciatinton Zamenhof, la internan ideon kaj homaranismon estas tute necese memori ke ĝi kreskis el la juda kulturo kaj la apartaj spertoj, kiujn havis homo apartenanta al persekutata malplimulto. La verko tamen ne estas nur atesto pri okazaĵoj en la historio. La batalo kontraŭ diskriminacio kontraŭ malplimultoj devas esti ĉiam aktuala afero. La verko kiu rakontas pri senlaca homo kaj ties batalo por la bono, povas inspiri ankaŭ niatempajn homojn al bona peno. La verko tial estas scienca, kaj ne nur scienca, sed ankaŭ atesto pri homo kiu estas kvazaŭ patriarko por sia movado, kaj kiu daŭre inspiros al centmiloj aŭ eĉ milionoj da anoj.

Ankaŭ estas laŭdinde ke Andreas Künzli verkis la libron germane. Zamenhofologiaj verkoj abundas esperante. La vivo kaj verko de Zamenhof estas tro interesa por esti konata nur al esperantistoj. Tial ni bezonas verkojn, kiuj konigas ĝin al la ĝenerala publiko. La recenzita libro estas ĝuste tia verko. La libro estas eĉ pli valora ĉar ĝi aperis en la serio *Jüdische Kultur* 'Juda kulturo' ĉe Harrassowitz Verlag en Wiesbaden.

Espereble estontaj popularaj biografioj pri Zamenhof en Esperanto kaj aliaj lingvoj prezentos ankaŭ faktojn kolektitajn de Künzli. Tio estos necesa por ke ni havu pli larĝan komprenon pri la personeco de Zamenhof.

Preseraroj aperas en la libro, kaj estas ja preskaŭ neebla afero tute eviti tiajn en dika libro. Aliaj recenzantoj eble listigos ilin.

La libro mem konsistas el 398 paĝoj. Oni tamen povas pridubi ĉu la 138 + 24 paĝoj kun aldonoj devus aperi en la libro. Eble kelkaj personoj legos ĉiujn dek kvar aldonitajn tekstojn, artikolojn kaj parolojn de Zamenhof en germana traduko. Menciinda estas germanlingva traduko de la *Manifesto de Homaranismo*, kiu estas aparte interesa kaj kiu aperas ĉi tie por la unua fojo. Verŝajne plej multaj legantoj tamen ne legos ĉiujn tradukitajn tekstojn. Ĉiuj aldonitaj paĝoj certe plikostigis la libron kaj tiel malpligrandigis la nombron de eblaj legantoj. Pro la sama kaŭzo certe multaj el la 24 paĝoj estas superfluaj. Fotoj de L. L. Zamenhof kaj liaj familianoj certe estas interesaj por la leganto, same kiel fotoj de Esperanto-kongresoj. Ne same interesaj estas fotoj de rusaj caroj, de Zamenhof-busto en Vieno kaj de memortabuloj.

Interreta diskuto montras ke la alta prezo de la libro (99,90 EUR ĉe UEA) malinstigas eblajn aĉetantojn aĉeti ĝin. Tio estas grava problemo, se oni volas uzi la libron por konatigi Zamenhofon kaj Esperanton al la ĝenerala publiko. La libro tamen povos doni inspiron kaj faktojn al personoj kiuj verkos librojn legotajn de pli granda publiko. Tial la verko sendube estas grava. Mi gratulas al la verkinto, al la eldonejo kaj al la ĝenerala publiko.

## Referencoj

Banet-Fornalowa, Zofia (2001). *La familio Zamenhof.* La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.

Boulton, Marjorie (1962). *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto.* La Laguna: J. Régulo.

Boulton, Marjorie (1980). *Zamenhof: Creator of Esperanto.* Londono: Routledge and Kegan Paul.

Centassi, René; Masson, Henri (2001). *La homo kiu defiis Babelon, Ludoviko Lazaro Zamenhof.* Tradukis G. Lagrange kaj P. Combot. Parizo: L'Harmattan. 293 pp. [Biografio de Zamenhof, kun multaj informoj pri la frua evoluo de la E-movado.]

Cherpillod, André (1997). L. L. Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj. Courgenard: la aŭtoro.

Drezen, E[rnest] (1991). *Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado.* Kvara Esperanto-eldono. Moskvo: Eldonejo Progreso. (Unue publikigita en 1928–1930.)

Holzhaus, Adolf (1969). *Doktoro kaj lingvo Esperanto.* Helsinko: Fondumo Esperanto.

Kiselman, Christer (red., 2010). *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Kiselman, Christer (2010). La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. **En:** Kiselman (red., 2010:39–61).

Korĵenkov, Aleksander (2009). *Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.* Kaliningrado: Sezonoj; Kaŭno: Litova Esperanto-Asocio.

Künzli, Andreas (2006). *Universalaj lingvoj en Svislando.* La Chaux-de-Fonds: Svisa Esperanto-Societo; Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale. 1129 pp.

Ludovikito [pseŭdonimo por Kanzi Itô] (1982). *senlegenda biografio de l. l. zamenhof.* Kioto: ludovikito.

Maimon, N[aftali] Z[vi] (1978). *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj studoj.* Tokio: Japana Esperanto-Instituto.

Neves, Gonçalo (2009). Recenzo pri *Universalaj lingvoj en Svizlando* de Andreas Künzli. *Esperantologio / Esperanto Studies* **4**, 23–29.

Nordenstorm, Leif; Lörnemark, Christer (2007). *Doktor Zamenhof och det internationella språket: en bok om esperanto och dess upphovsman.* Antaŭparolo de Daniel Tarschys. Gotenburgo: LiteraTuro kunlabore kun Sveda Esperanto-Federacio. 170 pp.

Privat, Edmond (2007). *Vivo de Zamenhof.* Sesa eldono. Redaktis Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. [Unua eldono 1920.]

Rátkai, Árpád (2009). Lazar Markoviĉ Zamenhof kaj la Zamenhof-falsaĵaro. *Esperantologio / Esperanto Studies* **4**, 61–92.

Romaniuk, Zbigniew; Wiśniewski, Tomasz (2009). *Ĉio komenciĝis ĉe la verda. Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto.* Łódź: Księży Młyn.

Sadan, Tsvi (2010). Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto. **En:** Kiselman (red., 2010:9–18).

Leif Nordenstorm estos ekde la unua de de septembro 2011 direktoro de la pastra kursejo *Fjellstedtska skolan* en Upsalo. Li estas pastro en la Sveda eklezio kaj lekciisto pri religihistorio en la Teologia instituto Johannelund en Upsalo. Li naskiĝis en 1960 kaj doktoriĝis en 2002 pri teologio kun disertaĵo pri la japana nova religio Oomoto. Li estas bakalaŭro pri la rusa lingvo kaj orienteŭropa historio.

*Adreso de la aŭtoro:* Bellmansgatan 42, SE-754 26 Uppsala, Svedio
*Retadreso:* `leif.nordenstorm@gmail.com`

Ricevita 2011-01-03. Ricevita en reviziita formo 2011-01-06. Akceptita 2011-01-13

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 37–59

# La esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj

Vilmos Benczik

Enhavo:

1. Konciza terminologia enkonduko
2. La paradigmo natureco ↔ artefariteco
3. La paradigmo parolo ↔ skribo
4. Ni revuu lingvoteoriojn
5. Ni revuu literaturkonceptojn
6. Konkludoj
Referencita literaturo

Resumo. La tradiciaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj baziĝas sur la organika unueco de signifanto (t.e. sonkorpuso de vorto) kaj signifato (tiu objekto, koncepto k.t.p., en kies loko staras la koncerna vorto kiel signo) — temas pri terminoj de de Saussure: *signifiant* kaj *signifié*. En tiu organika unueco signifanto elvokas la signifaton, dum ĝi mem paliĝas, kvazaŭ malaperas, kaj en la proscenio staras nurnure la signifato. Esperanta literatura verko laŭ tiu koncepto — dum longa tempo reganta en la literaturscienco — ne povas esti plenvalora, ĉar la rilato inter signifanto kaj signifato en Esperanto estas malpli fiksa kaj intima, ol en la etnaj lingvoj; sekve esperanta signifanto ne kapablas elvoki tiel firman kaj potencan signifaton, kiu likvidus ĝin (la signifanton), kaj mem starus sola antaŭ la okuloj de la leganto.

Sed la novaj lingvoteorioj kaj la post-strukturismaj literaturkonceptoj pridubas tiun organikecon kaj intimecon en la rilato inter signifanto kaj signifato (kiel ankaŭ la ĉefrolon de la signifato) ankaŭ koncerne la etnajn lingvojn; fariĝis ĝenerala la koncepto, laŭ kiu per la vortoj de la homa lingvo ne eblas konfidinde referenci al la realo. Laŭ tiuj tezoj en la semiotika procezo, funkcianta ĉe la kreado kaj legado de literatura teksto, la ĉefrolon transprenas signifanto, kies firma ligiteco al difinita signifato estas tre dubinda. Literatura verko laŭ tiu koncepto estas antaŭ ĉio teksto, konsistanta el signifantoj, kiuj signifantoj interrilatas multe pli kun la signifantoj de aliaj tekstoj ('interteksteco'), ol kun iuj dubindaj, transcendaj — sense ne kapteblaj — signifatoj.

Rezulte de tiu paradigmoŝanĝo en la teorio de lingvo kaj de literaturo fakte forfalas la bazo de ĉiuj rezervoj, pli frue alfrontantaj la esperantan literaturon. La studo deziras skize prezenti la esencon de tiu ĉi paradigmoŝanĝo, kaj montri ĝiajn teoriajn konsekvencojn rilate la pritakson de la esperanta literaturo kaj rilate la prijuĝon de Esperanto kiel lingvo.

# 1. Konciza terminologia enkonduko

## 1.1. Elementaj semiotikaj nocioj de Peirce

Charles Sanders Peirce (1839–1914) dividis la signojn plurmaniere; el tiuj dividoj la plej konata — kaj fakte plej fruktodona — estas la divido laŭ la rilato inter signo kaj signato.[1] Peirce nomas

**1.1.1.** *ikono* tiun signon, kiu similas aŭ imitas sian signaton. Ikonoj prezentas siajn signatojn esence per aludo al ties kvalito. Ikono estas ekzemple foto. Notindas, ke ikonoj povas ekzisti ne nur en la sensa dimensio de vido, sed principe en ĉiuj kvin sensaj dimensioj. (Ekzemple: sintezita rozparfumo estas odor-ikono.) En la homa lingvo — kiu estas baze simbola signosistemo — apud la baza simbola karaktero onomatopeoj havas ikonecajn trajtojn. Metaforo — unu el la bazaj stilistikaj tropoj — konstituiĝas per principoj ikonaj.

**1.1.2.** *indico* tiun signon, kiu havas iujn realajn kontaktojn kun sia signato aŭ aludojn al ĝi. Indicoj estas ekzemple vojmontraj sagoj, fumo kiel signo de fajro, aŭ man- kaj korpotenoj de policistoj direktantaj trafikon. Ankaŭ indicoj povas ekzisti principe en ĉiuj sensodimensioj. En la homa lingvo — apud sia baze simbola karaktero — pronomoj montras certajn indicecajn trajtojn, ja ili gajnas sian signifon enkadre de aluda procezo. Metonimio — unu el la bazaj stilistikaj tropoj — konstituiĝas per principoj indicaj.

**1.1.3.** *simbolo* tiun signon, kiu nek similas sian signaton, nek havas realajn kontaktojn kun ĝi: do la rilato inter simbolo kaj sia signato estas esence arbitra. Simboloj estas ekzemple naciaj flagoj aŭ la koloroj de semaforlanternoj. (Male, la pozicioj de la semaforbrakoj estas indicoj.) La lingvaj signoj baze estas arbitraj, do homa lingvo estas simbola signosistemo, kies iuj elementoj povas havi ankaŭ ikonecajn aŭ indicecajn trajtojn. (Rimarkigo: estas konsilinde klare diferencigi inter la signifoj semiotika, stilistika kaj komunlingva de la vorto *simbolo*!)

**1.1.4.** Per la supraj tri kategorioj estas priskribebla ajna konkreta signo. Peirce atentigas, ke konkretaj signoj neniam apartenas centprocente al nur unu kategorio. Ekzemple foto estas dominante ikono, sed la simileco al sia signato ne estas plena, ja ĝi nur aludas ekzemple al la realaj mezuroj de

[1] "[. . . ] I had observed that the most frequently useful division of signs is by trichotomy into firstly Likenesses, or, as I prefer to say, *Icons*, which serve to represent their objects only in so far as they resemble them in themselves; secondly, *Indices*, which represent their objects independently of any resemblance to them, only by virtue of real connections with them, and thirdly *Symbols*, which represent their objects, independently alike of any resemblance or any real connection, because dispositions or factitious habits of their interpreters insure their being so understood" (Peirce 1998:460–461; teksto verkita en 1909).

la prezentata signato (foto estas ordinare malpli granda, ol tio, kion ĝi prezentas), do en foto aperas apud la dominanta ikoneco ankaŭ indicecaj trajtoj.

**1.1.5.** El la tri signospecoj klare diferencas disde la aliaj du indico. La klara diferenceco kuŝas en tio, ke en la okazo de indico la rilato inter signo kaj signato estas priskribebla laŭ logike kapteblaj pozitivaj kriterioj. En la okazo de ikono kaj simbolo tiaj kriterioj ne ekzistas, ja simileco tute ne havas objektivajn kriteriojn (al tiu senlimeco de simileco ŝuldiĝas la kreeblo de surprizaj kaj aŭdacaj metaforoj),[2] dum la koncepto arbitreco priskribeblas nur per negativaj kriterioj. Kvankam je la unua vido ikono kaj simbolo ŝajnas esti forte diferencantaj unu de la alia, tamen la limo inter ili ne facile difineblas, ĉar firma limo ankaŭ inter simileco kaj arbitreco ne ekzistas. Ĉi tiu parenceco inter ikono kaj simbolo ebligas la fenomenon vidi la vortojn de la gepatra lingvo ikonoj, priskribita en subsekcio 1.3.3.

## 1.2. Signoj laŭ sia konsisto povas esti kontinuaj aŭ diskretaj

Kontinuaj signoj ofte estas nomataj analogaj signoj, dum diskretaj signoj nomatas digitaj signoj. Preferindas nomi signojn kontinuaj ↔ diskretaj, kaj la paron analoga ↔ digita apliki por la kodoj en kiujn ili organiziĝas. Laŭ tio kontinuaj signoj organiziĝas en analogan kodon, diskretaj signoj organiziĝas en digitan kodon. Kontinuaj signoj ne havas precizajn limojn, ili interpreteblas nur enkadre de iu hierarkio, karakterizata ne de opozicioj, sed de gradeco; diskretaj signoj havas siajn precizajn limojn, ili opozicias kun aliaj signoj, kaj ili estas bone interpreteblaj ankaŭ memstare, senkonsidere al aliaj signoj. Por kontinuaj signoj povas servi kiel ekzemploj analoga horloĝo aŭ ordinara frakcio, por diskretaj signoj cifereca horloĝo aŭ finia decimala frakcio.

Kontinuajn signojn karakterizas riĉeco, komplekseco je signifo (larĝa interpreteblo), samtempe malprecizeco pri semantiko kaj pri sintakso. Diskretajn signojn, male, karakterizas malriĉeco je signifo, samtempe altgrada semantika precizeco kaj vasta sintaksa varieblo[3] (Chandler 2002:47). Principe ikonoj, indicoj kaj simboloj povas esti egale kontinuaj aŭ diskretaj. Tamen ikonoj pli ofte estas kontinuaj, dum indicoj pli ofte diskretaj signoj; koncerne simbolojn tia dominanteco ne konstateblas: ili kun simila ofteco estas kontinuaj aŭ diskretaj signoj.

[2] "Da die *similitudo* keine Grenzen kennt, stehen auch der Metapher alle Möglichkeiten offen [. . . ]" (Lausberg 1990:285).

[3] "[. . . ] the graded quality of analogue codes may make them rich in meaning but it also renders them somewhat impoverished in syntactical complexity or semantic precision. By contrast the discrete units of digital codes may be somewhat impoverished in meaning but capable of much greater complexity or semantic signification [. . . ]"

Grava diskretigo en la lingvoscienco estas la transiro de la akustikaj parolsonoj (studataj en fonetiko) al la fonemoj (studataj en fonologio). En la gamo de vokaloj [i — e — a] ekzistas fonetike, akustike, nefinia nombro de vokalaj sonoj, priskribeblaj per la uzataj frekvencoj de la ondoj; en la gamo de vokalaj fonemoj kapteblaj de homa orelo nur finia nombro — en la okazo de Esperanto la tri /i/, /e/, /a/; en la okazo de iuj aliaj lingvoj malpli (ekzemple nur /i/, /a/) aŭ pli, sed ĉiam nur finia nombro.

En la homa lingvo la skribeblaj lingvounuoj — fonemoj, vortoj, frazoj — estas diskretaj signoj, dum intonacio, parolritmo k.t.p. kontinuaj signoj. Oni povas do diri, ke homa lingvo estas sistemo de heterogenaj signoj.

## 1.3. Signifanto kaj signifato: bazaj terminoj enkondukitaj de de Saussure

**1.3.1.** De Saussure insistas, ke la vorto *signo* estu konservata por nomi la tuton de la semantika procezo. Li demonstras, ke en tiu procezo fakte partoprenas du komponentoj. Unu komponento estas la koncepto, kiun ni havas en nia menso pri difinita objekto, kaj dua komponento estas la akustika bildo de la vorto, kiun ni aplikas al tiu objekto. La koncepton de Saussure nomas *signifato*, la akustikan bildon *signifanto* (de Saussure 2005:99). Koncepto kaj sono — t.e. signifato kaj signifanto — reciproke kaj nedisigeble ligiĝas unu al la alia, kiel ekzemple du flankoj de paperfolio.[4] La terminoj *signifanto* kaj *signifato* havas longan antaŭhistorion: spuroj de la nocioj aperas jam ĉe Gorgio antaŭ 2 500 jaroj, kaj mil jarojn poste Aŭgustino en la 3-a kaj 4-a libroj de sia verko *Pri la kristana doktrino* relative detale eksplikas pri la anatomio de la semantika procezo. La ligo inter signifanto kaj signifato estas arbitra, pro tio, kiel jam dirite supre, lingvo estas signosistemo simbola.

**1.3.2.** La signifo de la esperantaj vortoj originas en la Universala Vortaro, en kiu aperas ekvivalentoj de la esperantaj vortoj en kvin lingvoj (franca, angla, germana, rusa, pola). Tiu difinmaniero de la signifatoj de la esperantaj signifantoj el praktika vidpunkto povis esti kontentiga, sed evidente ĝi implicis malcertecojn. La malcerteco kuŝas en tio, ke la semantika kampo de la kvin nacilingvaj ekvivalentoj ne estas la sama; la diferencoj montriĝas kaj rilate la denotaciojn, kaj rilate la konotaciojn. La diferencoj rilate denotaciojn povas aspekti ne signifaj, sed la konotaciaj diferencoj povas esti tre grandaj, kaj tiuj ĉi diferencoj re-efikas ankaŭ al la denotaciaj signifoj, ja la limoj inter denotacioj kaj konotacioj ne estas fiksaj. En la menso de la lingvouzantoj la du signifospecoj ne apartiĝas — ili daŭre interefikas kaj

[4] "La langue est [...] comparable à une feuille de papier : la pensée est le recto et le son le verso ; on ne peut découper le recto sans découper le verso [...]" (de Saussure 2005:157.)

interludas. Tiamaniere la sama esperanta signifanto povas generi en la menso de la individuaj lingvouzantoj signifatojn tre diferencajn inter si.

**1.3.3.** Denaskaj uzantoj de lingvo emas vidi la vortojn de sia lingvo ikonoj. Ĉi tiu fenomeno konstateblas precipe ĉe tiuj, kiuj ne ricevis gramatikan edukadon, kaj/aŭ ne konas/uzas alian lingvon krom la gepatra; tamen, iagrade tiu fenomeno aperas ĉe la plimulto de la lingvouzantoj, ankaŭ ĉe lingve edukitaj individuoj, se la lingva influo, kiu atingas ilin, estas dominante monolita — kaj finfine gravega plimulto de la homoj vivas en tia lingve monolita medio: en tiu de la gepatra lingvo. En tiuj lingvouzantoj formiĝas la impreso, ke vortoj de ilia lingvo, la akustikaj bildoj — signifantoj — similas al tio, kion ili signifas, t.e. al la konceptoj, do al la signifatoj. La kunaparteno de signifanto kaj signifato en la gepatra lingvo povas ŝajni memevidenta, natura, la signifanto virtuale identiĝas kun la signifato,[5] dum alilingva signifanto de la sama signifato povas aspekti stranga kaj nenatura. Ekzemple, la akustika bildo de la vorto *leche* por denaska hispanlingvano povas esti kvazaŭ simila al la blanka likvaĵo, dum por denaska germanlingvano ĝi povas soni fremdece; similecon al la blanka likvaĵo tiu lasta trovos en la akustika bildo de la vorto *Milch.* (Vidu pri tio ankaŭ subsekcion 1.1.5.) La supre priskribita fenomeno estas karakterizaĵo ĉefe de la parola lingvofunkciado, sed ĉar akustikaj bildoj persiste akompanas ankaŭ la skriban lingvouzon (kaj skribadon, kaj legadon) en la formo de interna parolo aŭ apenaŭ voĉita parolo, ĉi tiu fenomeno ne limiĝas ekskluzive al la buŝa lingvouzo. La supre skizita ikonisma — teorie nepre erara — lingvokoncepto servas kiel bazo por la romantisma literaturkoncepto, kiu hipotezas iaspecan organikan rilaton — kvazaŭan similecon — inter signifanto kaj signifato, dum tiu rilato estas efektive arbitra.

Tiaspeca ikonismo en la okazo de Esperanto-parolantoj ne povas formiĝi, pro almenaŭ tri kaŭzoj. Unue pro tio, ĉar Esperanto por la grandega plimulto estas lernita, do sekundara lingvo; due, ĉar eĉ por denaskaj esperantistoj la lingva medio ne estas monolite esperanta, ankaŭ ilin daŭre atingas alilingvaj influoj; kaj trie, ĉar en la tipa esperanta lingvouzado la proporcio de parola uzo grave postrestas al la skriba uzo, dum en la tipa nacilingva uzado estas inverse.

### 1.4. Fonocentrismo, logocentrismo, grafocentrismo

La tri nocioj intime ligiĝas unu al la alia.

**1.4.1.** *Fonocentrismo* oni nomas la ideon pli alte taksi parolan lingvon ol skriban lingvon, nomante la unuan *natura*, la duan *artefarita* (pri tio pli detale

[5] Ong diras, ke en la primara parollingveco (historia epoko antaŭ la invento de skribo) “vortoj ne estas signoj” ‘words are not signs’ (Ong 1982:75), t.e. signifanto kaj signifato ne apartiĝas, signifanto estas mem la afero, kiun ĝi signifas.

en ĉapitro 2). Fonocentrisma sinteno arkas el la fora pasinteco ĝis la 20-a jarcento: ekde Platono tra Aŭgustino kaj Rousseau ĝis de Saussure kaj Bloomfield, tamen mejloŝtono en ĝia historio estas romantismo, kiu kun ĝisnuna valideco metis ĝin en la centron de la eŭropa publika pensado. Fonocentrismo memevidente metas en la centron de la lingvouzo la personan ĉeeston,[6] kaj tio laŭ postmodernismaj teoriuloj almenaŭ trimaniere ofendas la aŭtonomion de la teksto: unue per la uzo de eksterlingvaj komunikrimedoj (gestoj, mimiko k.t.p.); due per la voĉado de la parolo, absolute ligita al la korpa ĉeesto (oni ĉi tie preteratentu teknikajn rimedojn, kiel telefono k.t.p.); kaj trie per la neripetebleco, unikeco de la voĉa lingvouzo (dum skriba teksto estas fiksa kaj fidinde ripetebla; ankaŭ ĉifoje oni ignoru teknikaj rimedojn).

**1.4.2.** La termino *logocentrismo* estis inventita de la filozofo Ludwig Klages (1872–1956) en la tria jardeko de la pasinta jarcento, por termini tiun sintenon, kiu metas en la centron de ĉiu teksto *logos*, t.e. la sencoplenan, enhavriĉan vorton. Logocentrismo estas baza trajto de la okcidenta pensmaniero: sur ĝi bazas sin tiaj elementaj opoziciaj nocioparoj de la okcidenta kulturo, kiel *formo–enhavo, fenomeno–esenco, materio–spirito* k.t.p., en kiuj paroj prioritaton kaj preferon ĉiam ricevas la dua membro de la paro. Logocentrismo ŝuldas sian ekziston al la diferencigo inter signifanto kaj signifato, ja logos estas nenio alia, ol signifato, kaj logocentrismo iasence estas signifatcentrismo.

Fonocentrismo estas naskanto de logocentrismo, ja en la parola lingvouzo signifanto — la prononcata vorto — forvaporiĝas tuj en la momento de sia naskiĝo, kaj en la menso de la aŭdintoj de la vorto postrestas nur la signifato. Tiu cirkonstanco de la parola lingvouzo aŭtomate donis prioritaton al la signifato, kaj direktis la atenton al ĝi, dum la efemera signifanto estis rigardata duaranga.

**1.4.3.** *Grafocentrismo* estas antonimo de fonocentrismo: ĝi signas sintenon, kiu taksas skribon pli alte ol parolon. Paralele kun la deklarita fonocentrismo, ne deklarita, praktika grafocentrismo vivas en la eŭropaj socioj depost multaj jarcentoj, ja la plej gravajn aktojn de la homa vivo devige akompanas skribaj dokumentoj: naskiĝon, geedziĝon, morton. Kaj skribitaj estas ankaŭ ĉiuj reguloj — leĝoj — kiuj direktas nian vivon. Malgraŭ tiu praktiko la publika pensado pli alte taksas parolon ol skribon. Tiun ĝeneralan sintenon defiis Jacques Derrida (1930–2004), kiam en la lingvo mem li malkovris la latentan modelon de skribo, kreante la nocion *archi-écriture* 'pra-skribo'. Li priskribas homan lingvon kiel specon de skribo, argumentante, ke lingvo kun sia reguleco multe pli similas al la same regulita skribo, ol al la parola lingvouzo, en kiu

[6] Derrida longe kaj pasie argumentas kontraŭ la "ĉeesto" en sia libro *La voix et le phénomène* 'La voĉo kaj la fenomeno' (1967b).

svarmas senregulaĵoj, hazardaĵoj, spontaneaĵoj. Do, laŭ li skribo, malgraŭ sia ŝajna deriviteco, estas fakte la origina formo de lingvo, kaj la vulgara skribo — li nomas per tiu termino la grafikan skribon, kiun ni konas — neniam povus naskiĝi, se la bazaj ecoj de skribo ne nestus en la lingvo mem jam ekde la komencoj.[7]

## 2. La paradigmo natureco ↔ artefariteco

Tiu paradigmo havas du aspektojn: laŭgenezan kaj semiotikan.

### 2.1. Laŭgeneze natura aŭ artefarita

Laŭ sia genezo *natura* oni nomas tion, kio estiĝis spontanee, sen konscia homa interveno, kaj *artefarita* tion, kies estiĝo ŝuldiĝas al konscia homa ago. Ordinare *natura* oni nomas ies originan, primaran formon. Io natura povas esti nur konkreta, jam pro tio, ĉar io abstrakta povas estiĝi nur rezulte de abstraktado, kaj abstraktado estas nepre konscia homa ago. En la laŭgeneza aspekto la nocioj natureco kaj artefariteco formas opozician paron, kaj ili ekskludas unu la alian: io estas aŭ natura, aŭ artefarita.

### 2.2. Laŭkonsiste natura aŭ artefarita

Naturecon aŭ artefaritecon oni konstatas ne nur laŭ la genezo, sed ankaŭ laŭ la konsisto de la aferoj. Tion, kion ni spertas kontinua, ni trovas natura, kaj male, tion kion ni spertas diskreta, ni trovas malnatura, artefarita. Tiu juĝo rilatas ankaŭ signojn: kontinuajn signojn ni trovas naturaj, diskretajn signojn ni trovas artefaritaj. Homo havas klaran preferon por kontinueco: tiu favoro al kontinueco verŝajne radikas en la ribelo de romantismo kontraŭ raciismo antaŭ ducent kaj iom da jaroj.[8] En la semiotika aspekto, kontraste al la laŭgeneza aspekto, ne funkcias ekskluda opozicieco: en iu aĵo povas miksiĝi kontinuaj kaj diskretaj elementoj, kaj pro tio ni povas trovi ĝin parte natura, parte artefarita. La romantisma koncepto kaj sinteno pri natureco kaj artefariteco bele reliefiĝas en la *Eseo pri la origino de lingvoj* de Jean-Jacques

[7] "Nous voudrions plutôt suggérer que la prétendue dérivation de l'écriture, si réelle et si massive qu'elle soit, n'a été possible qu'à une condition : que le langage « originel », « naturel », etc., n'ait jamais existé, qu'il n'ait jamais été intact, intouché par l'écriture, qu'il ait toujours été lui-même une éciture. Archi-écriture dont nous voulons indiquer la nécessité et dessiner le nouveau concept ; et que nous ne continuons à appeler écriture que parce qu'elle communique essentiellement avec le concept vulgaire de l'écriture." (Derrida 1967a:82–83.)

[8] "We have deep attachment to analogical modes [...] The analogue–digital distinction is frequently represented as 'natural' versus 'artificial'. The privileging of the analogical may be linked with the defiance of rationality in romantic ideology (which still dominates our conception of ourselves as 'individuals')." (Chandler 2002:45.)

Rousseau (1712–1778); oni povas diri, ke tiu sinteno ĝis nun regas la publikan pensadon pri lingvo, kaj la rifuzoj al Esperanto kiel artefarita lingvo radikas ĉefe en tiu romantisma sinteno.

### 2.3. Prioritato de la artefarita skribo

Tiam, kiam Derrida kreis la nocion de pra-skribo, li fakte rifuzis la logike nemotiveblan homan inklinon al natureco. La nocio pra-skribo, difinanta la esencan karakteron de lingvo, implicas la aserton, ke lingvo montras esence artefaritan karakteron. En sia argumentado Derrida — citante de Saussure, kaj diskutante kun li — foje aludas ankaŭ al Esperanto: "La perverseco de artefariteco generas monstrojn. La skribo, kiel ĉiuj artefaritaj lingvoj, kiujn oni volas fiksi kaj abstrakti el la vivanta historio de la naturaj lingvoj, estas partoprenanto de la monstreco. Ĝi estas devio disde la naturo. [Ĝis ĉi tie Derrida citas/resumas la opinion de de Saussure.] La karakteristiko de Leibniz kaj Esperanto ĉi tie estus rigardataj samkategoriaj aferoj."[9] Derrida, pledante por la prioritato de la artefarita skribo, pledas ankaŭ por la artefariteco ĝenerale. Li argumentas por la malkonstruo de la piedestalo, kiun romantismo konstruis por natureco.

## 3. La paradigmo parolo ↔ skribo

Tiu ĉi paradigmo havas certajn paralelojn kun la paradigmo natureco ↔ artefariteco. Parolon oni emas taksi afero natura, dum skribo por la plej multaj el ni ŝajnas esti artefarita. (Per tio mi ne kontestas la eblon, ke por iu la propraj alfabeto kaj ortografio aspektu naturaj, kvazaŭ similaj al la vortoj, kiujn ili registras, dum aliaj alfabetoj aŭ ortografioj ŝajnu nenaturaj; iom simile al la ikonisma sinteno rilate la gepatran lingvon — vidu subsekcion 1.3.3.)

### 3.1. Parolo: vivofunkcio

Tio, ke parolon oni trovas natura, fontas el pluraj faktoj. Unue el tiu fakto, ke parolo estas la produkto de nia korpo, kaj tial ĝi estas interpretebla ankaŭ kiel vivofunkcio de la homo, kaj vivofunkcio estas memkompreneble io natura (parolan lingvouzon alproprigas sen konscia klopodado ĉiu homa individuo; esceptiĝas nur suferantoj pro certaj mensaj aŭ korpaj malsanoj); due el tiu fakto, ke parolo efektive estas la primara formo de lingvo; kaj trie, sed ne

[9] "La perversion de l'artifice engendre des monstres. L'écriture comme toutes les langues artificielles qu'on voudrait fixer et soustraire à l'histoire vivante de la langue naturelle, participe de la monstruosité. C'est un décart de la nature. La caractéristique de type leibnizien et l'espéranto seraient ici dans le même cas." (Derrida 1967a:57.)

laste el tiu fakto, ke voĉa lingvo montras abundajn trajtojn de kontinueco (intonacio, parolritmo k.t.p. estas tipe kontinuaj signoj), kaj kontinuecon oni emas identigi kun natureco, kiel tio estis jam aludita en sekcio 2.2.

### 3.2. Skribo: diskreta fenomeno

Skribo, kontraste al parolo, aperas por ni ne kiel natura, sed plie kiel artefarita fenomeno. Ties kaŭzo ankaŭ fontas el pluraj faktoj. Unue el tiu fakto, ke skribo estas homa invento, ĝia alproprigo postulas longdaŭran konscian klopodadon, kaj signifa parto de la homoj neniam alproprigas ĝin, tamen tiuj ne-alproprigintoj neniam estas rigardataj malsanuloj (dum jes ja, nehavantoj de parolkapablo estas rigardataj malsanaj). Due el tiu fakto, ke skribo efektive estas sekundara formo de lingvouzo. Trie, skribo (almenaŭ alfabeta skribo) estas nete diskreta fenomeno: el la lingvaj signoj ĝi kapablas fiksi nur la diskretajn elementojn (fonemojn, vortojn, frazojn k.t.p.), sed ne — aŭ nur tre nekomplete — la kontinuajn elementojn (intonacion). Resume: kontraste al parola lingvofunkciado, nomata natura, skribo estas esence artefarita. Ong diras: “Skribo estas teknologio. [. . . ] Kontraste al la natura, buŝa parolo, skribo estas komplete artefarita. Ne eblas skribi ‘nature’.”[10] Tiu ĉi cirkonstanco estas multe pli grava, ol ĝi ŝajnas esti unuavide.

### 3.3. Skribo transformas la lingvon

La artefarita skribo signife transformas la lingvon; la specifaj manieroj de la skribaj tekstoj refasonas ankaŭ buŝan lingvouzon. “Post la naskiĝo de skribo buŝa lingvo neniam plu estis la sama”,[11] skribas Ong. Kaj vere ĝi ne estis la sama. La daŭre kreskanta prestiĝo de skribo forte influas la parolan lingvo. Ĉar skribo ne kapablas registri intonacion, la pli frue variaj frazmelodioj de la parola lingvo griziĝas, paliĝas. Rimarkeblas, ke tiuj lingvoj, kiuj posedas pli longtempan kaj socie ampleksan skriban uzon, nuntempe estas akustike malpli riĉaj, ol tiuj, inter kies uzantoj socie ampleksa skribouzo disvolviĝis nur pli malfrue.[12]

La antaŭskriban epokon karakterizas relative malgranda nombro de vortoj, kiuj ĉiuj posedas aron da signifoj, ne klare konturitaj: la parolsituacio, la

[10] “Writing is a technology. [. . . ] By contrast with natural, oral speech, writing is completely artificial. There is no way to write ‘naturally’ ” (Ong 1982:81–82).

[11] “after writing [. . . ] oral speech was never the same” (Ong 1977:87).

[12] Nuntempa angla aŭ germana buŝa lingvouzo estas akustike malpli modulita, ol ekzemple la rusa, hispana aŭ itala. Ĉe la itala diferencoj rimarkeblas eĉ laŭ regionoj. En la nordaj regionoj (ekzemple en Piemonto), en kiuj uzado de skribo disvastiĝis relative frue, oni parolas malpli melodie, ol en la sudaj regionoj (ekzemple en Kalabrio), en kiuj skriba kulturo eĉ nun havas malpli profundajn radikojn. En Piemonto en 1871 scipovis skribi 58 %, en 1911 89 % de la plenkreska loĝantaro. La proporcio por Kalabrio en 1871 estas 17 %, en 1911 30 %; do la suda regiono grave postrestis (Cipolla 1969:19).

eksterlingvaj komunikrimedoj (mimiko, gestoj k.t.p.) kaj la intonacio en la buŝa lingvofunkciado ĉiam evidentigas, kiu el la pluraj signifoj de la prononcita vorto aktuale komprenendas. En skribo mankas tiuj eksteraj helpiloj, tial la kompleksaj vortsignifoj dissplitiĝas, naskiĝas por ĉiu klare konturita signifero aparta vortoformo, tiel do skribo kreskigas la vortonombron de ĉiu lingvo. La kreskado akompanas la disvastiĝan procezon de skribo: la 15 310-vortan dramon Cid de Racine konsistigas 1 488 leksemoj, en samampleksa nuntempa franca dramo ni trovas minimume 2 500 diversajn leksemojn (Guiraud 1956:12). Kaj iom post iom tiuj novaj vortoformoj eniras ankaŭ la parolan lingvo.

Skribo influas ankaŭ la sintakson. En la buŝa lingvouzo abundas kunordigitaj propozicioj, kiujn plej ofte kunligas la konjunkcio *kaj* — ili ne ŝarĝas multe la memorkapablon, ja ĉiam sufiĉas koncentriĝi nurnure al la ĝuste prononcata propozicio, ja ĉiu propozicio estas semantike memstara, ne ekzistas inter ili kompleksa interdependeco. Uzado de subordigitaj propozicioj — en kiuj propozicio esprimas iun frazelementon de la ĉefpropozicio — aperas unue en la skriba lingvo. En la okazo de subordigitaj propozicioj kompreno eblas nur ĉe samtempa konsidero de minimume du propozicioj (de la aktuale prononcata propozicio kaj de la ĉefpropozicio) — tamen tio ne ŝarĝas memorkapablon, ja la skribita teksto daŭre staras antaŭ la okuloj de la leganto. Post certa tempo subordigitaj propozicioj, naskiĝintaj en la skribo, aperas ankaŭ en la parola lingvouzo.

### 3.4. Esperanto naskiĝis skribe

Spite al la kantado en la jaro 1878 de la himno en Lingwe uniwersala, ni rajtas diri ke Esperanto naskiĝis skribe. En tiu cirkonstanco kuŝas la plej signifa diferenco inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. Skribo ja ne registras la tuton de la lingvo, nur ian subtrahaĵon de ĝi. Literoj ne enhavas la plenan kvalitaron de la prononcendaj parolsonoj, ili nur memorigas pri tiuj,[13] ili nur mobilizas la arsenalon de la akustika memoro, kiun konstruis, plenigis kaj riĉigis la ĉiutaga parola uzado de la lingvo. En Esperanto tiu ĉi akustika fono estas malpli firma, malpli evidenta. La unuaj parolaj uzantoj mem devis krei ĉi tiun fonon, kvazaŭ el nenio. Ili devis vesti per karno skeleton, ili devis doni radikojn al ekpompanta floro. Tiun ĉi akustikan fonon kompreneble ni jam havas, sed ni devas konscii, ke ĝi estas iom magra, malstabila, kaj malhavas tiun fortan memevidentecon, kiun posedas la akustikaj lingvofonoj de etnaj lingvaj. La akustika lingvofono de Esperanto kompreneble povos fortiĝi kaj profundiĝi; tio povos okazi rezulte de modifiĝo de ĝia funkciomodelo, t.e. rezulte de signifa ampleksiĝo de ĝia buŝa uzado.

[13] "The alphabet was and is an instrument of acoustic recognition, and only that" (Havelock 1982:318).

Pro la sekvaj kaŭzoj ajna lingvoteorio aŭ literaturkoncepto, staranta sur fonocentrisma kaj logocentrisma bazo, ĉiam trovos Esperanton kaj esperantan literaturan tekston ne plenvalora. La emancipiĝo de Esperanto kaj esperanta literatura teksto imageblas nur enkadre de tiaj teorioj, kiuj unuflanke rifuzas fonocentrismon (kaj kune kun ĝi ankaŭ logocentrismon), aliflanke aprezos la specifajn kvalitojn de skribo.

## 4. Ni revuu lingvoteoriojn

Ekzistas du bazaj lingvoteorioj, kiuj unuavide plene opozicias unu la alian: la kartezia lingvoteorio, kaj la teorio pri lingva relativismo de Sapir kaj Whorf.

### 4.1. La kartezia lingvoteorio

La tradicia lingvoteorio de la eŭropa kulturo ligiĝas al la nomo de la franca filozofo René Descartes (latina nomo Cartesius, esperantigite Kartezio; 1596–1650), kiu en la 17-a jarcento fakte nur formulis tiun lingvokoncepton, kiu ekde la antikveco regis la eŭropan pensmanieron pri lingvo. La kerno de tiu ĉi lingvoteorio estas la jena: pensoj povas naskiĝi sen kaj sendepende de lingva formulado, kaj la tiel naskiĝintaj pensoj povas poste ricevi lingvan veston, sed ne nepre ili ricevas tion. Tiu ĉi lingvoteorio enhavas plurajn implicojn, kies verecon de tempo al tempo pridubas iuj filozofoj kaj lingvistoj. La unua tia implico estas tio, ke lingva signo — signifanto — estas travidebla, kvazaŭ neŭtrala, ĝi peras la signifaton firme, kun precizaj konturoj, lasante nenian dubon, ne nur ĉe denotacioj, sed ankaŭ ĉe konotacioj. Laŭ la kartezia koncepto lingvo estas nura komunikada, reflekta ilo, nura perilo de la pensoj, kaj ĝia konstruo spegulas, mapas la arkitekturon de la perataj pensoj. Fakte el tiu ĉi implico sekvas ankaŭ alia, nome tio, ke lingva signo ĉiam konfidinde referencas al la elementoj de realo. La kartezia lingvoteorio estas la bazo de neta diferencigo inter signifanto kaj signifato, bazo de la pensmaniero kiu donas nepran prioritaton al la signifato, sekve ĝi estas ankaŭ bazo de logocentrismo, kiu estas — kiel jam montrite supre — signifat-centrismo.

Oni opinias, ke la kartezian lingvokoncepton generis la sonregistra, alfabeta skribosistemo per tio, ke ĝi donis aŭtonoman, kvazaŭ palpeblan kaj daŭran ekziston al la signifanto, klare apartigante ĝin disde la signifato — antaŭ la invento de skribo pro la efemera ekzistotempo de la prononcata vorto signifanto kaj signifato kvazaŭ kunfandiĝis, signifato kvazaŭ ensorbis la signifanton.

La kartezia lingvoteorio influas la juĝon pri Esperanto esence negative ĉefe pro tiu implico, kiu hipotezas firman, konturitan rilaton inter signifanto kaj signifato ne nur koncerne denotaciojn, sed ankaŭ konotaciojn. Por

la kritikantoj de Esperanto estas facile demonstri, ke tiu rilato inter signifanto kaj signifato en Esperanto estas malpli firma, ol en la etnaj lingvoj. Tio estas aparte okulfrapa fenomeno ĉe konotacioj: uzon kaj interpreton de konotacioj ĉe la plej multaj uzantoj de Esperanto sendube influas la gepatralingva semantika grundo. Do, resume: la kartezia lingvoteorio esence estas signifat-centrisma, logocentrisma. En Esperanto signifanto estas egale firma, kiel en etnaj lingvoj, sed signifato montras — ĉefe ĉe konotacioj — malpli klarajn konturojn, ol en tiuj lastaj: tial personoj, kiuj staras sur la bazo de la kartezia lingvoteorio, necese juĝas pri Esperanto negative.

La kartezia lingvoteorio ĝis nun firme regas la publikan pensadon pri lingvo, kio tute ne estas mirinda, ja ĝiaj bazoj estas samtempe ankaŭ pilieroj de la okcidenta kulturo.

## 4.2. Lingva relativismo: la lingvoteorio de Sapir kaj Whorf

La lingvoteorio de Edward Sapir (1881–1939) kaj Benjamin Lee Whorf (1897–1941), kiun ordinare oni nomas *hipotezo*, rekte opozicias al la kartezia koncepto. Ĝi formuliĝis nur meze de la dudeka jarcento; tamen ĝi ne malhavas antecedentojn: el tiuj antecedentoj elstaras la instruoj[14] de la germana lingvisto Wilhelm von Humboldt (1767–1835) pri tio, ke lingvo estas ne finita produkto (*ergon*), sed ĝi estas plie la funkciado mem (*energeia*).

La bazajn tezojn de lingva relativismo unuafoje formulas en sia studo Sapir (1929). La teorion detale eksplikas lia studento Whorf. Li skribas interalie, ke lingvo "ne estas nure reproduktilo por esprimi pensojn, sed multe pli ĝi estas formanto de la pensoj [...] Ni dissekcas, kategorias la elementojn de la naturo laŭ tio, kiel tion skizas por ni nia gepatra lingvo."[15] Lingvoj genealogie aŭ geografie proksimaj unu al la alia, aŭ kulture kunligitaj faras tiun dissekcadon laŭ tre simila (tamen ne sama!) maniero. Tia simileco konstateblas ĉe la eŭropaj lingvoj: tiun similecon nomas Whorf *Standard Average European*. Esence ankaŭ Esperanto sekvas tiun averaĝan eŭropan modelon.

Estas videble, ke lingva relativismo asertas plene la kontraŭon de tio, kion diras karteziismo. La karteziismo atribuas prioritaton al la pensado, dum lingva relativismo atribuas prioritaton al la lingvo.

La tezon de lingva relativismo pri la prioritato de la lingvo subtenas ankaŭ vico da tezoj lingvofilozofiaj kaj komunikadteoriaj — estas tre surprize, ke iliaj aŭtoroj neniam referencas, eĉ aludetas al la hipotezo de Sapir kaj Whorf, kvankam la nomitaj lingvofilozofiaj kaj komunikadteoriaj tezoj diras esence la

[14] Ili estas eksplikitaj ĉefe en *Über die Verschiedenheit des menschlichen Sprachbaus und ihren Einfluss auf die geistliche Entwicklung des Menschengeschlechts* (Berlin 1836).

[15] "[...] is not merely a reproducing instrument for voicing ideas but rather is itself the shaper of ideas. [...] We dissect nature along lines laid down by our native languages" (Whorf 1956:212–214).

samon, kion asertas lingva relativismo; aliflanke, ŝajne ankaŭ Whorf ne scias pri la ekzisto de tezoj tre parencaj al la lia. Jen, kelkaj el tiuj tezoj. Ludwig Wittgenstein (1889–1951) asertas, ke "ni ne povas esprimi per la lingvo tion, kion la lingvo mem esprimas" (Wittgenstein 1963:34). Aliloke li diras la jenon: "Lingvo vestas la penson per maskovesto. Ĝi faras tion tiel, ke oni ne povas dedukti laŭ la ekstera formo de la vesto pri la formo de la vestita penso, ĉar la ekstera formo de la vestaĵo estis fasonita tute ne por fari rekonebla la formon de la korpo" (Wittgenstein 1963:26). Martin Heidegger (1889–1976) sentencas, ke "La lingvo parolas, ne la homo. Homo parolas nur tiagrade, kiagrade li adaptiĝas al la lingvo."[16] Heidegger aliloke: "La lingvo parolas. La lingvo mem parolas al ni en la rakontitaĵoj."[17] Derrida kvazaŭ daŭrigas ĉi tiun vicon de konstatoj — harmoniaj inter si, sed tute sendependaj unu de la alia — kiam li diras, ke "ekzistas nenio ekster la teksto",[18] t.e. ne ekzistas referencaĵoj kaj signifatoj, ekzistas nur signifantoj, kiuj konstituas la tekston. McLuhan ampleksigas la validecon de tiu ĉi lingvokoncepto ankaŭ al aliaj periloj, kiam jam en la titolo de la unua ĉapitro de sia libro li asertas, ke "la perilo estas mem la mesaĝo."[19] Ĉiuokaze, estas fakto minimume tre atentinda, ke alfrontante la demandon pri pensado kaj lingvo, diversaj sciencoj alvenas esence al la sama konkludo.

En la teorio/hipotezo pri lingva relativismo kuŝas latento, kiu ebligas interpreton favoran por Esperanto. Lingva relativismo atribuas prioritaton al la lingvo, al la lingva elemento, do al la signifanto. Se la kartezia lingvoteorio estas logocentrisma, signifat-centrisma, do lingva relativismo estas iasence signifant-centrisma. Se en la signifadprocezo prioritaton kaj emfazon havas signifanto, Esperanto povas havi nenian malavantaĝon kompare al etnaj lingvoj. Se la signifanto kreas la signifaton (kaj ne inverse) tiam la funkciado de Esperanto estas absolute la sama, kiel tiu de la etnaj lingvoj.

### 4.3. Du teorioj

Povas lanĉiĝi la demando, kiu el la du lingvoteorioj estas la ĝusta. Kiu el la du kaptas kaj respegulas la veran naturon de la lingvo? Oni ne povas dubi, ke la du teorioj laŭ formallogika rezonado ekskludas unu la alian. Tamen, samtempe ni spertas, ke iuj fenomenoj de la funkciado de lingvo priskribeblas kaj interpreteblas per la kartezia teorio, dum aliajn lingvouzajn fenomenojn ni povas priskribi kaj interpreti pere de la teorio pri lingva relativismo. Malgraŭ

[16] "Die Sprache spricht, nicht der Mensch. Der Mensch spricht nur, indem er geschickt der Sprache entspricht" (Heidegger 2000:79).

[17] "Die Sprache spricht. Das Sprechen spricht für uns im Gesprochenen" (Heidegger 2000:107).

[18] "Il n'y a pas de hors-texte" (Derrida 1967a:227). Aliloke li ripetas tion: "Il n'y a rien hors du texte" (Derrida 1972:42).

[19] "The Medium is the Message" (McLuhan 1964).

ĉiaj logikaj rezonadoj ambaŭ teorioj ŝajnas esti ĝustaj, pravaj. Kiel tio eblas? Verŝajne tiel, ke neniu el la du teorioj sukcesas kompreni la veran naturon de la homa lingvo — tio ĝis nun restas kaŝita por ni.

Momente ni devas kontentiĝi per tio, ke gravan plimulton de la lingvofunkciaj fenomenoj eblas priskribi kaj interpreti ĉu per unu, ĉu per alia teorio, kaj la malkovro de la vera naturo de la homa lingvo restos kiel tasko por la lingvistoj de la estontaj generacioj.

Tre similan okazon montras por fizikistoj la naturo de lumo. Pri tio ekzistas same du teorioj. Unu teorio diras, ke lumo havas korpusklan karakteron, laŭ alia teorio lumo estas ondoj. Iuj lumfenomenoj priskribeblas kaj interpreteblas per la korpuskla teorio, dum aliaj fenomenoj per la onda teorio. Ĉiuokaze, gravan plimulton de la lumfenomenoj eblas priskribi kaj interpreti per unu el la du teorioj. Kiu el la du teorioj estas la ĝusta? Fakte tio estas neinteresa demando. Ne temas pri vero de teorioj, sed pri taŭgeco de matematikaj modeloj: por iuj fenomenoj unu el la du modeloj, por aliaj la alia modelo plej bone taŭgas por homa kompreno, por pedagogiaj priskriboj kaj por prognozoj.

## 5. Ni revuu literaturkonceptojn

Sub la termino *literaturo* ĉi tie ni komprenos beletron, t.e. fikciajn prozajn tekstojn kaj poezion. En la ĉiutaga praktika vivo ĝenerale bone ni scias, kio estas literaturo, tamen doni precizan difinon malfacilas. Kaj ni devas konscii, ke la konceptoj pri literaturo tra la jarmiloj, jarcentoj signife ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝas.

### 5.1. Tradiciaj literaturkonceptoj

**5.1.1. Fruaj literaturkonceptoj.** Klara apartiĝo de beletro disde aliaj tekstoj okazas fine de la epoko de klerismo, dum la dua duono de la 18-a jarcento. Ĝis tiu tempo ĉio skribita estis rigardata literaturo, sendepende de tio, ĉu temis pri fikcia aŭ nefikcia teksto. Indas noti, ke la senkaŝa fikcieco aperas nur en tiu ĉi tempo; pli frue la aŭtoroj de fikciaj tekstoj provis prunti verecon kaj realecon al sia verko, referencante al trovita taglibro, al rakonto de travivinto de la prezentita historio k.t.p. Necesas aldoni, ke klasiĝis literaturo nur tio, kio estis skribita. Buŝe rakontitaj tekstoj, ekzemple popolfabeloj, ĝis la fino de la 18-a jarcento restis sub la t.n. literatur-sojlo, t.e., ili ne estis rigardataj literaturo.

La klaran separiĝon de tekstoj fikciaj kaj nefikciaj verŝajne eldevigis la rapida kresko de la nombro de libroj: taŭga orientiĝo inter la libroj necesigis ian bazan kategoriadon.

**5.1.2. Mimetismo.** La malnovgrekaj vortoj *μίμησις* (*mímēsis*) kaj *μιμέομαι* (*miméomai*) origine signifas 'imito' respektive 'mi imitas', sed oni povas ilin kompreni ankaŭ kiel 'prezento', 'respegulo'; 'mi prezentas', 'mi respegulas'. Ili estas la bazo de tiu literaturkoncepto, kiun eksplikas Aristotelo en sia Poetiko. La greka filozofo trovas, ke la tasko de la arto — sekve ankaŭ tiu de la literaturo — estas imiti, prezenti, respeguli la realan mondon. Tiu ĉi postulo montriĝis treege temprezista: kun malmulte ŝanĝiĝintaj emfazoj kaj etaj modifoj la Aristotela koncepto vivas ĝis nun. La unuajn fendojn en la marmortrono de mimetismo kaŭzis romantismo, kiu donis vastan terenon al fantazio. La detronigon de mimetismo plenumis postmodernismo en la dua duono de la dudeka jarcento, kiam ĝi pridubis la eblon referenci al la reala mondo per elementoj de la lingvo, t.e. per vortoj. Oni povas diri, ke tiu detronigo ĝis nun ne estas plena, ja en la publika pensado pri literaturo mimetismo ankaŭ nuntempe havas firmajn poziciojn.

Mimetisma literaturkoncepto esence staras sur la bazo de la kartezia lingvoteorio; ĝia sinteno estas logocentrisma. La pretendo imiti, prezenti, respeguli la realan mondon implicas la kredon pri tio, ke la objektoj, personoj kaj fenomenoj de la reala mondo fidinde estas referenceblaj per la vortoj de la homa lingvo. Mimetismo trovas memevidenta tion, ke al ĉiu signifanto apartenas klare konturebla signifato, kaj inverse, por ĉiu signifato troveblas adekvata signifanto. Laŭ mimetismo la esenca celo kaj tasko de literaturo estas la vera, fidela kaj nuancoriĉa imitado, respegulado de la reala mondo, la tasko de la signifantoj — la vortoj de la literatura teksto — estas elvoki en la leganto klare konturitajn signifatojn. En tiu senco mimetismo estas literaturkoncepto signifat-centrisma, ĝisoste logocentrisma.

**5.1.3. Romantismo.** La romantismo refreŝigis la literaturkoncepton de klasikismo per du novaj trajtoj. La unua novigo estis tio, ke en la skribaj beletraj tekstoj resurektas la karakterizaj trajtoj de la buŝa lingvofunkciado, kaj ili fariĝas ĉefaj valorkriterioj; la dua novigo estis la kulto de originaleco. La du novigoj, je la unua vido sendependaj unu de la alia, fakte havas organikan interdependecon. Klasikismo preferis kaj aprezis regulecan, konscie konstruitan, zorge poluritan, perfekte harmonian, moderan stilon, kiu per mil fadenoj ligiĝis al la skriba lingvouzo. Spitante la klasikisman estetikon, romantismo preferas kaj aprezas la spontaneecon de la parola lingvouzo, trovante ĝin ankaŭ natura, kontraste al la artefarita perfekteco de la klasikisma idealo.

La kulto de originaleco kvazaŭ memevidente ligiĝas al la aprezo de la spontanea parola lingvo. La prefero de la parola lingvo sendube radikas en la jam en sekcio 2.2 menciita eseo de Rousseau pri la origino de lingvoj. Tiu prefero aperas en pluraj verkoj en klara, eksplica formo; ekzemple en la antaŭparolo de *Lirikaj baladoj* de Wordsworth kaj Coleridge (1798) — poemaro rigardata kiel unu el la uverturoj de la romantismo — oni povas legi, ke

la poemoj en tiu ĉi libro estas eksperimento pri tio, kiel la konversacia lingvo de la mezaj kaj subaj sociaj klasoj uzeblas por poeziaj celoj.[20]

En la romantisma literaturkoncepto la akustika kvalito de literaturo verko daŭre estas unu el la ĉefaj valorkriterioj. En sia fama eseo *Kiel estis farita la "Palto" de Gogol?* (1919) Boris Eichenbaum (1886–1959) detale demonstras, kiel zorge atentis Gogol pri la akustiko de sia teksto. Tiu insisto pri la akustika aspekto de la tekstoj en la epoko de Gogol povas ŝajni minimume stranga. Ja en tiu tempo literaturaj verkoj kreiĝis per silenta skribado, kaj ili estis legataj same silente:[21] do la grava plimulto (precipe la longaj prozaĵoj) de la romantisma epoko neniam gajnis akustikan konkretiĝon, t.e. tiuj tekstoj neniam estis voĉlegitaj, tial ilia akustiko povis esti nur virtuala. Tamen la akustika valorkriterio, enkondukita de la romantismo, montriĝis daŭra kaj ĝi grave postvivis romantismon. La franca verkisto Marcel Proust komence de la dudeka jarcento ne malpli ol Gogol zorgis pri la eŭfonio de siaj frazoj, kaj la kritiko multe aprezis tion.

La emfazo de la akustika vidpunkto malgraŭ la ne kontestata belsoneco de Esperanto ne utilas al la prijuĝo de la esperanta literatura teksto. Esperantlingve skribita teksto neniam povas havi tiel vastan kaj profundan akustikan fonon, kian havas etnolingve skribitaj tekstoj, ja en etnaj lingvoj la parola lingvouzo konsistigas minimume 90 procentojn de ĉiuj lingvouzoj, kaj restas maksimume 10 procentoj por skribo/lego, dum en la okazo de Esperanto tiu proporcio probable estas inversa. Tial ĉe esperante skribita teksto la akustika akompanaĵo estas malpli firma, malpli konturita, malpli emfaza. Malgraŭ sia emfaza fonocentrismo, romantismo ŝancelis la pli frue ŝtalfirmajn poziciojn de logocentrismo. La naskiĝanta kulto de originaleco donas pli da libero al la fantazio, kaj rezulte de tio la signifato iom perdas el sia konturiteco kaj pezo, do iomete da emfazo el ĝi transmetiĝas al la signifanto. Oni povas diri, ke romantismo rimarkinde kreskigas la pezon kaj gravecon de la vortoj.

**5.1.4. Enhavo kaj formo.** Ĉi tiun opozician nocioparon naskis logocentrismo, kaj la eŭropa pensado ĉiam donis prioritaton kompreneble al enhavo. Tamen, koncerne literaturajn (ĉefe poeziajn) tekstojn jam ankaŭ en la antikveco lanĉiĝis priformaj konsideroj, eĉ se tiuj estis grandparte metrikaj kaj stilaj. Kun la paso de la tempo ĉiam pli oni konsciis pri tio, ke ĉe certaj tekstoj la allogeco, la legindeco fontas malpli el la signifo de la vortoj, sed plie el ties formo kaj kombiniĝo.

---

[20] "The majority of the following poems are to be considered as experiments. They were written chiefly with a view to ascertain how far the language of conversation in the middle and lower classes of society is adapted to the purposes of poetic pleasure."

[21] En la komencaj tempoj de la skriba kulturo homo legis ankaŭ por si mem laŭte. Ekzemploj de silenta legado estis notitaj jam ankaŭ en la antikveco, sed ĝi fariĝis ĝenerala nur fine de la 18-a jarcento. Pri tio legu pli detale ĉe Balogh (1926).

En la unua duono de la 20-a jarcento aperas pluraj skoloj kaj tendencoj, kiuj celas malkovri la priformajn principojn, laŭ kiuj konstituiĝas literatura teksto. (Estas interesa fenomeno, ke tiuj skoloj kaj tendencoj elkreskas ĉefe el slava grundo; sufiĉas vicigi nur la ĉefajn nomojn, por vidi tion: Viktor Ŝklovskij, Miĥail Baĥtin, Roman Jakobson, Jan Mukařovský, René Wellek, kaj poste Tzvetan Todorov, Julia Kristeva k.a.) Ĉiuj tiuj skoloj kaj tendencoj vidis — kontraste al la pli fruaj psikologiaj kaj sociologiaj aliroj — en literaturaj verkoj antaŭ ĉio lingvan produkton. Tio signifas, ke la atento daŭre estis transmetiĝanta for de la signifato kaj al la signifanto.

## 5.2. Postmodernismo

**5.2.1.** Kiel turnopunkton en la procezo de la transmetiĝo de la atento disde la signifato al la signifanto oni vidas en la apero de la libro *De la grammatologie* 'Pri gramatologio' de Jacques Derrida (1967a). La konstatoj de tiu libro havis enorman efikon, kaj ĝis nun ili baze difinas la pensmanieron pri la funkciado de literatura teksto. Per unusola movo li renversas samtempe du plurjarmilajn bazajn dogmojn de la eŭropa pensado. La unua tia dogmo estas logocentrismo, kies bazo estas la hipotezita prioritato de signifato. Derrida nomas la signifaton transcenda, ĉar ĝia ekzisto ne estas pruvebla per la sensoj, kaj samtempe asertas, ke firman ekziston havas nur signifanto, kiu efektive mem produktas sian signifaton. Signifo ne estas perata al ni, ĝin ni mem kreas aktive konforme al la kompleksa interludo de kodoj kaj konvencioj, eĉ se ni ne konscias pri tio.[22] Do, Derrida ne kompromisas inter signifato kaj signifanto, kiel tion faris la literaturteoriaj skoloj de la unua duono de la dudeka jarcento, sed plene submetas signifaton al signifanto; tiu submetiteco estas speco de kunfandiĝo, ne-plu-diferencigebleco.

> La prezentado kunfandiĝas kun la prezentato, tiom, ke ni parolas tiel, kiel ni skribas, kaj ni pensas, ke la prezentato estas nura ombro aŭ respegulaĵo de la prezentanto. [...] En ĉi tiu ludo de prezentado la originpunkto fariĝas nekaptebla. Estas aferoj, akvosurfacoj kaj bildoj, senfinaj referencoj de unu al la alia, sed ne plu ekzistas fonto. Ne plu ekzistas simpla origino.[23]

La alia dogmo, kiun Derrida detruas, estas la prioritato de parolo antaŭ skribo. Li trovas, ke la koncepto de skribo nestas en la lingvo mem jam ekde la komencoj de la lingva ekzistado, kaj la grafika skribo, kiun ni konas,

[22] "Meaning is not 'transmitted' to us – we actively create it according to a complex interplay of codes or conventions of which we are normally unaware" (Chandler 2000:14).

[23] "La représentation s'enlace à ce qu'elle représente, au point que l'on parle comme on écrit, il pense comme si le représenté n'était que l'ombre ou reflet du représentant. [...] Dans ce jeu de la représentation, le point d'origine devient insaisissable. Il y a des choses, des eaux et des images, un renvoi infini des unes aux autres, mais plus de source. Il n'y a pas d'origine simple" (Derrida 1967a:54–55).

povis inventiĝi nur tial, ĉar skribo ekzistis latente ene de la lingvo jam antaŭe, kiel *archi-écriture* 'pra-skribo'. Lingvo multe pli rekonas sin en la reguleco de skribo, ol en la akustika ĥaoso de la parolo. La ekzisto estas esence skriba, li diras.[24]

**5.2.2.** La epoksojlan libron de Derrida akompanas la apero de tezoj kaj teorioj, kiuj harmonias kun ĝi. En la jaro 1968 aperas eseo de Roland Barthes *La mort de l'auteur* 'La morto de la aŭtoro', en kiu li fosas plu la sulkon komencitan de Derrida. La metafora titolo jam sugestas la kernon de la eseo: mortis la aŭtoro, kaj naskiĝis la leganto. Iom libere resumante la esencon: ne gravas, kiujn signifatojn atribuas la aŭtoro al siaj signifantoj (vortoj, teksto), gravas tio, kiujn signifatojn atribuas al ili la leganto. Per aliaj vortoj: la esenco de la tekstoj kuŝas ne en ties origino (t.e. ĉe la aŭtoro), sed en ties destino (t.e. ĉe la leganto).

Alia grava akompana tezo estis tiu pri interteksteco. Ĝin starigis Julia Kristeva (n. 1941) jam en 1966: ĝia esenco estas, ke literatura teksto interdependas kun ĉiuj aliaj literaturaj tekstoj iam naskiĝintaj, kaj tekstoj kvazaŭ generas unu la aliajn. Laŭ la tezo de interteksteco tekstoj multe pli kompariĝas kun aliaj tekstoj, ol kun siaj temoj, t.e., signifantoj multe pli kompariĝas inter si, ol kun siaj signifatoj — en la kerno de la tezo pri interteksteco do kaŝas sin la signifant-centrismo de Derrida.[25] Cetere, la radikoj de la tezo pri interteksteco rekondukeblas ĝis la instruo de de Saussure pri tio, ke lingvo estas sistemo de interdependaj elementoj, kaj la lingvaj elementoj (vortoj) gajnas sian memstarecon kaj signifon ne per sia pozitiva substanco (ekzemple son-formo), sed per kompariĝo al aliaj similaj elementoj kaj per sia diferenco disde tiuj aliaj elementoj.[26]

La koncepto de interteksteco intime ligiĝas al la teorio de lingva relativismo, tiel same ĝi ligiĝas al la tezo de Derrida, laŭ kiu ekster la teksto ekzistas nenio (vidu sekcion 4.2), kaj ĝi estas bazo de la poststrukturisma literaturscienco.

La tezo pri interteksteco fakte detruas ankaŭ mimetismon. Mimetismo ja diris, ke "arto imitas la vivon", dum interteksteco diras ke "arto imitas la arton". Siatempe Oscar Wilde (1854–1900) plupensis tiun tezon, kaj provoke deklaris, ke "vivo imitas la arton". Multaj opinias, ke tekstoj estas konstruantoj ne nur de aliaj tekstoj, sed ankaŭ konstruantoj de niaj percept-

---

[24] "L'être écrit" (Derrida 1967a:31).

[25] Pri la fenomeno de interteksteco en Esperanto verkis studon Sabine Fiedler (1999). Ŝi – kontraste al la supre eksplikita interpreto – reprezentas malvastan koncepton de interteksteco: ŝi konstatas intertekstecon nur tiam, kiam tekstoj rekte aludas unu al la alia.

[26] "Son contenu n'est vraiment déterminé que par le concours de ce qui existe en dehors de lui" (de Saussure 2005:160).

manieroj, t.e. ke ne ekzistas perceptoj sendependaj de la tekstoj, kiujn ni legis aŭ aŭdis.[27] La provoka tezo de Wilde ŝajnas do esti akceptita.

**5.2.3. Ŝanĝiĝo de la objekto de literaturo.** Lanĉiĝas la demando, kio povis elvoki la supre konturitan bazan kaj kernan paradigmoŝangon en la pensado pri lingvo kaj literaturo. La aŭtoro de tiu ĉi teksto hipotezas — ne ekskludante la kunefikon de aliaj faktoroj — ke la paradigmoŝanĝon elvokis ĉefe la ŝanĝiĝo de la objekto de literaturo. Literaturaj ŝanĝoj ja povas efiki ne nur al literaturkonceptoj, sed ankaŭ al lingvoteorioj; ja literaturo en ĉiuj socioj estas rigardata tre altprestiĝa formo de lingvouzo.

Dum longa tempo la ĉefa objekto de literaturo estis la eksteraj okazaĵoj de la homa vivo, kaj oni trovas nur sporadajn provojn kapti per la lingvo la internajn okazaĵojn aŭ animan staton de la homo. Tiuj provoj en liriko estis pli oftaj, sed en la proza epiko vere nur tre sporadaj. Signifa ŝanĝo en tio okazis nur en la dua duono de la 18-a jarcento, kiam preromantismo kaj poste romantismo direktis sian atenton al la interna mondo de la homo. Tiu atento ankaŭ post la fino de la romantisma epoko restis firma, eĉ kreskanta: sufiĉas aludi nur al la modo de psikologia romano dum la dua duono de la 19-a jarcento. Tiun tendencon poste akcelis la apero de kino: ĝi kvazaŭ foruzurpis eksterajn okazaĵojn kiel temon — sur tiu kampo teksto ne kapablis konkuri kun la bildoj. Tial kvalita literaturo iom post iom preskaŭ plene limiĝis al la prezento de la interna, psika, anima mondo de la homo; eksteraj okazaĵoj en kvalitaj verkoj ĉiam havas certan metaforan karakteron: en sia pura, nemetafora formo ili aperas kiel temo nur en eksplice poramuzaj verkoj.

La lingva prezento de la internaj eventoj de la homo streĉis la povojn de la lingvo, ja ĝi kreiĝis por funkcii en interhomaj rilatoj, kaj tial en ĝia vortaro mankis vortoj por internaj eventoj de la homa vivo. Lingva prezento de la internaj eventoj eblis nur per metafora ekuzo de vortoj, kies baza signifo rilatis elementojn de la ekstera vivo. (Ekzemple la vorto *skui* signifas baze 'rapide fari ripetatajn fizikajn movojn', kaj ni uzas ĝin metafore por signi tre fortan animan impreson: *La tragika novaĵo skuis lin.*) La temoŝanĝo de literaturo transformis la lingvouzon kaj stilon de la verkoj. Dum en la klasika epiko la prezentataj elementoj de la ekstera vivo montras tempan kaj spacan sinsekvon, iaspecan metonimian ordon, kontraste al tio en la moderna epiko la domino de la prezento de animaj, psikaj eventoj donas ŝlosilan rolon al metaforo. Ĉi tiun fenomenon malkovris la unua David Lodge fine de la 1970-aj jaroj (Lodge 1977), sed li ne serĉis klarigon por la fenomeno.

[27] "Confounding the realist agenda 'art imitates life,' intertextuality suggests that art imitates art. Oscar Wilde (typically) took this notion further, declaring provocatively that 'life imitates art'. Texts are instrumental not only in the construction of other texts but in construction of experiences" (Chandler 2000:205).

La romano *L'Étranger* 'La fremdulo' de Albert Camus (1913–1960) bele ilustras la kunapartenon de metonimiaj tekstostrukturoj kaj lingva prezento de eksteraj eventoj unuflanke, kaj kunapartenon de metaforaj tekstostrukturoj kaj lingva prezento de internaj, animaj eventoj aliflanke. La unuaj 83 paĝoj de la romano, kiuj rakontas kun protokola precizeco pri tio, kiel pasas la tagoj de la protagonisto Mersault, enhavas entute nur 15 metaforojn. Sur tiuj paĝoj Camus strebas esti tre objektiva kaj evitas diri ion iajn pri la pensoj aŭ sentimentoj de Mersault — do la rakontado tuŝas nur la eksterajn eventojn de la vivo de la protagonisto. Post tio okazas la pistolpafa senmotiva mortigo (fare de Mersault) de nekonata arabo sur la marbordo. Tio rakontiĝas en nur ses alineoj — kaj tiu mallonga teksto enhavas 25 metaforojn (Ullmann 1964:121). Kial tiu neproporcieco? La kaŭzo kuŝas en tio, ke tiuj ses alineoj temas pri la internaj eventoj de la psiko de Mersault, ja la murdofaro radikas en internaj eventoj; eksteraj, komun-evidentaj kaŭzoj por la faro de Mersault ne ekzistas.

Per kio la metaforiĝa procezo de la literatura lingvo povas esti katalizanto de la paradigmoŝanĝo prilingva kaj priliteratura? La respondo kuŝas en la funkcimekanismo de metaforoj. Kiam ni kreas metaforon, ni ligas novan, plian signifaton al signifanto, kiu ĝis tiam havis nur unu signifaton, kaj de nun ĝi havas du signifatojn. Tiu duobliĝo de la signifato kaŭzas certan semantikan malcertecon, osciladon, reduktas la evidentecon de la signifato, kaj tio nerekte sekvigas relativan fortiĝon de la pozicio de la signifanto en la semantika triunuo, nome 1. signifanto, 2. signifato$_1$, 3. signifato$_2$. Tiamaniere do la ŝanĝiĝo de la ĉefa temo de literaturo povas rezultigi la fendiĝon de la marmortrono de logocentrismo, kaj direkti la atenton disde la signifato al la signifanto.

## 6. Konkludoj

Esperanto kaj ĝia literaturo tra la lupeo de la ŝanĝiĝanta (ĉu jam ŝanĝiĝinta?) pensmaniero pri lingvo kaj literaturo aspektas multe malpli devia fenomeno, ol ĝi ŝajnis esti en la prilumo de la tradiciaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj.

Fonocentrismo kaj logocentrismo, kiuj dum pluraj miloj da jaroj regis la eŭropan pensadon pri lingvo kaj literaturo, aŭtomate asignis por Esperanto kaj esperanta literaturo duagradan rolon. Duagradan, ĉar fonocentrismo kaj logocentrismo nomis kernaj kaj esencaj tiujn elementojn de la lingvofunkciado, en kiuj elementoj Esperanto neniel povis konkuri kun la etnaj lingvoj. Tiuj du elementoj estas la primareco, prioritato kaj bazeco de la voĉa uzado unuflanke (t.e. fonocentrismo), kaj la firma, fiksa, kvazaŭ natura rilato inter signifanto kaj signifato aliflanke (t.e. logocentrismo).

Oni devas serĉi verŝajne en la tradiciaj lingvaj kaj literaturaj paradigmoj la kaŭzon de tio, ke dum la pasintaj 120 jaroj Esperanto altiris relative multajn adeptojn el inter matematikistoj, natursciencistoj, kaj relative malmult-

ajn el lingvistoj, kaj eĉ malpli multajn el literatursciencistoj. Probable temas pri tio, ke lingvistoj kaj literatursciencistoj ne povis akordigi la fenomenon Esperanto kun la regantaj paradigmoj de siaj fakoj. Tio tute ne estas mirinda, ja Esperanto okulfrape kontrastas al pluraj bazaj tezoj de la tradiciaj paradigmoj pri lingvo kaj literaturo. Oni notu, ke tiuj kelkaj lingvistoj, kiuj tamen fariĝis adeptoj aŭ eĉ uzantoj de Esperanto, emfazis ĝiajn praktikajn aspektojn kaj utilojn, sed ili evitis fari teoriajn konsiderojn. La novaj paradigmoj principe kreas pli favoran teorian fonon por Esperanto kaj por ĝia literaturo. La favoriĝo de la teoria fono resumeblas en du punktoj.

1. La promocio de skribo (fare de Derrida) al primara ekzistoformo de lingvo forfaligas aron da rezervoj kaj eblaj kontraŭargumentoj, ja se skribo (en la formo de pra-skribo) nestas en la homa lingvo jam ekde la komenco de ĝia naskiĝo, la grafik-skriba genezo de Esperanto ne povas signifi malavantaĝon. Do, se homa lingvo kreiĝas esence skribe, Esperanto nur obeas la bazan, ĝeneralan modelon, kaj tute ne estas rigardebla io devia.

2. La promocio de signifanto kompare al signifato. En la nova paradigmo signifanto avancas signifaton: la unua kvazaŭ kreas la lastan en la menso de la leganto (dum laŭ la tradicia paradigmo firman ekziston havis la signifato, kaj por ĝi elektiĝis adekvata signifanto). Tiamaniere la sama signifanto povas krei diversajn signifatojn en la menso de la diversaj legantoj. La nova paradigmo do asertas, ke la semantika malcerteco, kiu sendube ekzistas ĉe esperantaj vortoj, ekzistas fakte ankaŭ en ĉiuj etnaj lingvoj. Ankaŭ en tiu ĉi punkto montriĝas, ke Esperanto kaj ĝia literaturo nur kondutas laŭ la baza, ĝenerala modelo: ili havas nenian devian trajton.

La novaj paradigmoj dum la lastaj jardekoj plene ekregis en la literaturscienco, filozofio kaj scienco pri komunikado, akiris gravajn poziciojn en lingvistiko, kaj komencis esti akceptitaj ankaŭ en la publika pensado. Estus dezirinde, ke esperantologio eluzu tiujn ŝancojn, kiujn proponas tiu paradigmoŝanĝo.

## Referencita literaturo

Balogh, József (1926). Beiträge zur Geschichte des lauten Lesens und Schreibens. *Philologus* **82**, 84–109 kaj 202–240.

Chandler, Daniel (2002). *Semiotics. The Basics.* Londono: Routledge.

Cipolla, Carlo M.(1969). *Literacy and development in the West.* Londono: Penguin Books.

Derrida, Jacques (1967a). *De la Grammatologie.* Parizo: Les Éditions de Minuit.

Derrida, Jacques (1967b). *La voix et le phénomène.* Parizo: Presses Universitaires de France.

Derrida, Jacques (1972). *La dissémination.* Parizo: Le Seuil.

Эйхенбаум, Б. М. (1919). Как сделана «Шинель» Гоголя? `http://opojaz.ru/manifests/kaksdelana.html`

Fiedler, Sabine (1999). Tekstrilatoj. (Pri interteksteco en Esperanto.) **En:** Benczik, Vilmos (red.): *Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton*, pp. 50–60. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Guiraud, Pierre (1956–1964). *Index du vocabulaire du théatre classique.* Vol. III–XI. Publié sous la direction de Pierre Guiraud. Parizo: Libraire C. Klincksieck.

Havelock, Eric A. (1982). *The Literate Revolution in Greece and Its Cultural Consequences.* Princeton, NJ: Princeton University Press.

Heidegger, Martin (2000). *Das Ding, Die Sprache.* Sárvár: Sylvester János Könyvtár.

Lausberg, Heinrich (1990). *Handbuch der Literarischen Rhetorik. Eine Grundlegung der Literaturwissenschaft.* Tria eldono. Stuttgart: Franz Steiner Verlag.

Lodge, David (1977). *The Modes of Modern Writing: Metaphor, Metonymy and the Typology of Modern Literature.* Londono: Arnold.

McLuhan, Marshall (1964). *Understanding Media.* London: Routledge.

Ong, Walter J. (1977). *The Interfaces of the Word. Studies in the Evolution of Consciousness and Culture.* Ithaca; Londono: Cornell University Press.

Peirce, Charles Sanders (1998). *The Essential Peirce. Selected Philosophical Writings* (1893–1913), volumo 2, redaktita de la Peirce Edition Project. Bloomington; Indianapolis: Indiana University Press.

Rousseau, Jean-Jacques (1995). Essai sur l'origine des langues. **En:** Rousseau, Jean-Jacques, *Œuvres complètes V*, pp. 375–429. Parizo: Gallimard.

Sapir, Edward (1929). Linguistics as a Science. *Language* **5**, 207–214.

de Saussure, Ferdinand (2005). *Cours de linguistique générale.* Parizo: Payot.

Stephen Ullmann (1964). *Language and Style.* Oksfordo: Basil Blackwell.

Whorf, Benjamin Lee (1956). *Language, Thought, and Reality.* Cambridge, MA: M.I.T. Press.

Wittgenstein, Ludwig (1963). *Logikai-filozófiai értekezés.* Budapeŝto: Akadémiai Kiadó.

## Biografieto de la aŭtoro

Vilmos Benczik estas naskita en 1945 kaj doktoriĝis pri lingvistiko. Li estas profesoro en altlerneja fakultato de la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. Liaj esploroj koncentriĝas al la renkontterenoj de lingvistiko, literaturscienco kaj komunikada teorio, kun aparta atento al tiuj efikoj, kiujn faris kaj faras komunikadaj teknologioj al la homa lingvo.

## Bibliografieto de la aŭtoro

2001. *Nyelv, írás, irodalom — kommunikációelméleti megközelítésben* [*Lingvo, skribo, literaturo — en komunikteoria aliro.* Libro en la hungara]. Budapeŝto: Trezor Kiadó. 332 pp.

2001. Komunikteoriaj konsideroj pri Esperanto kaj ĝia leksiko. **En:** Kiselman, Christer; Mattos, Geraldo (red.). *Lingva Planado kaj Leksikologio / Language Planning and Lexicology*, pp. 55–64. Chapecó (Brazilo): Fonto.

2002. Ĉapitro el la historio de la komunikado: "La revolucio de voĉo". **En:** McCoy, Roy (red.): *Internacia Kongresa Universitato, Fortalezo, Brazilo, 3–10 aŭgusto 2002*, 35–45. Roterdamo; Fortaleza: Universala Esperanto-Asocio.

2003. Communication as source and motivator of language evolution. *Language Planning & Language Problems* **27**, 3, 249–268.

2006. *Jel — hang — írás* [*Signo — sono — skribo.* Libro en la hungara]. Budapeŝto: Trezor Kiadó. 268 pp.

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 61–67

# Organizaj strukturoj kaj la estonteco de Esperanto

Humphrey Tonkin

Enhavo:

La komenco: universaleco aŭ internacieco?
UEA: universalismo kaj kompromitiĝo
UEA postmilita: de internacieco ree al universalismo
Estontece
Cititaj verkoj

Resumo. Ne senpense Hector Hodler kaj liaj junaj kunlaborantoj en 1908 nomis sian novan asocion "Universala": kiel Lins atentigas, UEA konsistis nur el individuaj membroj, tiel ignorante la naciajn Esperanto-societojn. Temis esence pri horizontala strukturo, tre taŭga por la idealisma, popularisma etoso de tiu periodo. Sed la Unua Mondmilito, kaj la posta mondpolitika evoluo ĝenerale, plifortigis naciajn identecojn. Sekve, ne estas surprize, ke, kiam oni konstruis la "modernan UEA" en la jaroj post la Dua Mondmilito, oni kreis, surbaze de la kunigo de UEA kaj IEL, esence hierarkian strukturon, kies bazo konsistis el lokaj grupoj, landaj asocioj, kaj internacia organizaĵo. La fundamento de tiu strukturo estis (a) geografia kaj (b) ŝtata. Kvankam ekzistis plej diversaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, neniu sukcesis komplete teni sian pozicion fronte al tiu monolita kaj dum pluraj jaroj tre efika strukturo. La mondpolitika evoluo iris en la lastaj jaroj inversan direkton: la internacia kunlaboro okazas ĉiam pli ofte sen interveno de ŝtataj strukturoj, sen limiĝo geografie – helpate (eĉ kaŭzate) de la profundaj ŝanĝoj en la komunika teknologio. Malfermiĝis la demando, kiun formon prenos la strukturoj de la Esperanto-komunumo en la estonteco.

## La komenco: universaleco aŭ internacieco?

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco estis fondita en 1863 kaj la Unua Konvencio de Ĝenevo estis adoptita en 1864, sed la unua vera internacia organizaĵo de ŝtatoj estis la *Union internationale du télégraphe* 'Internacia Unio de la Telegrafo', fondita en Parizo en 1865, kun la celo reguligi la internacian trafikon en la nove inventita telegrafio. Naŭ jarojn poste, en 1874, oni starigis la *Union générale des postes* 'Ĝeneralan Poŝtan Union', kiu en 1878 fariĝis *Union postale universelle* 'Universala Poŝta Unio' (Iriye kaj Saunier 2009:681–682, 1078–1079). Kial la telegrafia unio estis nomata "Internacia" kaj la poŝta unio "Universala"? Lingva pedanto eble atentigus, ke, dum la

telegrafia estis internacia *unio*, la gramatika rolo de la vorto *universala* estis iom malpli klara (spite la ŝajnan klarecon de ties franca titolo), ĉar la poŝta unio celis krei universalan poŝton — ĝi volis universaligi sistemon de komunikado jam establita ene de la diversaj landoj.

Fakte, inter la 1860-aj jaroj kaj la 1870-aj okazis subtila ŝanĝiĝo en la retoriko de internacia kunlaboro. Pli kaj pli malfermiĝis al edukitaj homoj vizio de novaj mondaj organizaj formoj, en kiuj tutmonda etiko limigus kaj eĉ forigus internaciajn konfliktojn, anstataŭigante ilin per traktatoj pri kunlaboro kaj pri la paca solvado de disputoj. Tiu periodo, kiun hodiaŭ oni nomus la zenito de imperiismo, estis karakterizata ne de insista ŝovinismo sed de la nocio, ke la vivprincipoj de "civilizitaj" homoj, kaj la edukaj sistemoj, kiuj peris tiujn vivprincipojn, estu etenditaj el Eŭropo al la cetero de la homaro (Drayton 2002:113–114). La koncepto de universaleco leviĝis kiel forta konvinko inter multaj homoj. Hodiaŭ ni komprenas, ke ofte tiuj principoj konvene maskis nudan akiremon, kaj ke la senbrida kapitalismo superruzis la idealistojn. Tamen, ne malmultis la homoj, kiuj revis pri universala ordo. Eĉ Karl Marx (1818–1883) en *Das Kapital* (1867) revis pri *forvelko* de la ŝtato. La finaj jardekoj de la jarcento estis periodo de florado de utopiismo, ekzemple la usona romano, ekzistanta en Esperanto-traduko, *Looking Backward: 2000–1887* 'Rigardante Malantaŭen' (1888) de Edward Bellamy (1850–1898) kaj amaso da aliaj verkoj. Sed la ideo de progreso, kiu ŝajnis nehaltigebla dum tiu ĉi periodo de industriiĝo kaj ekspansio, kompromitis iasence la ideon de universaleco, ĉar ĝi estis rekte ligita ne nur al la civiliza impulso sed ankaŭ al ekonomia supereco.

Elekto de la adjektivo *universala* en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en 1908 estis signifa el pluraj vidpunktoj. Kompreneble, tio ne estis ĝia unua uziĝo en Esperanto: kiam Zamenhof aperigis sian vortaron en 1893, li elektis la vorton *universala* por priskribi ĝin; kaj kiam la organizantoj de la dua kongreso de Esperanto en Ĝenevo serĉis nomon por sia kongreso, ili nomis ĝin "universala" — esprimo, kiu poste gluiĝis ankaŭ al la antaŭa kongreso en Bulonjo. La vorton *universala* oni jam antaŭ la epoko de Esperanto identigis kun la filozofiaj lingvoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj, kaj ĝi reaperis en la periodo de la Lumiĝo, precipe en la verkoj de Immanuel Kant (1724–1804), kiu alproprigis la koncepton por esprimi la nocion de moralaj imperativoj ligitaj al la homa rezonkapablo (Hopkins 2002:14). Naskiĝis en tiu epoko la nocio de monda civitaneco kaj, kiel ekzemple evidentiĝis en la historio de lingvistiko per la eltrovo de la hindeŭropa "familio" de lingvoj en la sanskrita, malfermiteco al la nocio, ke la radikoj de la moderna mondo troviĝas ne nepre en Eŭropo. La vorto *universala* daŭrigis sian ekziston kiel esprimo de

tutmondeco, sed ĝia filozofia fundamento preskaŭ neperceptebl ŝanĝiĝis kun la kresko de la grandaj eŭropaj imperioj.

Zamenhof mem nomis sian unuan lingvan provon en 1878 *Lingwe uniwersala*; sian duan provon en 1881 *Lingvo universala* (vidu la artikolon de Kiselman, paĝoj 79–149 samkajere), sed sian en 1887 publikigitan lingvon *Lingvo internacia* (kvankam ties vortaro havis la titolon *Universala vortaro*) kaj notis sur la kovrilpaĝo de la Unua Libro, "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia." Oni povus dediĉi tutan eseon al la rilato inter la adjektivo *internacia* koncerne la lingvon kaj la adjektivo *tutmonda* koncerne la uziĝon de tiu lingvo. Zamenhof mem utiligis jen unu adjektivon jen alian en siaj fruaj proponoj pri starigo de organizaĵo por kunligi ĉiujn esperantistojn, proponante jam en 1889 *Tutmondan Ligon de Esperantistoj* kaj en 1893 *Internacian Ligon Esperantistan* (pri tiu historio vidu Korĵenkov 2009:87–93, 98–99). Li mem, kun sia iom neklara koncepto de etnoj kaj nacioj (evidenta en la ĝis hodiaŭ daŭre problema sufikso *-ujo*), revis pri "popoloj [...] en konsento," ne plene farante la intelektan salton al la nocio de universaleco.

La serĉado de organiza strukturo por la esperantistoj longe daŭris en tiu komunumo de individuistoj kaj rivalaj gvidantoj. Kiam la Esperantista Centra Oficejo estis fondita post la bulonja kongreso, iuj esperis, ke ĝi sukcesos kunordigi la ekzistantajn Esperanto-organizaĵojn lokajn kaj naciajn. Sed tiu oficejo renkontis konsiderindan skeptikon inter la esperantistoj kaj neniam havis multan potencon — nek rimedojn.

Unu plia espero, la Delegacio por alpreno de lingvo internacia, starigita de Louis Couturat (1868–1914) kaj Léopold Leau (1868–1943) jam en la jaro 1900 kaj neniam vera kunordiga organizaĵo, fine glitis el la manoj de la esperantistoj kiam Louis de Beaufront (1855–1935) kaj Couturat en la periodo 1907–1908 proponis reformojn de Esperanto, kaj la fenomeno Ido ekestis. Tiu renverso nur pliakrigis la bezonon de funkcianta unuiga asocio por la esperantistoj.

## UEA: universalismo kaj kompromitiĝo

La koncepto de Esperanto-organizaĵo kiel ligo inter la nacioj jam estis esence fiaskinta kiam Hector Hodler (1887–1920) kaj Théophile Rousseau (1876–1916), forŝovante la tutan malbenitan historion de ligoj inter ekzistantaj asocioj, fondis sian universalan Esperanto-asocion kaj malfermis ĝin ne al asocioj sed al ordinaraj unuopaj esperantistoj (Lins 2008:10). Nur unu elementon el la antaŭa historio ili konservis: la ideon de Esperanto-konsuloj. Tiu ideo fakte naskiĝis jam en 1896, kiam M. S. Rakitski, en artikolo en la unua volumo de *Lingvo Internacia* proponis starigon de sistemo de Esperanto-agentoj — kun ioma sukceso (Sikosek 2006:58). En 1906 ĝi estis revivigita de

Alphonse Carles (m. 1929) kaj de Rousseau, kiuj proponis al la ĝeneva kongreso starigon de sistemo de Esperanto-konsuloj (Rousseau ankaŭ proponis starigon de urbaj Esperanto-oficejoj kiel servon al vojaĝantoj; Lapenna k.a. 1974:346). La juna Hodler entuziasmis pri la ideo, kaj enkadrigis ĝin en sian UEA en la formo de la delegita reto. Signifa estas tio, ke tiu loka delegitaro konsistis el unuopuloj, kiuj libere liveris helpon al vojaĝantaj esperantistoj: Hodler volis krei asocion, kiu laborigu Esperanton — kiu igu ĝin praktika rimedo por utiligo de ordinaraj homoj.

Nomante la asocion universala, Hodler verŝajne estis influita ĝuste de la nocio de universaleco de interhoma helpo, kaj de bildo de mondo, en kiu homoj rilatas kun homoj, ne ŝtatoj kun ŝtatoj: li donis praktikan realigon al la fama eldiro de Zamenhof en Bulonjo en 1905 pri renkontiĝo de homoj kun homoj. Kion ne povis atingi Zamenhof, Hodler atingis. Privat pravis kiam li skribis (Künzli 2006:391): "Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva, Hodler aldonis la necesan bazon sur la kampo socia." La esenca konstato tie ĉi estas tio, ke Hodler daŭrigis la koncepton de universaleco tia, kia ĝi manifestiĝis en la titolo de la Universala Poŝta Unio: ne temis nur pri universala *asocio* tiom kiom pri universala *lingvo Esperanto* utiligebla por ĉiu celo kaj de ĉiu homo, sendepende de aliaj disdividaj organizaj inventaĵoj de la homaro.

Kiam en 1910 la konata franca historiisto Gustave Gautherot (1880–1948) aperigis sian libron *La Question de la langue auxiliaire internationale* 'La demando de internacia helpa lingvo' li firme lokis sin en la linion de la universalistoj, klarigante kiel la ĉiuspecaj moralaj kaj materiaj rilatoj inter la homoj (por citi el la statuto de UEA de 1908; Möbusz 1921:150–170) vaste intensiĝas sendepende de la ŝtatoj kaj sen ilia kapablo interveni. Li listigis la abundajn teknologiajn ŝanĝojn, kiuj okazadis depost la invento de telegrafio, kun ekzemploj de la manieroj, laŭ kiuj ili ŝanĝis la vivojn de la homoj. Gautherot baptis tiun eraon *l'ère de la mondialité* 'la erao de la tutmondismo'. Agnoskante, ke armeoj ankoraŭ ekzistas, kune kun rivalecoj inter la ŝtatoj, li substrekis la ŝajne komunan deziron utiligi armeojn por konservi pacon, kaj eviti bataladon per traktatoj kaj interkonsentoj. En 1911, kvazaŭ substrekante tiun vidpunkton, la Universala Kongreso de la Rasoj okazis en Londono, kaj Zamenhof kontribuis referaĵon.

Sed Gautherot estis tro optimisma. La koncepton de universaleco detruis, aŭ almenaŭ grave malhelpis, la rea triumfo de ŝovinismo en la Unua Mondmilito, kiu batis UEA-n aparte forte: Harold Bolingbroke Mudie, la unua prezidanto, mortis sur la batalkampo en 1916, Théophile Rousseau same kaj en tiu sama jaro (Enciklopedio de Esperanto 1979:472). Kaj Hodler mem apenaŭ ĝisvivis la militofinon (por ne paroli pri la morto de Zamenhof mem en 1917). Nur Eugène Lanti (1879–1947), alia revanto pri universala homeco, sed *politike engaĝita* universala homeco, tenis la ideon viva en sia filozofio de

sennacieco, dum Privat plejparte ligis siajn esperojn, kvankam bazitajn en liberalisma tutmondismo, al la postmilita interŝtata ordo. Tamen, eĉ Privat ne povis malhelpi la transiron de UEA en iun specon de "negativa neŭtralismo" (Lapenna k.a. 1974:431), kiu kondukis al neglektado de la bezono mobilizi la esperantistan bazon ĉirkaŭ la principoj de internaciismo kaj aŭdigis voĉojn, kiuj rekomendis adaptiĝon de Esperanto kaj ties organizaĵoj al la kreskanta naciismo en Eŭropo.

Ne necesas detaligi ĉi tie la cirkonstancojn kiuj kondukis al la kompromitiĝo de UEA kaj la fondiĝo de la Internacia Esperanto-Ligo en 1936, kies organo fariĝis *Heroldo de Esperanto* sub redakto de Teo Jung (1892–1986) kaj kies oficejo en Londono tenis la movadon viva dum la milita periodo. Unu el la multaj paradoksoj malantaŭ tiu organizaĵo estis la fakto, ke ĝi konsistigis federacion de landaj Esperanto-organizaĵoj, do kompleta inverso de tio, kion Hodler celis en 1908, kvankam ankaŭ eblis aliĝi al ĝi kiel individua membro. Unu el la ĉefaj rolantoj en la nova organizaĵo estis Ivo Lapenna (1909–1987), el Jugoslavio.

## UEA postmilita: de internacieco ree al universalismo

Post la milito, IEL kaj UEA kunfandiĝis en nove starigitan asocion kun la nomo UEA. Denove Lapenna ludis gravan rolon en tiu postmilita rekuniĝo. La nova UEA tamen ne estis la Hodlera: ĝi kombinis individuan membrecon kun sistemo de aliĝintaj landaj asocioj, en kiu la landaj asocioj havis signifan, eĉ decidan, rolon en la gvidaj organoj, precipe en la Komitato (detale rakontas la historion de tiu ĉi periodo Lapenna k.a. 1974:548–634). Lapenna sukcesis enkonduki en la statuton de la nova asocio la provizon, ke la homaj rajtoj estu gvidaj principoj por ĝia agado, tiel ŝirmante ĝin kontraŭ la politika kapitulaco, kiu karakterizis la antaŭmilitan UEA. En 1948, per la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (akceptita *post* la enstatutigo de homaj rajtoj ĉe UEA) la nova monda ordo denove esprimis sin por la nocio de universaleco. Ĝis la lasta momento, la malneta deklaracio portis la nomon *internacia*, sed la franco René Cassin argumentis, ke la Deklaracio estas morale deviga al ĉiu homo, ne nur la registaroj, kiuj voĉdonis por ĝia akcepto (Glendon 2001:161). Tiel, la principo de universaleco, jam reesprimita en la titolo de la Asocio, esprimiĝis ankaŭ en ĝiaj bazaj principoj de agado.

En 1954 okazis plia renverso, kiam la Centra Oficejo translokiĝis al Nederlando kaj finiĝis la periodo de brita dominado de la asocia administrado. Lapenna, kiu kiel ĝenerala sekretario estis la ĉefa impulso malantaŭ la translokiĝo, elektis daŭrigi agadon, kiun li kaj aliaj jam komencis en la jaroj tuj post la milito, nome klopodojn influi la interŝtatajn organizaĵojn UN kaj Unesko. Tiun historion oni jam plurfoje rakontis (vidu ekzemple Lapenna k.a. 1974 kaj Tonkin 2006:68–88) — sed ĝi montras al la malfacila vojo kiun

Lapenna klopodis stiri inter universalaj, neŝtataj principoj unuflanke, kaj interŝtateco aliflanke. Li elektis plejparte interŝtatan strategion surbaze de esence universala Centra Oficejo, kiu forte gvidis la Esperanto-movadon sen tre sistema klopodo entiri la landajn asociojn en la komunan regadon de la tuta strukturo. Tiu interna kontraŭdiro (se mi rajtas al marksisma termino) kondukis al la vojkruciĝo de 1974: en tiu jaro, la interŝtata potenco venkis kontraŭ Lapenna, kiam koalicio de landaj prezentantoj kontraŭstaris lin en la Komitato de UEA kaj lia prezidanta periodo finiĝis.

En la jaroj inter 1974 kaj 1990 la landaj asocioj restis, almenaŭ certagrade, la potencohavantoj en la Esperanto-movado ĝenerale; sed la moderna komunikado jam komencis subfosi ilian influon. Ju pli facile la esperantistoj povis atingi la internacian sferon kaj tie utiligi sian Esperanton, des pli malfacile la landaj asocioj tenadis sian influon. La malintegriĝo de la socialismaj landoj en la jaroj 1989−1990, parte ĝuste pro tiu komunika revolucio, kondukis al signifa malfortiĝo de la landaj asocioj, ne nur en oriento sed ankaŭ en okcidento. La mondpolitika evoluo kondukis la mondon for de la modernisma interŝtateco, kun ties klaraj linioj de aŭtoritateco, al nova speco de individuismo, en kiu la tuta koncepto de organizita movado ŝanĝiĝas favore al spontaneeco kaj hazarda ligiteco (Fettes 1997). Hodiaŭ la internacia kunlaboro okazas ĉiam pli ofte sen interveno de ŝtataj strukturoj, sen limiĝo geografie — helpate (eĉ kaŭzate) de la profundaj ŝanĝoj en la komunika teknologio. Ne estas facile antaŭdiri kiel la Esperanto-movado evoluos en tiuj novaj cirkonstancoj, sed estas evidente, ke la iama financa bazo de la organizita movado estas pli kaj pli subfosata de novaj kaj ŝanĝiĝantaj grupiĝoj de homoj kaj agado. Estas signife, ekzemple, ke `lernu.net` havas 100 000 registritajn uzantojn (depost 2004; sed kun ĉiusemajna kresko de ĉirkaŭ 250, do 5 000 novuloj jare), dum UEA havas apenaŭ 5 000 individuajn membrojn entute. Estas vere, ke fariĝi individua membro de UEA estas multe malpli facile ol simple aliĝi al `lernu.net` — sed tiu fakto estas interpretebla ne kiel avantaĝo sed kiel obstaklo.

## Estontece

Estas malfacile imagi cirkonstancojn, en kiuj la malnova UEA, kun siaj nemultiĝantaj membroj, malfortiĝantaj geografie bazitaj landaj asocioj kaj velkanta delegita reto povas longe elteni kontraŭ la fortoj de la elektronika mondo. Antaŭ precize 100 jaroj, Gautherot aperigis sian libron pri *mondialité* kaj Esperanto. Tiam la nocio de *reto* (signifa vorto!) de delegitoj kaj de horizontala strukturo de membreco, en kiu ĉiuj membroj kunlaboradu por komuna bono, estis revolucie nova (Lins 2008:12). Hodiaŭ, la revolucio en komuna nedeviga internacia mobilizo ĉirkaŭ morala agado jam okazis, kaj UEA ankoraŭ ne aliĝis al ĝi. Necesas denove apliki la principon de universaleco

kaj de komuna mobilizo laŭ la spirito de Hodler sed kun la novaj rimedoj de la dudekunua jarcento.

## Cititaj verkoj

Drayton, Richard (2002). The collaboration of labor: Slaves, empires, and globalization in the Atlantic world, ca. 1600–1850. **En:** A. G. Hopkins, red. *Globalization in World History*, 99–115. Nov-Jorko; Londono: Norton.

*Enciklopedio de Esperanto* (1979). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. (Represo de la unua eldono, 1933, 1934. Redaktis L. Kökény; V. Bleier; ĉefredaktoro I. Ŝiraev.)

Fettes, Mark (1997). Moderno kaj postmoderno en nia kulturo. *Esperanto* **90**(11):182–184.

Gautherot, Gustave (1910). *La Question de la langue auxiliaire internationale.* Parizo: Hachette.

Glendon, Mary Ann (2001). *A World Made New: Eleanor Roosevelt and the Universal Declaration of Human Rights.* Nov-Jorko: Random House.

Hopkins, A. G. (2002). The history of globalization – and the globalization of history. **En:** A. G. Hopkins, red., *Globalization in World History*, 12–44. Nov-Jorko; Londono: Norton

Iriye, Akira; Saunier, Pierre-Yves (red. 2009). *The Palgrave Dictionary of Transnational History.* Basingstoke; Nov-Jorko: Palgrave Macmillan.

Kiselman, Christer (2010). Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 79–149.

Korĵenkov, Aleksander (2009). *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.* Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.

Künzli, Andreas (2006). *Universalaj lingvoj en Svislando.* La Chaux-de-Fonds: Svisa Esperanto-Societo; Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale.

Lapenna, Ivo; Lins, Ulrich; Carlevaro, Tazio (1974). *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo.* Londono: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj; Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Lins, Ulrich (2008). *Utila estas aliĝo: Tra la unua jarcento de UEA.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Möbusz, A. (red. 1921). *Dokumentoj de Esperanto: Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado.* Berlino: Ellersiek.

Sikosek, Marcus (2006). *Die neutrale Sprache: Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes.* Bydgoszcz: Skonpres.

Tonkin, Humphrey (2006). *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Humphrey Tonkin, membro de la Akademio de Esperanto, estas Universitata Profesoro pri humanistiko ĉe la Universitato de Hartford, Usono. Li rolis kiel prezidanto de UEA dum la jaroj 1974–1980 kaj 1986–1989. Li estas direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj ĉefredaktoro de la revuo *Language Problems and Language Planning.*

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 69–78

# Unu hindunia infanlibro en Eŭropo, tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio

Spomenka Štimec

## Enkonduko

La Eŭropa Komisiono en la jaro 2008 per sia agentejo E.A.C.E.A. (Agentejo por edukado, aŭdvidiaj programoj kaj kulturo) alvokis projektojn en la kultura kampo, kiuj proksimigos Hindan Union al Eŭropo kaj Eŭropon al Hinda Unio. Rajtis kandidatigi siajn projektojn tiuj kulturagantaj instancoj kiuj povis pruvi jam antaŭan sukcesan kunlaboron kun partneroj el Hinda Unio.

Zlatko Tišljar, direktoro de la slovena firmao Inter-Kulturo, stimulis Kroatan Esperanto-Ligon kandidatigi literaturan tradukprojekton de infanlibroj. Jam en la jaro 2005 Kroata Esperanto-Ligo realigis kun sia bengala partnero Samatat Sanstha eldonon de kroata infanlibro *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* en la bengala. La bengalan partneron trovis en Kolkato kaj la libron de la kroata aŭtorino Ivana Brlić-Mažuranić tradukis bengalen D-ro Probal Dasgupta. La eldonejo de Samatat Sanstha – Samatat Prakashan eldonis du eldonojn de la kroata libro en la bengala: unue la bengala traduko aperis per tri daŭrigoj en la revuo de Samatat Prakashan en 2006 (N-roj 146, 147–148) kaj poste libroforme en aŭgusto 2006.

La projekto devis krom en Hinda Unio disvolviĝi en minimume tri landoj. Kroatio ne estas membro de Eŭropa Unio, sed ĝi en tiu projekto rajtis engaĝiĝi. Kroata Esperanto-Ligo prezentis la projekton kiel gvidanto de la projekto. La aliaj du landoj-partneroj estis Italio kaj Slovenio. La projekto ampleksis la tempan periodon de majo 2008 ĝis aprilo 2010. La Eŭropa Komisiono financis ĝin per 50 procentoj de la necesaj rimedoj. La gvidanto de la projekto devis trovi la ceterajn 50 procentojn de la financoj por la projekto.

La partneroj en la projekto estis: Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo, Inter-Kulturo el Maribor (Slovenio) kaj Edistudio el Pizo (Italio). La partnero en Hinda Unio estis Samatat Sanstha. Kroata Esperanto-Ligo gvidis la projekton.

## Kion celis la projekto?

La projekto celis publikigi hindan infanlibron en tri eŭropaj lingvoj kaj paralele publikigi tri eŭropajn infanlibrojn en Hinda Unio. Nia hinda partnero proponis al ni la libron *La vivo de Damoru* de la bengala verkisto Trailokyanat Mukhopadhyay. Fine de la projekto la bengala libro aperis en la kroata, slovena kaj itala lingvoj. La bengala eldono de la itala libro uzis la originalajn desegnojn de la aŭtoro Vamba. Por la bengala eldono de la slovena libro estis uzita la titolpaĝa desegno de Danka Tišljar el la Esperanta eldono de la verko. La titolpaĝan desegnon por la bengala eldono de la kroata libro kreis Tihomir Lovrić.

La slovena partnero proponis por la projekto la libron de slovena aŭtoro Tone Partljič *Mi volis tuŝi la Sunon*, la itala partnero proponis la libron *Ĵurnaleto de Joĉjo Tempesto* de Vamba. La kroata gvidanto de la projekto elektis la libron *Wakajtapu* de aŭtoro Joža Horvat. (Tiu sama libro aperis en la ĉina lingvo en 2005 en Wuhan, ĉinigita el la Esperanta eldono. Ĉinigis Hu Guozhu.)

Eŭropaj legantoj ne havis multajn kontaktojn kun la bengala literaturo. Ekzemple la sola konata bengala aŭtoro en Kroatio estas Rabindranath Tagore, tradukita al la kroata per la angla.

La projekto klare indikis ke ne ekzistas literaturaj tradukistoj inter la bengala kaj la eŭropaj lingvoj en la projekto kaj ke la tradukoj okazos per poste elektota ponto-lingvo. La pontolingvo per kiu estis tradukita la bengala libro al tri eŭropaj lingvoj kaj tri eŭropaj infanlibroj al la bengala estis Esperanto.

Grava segmento de la projekto estas ekspluatado de publikigotaj libroj. Post kiam la libroj aperis, la gvidantoj de la projekto devis okazigi lanĉojn en ĉiuj kvar landoj, stimuli koncernajn gelernantojn legi la libron en sia nacia lingvo kaj nacilingve verki eseon pri la tralegita libro. En ĉiu lando estis premiitaj la plej bonaj eseoj. Kroata Esperanto-Ligo kolektis la premiitajn eseojn kaj publikigis ilin en Esperanto en sia revuo *Tempo* 1-2010.

## Realigo

Ĉiu partnero engaĝis sian teamon por realigo de la projekto:

En Kroatio la projekton de Kroata Esperanto-Ligo gvidis Spomenka Štimec, la partnera eldonejo estis Izvori, la tradukisto de la bengala verko el Esperanto al la kroata estis juna tradukisto Domagoj Vidović.

En Slovenio la gvidanto de la projekto estis Zlatko Tišljar, la eldonejo Inter-Kulturo, la tradukisto de la bengala verko el Esperanto al la slovena estis Vinko Ošlak. Zlatko Tišjar esperantigis la slovenan libron *Mi volis tuŝi la Sunon*.

En Italio la gvidanto de la projekto estis Brunetto Cassini, la eldonejo Edistudio, la tradukistoj de la bengala verko el Esperanto al la itala estis Silvia Garnieri kaj Massimo Acciai. Umberto Brocatelli esperantigis la italan libron de Vamba *La Ĵurnaleto de Joĉjo Tempesto*.

En Hinda Unio la projekton gvidis Probal Dasgupta. La eldonejo estis Samatat Sanstha – Samatat Prakashan en Kolkato. La tri eŭropajn infanlibrojn el la kroata, slovena kaj itala kulturoj per Esperanta traduko bengaligis D-ro Malasree Dasgupta. Ŝi elbengaligis la libron *La vivo de Damoru* al Esperanto.

## La lanĉoj

Por la festenoj de lanĉoj ni petis en ĉiuj landoj helpon de respektivaj ambasadejoj: tiel en Hinda Unio itala konsulo en Kolkato kontribuis al la lanĉo. En Kroatio en la programo de la lanĉo partoprenis ataŝeo de ambasadejo de Hinda Unio en Zagrebo Siddhartha Chattopadhay.

La gelernantoj en la lernejoj ne nur legis la librojn: ekzemple kroataj infanoj havis en siaj lernejoj viziton de bengala sinjorino Shuleka Pollak, loĝanta en Zagrebo, servinta bengalan manĝaĵon *alukabli*. La infanoj aŭdis fragmenton de la kroata libro en la bengala lingvo, lernis pri bengala skribo. Pluraj infanoj surmetis vestaĵon el Hinda Unio por kompletigi la sperton. La infanoj mem preparis programon pri Hinda Unio, ornamis per afiŝoj pri Hinda Unio siajn lernejojn dum la bengala tago. Iuj desegnis scenojn el la bengala libro kaj vizitis alian lernejon por tie kontribui al la programo. Lernejaj direktoroj kaj instruistoj gaste partoprenis en la programo.

Inter-Kulturo el Slovenio pretigis la diplomojn per kiuj estis premiitaj la plej bonaj eseoj de la infanaj legantoj en Slovenio, Kroatio kaj Hinda Unio. Kadre de la projekto Probal Dasgupta verkis studojn pri la problemoj de tradukado per Esperanto: "Translating fiction for children: pedagogy and the post-national imaginary" aperis en *Jadavpur Journal of Comparative Literature* 47.2010; la dua studo, "Translating Children's Literature as a Vector of Postnational Pedagogies: the Case of Horvat's Waitapu", aperos en 2011 ĉe Black Swan en Hinda Unio.

La projekto havis valoron de 66 000 eŭroj. Ne estis facile trovi financajn rimedojn. Finance subtenis la projekton Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, Urba oficejo pri edukado, kulturo kaj sporto el Zagrebo, Departamento Medjimurska el Čakovec, Ministerio pri eksterlandaj aferoj kaj eŭropaj integriĝoj de Respubliko Kroatio. Tre valoran financan subtenon al la projekto donis Esperantic Studies Foundation el Usono. Esperanto-Societo el Rijeka en Kroatio finance helpis la projekton, samkiel dudeko da membroj de Kroata Esperanto-Ligo aĉetinte la bengalan libron kiu per Esperanto eniris kroatan kulturon.

Spomenka Štimec naskiĝis en 1949, diplomiĝis pri la germana kaj franca lingvoj en la Universitato de Zagrebo en 1972, kaj aktuale laboras kiel sekretario en la asocio Kroata Esperanto-Ligo gvidante kulturajn programojn de la asocio. Ŝi antaŭe profesiis en Internacia Kultura Servo en Zagrebo (1972–1994) kaj en la Ambasadejo de Malajzio en Kroatio (1994–1995). Ŝi estis sekretario en la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) ĝis 2008.

Ŝi laboras ĉefe en la kultura kampo:


- en fako teatra kiel organizanto de diversaj pupteatraj programoj (sekretario de Pupteatra Internacia Festivalo, Zagrebo, 1972−1988);
- en fako eldona (redaktoro de deko da libroj eldonitaj en Kroatio);
- en fako ĵurnalista (redaktoro de revuo *Tempo* en Kroatio ekde 1996 ĝis nun);
- en fako verkista (aŭtoro de ses libroj de prozo tradukitaj al germana, franca, japana, ĉina);
- en fako pedagogia (kunaŭtoro de la lernolibro pri Esperanto laŭ la Zagreba metodo);
- en fako de organizo de kulturaj aranĝoj (organizanto de Internaciaj renkontiĝoj de verkistoj en Kroatio; organizo de tradukoj de kroataj verkoj al la persa, japana, ĉina kaj bengala).





1. Zlatko Tišljar kaj Domagoj Vidović lanĉas la kroatan eldonon de la bengala libro en Centro por infanlibroj, Zagrebo, 2010-02-17.





2. Kovrilo de la slovena libro en la bengala traduko.




3. Kovrilo de la itala libro en la bengala traduko.





4. Kovrilo de la kroata libro en la bengala traduko




5. Kovrilo de la bengala libro en la itala traduko.




6. Kovrilo de la bengala libro en la slovena traduko.




7. Kovrilo de la bengala libro en la kroata traduko.

*Esperantologio / Esperanto Studies* **5** (2011), 79−149

# Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof

Christer Kiselman

*Enhavo*


| | | |
|---|---|---|
| 1. | La difino de esperanto | 80 |
| 2. | Aliaj variantoj | 80 |
| 3. | Fontoj | 81 |
| 4. | "Naturaj", "denaskaj" kaj "indiĝenaj" lingvoj | 82 |
| 5. | La Lingwe uniwersala de 1878 | 84 |
| 6. | La Lingvo universala de 1881 | 87 |
| 7. | La Lingvo internacia de 1887 | 102 |
| 8. | La reformpropono de 1894 | 109 |
| 9. | La Fundamento de Esperanto de 1905 | 122 |
| 10. | La propono pri neologismoj en esperanto de 1906 | 130 |
| 11. | La projekto pri neologismoj de 1906-01-18 | 131 |
| 12. | Korespondado kun Émile Javal dum 1906 | 132 |
| 13. | La propono pri neologismoj de 1906-11-22 | 134 |
| 14. | Cirkuleraj leteroj en 1907 | 137 |
| 15. | Letero pri propono en 1908 | 138 |
| 16. | Finaj komentoj | 139 |
| 17. | Diakronaj tabeloj | 140 |
| | Dankoj | 144 |
| | Referencoj | 144 |


*Resumo.* L. L. Zamenhof (1859−1917) multe eksperimentis pri sia lingvo antaŭ ol publikigi ĝin kiel Lingvo internacia en 1887. Ni priskribas du lingvojn antaŭ tiu jaro, la Lingwe uniwersala de 1878 kaj la Lingvo universala de 1881. Post la publikigo en 1887 de la Lingvo internacia, baldaŭ konata kiel la lingvo de Doktoro Esperanto, poste simple kiel Esperanto, aperis postuloj pri reformoj, kaj Zamenhof pretigis proponojn pri modifoj de esperanto en 1894 kaj 1906. Ni komparas la kvin variantojn, do el 1878, 1881, 1887, 1894 kaj 1906.

*Abstract. Variants of Esperanto initiated by Zamenhof*
L. L. Zamenhof (1859−1917) tested several variants of his language before he published it as *Lingvo internacia* in 1887. We describe two languages before that year, the *Lingwe uniwersala* of 1878 and the *Lingvo universala* of 1881. After the publication in 1887 of *Lingvo internacia*, soon to be known as the language of Dr. Esperanto, later just as Esperanto, there appeared demands for reform, and Zamenhof prepared reform proposals of Esperanto in 1894 and 1906. We compare the five variants, thus from 1878, 1881, 1887, 1894, and 1906.

## 1. La difino de esperanto

Esperanto estas la lingvo kiun parolas la esperantoparolantoj. Jen cirkla (kaj tial science neakceptebla) difino, kiu tamen esprimas gravan ideon pri la identeco de la lingvo. Kaj kompreneble ĉiu lingvo estas analoge difinita.

La esploristoj pri la kantado de la ĝiba baleno (megaptero ĝibdorsa, *Megaptera novaeangliae*) registras kaj analizas la kantadon el la oceana profundo, sed ili ne serĉas (sekve ne trovas) erarojn en la balena kantado (kp. Pinker 1995:370). Lingvosciencistoj penetras la ĝangalojn de Amazonio kaj priskribas lingvon parolatan de nur okdek tri personoj sen trovi en ilia lingvaĵo erarojn. Ni komprenas ke la nocio de lingva eraro estas io kio povas ekzisti nur en sufiĉe grandaj lingvokomunumoj, nome nur en tiuj kiuj kapablas vivteni gramatikistojn, vortaristojn, lingvoplanistojn, akademianojn kaj simile funkciantajn homojn. Nur en tiuj komunumoj aperas la nocioj de lingva normo kaj de lingva eraro — kiuj tamen estas gravaj en ĉiu lingvo kiu devas funkcii ne nur en unu loko kaj en unu momento. La disvastigo de lingvo en la tempospaco estas la plej baza kaŭzo de lingvonormigo. Sen normigo ĉiu lingvo restus tre limigita space kaj tempe.

Bo Utas (2009:142) nomas "altaj lingvoj" la malnovan persan, la arŝakan pahlavan, la mezan persan kaj la novan persan, kio signifas ke ili estas kultivitaj, normigitaj kaj uzataj multcele de homoj de variaj lingvaj fonoj. Li komparas ilin metafore al la tradicia irana ĉirkaŭmurigita ĝardeno, la *pairidaēza-* de la Avesto, kaj kontrastigas ilin al la libera vegetaĵaro de spontanea homa parolo en sociaj situacioj. Tiuj altlingvaj ĝardenoj do estas kulturaj artefaktoj. Esperanto laŭ tiu metaforo certe estas bone ordigita ĝardeno — sed kiu sarkas?

Por esperanto ekzistas gvida dokumento: la *Fundamento de Esperanto* el 1905, kiu peras ian juran difinon. Ekzistas ia streĉiteco inter la du difinoj, sed ni povas konstati ke ili almenaŭ ne akre kontraŭdiras unu la alian. Tiuj eldiroj tamen estas simpligoj. Skriba dokumento neniam povas ĉiom difini lingvon, kiu estas parola komuniksistemo, kaj neniam povos difini vivantan parolatan lingvon, ĉar por tia lingvo la parolantoj estas suverenaj. Kaj la buŝa praktiko de la parolantaro ja estas malfacile kaptebla — oni povas registri voĉojn, sed laŭ mia scio granda korpuso de la parola lingvo ne ekzistas.

## 2. Aliaj variantoj

Pli-malpli kaŝite ekzistis variantoj de la zamenhofa lingvo. Per tiu esprimo mi celas

- la nur parte konatan pralingvon Lingwe uniwersala de 1878;
- la praesperanton Lingvo universala de 1881;

- la reformproponon de esperanto de la jaro 1894; kaj
- proponprojekton kaj proponon pri neologismoj en esperanto de la jaro 1906.

Al tiuj oni povus aldoni proponojn el 1907 kaj 1908, kiuj similas al tiu de 1906 kaj kiujn ni devas konsideri pli kiel reagon al la kritikantoj ol kiel veran iniciaton de Zamenhof. Krome ne estas klare ĝis kiu grado ili estis konsiderataj de la Lingva Komitato.

Temas do ĉefe pri du variantoj antaŭ 1887 kaj du post tiu jaro. La esperanto de la Fundamento de 1905 estas el tiu ĉi vidpunkto egala al tiu de 1887.

Ĉu ni povas vidi evoluon sekvante tiujn jarojn, do 1878, 1881, 1887, 1894 kaj 1906? Ĉu la reformproponoj estas ia pluevoluado de la lingvo de 1887 aŭ ĉu, male, ili prezentas ian reiron al pli frua ŝtupo? Kial Zamenhof faris en 1906 proponon spite al la severa netuŝeblo de la Fundamento? Ni provos esplori tion.

Mi substreku ke temas pri variantoj de la lingvo kiujn iniciatis Zamenhof mem. Ne temas pri *sperantu* de Kálmán Kalocsay, nek pri *Arcaicam Esperantom* de Manuel Halvelik, pseŭdonimo de Kamiel Vanhulle. Pri la unua vidu i.a. Bavant (2007) kaj Barandovská-Frank (2009:70–71); pri la dua vidu i.a. Barandovská-Frank (2009:71–73).

En la artikolo mi prezentos la variantojn laŭtempe. Diakronaj tabeloj tamen troviĝas fine (tabeloj 16–19, paĝoj 140–142).

## 3. Fontoj

La fonto por Lingwe uniwersala estas letero de Zamenhof al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), verkita en 1895 kaj tradukita el la rusa en 1896 de Vladimir Aleksandroviĉ Gernet (1870–1929) (Zamenhof 1948a:343–350, zamenhof 1990:922–930). Waringhien asertas ke tiu ĉi traduko, kiel ĉiuj aliaj tekstoj presitaj en la revuo *Lingvo Internacia*, estis reviziita de Zamenhof mem (Zamenhof 1948a:343).

Waringhien (1989) kaj Cash (1992) verkis analizojn de tiu ĉi nur parte konata lingvo. Mattos (1987) prezentis la antaŭirantojn de esperanto kun informoj pri eblaj originoj de la vortoj.

La Lingvo universala estas alia etapo en la evoluigo de la lingvo de Zamenhof. Pri ĝi ni konas multe pli ol pri la Lingwe uniwersala: ni havas bonan superrigardon de la gramatiko kaj almenaŭ parto de la centra vortprovizo. Tamen kelkaj formoj kaj vortoj estas ne atestitaj. La fontoj pri tiu ĉi lingvo estas ĉefe el 1881, sed ekzemple la poemo *Pinto* 'Penso' estas el 1882. Mi skribos pro simpleco 1881 en la sekvo, kaj estu komprenite ke ni ne ĉiam certas pri la jaro de kelkaj trajtoj. Tamen estas klare ke tiu ĉi lingva versio estis *kojpassa* 'komencita' en aŭgusto de 1881.

La fonto por Lingvo universala estas “Artikolo pri la deveno de Esperanto”, kiu verdire estas nur fragmento de artikolo, verkita “je nekonata dato” laŭ Waringhien (Zamenhof 1948a:350−351) kaj publikigita de li en Zamenhof (1948a:351−354). Waringhien (1989) kaj zamenhof (1989:722−765) enhavas pliajn tekstojn; la unue menciita libro krome enhavas analizon (pp. 41−48, 55−72) kaj la dua liston de ĉiuj vortoj aperintaj en la tekstoj (pp. 741−765).

La tekstoj estis entenataj en tri kajeroj de la jaroj 1881−1882. Kálmán Kalocsay (1891−1976) kaj Gaston Waringhien (1901−1991) havis la ŝancon disponi la trian kajeron por kelkaj horoj dum la Viena Kongreso de 1936, en la Esperanto-Muzeo, al kiu Lidja Zamenhof (1904−1942) estis donacinta ĝin en julio 1929 (Waringhien 1989:20). El tiu kajero ili kopiis la tekstojn prezentitajn en Waringhien (1989:23−35), kiuj estis nur parto de la enhavo de la kajero 80-paĝa. “Ĉiuj tiuj kajeroj estis detruitaj de la Nazioj” (Waringhien 1989:21).

Cash (1992) faris tre zorgan kaj detalan prezenton de la lingvo kun multaj klerigaj komentoj.

La fontoj por la Lingvo internacia de 1887 kaj la esperanto de 1905 estas publikigaĵoj de Zamenhof mem.

La fontoj por la proponoj de 1894 kaj 1906 estas multaj leteroj kaj artikoloj de Zamenhof, publikigitaj en Zamenhof (1948a) kaj zamenhof (1989, 1990). Por la proponoj de 1907 kaj 1908 aldonendas Zamenhof (1948b).

Mi ankaŭ ĉerpos informon el la analizoj de Mattos, Waringhien kaj Cash en la menciitaj libroj.

## 4. “Naturaj”, “denaskaj” kaj “indiĝenaj” lingvoj

La lingvistoj interesiĝas pri “naturaj” lingvoj, t.e. lingvoj kiujn oni lernas en la infaneco, kaj tial emas ne konsideri esperanton, spite al la fakto ke ekzistas denaskaj esperantoparolantoj — tiuj ĉi ja formas etan malplimulton de ĉiuj parolantoj, tiel ke ili ne determinas la normon de la lingvo.

Se oni povus montri ke kelkaj trajtoj de la lingvo devenas de denaskuloj, tiam oni povus atesti pri kreoligo aŭ denaskigo (angle *nativization*) de la lingvo, t.e. ŝanĝoj kiuj indikas ke ĝi fariĝis vera natura lingvo en la senco de la lingvistoj. Bergen (2001) asertas ke infanoj naturigas aŭ denaskigas esperanton farante specon de “creoloid” kun fiksa SVO-ordo kaj nedeviga aŭ mankanta marko por rektaj objektoj.[1] Lindstedt (2006) serĉas indikojn en tiu direkto, sed ne trovas konvinkajn signojn: la ŝanĝiĝoj kiujn li observas plej kredeble havas aliajn klarigojn.

[1]Eble mi devus substreki ke ne temas pri ia opinio ke certa lingva esprimo estas pli natura ol alia; temas simple pri tio ke la denaskuloj enkondukas iun ŝanĝon en la lingvon, sendepende de la karaktero de tiu ŝanĝo, kaj tiel movas ĝin for de la stato de artefariteco.

La diferencon inter denaskaj parolantoj kaj indiĝenaj parolantoj Ken Miner pritraktas en pensinstiga artikolo (2010). "Estas la indiĝenaj parolantoj, kiuj determinas, kiuj frazoj estas gramatikaj; kaj estas la indiĝenaj parolantoj, kiuj determinas kion ili signifas" (Miner 2010:261). "Sed klare, tute mankas al Esperanto indiĝenaj parolantoj" (Miner 2010:260). Post tiuj du eldiroj la konkludo estas evidenta: "esperantologio eblas, sed ne priesperanta lingvistiko" (Miner 2010:259).

Dum la diskuto post mia prezento en Havano 2010-07-22 mi menciis la artikolon de Miner (ĉar simila temo iel aperis en ies interveno) kaj mi demandis kiom da parolantoj povas determini kiuj svedlingvaj frazoj estas gramatikaj, kaj kiom da parolantoj povas determini kion ili signifas. Mi proponis ke eble temus pri la dek ok membroj de la Sveda Akademio, fondita de la reĝo Gustavo III en 1768, sed mi dubas ke ili povus aŭ akceptus tion fari. Kaj la dungitaj kaj salajrataj universitataj profesoroj pri la sveda lingvo certe rifuzos tion fari — pli precize, ili rifuzos deklari frazon negramatika krom en tute simplaj okazoj, same kiel ili rifuzos trovi erarojn en la ĝibbalena kantado. Kaj ĉiuj aliaj frazoj prezentus principe la saman necertecon kiel elmontras Miner pri esperanto en sia artikolo. La neeblo de lingvoscienco sekve aplikiĝas al la sveda lingvo principe same kiel al esperanto.[2]

Al la dirita aldoniĝas alia problemo. En ekzemple Singapuro ekzistas homoj kiuj havas lingvokonojn pri la angla laŭ la tuta gamo, ekde perfekte regata denaska lingvo ĝis malfrue kaj malbone lernita lingvo; mallonge dirite ekzistas ĉiuj eblaj gradoj de lingvokono. Por kelkaj la ĉina estas laŭtempe la unua lingvo, sed ne laŭ la konoj. La konoj pri aferoj en la hejmo povas esti pli bonaj en la ĉina, dum pri teknikaj kaj profesiaj aferoj la konoj en la angla estas multe pli bonaj. La plej bone konata lingvo de persono do varias laŭ la semantika kampo studata.[3] Estas teorie neeble enmeti limon inter la indiĝenaj lingvoparolantoj kaj la ne-indiĝenaj. Se nur indiĝenaj parolantoj rajtas determini pri la gramatikeco aŭ signifo de frazo, oni ja devas unue decidi kiu estas indiĝena parolanto, kaj tio estas teorie kaj praktike neebla. Se oni malkovras en Singapuro iun diferencon disde la brita angla, tiam povas temi pri singapura varianto de la lingvo, samranga kun la kanada, aŭstralia aŭ novzelanda variantoj, sed povas ankaŭ temi pri simpla eraro de ne-indiĝena parolanto — kaj ĉiuj eblaj niveloj inter tiuj du. Tia situacio ne estas unika por Singapuro, sed eble tie ĝi aperas plej klare. Pri la lingva situacio en Singapuro vidu ekzemple Zhao & Liu (2010), kiu pritraktas ĉefe la pozicion de la lingvo de la plimulto, t.e. la ĉina, kaj ties rilaton kun la angla, kiu estas la plej grava lingvo en la universitatnivela edukado.

[2]Mi dankas al Wim Jansen, kiu en komento 2010-08-15 al antaŭa versio de mia teksto aludis al tiu ĉi temo.

[3]Similan konkludon mi faris en mia studo (2001:52).

Rilate al la semantiko ni fine notu konkludon de Vilmos Benczik en lia pritrakto de la esperanta literaturo: "La nova paradigmo do asertas, ke la semantika malcerteco, kiu sendube ekzistas ĉe esperantaj vortoj, ekzistas fakte ankaŭ en ĉiuj etnaj lingvoj." (Benczik 2011:57, punkto 2.) Li konvinke montras ke la diferenco inter esperanto kaj naciaj lingvoj estas malpli granda ol oni povus imagi post legado de la artikolo de Ken Miner.

Rilate al la strukturo de esperanto kiom tiu montriĝas en kvantaj rilatoj Liu (2011) esploras la tekston *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* (publikigita ekzemple en Zamenhof 1939:268−316) per metodoj de la kvanta lingvoscienco. Li konsideras ekzemple la distribuon de morfemoj, de vorta ofteco, de vorta longo kaj de vorta klaso, same kiel la dependan distancon kaj ties distribuon. Li konkludas ke ĉiuj kvantaj trajtoj de esperanto montras ke ĝi estas strukture normala homa lingvo.

## 5. La Lingwe uniwersala de 1878

### 5.1. Lingvo konata nur per sia nomo kaj kvar versoj de sia himno

"*. . . En 1878 aperis «Lingwe Uniwersala», sed de tiu tempo* mi du aŭ tri fojojn radikale ŝanĝis la lingvon" (Fragmento de artikolo, Zamenhof 1948a:351). Ni kontrastigu tiun eldiron kun la sekva: "En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama « lingwe uniwersala » kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco" (letero 1895 al Borovko; Zamenhof 1948a:347, zamenhof 1990:926). Zamenhof komunikis la lingvon al siaj kolegoj; li estis tiam 19-jara kaj en la 8-a klaso de la gimnazio en Bjalistoko. "La 17-an[4] de decembro 1878 ni ĉiuj kune[5] solene festis la ekvivigon de la lingvo, kaj entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estas la sekvantaj:

Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoze in familje  
konunigare so debá."

En la traduko de Zamenhof mem ĝi signifas:

---

[4]Laŭ la nuna gregoria kalendaro, responda al la 5-a de decembro laŭ la julia. Estis du tagoj post la 19-a datreveno de lia naskiĝo.

[5]Temis pri "rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj" (Parolado en Ĝenevo 1906-08-28; zamenhof 1990:1787), kio i.a. implicas ke estis ne nur judaj lernejanoj tie. Laŭ Golden (1978) unu el la partoprenantoj estis Leo Wiener (1862–1939), kiu poste fariĝis profesoro pri slava literaturo ĉe Harvard. Li estis la patro de la matematikisto Norbert Wiener (1894–1964). Alia estis Aleksandro Waldenberg (Enciklopedio de Esperanto 1979:572, Golden 1978).

Malamikeco de la nacioj
falu, falu, jam tempo estas!
La tuta homaro en familion
unuiĝi devas.

La citaĵoj estas laŭ Zamenhof (1927:87). Waringhien ŝanĝis *unuiĝi devas* al *unuigi sin devas* (Zamenhof 1948a:347).

En Zamenhof (1927:87), zamenhof (1989:721), Privat (2007:42–43), same kiel en Waringhien (1989:23) estas skribite *está, debá*, kun akuta supersigno, alivorte dekstra korno. Sed en Adam (1913:6) kaj en Zamenhof (1948a:347) la prezenca finaĵo en Lingwe uniwersala estas skribita per *-à* (*està, debà*) kun malakuta supersigno, alinome maldekstra korno. En Privat (1982:27) la vortoj aperas sen iu diakrita signo: *kado, esta, deba.* Komparu kun sekcio 6.2.

## 5.2. Prononco kaj fonemoj

Pri la prononco oni ja nenion scias. Tamen oni povas diveni ke la prononco de la vortoj en la himno estas pli-malpli kiel en esperanto. Oni povas ekzemple diveni ke la akcento en vortoj sen diakrita signo estis kiel en esperanto: [malamiˈkete, hoˈmoze, faˈmilje, konuniˈgare]. La neakcentitaj literoj en la himno kredeble respondas al la samaj fonemoj kiel en la nuna esperanto. La litero *w*, kiu aperas en la nomo de la lingvo, kredeble respondas al la fonemo /v/. Tiel do ĉiuj fonemoj de esperanto krom la kvin /ç/ (aŭ /tʃ/), /x/, /ʒ/, /ʃ/, /w/ (nun skribataj per la literoj *ĉ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*) aperas en Lingwe uniwersala. Ni ja ne scias ĉu iuj el tiuj kvin ekzistis en la lingvo.

Du atestitaj verbformoj (el kiom da?) havis evidente akcenton sur la lasta silabo, montritan per diakrita signo: *kadó!* 'falu!', *está, està* 'estas', *debá, debà* 'devas'. La akuta kaj malakuta supersignoj havas en diversaj lingvoj malsamajn funkciojn.[6] Se la diferenco inter la akuta supersigno en *kadó!* kaj la malakuta supersigno en *està, debà* estas intenca kaj ne nur kompostista hazardo, oni povas spekulativi ĉu ĝi indikas leviĝantan tonon en la imperativa *kadó!* (komparu kun la pli pala *falu!*) kaj falantan tonon en la versfinaj *està,*

[6]En la hispana, portugala kaj sveda akuta supersigno super vokallitero plej ofte indikas akcenton en nekutima loko (hispane kaj portugale *lógica* 'logiko'; svede *ide* [ˈiːdə] 'ursa groto', *idé* [ɪˈdeː] 'ideo'); en la franca kelkfoje akcenton (*donne* 'donas', *donné* 'donita'), kelkfoje malsamajn sonojn (*guéri* 'kuracita', *guère* 'apenaŭ'), kaj kelkfoje distingas skribitajn vortojn sen influo al la prononco (*a* 'havas', *à* 'ĉe, al'; *ou* 'aŭ', *où* 'kie'). En la ĉeĥa ĝi indikas longecon de la vokalo. En la hungara, kun dek kvar vokalaj fonemoj, dekstrakorno indikas longon de vokalo en la sep paroj *a, á*; *e, é*; *o, ó*; *u, ú*; *ö, ő*; *ü, ű* kaj *i, í*; ĉe la du unuaj temas ankaŭ pri tre malsamkvalitaj sonoj. En la Pinyin-sistemo, uzata por latinlitere skribi la ĉinan, la du supersignoj montras altan kaj leviĝantan tonon (la duan tonon: *má, ma2* 'kanabo') respektive altan kaj falantan tonon (la kvaran tonon: *mà, ma4* 'insulti, moki'; DeFrancis 1986:45, 98).

*debà.* Tamen plej verŝajne ĉi tie ĝi indikas akcenton – apogon al tiu aserto mi trovas en artikolo de Zamenhof publikigita en 1894; vidu subsekcion 8.13.2.

### 5.3. Skribo

Ĉiuj literoj de la nuna esperanto krom la ses *ĉ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, v* aperas en la himno. Tie oni rimarkas du literojn kiuj ne ekzistas en la nuna esperanto: *ó, á* aŭ *à.* Al tiuj aldoniĝas *w.* Ni ne povas konkludi ke la mankantaj *ĉ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ* (aŭ variantoj de ili) ne estis uzataj en aliaj tekstoj.

### 5.4. Verbaj finaĵoj

Ni ne scias kiom riĉa estis la verba sistemo. Ni konas nur la finaĵon de infinitivo (*-are*), imperativo (*-ó*) kaj precenzo (*-á* aŭ *-à*).

### 5.5. Pronomo de ĝentileco

Zamenhof skribis en 1908 pri la problemo de *ci*, la persona pronomo en la singularo de la dua persono. Li finas per la konkludo: "ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur « vi »." (Respondo en *La revuo* 1908, n-ro 6, al $\mathrm{S^{ro}}$ B. A.; zamenhof 1980:223, 1991b:2083–2084). Sed antaŭ ol alveni al tiu rekomendo li parolas pri aparta pronomo de ĝentileco: ĉar ni ne povas postuli ke la esperantistoj ĉiam diru « ci », "ni devus sekve havi apartan pronomon de ĝentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878)."

Ĉu povus temi ĉi tie pri preseraro por 1887? Antaŭ 1878 la lingvo ja ne havis la nomon *Esperanto.* La grava informo tamen estas ke Zamenhof eksperimentis pri tia pronomo en iu antaŭa versio de sia lingvo.

### 5.6. Konkludoj

La citita komenco de la himno kaj la nomo mem de la lingvo estas ĉio kion ni havas de la Lingwe uniwersala. Tamen ni povas fari kelkajn konkludojn.

1. La lingvo estas, same kiel la nuna esperanto, aglutina: *mal-amik-et-e* 'mal-amik-ec-o', *hom-oz-e* 'hom-ar-o', *kon-un-ig-are* 'kun-unu-ig-i'. En la Unua libro 1887 Zamenhof klarigos tion.[7]

[7] Aliaj konataj aglutinaj lingvoj estas la turka kaj la tamula. La aglutina karaktero de la literatura tamula povas esti montrita per la sekvanta ekzemplo (Andronov 1989:§45). Ni havas *puli, pulikaL* 'tigro, tigroj' en nominativo kaj *puliy*(*in*)*ai, pulikaL*(*in*)*ai* 'tigron, tigrojn' en akuzativo (la enmetaĵo *-in-* estas nedeviga eŭfonia elemento) — ĉie tie *L* signas retrofleksian varianton de *l* (Andronov 1989:20), ofte skribata *ḷ*. Tio signifas ke la plurala finaĵo *-kaL* estas sekvata de la akuzativa finaĵo -(*in*)*ai.* La du finaĵoj estas metitaj unu post la alia sen ŝanĝo, kiel en esperanto (ŝanĝoj pro *sandhi* povas okazi). Se oni konas la unuajn

2. La ideo marki la vortklasojn per specifaj finaĵoj estas jam enkondukita.[8] Por la substantivoj tiuj indikiloj estas *-e* en singularo (*malamikete, homoze, familje*), kaj *-es* en pluralo (*nacjes*), por verboj ĝi estas *-ó* en imperativo (*kadó*), *-á* aŭ *-à* en prezenco (*está, debá*; *està, debà*) kaj *-are* en infinitivo (*konunigare*).
3. La atestita vortprovizo estas nur latindevena.[9]
4. La akuzativo ne estas markita, almenaŭ ne ĉe la refleksiva pronomo: *so* 'sin'. Same direkta akuzativo ne estas uzata en *in familje* 'en familion'.
5. La artikolo estas *la* en singularo kaj *las* en pluralo.
6. Oni povas diveni ke la akcento en vortoj sen diakrita signo estis kiel en esperanto. Sed almenaŭ du verbformoj havis akcenton sur la lasta silabo, montritan per diakrita signo.

## 6. La Lingvo universala de 1881

La Lingvo universala estis en kelkaj rilatoj tre simila al esperanto de 1887, sed enhavis kelkajn diferencojn, precipe pri la verbaj finaĵoj kaj la tabelvortoj. La adverboj ofte estis tre mallongaj. La vortprovizo estis plejparte latiniddevena, sed konsiderinda malplimulto en la atestita vortprovizo estas ĝermandevena

---

tri formojn, tiam oni scias kiel aspektos la kvara, nome la plurala akuzativa formo. En dativo la literatura tamula estas same regule aglutina: *puli, pulikaL* 'tigro, tigroj' (nominativo) kaj *puli(yinu)kku, pulikaL(in)ukku* 'al tigro, al tigroj' (dativo). Eĉ por personaj pronomoj, kiuj ja ofte estas neregulaj, ni havas surprizan regulecon: *naan, naamkaL* 'mi, ni' (nominativo; ekskluda ni), *ennai, emkaLai* 'min, nin' (akuzativo) (Andronov 1989:§61).

Kontraste, en fleksia lingvo kia la klasika greka ni havas ekzemple — kaj tiu ekzemplo certe havas rilaton kun esperanto — λόγος (*lógos*) 'vorto, parolo, penso' en nominativo, λόγον (*lógon*) 'vorton, parolon, penson' en singulara akuzativo, λόγοι (*lógoi*) 'vortoj, paroloj, pensoj' en plurala nominativo. De tie oni ja povus diveni ke la plurala akuzativo estus *λόγοιν (**lógoin*) 'vortojn, parolojn, pensojn'. Sed la plurala akuzativo estas ... λόγους (*lógoys*) /ˈloguːs/ 'vortojn, parolojn, pensojn', kie la finaĵo ne havas iun rilaton kun la du antaŭe menciitaj.

En alia fleksia lingvo, sanskrito, ni havas *devaḥ, devāḥ* 'dio, dioj' en nominativo kaj *devam, devān* 'dion, diojn' en akuzativo (Maurer 1995:I:51). Se oni konas la unuajn tri formojn, oni ne povas diveni ke la plurala akuzativo estas *devān*. Kaj la dativo estas same neregula: *devaḥ, devāḥ* 'dio, dioj' (nominativo); *devāya, devebhyaḥ* 'al dio, al dioj' (dativo). La finaĵo en plurala dativo neniel povas esti derivita de tiuj en singulara dativo kaj plurala nominativo.

La gota lingvo havas *dags, dagôs* 'tago, tagoj' en nominativo, *dag, dagans* 'tagon, tagojn' en akuzativo, *daga, dagam* 'al tago, al tagoj' en dativo (Braune 1930:29). Sama konkludo.

[8] Multajn jarojn poste, en 1935, du kreintoj de "naturalismaj" artefaritaj lingvoj riproĉos al esperanto "la ĉeeston de artefaritaj elementoj neekzistantaj en realaj lingvoj, ekz. la fiksajn finaĵojn de vortspecoj." Temas pri Otto Jespersen (1860−1943) kaj Edgar de Wahl (1867−1948), kiuj publikigis respektive *Novial* en 1928 kaj *Occidental* en 1922. (Barandovská-Frank 2009:30.)

[9] Kompreneble ni ne povas scii – pro la malmultaj vortoj konataj – kiom da vortoj en la tuta lingvo havis alian devenon. Ni ja eĉ ne scias kiom vasta estis la vortprovizo.

(germandevena, jiddevena kaj en malmultaj okazoj angledevena). Vidu la tabelojn en sekcio 6.10 kaj la komentojn pri ĝermandevenaj vortoj en subsekcio 8.16.1.

### 6.1. Fonemoj kaj akcento

La Lingvo universala havis la samajn fonemojn kiel la nuna esperanto.

La akcento estis plej verŝajne sur la antaŭlasta silabo kiel en esperanto, krom en tri el ses atestitaj verboformoj, kie ĝi falis sur la lasta silabo. En la laste menciita okazo ĝi estis markita per diakrita signo; vidu la sekvantan sekcion kaj sekcion 6.4.

### 6.2. Skribo

En la Lingvo universala Zamenhof uzis supersignitajn konsonantliterojn *ć, h́, ś, ź*, respondaj al la nunaj *ĉ, ĥ, ŝ, ĵ*, kaj lunarkon sur *u* same kiel nun: *ŭ*. Por *ĝ* li skribis *dź*. La litero *h́* aperas nur en la vorto *arh́a* 'antikva' (zamenhof 1989:733, 743, Waringhien 1989:45; sur la paĝo 33 aperas vorto *arha*, kiu plej verŝajne estas preseraro por *arh́a*).

En la tekstoj ni trovas tri vortojn kun *au* sen lunarko: *lau* 'laŭ', *nau* 'naŭ' kaj *Augusto* 'Aŭgusto' (alian fojon tamen *Aŭgusto*). Kredeble tiu *au* estis prononcata kiel *aŭ* en la nuna esperanto — la lunarko ne estis necesa por indiki tiun ĉi prononcon (Cash 1992:5). Tamen du vortoj, *aŭ* 'aŭ' kaj *kaŭ* 'apenaŭ', kiuj estas skribitaj kun lunarko, iom kontraŭdiras tion. Povus ja esti simpla forgeso — aŭ eble la afero indikas ke Zamenhof hezitis en 1881 kaj poste decidis uzi la lunarkon (Cash 1992:5).

Zamenhof uzis supersignojn por indiki akcenton sur finaj vokaloj: *-á, à*; *-é, è*; *-ó*. La prezenca finaĵo en Lingvo universala laŭ Waringhien (1989:25) kaj zamenhof (1989:723–724) estis skribita *-é* (*esté, fakté, pensé*) kun akuta supersigno, alinome dekstra korno. Same pri la imperfekta finaĵo *á* (*brulá, sidá, mová*). Sed en Zamenhof (1948a:353) ili estas estas skribitaj per *è* (*estè, faktè, pensè*) respektive *-à* (*brulà, sidà, movà*) ĉiam kun malakuta supersigno, dum *ó* ĉie havas akutan supersignon (*estó*). Mi ne konas la originon de la literumado *brulà, sidà*; *estè, faktè*. Mi povas nur konstati ke ambaŭ skribmanieroj ekzistas. Eble Zamenhof mem ne tre zorgis pri la elekto de supersigno ĉi tie — tion indikas artikolo de li citita en subsekcio 8.13.2.

La konsonantliteroj *ć, ś, ź* havas akutan supersignon en Waringhien (1989), sed en Zamenhof (1948a:353) aperas anstataŭe *c', s', z'*, kredeble pro manko de la ĝustaj supersignoj en la presejo. Tamen tia manko ne povas klarigi kial oni presas *estè, faktè, pensè* en tiu libro presita en Francio, ĉar en la franca skribo *é* kaj *è* ambaŭ ekzistas. Ili prezentas malsamajn sonojn, kaj estas zorge distingitaj en la presejoj. Komparu kun subsekcio 8.13.2.

### 6.3. La vortklasindikiloj

En Lingvo universala la vortklasindikilo por substantivo estis *-o* (anstataŭ la *-e* el 1878). Tiu por adverbo estis *-e*, tiu por infinitivo *-i*. Tial la vortklasindikiloj por substantivoj, adjektivoj, adverboj kaj infinitivoj samas al tiuj de la nuna esperanto.

### 6.4. La verbaj finaĵoj

Kiel menciite la verba finaĵo por la infinitivo en Lingvo universala estas *-i* (*alli* 'iri'), kontraste al *-are* de Lingwe uniwersala. Por la finitivaj verboformoj ili estas

- *-é, -è* por prezenco: *rajiśé, rajis'è* 'radias', *faktidźé, faktidz'è* 'fariĝas', *fakté, faktè* 'faras', *esté, estè* 'estas', *poté, potè* 'povas', *amé* 'amas', *pensé, pensè* 'pensas', *malviské* 'malvolvas', *kojpé* 'komencas';
- *-á, -à* por imperfekto: *sidá, sidà* 'sidadis', *brulá, brulà* 'bruladis', *está* 'estadis', *vididźá* 'vidiĝadis', *lassá* 'lasadis', *mová, movà* 'movadis', *sobá* 'posedadis';[10]
- *-u* por preterito: *vidu* 'vidis', *levu* 'levis', *ektisku* 'ekplaŭdis', *kinu* 'ricevis', *pallu* 'diris';[11]
- *-uj* por futuro: *sciidźuj* 'sciiĝos';
- *-ó* por volitivo: imperative en *alló!* 'iru!', *ottó!* 'aŭskultu!', *fajfó!* 'fajfu!', *tajmó!* 'restu!'; pure volitive en celaj propozicioj: *dam fiu fol potó vidi* 'por ke neniu tion povu vidi'; kaj
- *-as* por kondicionalo: *debas* 'devus'.

La Lingvo universala do havis du simplajn tensojn por la pasinteco, kiujn mi ĉi tie nomas imperfekto kaj preterito. Evidente temas pri aspektoj. La imperfekto estas ĉiam uzata kiam temas pri priskribo de fona situacio (kiel en multaj lingvoj kun aspekta verbosistemo), dum la preterito, kiun oni povus nomi ankaŭ aoristo, estas uzata por raporti pri okazintaĵoj antaŭ la per imperfekto skizita fono, aŭ dum la per imperfekto rakontita situacio.

Ni notu en tiu ĉi kunteksto ke la orienta jida zorge distingas aspektojn simile al la rusa kaj pola sed kontraste al la germana. La emo distingi estas simila, sed la lingvaj rimedoj por esprimi tiun distingon estas tute malsamaj,

[10] Notinde estas ke Waringhien en sia traduko el la Lingvo universala (1989) ĉiam redon(ad)is imperfekton per *-adis*: *habá* 'havadis', *debá kini* 'devadis ricevi'. Pri tio vidu ankaŭ la sekcion 9.7, paĝon 129.

[11] Waringhien tradukas *pallu* per 'parolis' sed mi opinias ke la signifo 'diris' estas pli bona. Kontraste, *pallá* povas esti donita per la simpla 'parolis' anstataŭ per la pli longaj 'paroladis, estis parolanta'. En la nuna esperanto, kie la aspektoj ne estas tiel videblaj kiel en la Lingvo universala, ili povas, en tiu ĉi okazo, esti donitaj per du malsamaj verboj: *pallu* 'diris', *pallá* 'parolis'.

ĉar oni jide ne disponas, kiel en la rusa kaj pola, pri du malsamaj verbformoj inter kiuj la parolanto devas ĉiumomente elekti. Tamen ĝi posedas kion Weinreich nomas "aspectoid forms" (1980:528). Por ilustri tion, mi menciu kelkajn ekzemplojn: *ikh gib a shrayb, iĥ gib a ŝrajb*[12] 'I write once, mi skribas unufoje' kontraste al *ikh halt in eyn shraybn, iĥ halt in ejn ŝrajbn* 'I keep on writing, mi daŭre skribas' (Weinreich 1980:33–34). Plue: *Ikh fleg (tsu) shraybn, iĥ fleg (cu) ŝrajbn* 'I used to write, mi kutimis skribi', *ikh hob geshribn, iĥ hob geŝribn* 'I have written, mi skribis' (ne informante ĉu la skribo estis finita aŭ ne), *ikh hob on geshribn, iĥ hob on geŝribn* 'I have completed writing, mi finskribis' (informante ke la skribado estas finita), *ikh fleg on (tsu) shraybn, iĥ fleg on (cu) ŝrajbn* 'mi kutimis skribi' (Weinreich 1980:528, 529). Laŭ Weinreich (1980:528) tiuj aspektoidaj formoj ne ekzistas en la okcidenta jida; ili evoluis nur en tiuj regionoj kie la jida estas samteritoria kun slavaj lingvoj.

La du tensoj en Lingvo universala kiuj implicas daŭron, do precenzo kaj imperfekto, estas markitaj per akcento sur la lasta vokalo, imagigante longecon aŭ daŭron.

La lingvo enhavis participojn kaj konverbojn:[13]

- *-enta* '-anta': *kadenta* 'falanta', *malbenenta* 'malbenanta';
- *-ente* '-ante': *revionente* 'revenante';
- *-aga* '-inta', malrekte atestita per la formo *-agaŭ* '-intino': *mortagaŭ* 'mortintino';
- *-age* '-inte': *dekastage* 'malĉastinte';
- *-ita* '-ata': *vidita* 'vidata';
- *-assa* '-ita': *kojpassa* 'komencita', *fermassa* 'fermita', *pallassa* 'parolita', *faktassa* 'farita'; kaj
- *-ata* '-ita': *blobalbata* 'kontraŭbalbutita' — verŝajne provo; komparu kun *-assa*.

El la atestitaj formoj oni rajtas konkludi ke ekzistis kvar participoj, kies finaĵoj estis *-enta, -aga, -ita, -assa*, kaj kvar konverboj, kies finaĵoj estis *-ente, -age, -ite, -asse*.

Pri eblaj originoj de la kvar participaj sufiksoj vidu Mattos (1998:208–209).

[12] Mi donas unue la citaĵon el Weinreich, poste transkribon per esperantaj literoj.

[13] Mi uzas la terminon *konverbo*, sinonime *verba adverbo*, por la formo kiu antaŭe estis nomata gerundio. Laŭ Haspelmath (1995:46) ĝi estis enkondukita en 1903 en germanlingva artikolo pri la mongola de Gustaf John Ramstedt (1873–1950). Ramstedt estis la unua finnlanda ambasadoro en Tokio kaj krome esperantisto (Mine 2008:63). Li ankoraŭ hodiaŭ estas memorata de japanaj esperantistoj, kiel mi trovis dum la Universala Kongreso en Havano 2010.

Haspelmath (1995) argumentas ke *gerundio* kaj similaj terminoj estas misgvidaj. Oni nun uzas la terminon *konverbo* en la priskriboj de multaj lingvoj; vidu ekzemple Haspelmath & König (red., 1995).

### 6.5. La akuzativo en 1881

En la traduko de la dramo *La Brandistoj* 'La Rabistoj' (1780) de Frederiko Ŝiller (Friedrich Schiller, 1759–1805), kiu verŝajne estas frua provo, akuzativa finaĵo *-l* estis uzata: *tal fradral kordol* 'cian fratan koron'; *Kabropalal kadental ba sal sellol e malbenental la diol* 'Kadavropalan falantan sur sian seĝon kaj malbenantan la tagon' (*La Brandistoj* 'La Rabistoj'; Waringhien 1989:29, zamenhof 1989:728–729). Ni vidas ĉi tie ankaŭ la direktan akuzativon: *ba sal sellol* 'sur sian seĝon' aŭ 'en sian seĝon'.[14]

Sed en la aliaj konataj tekstoj li limigis la uzon de la finaĵo al pronomoj: *mo, mol* 'mi, min'; *to, tol* 'ci, cin', kaj skribis *la śemmo rajiśé alia prekalo el di no* 'la suno radias alian varmegon ol ĉe ni' (*La umbo* 'La ombro'; Waringhien 1989:25) kaj *kvu habá koj tre malmagna civetto* 'kiu havadis nur tre malgrandan regneton' (*La śuisto* 'La porkisto'; Waringhien 1989:33), do sen akuzativa finaĵo: ne estis **alial prekalol*, nek **malmagnal civettol.* La manko de akuzativa finaĵo ĉe substantivoj estas notinda en *Ful-ći rudźo e ful-ći fiaro debá kini la princaŭ* 'Tiun-ĉi rozon kaj tiun-ĉi najtingalon devadis ricevi la princino'; *ful* 'tiun' havas tie la finaĵon, *rudźo* 'rozon' kaj *fiaro* 'najtingalon' ne. (*La Śuisto* 'La Porkisto'; Waringhien 1989:33).

Same la direkta akuzativo mankas en *La imperestro lassu pol porti il magna zalo* 'La imperiestro lasis ilin porti en la grandan salonon' (*La Śuisto* 'La Porkisto'; Waringhien 1989:35).

Povas esti ke la plurala finaĵo *-j* kaj la akuzativa finaĵo *-l* ne bone kuniĝas: *-ojn* pli facile prononciĝas ol *-ojl*; same Günkel (1996:185) observas pri la ingenra finaĵo *-aŭ*: ĉu *-aŭsl* aŭ *-aŭls*?[15] Kun la pronomoj tio ne okazas, ĉar estis *no, nol* 'ni, nin'.

### 6.6. Verbiga finaĵo

Lingvo universala havis "grandan abundon da afiksoj". Ekzemple ekzistis sufikso por verbigo de substantivoj: *rajiśé* 'radias', kun infinitivo *rajiśi* 'radii', el *rajo* 'radio'; la sufikso *-iśi* verbigas substantivon. (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948a:354.) En la nuna esperanto oni ja senpere verbigas: *radio* ↦ *radii.* (Pri alia sufikso, *-iz-*, vidu la noton 29 sur paĝo 98.)

[14] En sia publikigita traduko al esperanto de la dramo Zamenhof skribis: "Mortpale refalanta en sian seĝon kaj malbenanta la tagon [. . . ]" (Schiller 1908:7).

[15] En volapuko la plurala finaĵo aldoniĝas post la akuzativa: *dom, domi*; *doms, domis* 'domo, domon; domoj, domojn'. Mi ne trovis formon kun *-aŭsl*; tamen estas klare ke Zamenhof metis la akuzativan finaĵon post la plurala: *ćiujl* 'ĉiujn' (*La Śuisto* 'La Porkisto'; Waringhien 1989:33).

### 6.7. La personaj pronomoj en Lingvo universala 1881

La personaj pronomoj estis *mo, no* 'mi, ni'; *to, vo* 'ci, vi'; *ro* 'li, ĝi'; *ś o* 'ŝi'; *so* 'si'; kaj *po* 'ili'. La pronomo *ro* estis kaj virgenra kaj neŭtrala (ne-utra), do responda al *li* kaj *ĝi*; *śo* estis ingenra. Vidu tabelon 18 sur paĝo 142. La posesivaj pronomoj estis *ma, ta, ra, śa* 'mia, cia, lia, ŝia', en akuzativo *mal, tal, ral, śal* 'mian, cian, lian, ŝian' k.t.p.

Aparta demando estas la eventuala ekzisto de pronomo de ĝentileco en la dua persono, kiu ekzistis en iu versio de la lingvo. Vidu pri tio sekcion 5.5 sur paĝo 86.

### 6.8. La tabelvortoj en 1881

Jam en Lingvo universala Zamenhof enkondukis la tabelon kiu permesas konstrui el $5 + 9 = 14$ elementoj $5 \times 9 = 45$ adverbojn kaj pronomojn. El la vidpunkto de lernado tio ja estas granda gajno, ĉar 14 estas multe pli malgranda ol 45.

Tamen la elementoj ne estis la samaj kiel en 1887. Nome, al la nunaj kvin

> *i-, ti-, ki-, ĉi-, neni-* respondis
> *k-, f-, kv-, ći-, fi-*[16]

kaj al la nunaj naŭ

> *-u, -a, -o, -es, -e, -am, -al, -el, -om* respondis
> *-u, -a, -o,* [?], *-i, -an, -ej, -e, -om.*

Ni notu ke la maniera *-el* tiam estis *-e*, la ĝenerala finaĵo por adverboj.

Ni havas atestojn pri ĉiuj dek kvar elementoj krom pri tiu responda al la poseda *-es*, kaj per ili ni povas rekonstrui la tabelon kun $5 \times (9 - 1) = 40$ vortoj, kvankam nur dudek unu el ili estas atestitaj. En tabelo 17 sur paĝo 141 mi listigas tiujn ĉi dudek unu vortojn.

La kvin tempaj tabelvortoj estis en 1881 *kan* 'iam', *fan* 'tiam', *kvan* 'kiam', *ćian* 'ĉiam', *fian* 'neniam' (Waringhien 1959:42), do finiĝantaj per la du literoj *an*, kiuj restis ankoraŭ en la Unua libro 1887. Ĉar la akuzativa finaĵo tiam estis *-l*, ne okazis kolizio — la nunaj tabelvortoj finiĝantaj per *-al* kaj *-el* tiam estis *fej* 'tial', *fe* 'tiel' kaj *kve* 'kiel', do sen *l* (Waringhien 1989:42).

### 6.9. La funkcivortoj en 1881

La funkcivortoj (t.e. vortoj kun ĉefe strukturiga funkcio, precipe prepozicioj, konjunkcioj kaj adverboj) estis ĝenerale mallongaj. Kune kun la mallongaj tabelvortoj (vidu sekcion 6.8 kaj tabelon 17 sur paĝo 141) kaj la unusilabaj posesivaj pronomoj (*ma* 'mia', *ra* 'lia', *sal* 'sian') tio donas impreson de lingvo

[16] La vorto *fiu* 'neniu' prononciĝis [fju] (Zamenhof 1948a:354).

efika kaj rapide fluanta. Al tio kontribuas la kombinaĵoj de prepozicioj kaj la artikolo:

*a la* 'al la' ↦ *al*;
*ba la* 'sur la' ↦ *bal*;
*bu la* 'inter la' ↦ *bul*;
*de la* 'de la' ↦ *del*;
*he la* 'el la' ↦ *hel*;
*i la* 'en la' ↦ *il*;
*ja la* 'ekster la' ↦ *jal*;
*je la* 'je la' ↦ *jel*.

"Ekz-e «il» estas «in la» (= en la), alkonformigita al la tiama leĝo, ke prepozicio devas esti ne sole plej mallonga, sed ankaŭ finiĝi per vokalo, por ke ĝi povu unusilabe kunfandiĝi kun la ĝin sekvanta artikolo" (Artikolo pri la deveno de Esperanto; Zamenhof 1948a:354).

Al tiu impreso de rapideco kontribuas ankaŭ mallongaj vortoj kaj esprimoj kiaj *delka* 'delikata', *degi* 'deziri', *denco* 'distanco', *dianto* 'diamanto', *es* 'ankoraŭ', *lue* 'malproksime', *sobá* 'posedadis', *utá* 'uzadis', *veksá* 'incitadis'; *bal muro del bloa balko* 'sur la muro de la kontraŭa balkono', *i kvilo* 'en trankvilo', *ma vando* 'mian avantaĝon', *taj brivoj* 'ciaj leteroj'.

Ekzemploj de vortoj kiuj nun havas alian formon: *a* 'al', *ba* 'sur',[17] *bej* 'post' [tempe], *bi* 'post' [loke], *blo* 'kontraŭ', *bu* 'inter', *da* 'per', *di* 'ĉe', *e* 'kaj', *ej* 'se', *el* 'ol', *en* 'jen', *es* 'ankoraŭ', *et* 'ja', *he* 'el', *hor* 'krom se', *i* 'en', *ja* 'ekster', *jur* 'hieraŭ', *kaŭ* 'apenaŭ', *ko* 'kun', *koj* 'nur', *kor* 'ĉar', *nuk* 'nun', *os* 'ankaŭ', *pej* 'po', *pelle* 'plue', *pin* 'antaŭ ol', *ple* 'sen', *prej* 'tro', *pu* 'por', *si* 'jes', *sej* 'sed', *su* 'sub', *śu* 'ke', *śte* 'pro' (ankaŭ *pro*), *vel* 'kvazaŭ', *vi-* 'antaŭ-'. La nombro de literoj uzendaj por tiuj vortoj estas proksimume du trionoj de tiuj por la respondaj nunaj vortoj.

Sed multaj, fakte surprize multaj, el la funkcivortoj kaj afiksoj travivis, kio signifas ke Zamenhof jam en 1881 trovis formon kiun li ne forlasos. La sekvantaj estas senŝanĝaj: *-ano*, *aŭ*, *de*, *dum*, *eć* 'eĉ', *-estro*, *-ett-* '-et-', *-idźi* '-iĝi', *-igi*, *jam*, *je*, *mal-*, *mem*, *ne*, *nu*, *plej*, *pli*, *pri*, *pro* (ankaŭ *śte*), *tre*, *tuj*.

En la vorto *prekalo* 'varmego' ni vidas ke la nuna sufikso *-eg-* estas esprimita per prefikso *pre-*. Ĝi estas kaj slavdevena kaj latindevena. En la rusa ni havas *пребогатый* 'riĉega', *прелюбезный* 'amindega', *пресвятой* 'sanktega'; ĝi ekzistas ankaŭ en la kroata kaj la bulgara. En latino la prefikso *prae-* signifas ofte 'antaŭ-', 'antaŭtempe-', sed ankaŭ 'plej altgrade': *prae-altus* 'plej alta', *prae-longus* 'longega', *prae-potens* 'plej potenca', *prae-dulcis* 'dolĉega', *prae-dūrus* 'malmolega'. Ĝia malo estis tamen esprimita per sufikso: *civo, civetto* 'regno, regneto', *At fo estas feletto!* 'Se-nur tio estus kateto!' (*La*

[17] Vidu piednoton 19 sur paĝo 95.

*Ŝuisto* ‘La Porkisto’, Waringhien 1989:33, 35). Oni do ne havis la paralelecon de la nuna paro *-et-, -eg-*. Rilate al tio oni povas demandi sin kiel Zamenhof esprimus *malvarmega*. En la Lingvo internacia oni povas formi tiun vorton dumaniere: aŭ *varma* ↦ *varmega* ↦ *malvarmega* aŭ *varma* ↦ *malvarma* ↦ *malvarmega*. La signifo estas la sama; alivorte *mal*(*varmega*) kaj (*malvarm*)*ega* estas samsignifaj: la malo de varmega kaj la aŭgmentativo de malvarma samas. Sed kun la prefikso *pre-* ni povas formi kaj **premalkala* kaj **malprekala*. Kiun formon uzus Zamenhof?

### 6.10. La vortprovizo

La vortprovizo de Lingvo universala estis plejparte latiniddevena, kun plej multaj vortoj el latino kaj multaj vortoj francdevenaj kaj krome kelkaj italdevenaj. Sed konsiderinda malplimulto en la atestita vortprovizo estas ĝermandevena (germandevena, jiddevena kaj en malmultaj okazoj angledevena). Krome alia malplimulto estas slavdevena (rusdevena kaj poldevena). Ekzistas pli da hebredevenaj vortoj ol en Lingvo internacia de 1887, kalkulante la nombrojn, kaj kompreneble eĉ pli kalkulante la procentaĵojn. Fine kelkaj vortoj estas grekdevenaj.

Mi metas en la sekvantajn kvar tabelojn atestitajn vortojn ĝermandevenajn, slavdevenajn, hebredevenajn respektive grekdevenajn en Lingvo universala.[18] Mi do ne listigos la latindevenajn, francdevenajn kaj italdevenajn, kiuj konsistigas la plimulton. Mi sekvas ĝenerale la liston en zamenhof (1989:741–762), kiu kredeble estas farita de Itô Kanzi. Tie aperas la radikoj; mi aldonis vortklasindikilon laŭ la atestita kunteksto. La jidajn vortojn mi enmetis laŭ persona informo de Tsvi Sadan (2010-08-08) aŭ laŭ Vilborg (1989, 1991, 1993, 1995, 2001).

La jidaj vortoj plej ofte apogas la germanajn, krom en kelkaj okazoj kie la jida vorto havas hebrean, aramean aŭ slavan originon. Pro la simileco ĝenerale ne eblas diri ĉu la germana aŭ la jida modelo estis uzita por la Lingvo universala. En la okazoj kie la germana kaj la jida havas tute similajn vortojn (kiel por *juna* kaj *frinda* ‘fremda’), aŭ kie la germana pli ol la jida similas al tiu de la Lingvo universala (kiel por *kaŭ* ‘apenaŭ’), mi metis la germanan vorton antaŭ la jida. Sed en kelkaj okazoj la responda jida vorto estas pli simila al tiu de la Lingvo universala ol la germana (kiel por *fajfi* kaj *brivo* ‘letero’); tiam mi metis la jidan vorton unue.

Ni notu ke Zamenhof uzis *-io* kaj por *-ujo* en *rudźio* ‘rozujo’, kaj por *-aro* en *verbio* ‘vortaro’.

[18] Mallongigojn por lingvonomoj mi uzas laŭ ISO 639-1, aŭ, en la okazo de la klasika greka, ISO 639-2: `en` angla, `es` hispana, `fr` franca, `grc` klasika greka, `he` hebrea, `it` itala, `la` latino, `pl` pola, `ru` rusa, `yi` jida.

*Tabelo 1.* Ĝermandevenaj vortelementoj en Lingvo universala 1881

| *Vorto 1881* | *Ebla fonto* | *Responda vorto 1887* | *Ebla fonto* |
|---|---|---|---|
| armo | de Arm, en arm, (yi orem) | brako | grc βραχίων, la brachium |
| ba[19] | yi *ba* 'ĉe' | sur | fr sur |
| baj | de beide, yi bejde | ambaŭ | la ambo |
| brivo | yi briv, de Brief | letero | en letter |
| dam | de damit, (yi kedej) | por ke | fr pour que |
| -ej- | de Bäckerei, yi bekeraj | -ej- | [20] |
| el | de als, (yi vi, ejder, fun) | ol | [21] |
| fajfi | yi fajfn, (de pfeifen) | fajfi | yi fajfn, (de pfeifen) |
| flanko | de Flanke, (yi zajt) | flanko | de Flanke |
| for | de fort, (yi avek) | for | de fort |
| frinda | de fremd, yi fremd | fremda | de fremd, yi fremd |
| he | de heraus, (yi arojs) | el | la ex, e |
| -ig- | de -igen, yi -iken | -ig- | de -igen |
| je | de je | je | de je |
| juna | de jung, yi jung | juna | de jung, yi jung |
| kabaliro | de Kavalir, yi kavalir | kavaliro | de Kavalir, yi kavalir |
| kaŭ | de kaum, yi kojm | apenaŭ | fr à peine |
| krego | de Kragen, yi kragn | kolumo | fr col |
| krono | de Krone, yi krojn | krono | de Krone, yi krojn |
| kusso | de Kuß, yi kuŝ | kiso | en kiss |
| lassi | de lassen, (yi lozn) | lasi | de lassen, (yi lozn) |
| lau | de laut, yi lojt | laŭ | de laut, yi lojt |
| linda | de blind, yi blind | blinda | de blind, yi blind |
| mirko | de Mährchen, (nun Märchen), (yi majse) | fabelo | de Fabel |
| nau | de neun, yi nojn | naŭ | [22] |
| nu | de nu | nu | de nu |

[19]La prepozicio *ba* aperas kvinfoje en la tekstoj de Lingvo universala: en la frazo *ba sal sellol* 'sur sian seĝon' (*La Brandistoj* 'La Rabistoj'; Waringhien 1989:29); *Un sero la frindoro sidá [jal] ba sa balko*, kiun Waringhien tradukis al 'Unu vesperon la fremdulo sidadis [ekster-la] sur sia balkono'; kaj krome trifoje en la kombinaĵo *bal* 'sur la': *bal muro* 'sur la muro'; *bal balko* 'sur la balkono'; *bal bloa balko* 'sur la kontrŭa balkono' (la kvar lastaj en *La Umbo* 'La Umbro', Waringhien 1989:25). Kelkfoje ĝi povas esti redonita per *ĉe.* Tial origino en la jida *ba* 'ĉe' ne estas ekskludita.

[20]Pri *-ej-* vidu Vilborg (2001:155–156).

[21]Pri *al, el* kaj *ol* vidu Vilborg (1989:26–27), (1991:22) kaj (1995:33).

[22]Pri *naŭ* vidu Vilborg (1995:17–18).

| | | | |
|---|---|---|---|
| opri | de opfern, (yi makrev zajn) | oferi | la offerre |
| sedro | yi sedre[23] | partaĵo | fr part |
| śenko | de *schenken* ‘donaci’, (yi matone) | donaco | la donátio |
| śnuri | de *Schnur* ‘ŝnuro’, yi *ŝnur* ‘ŝnuro’ | ŝnuri | de Schnur, yi ŝnur |
| śtromo | de Strom, (yi tajĥ) | rivero | fr rivère, en river |
| tajmi | en time | resti | fr rester |
| tupo | yi top, de Topf | poto | fr pot |
| viski | de wickeln, yi viklen | volvi | la vólvere |
| vugi | de wiegen, yi vign | balanci | fr balancer |
| zalo | de Saal, yi zal | salono | fr salon |

*Tabelo 2.* Slavdevenaj vortelementoj en Lingvo universala 1881

| *Vorto 1881* | *Ebla fonto* | *Responda vorto 1887* | *Ebla fonto* |
|---|---|---|---|
| bavi | pl bawić się | ludi | la lúdere |
| bura | ru бурый | bruna | fr brun |
| ći | pl czy, yi tsi | ĉu | pl czy, yi tsi |
| es | ru ещё | ankoraŭ | fr encore |
| eś | pl aż | tiom ke | |
| matto | ru *внимательный* ‘atenta’ | atento | fr attention |
| moa | ru молча | muta | la mutus |
| ob- | ru об- | pri- | grc *περί* |
| pre- | ru пре- | -eg- | ru -яга |
| rado | ru радость | gajo | fr *gai* ‘gaja’ |
| rudźo | pl róża | rozo | ru роза |
| sobi | ru *собственность* ‘posedaĵo’ | posedi | fr posseder |
| strapa | ru страшный | terura | la *terror* ‘teruro’ |
| śeppi | ru шепнуть, yi ŝepĉen | flustri | de flüstern |
| śu | pl że | ke | it che, fr que |
| terg,ig,a | ru *терзать* ‘turmenti’ | ĉagrena | fr chagriner |

[23]La jida vorto *sedre* ‘semajna sekcio en la Torao voĉlegata en la sinagogo’ devenas de la samsignifa hebrea vorto *sidra*.

| | | | |
|---|---|---|---|
| tiski | ru *тискать* 'premi, presi' | plaŭdi | la *plaudere* 'frapi, aplaŭdi' |
| tri | ru три, la tri-, grc *τρι-* | tri | ru три, la tri-, grc *τρι-* |
| voski | ru воскликнуть 'ekkrii' | voki | la vocare |

*Tabelo 3.* Hebredevenaj vortoj en Lingvo universala 1881

| *Vorto 1881* | *Ebla fonto* (he) | *Responda vorto 1887* | *Ebla fonto* |
|---|---|---|---|
| amen | amen | amen | he amen |
| bu | bejn | inter | la inter |
| jerko | *jarĥatajim* 'malantaŭo'[24] | malantaŭo | la ante |
| satono | satan | satano | he satan |
| sokka | suka | (vepra)[25] | la *vepres* 'vepro' |
| śemmo | ŝemeŝ | suno | en sun |
| taŭr | tora | torao | he tora |

Kiam Zamenhof pruntis hebrean vorton en esperanton (kaj tial kredeble ankaŭ en la Lingvon universalan), li sekvis laŭ Sadan (2008:260) la tradician sefardan prononcon kiam temis pri vokaloj kaj la tradician aŝkenazan prononcon kiam temis pri konsonantoj. Rezulte la supozita prononco de Zamenhof de la biblia hebrea estas amalgamo de la aŝkenaza kaj sefarda prononcoj.

*Tabelo 4.* Grekdevenaj vortelementoj en Lingvo universala 1881

| *Vorto 1881* | *Ebla fonto* (grc) | *Responda vorto 1887* | *Ebla fonto* |
|---|---|---|---|
| arĥa | *ἀρχαῖς* | antikva | la antiquus |
| ej | *εἰ* | se | it se |

[24]Waringhien tradukas *Po heprené la taŭroviskoj hel sankta jerko* per 'Ili elprenas la Tora-volvojn el-la sankta ŝranko' (1989:36). Sed la vorto *jerko* povas celi la fakton ke la Tora-volvaĵoj estas en ŝranko malantaŭ kurtenoj. Tiel oni povas klarigi la ŝovon de la signifo de 'malantaŭo' al 'ŝranko'. Vidu ankaŭ Golden (1983).

[25]Waringhien (1989:36) tradukas *sokka vagejo* per 'vepra vagejo'. Tamen *vepro* ne aperas en la Unua libro aŭ en la Fundamento. Ĝi ne estas oficiala.

| | | | |
|---|---|---|---|
| ek-[26] | *εκ-* | ek- | `grc` *εκ-*[27] |
| guro | *χώρα*[28] | lando, loko | `de` Land, `yi` land `la` locus |
| -id- | *-ίδ-* | -id- | `grc` *-ίδ-* |
| -iz- | *-ίζω*[29] | -plen- | `fr` plein |
| -on- | *τρίτον*[30] | -on- | `grc` *τρίτον* |
| pin | *πρίν* | antaŭ ol | `la` ante |
| ple | *πλήν*[31] | sen | `la` sine, `fr` sans |
| prej | *περί-*[32] | tro | `fr` trop |
| pri | *περί* | pri | `grc` *περί* |

### 6.11. Enigmaj originoj de la vortoj en Lingvo universala

Nepre restas enigmaj la originoj de pluraj vortoj en la lingvo de 1881. Multaj funkcivortoj ŝajnas esti arbitre kreitaj, ekzemple *ba* 'sur', *bej* 'post' [tempe], *bi* 'post' [space], *blo* 'kontraŭ', *bu* 'inter', *di* 'ĉe', *gu* 'do', *ja* 'ekster', *koj* 'nur', *-ozo* '-aro', *pej* 'po', *ple* 'sen', *prej* 'tro', *śte* 'pro', *vi-* 'antaŭ-' [space]. Tial plej ofte estas verŝajne senespere serĉi nacilingvajn modelojn.

Zamenhof kritikis Volapukon pro tio ke ĝi enhavas multe da tre simile sonantaj vortoj "ekzemple « bap, pab, pap, päp, pep, pöp, peb, böb, bob, pop, pup, bub, pub, büb, bib, pip, püp » k. t. p." (Esenco kaj estonteco de la

[26]Ekzemple *ektisku* 'ekplaŭdis', *ekludu* 'ekludis', *ekkriu* 'ekkriis' en la *Śuisto* 'La Porkisto', Waringhien (1989:35).

[27]Vidu Vilborg (2001:149–150).

[28]Vidu sekcion 6.11.

[29]En la teksto aperas la frazo *armoj amizaj e kalaj* 'brakoj amplenaj kaj varmaj' (*Balladdo* 'Balado'; Waringhien 1989:27), sed oni povas traduki la adjektivon *amiza* ankaŭ per 'provizita per amo', do kun uzo de la poste aperinta sufikso *-izi* 'provizi per'. La klasika greka havas multajn verbojn finiĝantajn per *-ίζειν* (*-ízein*) en infinitivo, *-ίζω* (*-ízō*) en la unua persono en singularo: ekzemple *καθαρός* (*katharós*) 'pura', *καθαρίζω* (*katharízō*) 'mi purigas'; *νόμος* (*nómos*) 'kutimo; leĝo', *νομίζω* (*nomízō*) 'mi opinias, mi kredas'; *ξένος* (*ksénos*) [i.a.] 'gasto', *ξενίζω* (*ksenízō*) 'mi ricevas kiel gaston', *βάπτισμα* 'bapto', *βαπτίζω* 'mi baptas'. Ĝi evidente funkcias kiel ĝenerala verbiga sufikso kaj estas iom produktiva. Ove Strid konfirmas (persona informo 2010-11-25) ke ĝi ne havas iun pli specialan signifon aŭ semantikan funkcion – malkiel *-igi, -iĝi*. Pri la verbiga sufikso *-iśi* vidu sekcion 6.6.

[30]Ebbe Vilborg (2001:162) skribas: "Necerta etimologio. La plej multaj devenigas la sufikson de la lasta silabo en AF *fraction* (I *frazione*) "frakcio" [. . . ]" Mi kuraĝas proponi la grekan kiel unu eblan fonton. En la klasika greka ni havas *τὸ τρίτον* (*tò tríton*) 'la tria; la triono' kaj *τὸ πέμπτον* (*tò pémpton*) 'por la kvina; la kvinono'. La finaĵo *-ον* (*-on*) estas ofta ĉe neŭtralaj (ne-utraj) substantivoj, sed ĉi tie konvencie uzata por frakcioj.

[31]Vidu sekcion 6.11.

[32]Vidu sekcion 6.11.

ideo de Lingvo Internacia; Zamenhof 1939:303).[33] Tamen liaj *ba, bej, bi, blo, bu* kaj *pej, pelle, pin, ple, prej, pu* povas iel konkurenci kun la volapuka listo. Do la kritiko en Esenco kaj estonteco estas parte ankaŭ kritiko al lia propra Lingvo universala — li ja volis montri ke li estis pluirinta al pli alta stadio de lingvokonstruado.

Sed ankaŭ pluraj enhavovortoj (kiuj ĝenerale estas pruntitaj de respondaj nacilingvaj vortoj) restas sen konata origino, ekzemple *blena* 'abomena', *degi* 'deziri', *fladi* 'flari', *fuko* 'sono', *guro* 'lando', *irio* 'kesto', *kajdo* 'okazo', *kini* 'ricevi', *kośo* 'kortego', *mianto* 'momento', *paś* 'almenaŭ', *pil* 'certe', *śanno* 'svatiĝo'.

Laŭ Tsvi Sadan (persona informo 2010-08-10, 2010-08-15 kaj 2010-10-17) la menciitaj vortoj ne similas al iuj hebreaj, arameaj aŭ jidaj vortoj kun la ebla escepto de *ba*, kiun mi jam komentis en piednoto 19 al tabelo 1. Laŭ Bo Isaksson (persona informo 2010-08-16 kaj 2010-11-08) ili ne similas al iuj ŝemidaj vortoj.

Tamen en kelkaj okazoj mi povas imagi originon.

Por la vorto *guro* 'lando', eble ankaŭ 'loko' (*Il kalaj guroj la śemmo rajiśé alia prekalo el di no* 'En la varmaj landoj la suno radias alian varmegon ol ĉe ni', *il plej kalaj guroj* 'en la plej varmaj landoj', aperinta en *La umbo* 'La ombro', Waringhien 1989:25), mi volas proponi kiel eblan originon la klasikgrekan vorton χώρα (*khōra*) 'loko, tereno, teritorio, regiono, lando'. Unuavide tiu greka vorto donus **ĥ́oro*, sed eble tiu vorto, kvankam neatestita, estis intencita por la nuna signifo 'ĥoro, koruso'. Ĉiuokaze la litero *ĥ́* estis ege malofte uzata kaj, kiel dirite, aperas nur en la vorto *arĥ́a* 'antikva'. Aliaj ebloj estus **horo*, kiu kolizius kun *hor* 'krom se' kaj la neatestita **horo* 'horo', kaj **koro*, kiu kolizius kun *kor* 'ĉar'. Do la elekto *guro* ne estas neebla.

La prepozico *ple* 'sen' (*ma plekulpa plumo* 'mia senkulpa plumo', aperinta en *La Brandistoj* 'La Rabistoj', Waringhien 1989:27) memorigas min pri la klasika greka πλήν (*plḗn*) 'krom'. Koncede la sencoj 'sen' kaj 'krom' ne samas, sed la vorto *krom* kelkfoje povas esti redonita per 'sen kalkulo pri'. Almenaŭ *plḗn* povus esti inspiro pri *ple* — pro la ekzisto de la vorto *plena* 'plena' (*plenigu nuk* 'plenigis nun', aperinta en *La Brandistoj* 'La Rabistoj', Waringhien 1989:29) li devis forigi la literon *n*.

La adverbo *prej* 'tro' (*ne tajmó prej longe* 'ne restu tro longe', aperinta en *La Umbo* 'La Ombro', Waringhien 1989:25) memorigas min pri la klasika greka prefikso περί- (*perí-*) 'tro-, super-', kiu signifas plifortigon en kunmetaĵoj. Tiel do la prepozicio περί (*perí*) 'pri, ĉirkaŭ' kaj la samlitera prefikso περί- (*perí-*) 'tro-, super-' povus esti la originoj kaj de *pri* kaj de *prej*.

[33]Kaj inventis tiujn vortojn ne Zamenhof: el la dek sep menciitaj dek kvin aperas en Kerckhoffs (1887); nur *bub* kaj *püp* mankas tie.

Ove Strid (persona informo 2011-01-31) skribas ke la prefikso *vi-* 'antaŭ-', aperinta en la esprimo *sej fe vo debé paś vistaridźi, dam fiu fol potó vidi* 'sed tiel vi devas almenaŭ antaŭstariĝi, por ke neniu tion povu vidi', memorigas lin pri la klasikgreka sufikso -$\varphi\iota(\nu)$ (-*fi*(*n*)), uzita de Homero kaj kun i.a. la signifo 'en, sur, apud', ekzemple en $\vartheta\acute{\upsilon}\rho\alpha$ (*thýra*) 'pordo', $\vartheta\acute{\upsilon}\rho\eta\varphi\iota$ (*thýrēfi*) 'ĉe la enirejo, ekstere'. (Ni memoru ke *fi-* estis la tiama *neni-*.) Sed pri la aliaj menciitaj vortoj li ne trovas iun eblan ligon al la klasika greka. Do la enigmo grandparte restas.

### 6.12. La ingenra finaĵo -*aŭ* en 1881

La lingvo havis ingenran finaĵon -*aŭ*, ekzemple *puettaŭ* 'knabineto' (*Pinto* 'Penso'; Waringhien 1989:31), *filaŭ* 'filino' (*La śuisto* 'La porkisto'; Waringhien 1989:33), *princaŭ* 'princino', plurale *princaŭs* 'princinoj', *kośanaŭs* 'kortegan-inoj' (*La śuisto* 'La porkisto'; Waringhien 1989:33, 35) kaj *mortagaŭ* 'mort-intino' (*Mirkoj hel getto* 'Fabeloj el-la ghetto'; Waringhien 1989:37). Günkel (1996) detale pritraktis ĝin.

Tamen la finaĵo -*ino* konkurencis kun -*aŭ*: *princino* 'princinon' (*Balladdo* 'Balado'; Waringhien 1989:27), *filinol* 'filinon' (*La Krego* 'La Kolumo'; Waringhien 1989:29).

Mattos (1987:31) proponas ke la ingenra finaĵo -*aŭ* devenas de la latina -*a*, kiu devis esti modifita pro kolizio kun la adjektiva finaĵo -*a*. Mi volas mencii alian eblan fonton, nome la hebrean kaj aramean ingenran finaĵon -*ā* aŭ -*â*, prononcata kiel longa [aː]. Ĝi aperas ekzemple en *malkā* 'reĝino' kaj *pārâ* 'guno' — kp. *melek* 'reĝo' (de praŝemida *malk*) kaj *par* 'virbovo, taŭro'. En la aramea simile: *antā* 'virino' (de praŝemida *an̲tat*). Tiuj du eblaj fontoj, do la latina modelo kaj la hebrea-aramea modelo, ne kontraŭdiras sed male fortigas unu la alian.

### 6.13. Verboparoj en Lingvo universala de 1881

En la nuna esperanto ni havas kelkajn verboparojn kun parencaj sed malsamaj signifoj: *pesi* 'mezuri pezon', *pezi* 'havi pezon'. El ili oni formas substantivojn *pesilo* kaj *pezilo* kun klare distingeblaj signifoj. Simila paro estas *ŝargi, ŝarĝi.*

Tiuj paroj estas ia restaĵo de multaj paroj kiujn Zamenhof kreis por sia lingvo de 1881. Ekzistis en frua versio de la lingvo eĉ speciala formo por esprimi la rilaton inter *doni* kaj *preni*, *vendi* kaj *aĉeti*, *instrui* kaj *lerni* k.t.p. (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948a:352.)

Oni povas diri *Mi rigardis sed nenion vidis*; *Mi aŭskultis sed nenion aŭdis.* La du eldiroj signifas ke mi provis vidi aŭ provis aŭdi, sed ne sukcesis. La parojn *vidi, rigardi* kaj *aŭdi, aŭskulti* kaj plurajn aliajn Zamenhof sistemigis,

enkondukante parojn de similaj verboj. Li enkondukis ekzemple verbon *viti* aŭ *vitti*, kiu signifas 'provi vidi sed ne certe sukcesi vidi'.

Mi metas en tabelon unue la verboparojn menciitajn de Zamenhof mem (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948a:352) kaj due la parojn menciitajn de Cash (1992:15). Zamenhof skribis "Paralele al radikoj (kies tiaman formon mi nun ne memoras precize, sed donas nur proksimume) [...] ekzistis simetrie la serio [...]." Sed laŭ mia scio Cash ne havis alian fonton.

*Tabelo 5.* Verboparoj en Lingvo universala 1881 laŭ Zamenhof (1948a:352)

| *Percepti*<br>*Fari ion (sukcese)* | *Provi percepti*<br>*Provi fari ion (ne nepre sukcese)* |
|---|---|
| *vidi* 'vidi' | *viti* 'rigardi' |
| *aŭdi* 'aŭdi' | *aŭti* 'aŭskulti' |
| *fladi* 'senti per la nazo' | *flati* 'flari' |
| *palbi* 'senti per palpado' | *palpi* 'palpi' |
| *gudi* 'senti per la gusto' | *guti* 'gustumi' |
| *svazi* 'konvinki' | *svasi* 'peni konvinki' |
| *provi* 'sperti' | *profi* 'pruvi'[34] |
| *trovi* 'trovi' | *trofi* 'serĉi' |
| *pruvi* 'pruvi' | *prufi* 'argumenti' |

*Tabelo 6.* Verboparoj en Lingvo universala 1881 laŭ Cash (1992:15)

| *Percepti*<br>*Fari ion (sukcese)* | *Provi percepti*<br>*Provi fari ion (ne nepre sukcese)* |
|---|---|
| *vidi* 'vidi' | *vitti* 'rigardi' |
| *odi* 'aŭdi' | *otti* 'aŭskulti' |
| *fladi* 'flari; percepti odoron' | *flati* 'esplori per flarado' |
| *palbi* 'percepti pro tuŝiĝo' | *palpi* 'palpi' |
| *gudi* 'percepti pro gusto' | *guti* 'esplori per gustumado' |
| *svazi* 'konvinki' | *svasi* 'peni konvinki' |
| *provi* 'sperti' | *profi* 'provi' |
| *trovi* 'trovi' | *trofi* 'serĉi' |
| *pruvi* 'pruvi' | *prufi* 'argumenti' |

[34]Eble 'pruvi' estas erara traduko de *profi*; devus esti 'provi' kiel en la sekvanta tabelo laŭ Cash.

Ni vidas ke Zamenhof uzis la kontraston inter voĉa konsonanto kaj senvoĉa konsonanto (la parojn *d, t*; *b, p*; *z, s*; *v, f*) por la verboparoj, kie ĉiam la voĉa indikas la percepton aŭ sukcesan faron, la senvoĉan la provon percepti aŭ la ne nepre rezultodonan faron. Estas evidente ke la vorto kun voĉa konsonanto estas la elira, almenaŭ en la okazoj de *vidi, aŭdi, trovi, pruvi.*

En aliaj okazoj temas pri kaŭzativo: *levi* 'levi' (kaŭzi leviĝon) kaj *lefi* 'leviĝi'. Li ankaŭ uzis la verbon *stutti* 'instrui', kiun oni povus kompreni kiel kaŭzativo de **studi* 'studi', kie tamen la verbo **studi* ne estas atestata. En la du paroj *levi, lefi* kaj *stutti, studi* la roloj de la voĉa kaj senvoĉa konsonantoj estas inversaj.

## 7. La Lingvo Internacia de 1887

### 7.1. La Unua libro

Kiel ni ĉiuj scias Zamenhof, 27-jara, publikigis sian lingvon en 1887 en Varsovio. En tiu ĉi jaro aperis la Unua libro en kvar versioj: la rusa (Дръ Эсперанто 1887a), pola (Dr. Esperanto 1887b), franca (Dr. Esperanto 1887c) kaj germana (Dr. Esperanto 1887d). La unua versio, la rusa, aperis la 26-an de julio[35] (Courtinat 1963:12).

Ni scias ke Zamenhof provis publikigi sian verkon pli frue:

> Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigadis mian broŝuron por eldono kaj fine — rifuzis. (Letero 1895 al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko; Zamenhof 1948a:350)

Vytautas Šilas opinias ke la eldonanto kiun Zamenhof celas ĉi tie estis la rabeno Menachem Man Romm en Vilno, kies firmao estis

> *Firmao de vidvino kaj fratoj Rom* (ruse Вдова и братья Роммъ), kiu presis ne nur en la jida kaj la hebrea lingvoj. Ĝis 1864 ĝi presis ankaŭ litove, poste pole (kontraŭe al malpermeso presi litovlingve, presado pollingve ne estis malpermesita). La presejo presis ankaŭ latine, germane, ruse, itale kaj france! (Šilas 2010:26)

### 7.2. Fonemoj kaj akcento

La Lingvo internacia de 1887 havas 5 vokalfonemojn kaj 24 aŭ 22 konsonantfonemojn, depende de tio ĉu oni konsideras ke la paro *c, dz* indikas du fonemojn /ʦ/ kaj /ʣ/ (en tiu ĉi okazo *eco, edzo* estas minimuma paro) aŭ ĉu oni male konsideras ilin kiel kombinaĵojn de /t/ kaj /s/ respektive de /d/

[35] Laŭ la nuna gregoria kalendaro. Laŭ la tiam uzata julia tiu dato respondas al la 14-a de julio.

kaj /z/. Ambaŭ analizoj eblas. Escepte de tiu ĉi detalo la alfabeto estas fonemfidela.[36]

La akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta silabo.

### 7.3. Skribo

La alfabeto estas tiu kiun ni konas, kun 28 literoj. La kvar versioj de la Unua libro ne mencias iun alternativan metodon por presi la ses supersignitajn literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*.

### 7.4. Prezento per vortelementoj

La libro Дръ Эсперанто (1887a) estas 42-paĝa kaj enhavas faldfolion kun 917 konstruelementoj. Tie mankas la elementoj *esper, kaf* kaj *propon*, kiuj estis aldonitaj en pli posta eldono de la rusa versio de la Unua libro; tiu ĉi do enhavas 920 elementojn.

Same kiel Lingwe uniwersala kaj Lingvo universala, Lingvo internacia estas aglutina.[37] En la Unua libro Zamenhof klarigis kiel li prezentis sian lingvon per vortelementoj, kvankam li ne uzis tiun ĉi vorton. Ĉar la Unua libro aperis en 1887 en la rusa, pola, franca, germana sed ne en esperanto, mi citas ĉi tie la tradukon en esperanton kiun li publikigis en la *Fundamenta krestomatio*:

> Mi aranĝis plenan *dismembriĝon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. (Zamenhof 1939:248)

Tiajn elementojn de la lingvo en la Fundamento Kaloscay & Waringhien (1985, § 276) nomas *vortelementoj*, *lingvoelementoj* kaj *neŝanĝeblaj lingvoelementoj*. En du lokoj en la citaĵo oni do, laŭ ilia terminelekto, havus *memstarajn vortelementojn* kaj *neŝanĝeblaj vortelementoj*, aŭ, egalnivele kaj samsignife, *memstarajn lingvoelementojn* kaj *neŝanĝeblaj lingvoelementoj*. En la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertilo Wennergren la sekcio 37.1, kiu pritraktas ĝuste tiujn ĉi konstruelementojn de la lingvo, havas la rubrikon "Vortelementoj kaj signifoj".

Ĉi tie mi uzos la terminon *konstruelemento* por la lingvoelementoj listigitaj en la Unua libro kaj la Fundamento. La terminon *vortelemento* mi uzos kiel hiperonimon por *vorto*, *morfemo* kaj *konstruelemento*; ĝi do signifas ajnan elementon en la vortfarado. Ekzemple *dom′*, *o*, *j* kaj *domoj* estas kvar vortelementoj; la unuaj tri estas konstruelementoj (ne vortoj) kaj la kvara estas

[36] Nur la stultaj detektivoj Citserono kaj Tsicerono (france Dupont kaj Dupond), kies nomojn inventis Louis M. Lazaro, memorigas pri la ambigueco en la fonemanalizo.

[37] Oni kutime mencias la sufiksojn *-ĉjo* kaj *-njo* (*Miĥaelo* ↦ *Miĉjo*; *Henrieto* 'Henrietta' ↦ *Henrinjo, Henjo* 'Hetty') kiel neaglutinajn trajtojn, ekzemple ĉe Wells (1978:33, piednoto 6). Tamen tiaj etaj esceptoj verŝajne ekzistas en ĉiuj lingvoj.

vorto. En la Fundamento *ek′* estas konstruelemento. Sed poste estiĝis interjekcio *ek!*, kio do en la nuna lingvo estas vorto. Vidu plie sekciojn 9.4 kaj 9.5.

Laŭvorte interpretate la eldiro de Zamenhof signifas ke ĉiu konstruelemento estas uzebla kiel memstara vorto, sed tio laŭobserve ne veras: en siaj verkoj Zamenhof nur tre malofte uzas tiun eblon.

Banala observo estas ke konstruelementoj kiaj *a, as, e, i, is, j, n, o, os, u, us* tute ne aperas kiel memstaraj vortoj — komparu kun la reformpropono menciita en sekcio 13.4. Tiu ĉi uzo do havas siajn limojn. Pli grave: li laŭ mia scio neniam skribis *iĝas*, ĉiam *fariĝas*. En la Ekzercaro aperas nur kelkaj tiaj memstaraj vortoj, ekzemple *indo, aro* kaj *eble*: *havas pli grandan indon* (§ 23), *aroj da bellanaj ŝafoj* (§ 34), *eble mi povos helpi al vi* (§ 41).

Ne surprize kelkaj vortoj estas teorie analizeblaj dumaniere: ni havas *ĉap′*, *el* kaj *ĉapel′*; same *ĉi*, *el* kaj *ĉiel*, *ĉiel′*; *de*, *tru′* kaj *detru′*; *Di′*, *fin′* kaj *difin′*; *Di′*, *ven′* kaj *diven′*; *et′*, *at′* kaj *etat′*; *fest′*, *en* kaj *festen′*; *son′*, *or′* kaj *sonor′*; *tre*, *mol′* kaj *tremol′*.

Praktike tiaj ekzemploj ne kaŭzas problemon. Cetere, kion estus farinta Raymond Schwartz (1894–1973) sen *et-aĝo, kur-aĝo, voj-aĝo, dom-aĝo* kaj *vil-aĝo*?

En la "Интернаціонально-русскій словарь" en la Unua libro la konstruelementoj estas listigitaj sen iu signo por indiki la nekompletecon de la radikoj, ekzemple *flor* цвѣтокъ. Same en la "Słownik mięzynarodowo-polski" de la pola versio (*flor* kwiatek), en la "Dictionnaire international-français" de la franca versio (*flor* fleur) kaj en la "International-deutsches Wörterbuch" (*flor* Blume) de la germana versio de de la Unua libro (Zamenhof 1991a:47, 99, 159 respektive 219).

La unua eldono de la Unua libro enhavis la radikojn *vaks* 'рости' (kreski) kaj *stal* 'сталь' (ŝtalo) (Zamenhof 1991a:49). En la dua eldono aperis *vaks* 'воскъ' kaj *stal* 'стойло, сарай' kun la nunaj signifoj (Zamenhof 1991a:243).

## 7.5. Fruaj versioj de la verbaj finaĵoj

La pluskvamperfekto en la lingvo de Zamenhof restis ankoraŭ en 1881, la imperfekto, kies finaĵo estis *-es*, restis ĝis la komenco de 1887, do mallonge antaŭ la publikigo (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948a:351).

En frua versio de la lingvo ekzistis "ambaŭ participaj sufiksoj por la kondicionalo kaj la imperativo (la lasta en la senco de devo: kiu devas fari, kiu devas esti farata)" (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948a:351).

En la publikigita libro tiuj ĉi gramatikaĵoj ne plu ekzistas.

### 7.6. La tempaj tabelvortoj en 1887

En 1887 la kvin tempaj tabelvortoj estis *ian* 'iam', *tian* 'tiam', *kian* 'kiam', *ĉian* 'ĉiam', *nenian* 'neniam', kio kaŭzas koliziojn kun la akuzativa formo de la vortoj *ia*, *tia* k.t.p. — la akuzativa finaĵo ja tiam estis *-n*. En la *Dua Libro de l'Lingvo Internacia*, 1888, li ankoraŭ uzis *tian, kian* (Zamenhof 1962:90, n-ro 108).

En 1888, do post la apero de la Unua libro, kaj sekve al propono de Edgar de Wahl (Waringhien 1989:52), Zamenhof faris ŝanĝon: la kvin tempaj tabelvortoj estis ŝanĝitaj al la nunaj *iam*, *tiam* k.t.p.

Tamen tio estas detalo, kaj en la nuna studo oni povas konsideri la Lingvon internacian el 1887 kaj esperanton el 1905 kiel la saman varianton de la lingvo.

### 7.7. La akuzativo

En la komencaj jaroj post la publikigo en 1887 oftis uzo de akuzativo en predikativoj rilataj al verboj de percepto kiaj *vidi, rigardi, aŭdi, aŭskulti, senti*, eble laŭ la modelo de la klasika greka, kiu ĉiam metas la participojn en akuzativo en tiaj predikativoj, situantaj en subpropozicioj kiujn Kalocsay & Waringhien (1985:235) nomas atribuaj *ag*-propozicioj. Montras tion ĉi du el tri citaĵoj el la fabelo *La virineto de maro*, kiu estis verkita en 1837 de H. C. Andersen (1805–1875) kaj kies ĉefrolulino fariĝis, spite al sia tragedia sorto, la simbolo de Kopenhago:

> Ofte en vespero ŝi vidadis lin forveturantan sub la sonoj de muziko en lia belega ŝipeto [...] (participo en akuzativo);
>
> [...] ili ekvidadis la nubojn preterflugantaj profunde sub ili [...] (participo en nominativo);
>
> [...] ŝi ekvidis siajn fratinojn leviĝantajn el la maro [...] (participo en akuzativo).

La cititaĵoj estas el Zamenhof (1939:45, 53, 57). Laŭ Kaloscay & Waringhien (1985:235) la fabelo estis tradukita jam en 1889. La lingvaĵo de la traduko estas tre bela kaj agrable flua. Mi divenas ke Zamenhof uzis ne la danan originalon sed ties tradukon en la germanan, kiu aperis en Braunschweig en 1864 (la jaro de unu el la dan-germanaj militoj) kaj plurfoje poste.

Zamenhof skribis en 1889 ke oni "povas egale bone diri: « la malfeliĉo faris lin prudentan » kaj « la malfeliĉo faris lin prudenta ». Mi mem uzas en tia okazo la nominativon." (Ni ĵus vidis du kontraŭekzemplojn.) En 1906 li skribis ke la diferenco "ne estas granda, kaj ofte ambaŭ estas egale bonaj." (Zamenhof 1962:68–69, N-roj 76 A kaj 76 B.) Tio kredeble klarigas kial li ne ŝanĝis en postaj eldonoj la cititajn frazojn el 1889.

Kontraste, laŭ Kalocsay & Waringhien (1985:235) la akuzativo ĉi tie "estas severe evitinda." La lasta ĉi-supre citita frazo "ŝajnus hodiaŭ nekorekta kaj

devus esti ĝustigita en: *leviĝantaj* aŭ *leviĝi*." Kaj rimarkinde la dana originalo same kiel la germana traduko uzas ne participojn sed infinitivojn:

> *Hun saae ham* [...] *seile* 'Ŝi vidis lin [...] veli';
> *til de saae Skyerne seile nede under sig* 'ĝis ili vidis la nubojn veli sub si';
> *Da saae hun sine Søstre stige op* 'Tiam ŝi vidis siajn fratinojn leviĝi'.
> (Andersen 1837:95, 101, 105)

> *Sie sah ihn* [...] *segeln* 'Ŝi vidis lin [...] veli';
> *bis sie die Wolken unter sich segeln sahen* 'ĝis ili vidis la nubojn sub si veli';
> *Da sah sie ihre Schwestern* [...] *aufsteigen* 'Tiam ŝi vidis siajn fratinojn [...] leviĝi'. (Andersen ≈ 1900)

Do la demando restas kial Zamenhof ne uzis infinitivon en tiuj okazoj. Laŭ Vilmos Benczik (persona informo 2011-03-11) la rusa, kiu en tiu situacio preferas participon kvankam infinitivo estas gramatike ebla, influis lian elekton. Kaj kiel jam menciite la klasika greka uzas participojn (en akuzativo) en tiaj konstruoj.

La atestitaj formoj implicas ke oni ne povos konsideri kiel eraron en klasika esperanto la uzon de akuzativo en tiaj okazoj. Tamen tio eblas en vivanta lingvo, ĉar tie la normoj povas ŝanĝiĝi. La kondamno de Kaloscay kaj Waringhien ("severe evitinda") havas gravon, ĉar ĝi montras ke la lingvo liberiĝis de sia historia origino.

### 7.8. Ĉu volapuko influis la Lingvon internacian?

La lingvo Volapuko (*Volapük*), publikigita de Johann Martin Schleyer (1831–1912), unue en artikoloj en la revuo *Sionsharfe* en 1879 kaj libroforme en 1880, uzis prefiksojn por indiki tensojn, *timafoms* (Schleyer 1882:47–48, 112–115):[38]

> *ä-* por *Imperfekt, pätüp: älöfob* 'ich libte'[39] (mi amadis, mi estis amanta), *äbegob* 'ich bat' (mi preĝadis, mi estis preĝanta);[40]

---

[38] Tiuj prefiksoj estis sendube inspiritaj de la klasika greka; komparu la verbformojn en volapuko kun παιδεύω (*paideúō*) 'mi edukas' (prezenco), ἐπαίδευον (*epaídeuon*) 'mi edukis' (aoristo) kaj ἐπαίδευσα (*epaídeusa*) 'mi edukadis, mi estis edukanta' (imperfekto).

[39] Schleyer skribas *libte, gelibt, liben, Libe, libe, di, si* por la vortoj kiuj en la nuna germana estas skribataj *liebte, geliebt, lieben, Liebe, liebe, die, sie* (kun longa /iː/).

[40] Ĉar la imperfekto, kiu ekzistas en la germana, franca kaj sveda same kiel en la Lingvo universala, malaperis el la Lingvo internacia en 1887 antaŭ ties publikigo, oni devas uzi aliajn rimedojn por indiki ĝin. La malaperinta **skribes* estas nun ofte anstataŭigata per la simpla *skribis*, sed oni povas, por emfazi ke temas pri traduko de imperfekto en alia lingvo, skribi *skribadis* aŭ *estis skribanta*, kvankam ĝenerale tiaj formoj estas pezaj, pedantaj, kaj plej ofte ne estas necesaj por transdoni la sencon. En *La virineto de maro*, citita en sekcio 7.7 sur paĝo 105, ni trovas ekzemple *vidadis* kaj *ekvidadis*. Alia ekzemplo estas la uzo de *rigardadis* en la citaĵo el lia parolado dum la kongreso en Bulonjo ĉe maro, citita sur paĝo 122. En la lingvo kun imperfekto tiuj vortoj sendube respondus al **vides* aŭ **vidades*

*e-* por *Perfekt, petüp: elöfob* 'ich habe gelibt' (mi amis), *eblinób* 'ich habe gebracht' (mi kunportis);

*i-* por *Pluskuamperfekt, pitüp: ilöfob* 'ich hatte gelibt' (mi estis aminta), *ikanitófs* 'si (di Frauen) hatten Lider gesungen' (ili (la virinoj) estis kantintaj), *ikapälóms* 'si (di Männer) hatten verstanden' (ili (la viroj) estis komprenintaj);

*o-* por *einfaches Futur, potüp: olöfob* 'ich werde liben' (mi amos), *okódom*[41] 'er wird verursachen' (li kaŭzos), *okukóf* 'si wird kochen' (ŝi kuiros);

*u-* por *Futurum exaktum, putüp: ulöfob* 'ich werde gelibt haben' (mi estos aminta), *ukonletóms* 'si werden gesammelt haben' (ili estos kolektintaj), *ukömóns* 'Si werden gekommen sein' (ili estos alvenintaj).

En prezenco (*Präsens, patüp*) estis la malplena prefikso: *löf* 'Libe' (amo), *löfob* 'ich libe' (mi amas) (Schleyer 1882:42, 112). Tamen en prezenca pasivo (*Präsens Passiv, patüp sufafoma*) *a* aperas: *pamutón* 'man wird gezwungen' (oni estas devigita).

En franclingva lernolibro publigita kelkajn jarojn poste ni povas legi pri la tensoj de la verbo *penön* 'skribi' (formita el *pen* 'skribilo'): *penob* 'j'écris' (*présent*), *äpenob* 'j'écrivais' (*imparfait*), *epenob* 'j'ai écrit' (*passé indéfini*, sinonime *passé composé*), *ipenob* 'j'avais écrit' (*plus-que-parfait*), *openob* 'j'écrirai' (*futur présent*), *upenob* 'j'aurai écrit' (*futur passé*) (Kerckhoffs 1887:23). Li rimarkigas ke *le passé défini* (sinonime *passé simple* kaj iel analoga al aoristo en la klasika greka) estas donita per la sama formo kiel la imperfekto, do *äpenob* kaj por 'j'écrivais' kaj por 'j'écrivis'.

En svedlingva lernolibro ni povas tute simile legi: *penob* 'jag skrifver' (mi skribas), *äpenob* 'jag skref' (mi skribadis, mi estis skribanta), *epenob* 'jag har skrifvit' (mi skribis), *ipenob* 'jag hade skrifvit' (mi estis skribinta), *openob* 'jag skall skrifva' (mi skribos), *upenob* 'jag skall hafva skrivit' (mi estos skribinta) (Kerkhoffs 1887:16).

Do la malplena prefikso aŭ *a-* estis uzata por prezenco, *ä-* por imperfekto, *e-* por perfekto, *i-* por pluskvamperfekto, *o-* por futuro kaj *u-* por futuro ekzakta. Ni vidas ke la vokaloj *ä, e, i* estis uzataj por la pasinteco; *o, u* por la estonteco. Vokaloj estis ankaŭ uzataj por tempaj adverboj: *adelo* 'hodiaŭ', *ädelo* 'hieraŭ', *edelo* 'antaŭhieraŭ', *odelo* 'morgaŭ', *udelo* 'postmorgaŭ'; ĉi tie do aperas *a* por la nuntempo. Ĉiuj enhavas la vorton *del* 'tago' kaj la adverban finaĵon *-o*, respondan al la esperanta *-e*. (Kerckhoffs 1887:45, Kerkhoffs 1887:16.) Same pri la adverboj *avigo* 'ĉisemajne', *ävigo* 'pasintsemajne', *evigo* 'dum la semajno antaŭ la pasinta', *ovigo* 'venontsemajne', *uvigo* 'dum la semajno post la venonta' (Kerckhoffs 1887:45). Kiel ni vidis

respektive **rigardes* aŭ **rigardades*. Vidu ankaŭ piednoton 10 sur paĝo 89.

[41] Verŝajne preseraro por *okodóm*.

ĉi-supre, la samaj vokaloj estis uzataj por la tensonomoj mem: *patüp, pätüp, petüp, pitüp, potüp, putüp.*

Estas nature konjekti ke la uzo de tiuj vokaloj influis Zamenhof en lia elekto de la finaĵoj *-as, -is, -os* kaj *-es* por la imperfekto: vidu Trunte (1975), Gacond (1979) kaj Mattos (1998:212−213). Tamen Waringhien (1989:57−58) mencias plurajn aliajn eblojn.

Bernard Golden (1925−2008) skribis pri eblaj leksikaj influoj de volapuko al esperanto (1980, 1985a). Temas pri du aferoj: unue ke Zamenhof uzus volapukon kiel modelon en la elekto de kelkaj vortoj kaj morfemoj, ekzemple *al* (1985a, 1985d), *-il-* (1985a, 1985c; komparu tamen kun Murgin 1985), *-ul-* (1985b), *birdo* kaj *ĉevalo*; due ke la fakto ke li entute elektis multajn ĝermandevenajn vortojn estus por konkurenci kun volapuko pri la ĝermanparolantoj. La duan temon ni traktos en subsekcio 8.16.1.

Kiam Zamenhof konatiĝis kun volapuko? Li mem skribis en 1887:

> Kian mi antaŭ 5 jar,o,j aŭd,is pri la Volapük', mi ne for,ĵet,is mi,a,n labor,o,n, ĉar la konstru,o de Volapük' ŝajn,is al mi ne tut,e praktik,a; mi dir,is al mi ke lingv,o tut,a,mond,a dev,as est,i antaŭ ĉio kompren,ebl,a [. . . ] (Letero al Schleyer 1887-11-15/27, zamenhof 1985:7)

Do lia respondo implicas ke li aŭdis pri volapuko en 1882.

Kion diris Zamenhof mem pri la influo de volapuko?

> Kiu iom interniĝis en la lingvon Esperanton, tiu povis facile vidi, ke mia laboro ne estis elvokita de la "sukcesoj de Volapük", kiel diras kelkaj volapükistoj. Kiam mi antaŭ 13 jaroj[42] komencis mian laboron, tiam Volapük ankoraŭ ne estis en la mondo. (Artikolo en *La Esperantisto* 1889; Zamenhof 1983:263)

Kaj: "[. . . ] la lingvo Esperanto estis ellaborita tute sendepende de Volapük [. . . ]" (Artikolo en *La Esperantisto* 1890; Zamenhof 1983:269); plue "[. . . ] la lingvo Esperanto ne sole ne eltiris, sed ankaŭ ne povis eltiri ian utilon el la laboro de s-ro Schleyer [. . . ]" (Artikolo en *La Esperantisto* 1890; Zamenhof 1983:270).

Julius Riegel en Nurenbergo demandis lin en letero de 1907-02-23: "Ĉu vi konis la mondlingvon Volapük, kiam vi kreis vian lingvon, ĉu via lingvo bazas sur iu ajn pli frua sistemo, aŭ ĉu via kreitaĵo estas ĉiuparte originala?" Kaj Zamenhof respondis 1907-03-02:

> Kreante mian lingvon mi ne sciis pri Volapük, ĉar ĝi ankoraŭ ne ekzistis. Pri la diversaj projektoj mi eksciis nur tiam, kiam Esperanto estis jam tute preta. (Holzhaus 1975:140−141)

Ni ja scias ke Zamenhof skribis al Borovko en 1895 ke lia lingvo estis "plimalpli preta" en 1878, kaj evidente li opiniis en 1907 ke la lingvo estis "tute preta" en 1882. Sed se tiel, ni devas akcepti ke la verbaj finaĵoj estas malgrava

[42] Ni kalkulu: $1889 - 13 = 1876$, du jarojn antaŭ la festeno en 1878.

detalo ne menciinda en tiu ĉi kunteksto. Golden (1979:17) alvenis al simila konkludo.

## 8. La reformpropono de 1894

En la jaro 1894 Zamenhof publikigis en la revuo *La Esperantisto* proponon pri reformo de la lingvo. Li promesis voĉdonadon en kiu partoprenos la membroj de la Ligo Esperantista — post la fino de lia "analiza laboro" (zamenhof 1989:597). Ĉiu abonanto de *La Esperantisto* estis membro de la Ligo (zamenhof 1989:595). En 1894 la nombro de abonantoj estis 717, el kiuj 60 % estis ruslandanoj (Enciklopedio de Esperanto 1979:319).

Sed li avertis ke post decido pri reformo "ni kalkulos niajn fortojn, por konvinkiĝi, ĉu ni havas la eblon krei novan sisteman literaturon anstataŭ la forĵetota malnova; se montriĝos ke ni la sufiĉan forton ne havas, tiam ni atendos ankoraŭ kun la praktika enkonduko de la nova dialekto, ĝis la fortoj troviĝos" (zamenhof 1989:599). La analiza laboro do estis, laŭ la nuna lingvouzo, korpusa planado, dum la averto pri la "fortoj" indikas la neceson de statusa planado.

La proponitaj ŝanĝoj estis profundaj. La motivoj plej ofte temis pri forigo de laŭspertaj malfacilaĵoj. Mia fonto estas zamenhof (1989:595–663). Mi donu ekzemplojn.

### 8.1. Fonemoj

La kvin fonemoj respondaj al la literoj *ĉ, ĝ, ĥ, j, ĵ* malaperos. (La fonemo donita de la litero *ŝ* restas.) Krome Zamenhof metas demandosignon ĉe la fonemo /h/, kiu eventuale ankaŭ estos forigita. Sed pli malfrue li decidas restigi /h/ kaj — post diskuto en la revuo (zamenhof 1989:623–625) — ankaŭ /j/. La fonemo signita per *ŭ* ne malaperos, sed fariĝos maloftega.

Multaj vortoj kiuj enhavas la fonemon /z/ havos laŭ la reformpropono anstataŭe /s/: *ezoko, izoli, paradizo, ripozi* fariĝos *esoko, isola, paradiso, reposa*, kaj, plej rimarkinde, *sezono* fariĝos *sesono*, do homonimo de *sesono* egala al la frakcio unu dividite per ses, ĉar la sufikso -*on*- por frakcioj restos. Komparu kun la rakonto en sekcio 9.8!

La fonemoj respondaj al la literoj *c* kaj *ŝ* restos kaj estos donitaj respektive per la literoj *z* kaj *c*, kiuj do ricevas la prononcon [ts] respektive [ʃ]: *ŝambro, ŝampano, ŝapo, ŝapelo, ŝapitro, ŝe, ŝesi* fariĝos *cambro, campano, capo, capelo, capitro, ce, cesi* kun la prononco [ʃambro, ʃampano, ʃapo, ʃapelo, ʃapitro, ʃe, ʃesi].

La vortoj *cent, cigaro, okcidento, participo, sciuro*; *zebro, zingibro, zono* restos skribe sen ŝanĝo, sed ricevos novan prononcon: [ʃent, ʃigaro, okʃidento, partiʃipo, sʃiuro; tsebro, tsingibro, tsono].

### 8.2. La skribo

Kiel sekvo de la fonologiaj ŝanĝoj menciitaj en la antaŭa sekcio la kvin supersignitaj literoj *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŭ* estos forigitaj, same kiel la litero *j* (zamenhof 1989:601). La litero *ŝ* ankaŭ malaperos, sed ĝia fonemo restos kaj estos skribata *c*.

Krome Zamenhof metas demandosignon ĉe *h*, kiu eventuale ankaŭ estos forigita. Sed poste li restigas *j* (diskuto pri tiu litero aperis en la revuo; zamenhof 1989:623–625) same kiel *h*.

La vortoj *peco, provinco, scienco, spaco*, male, konservas sian prononcon sed estos skribataj *pezo, provinzo, szienzo, spazo*; *danci* fariĝas *danza*.

### 8.3. La artikolo

La artikolo *la* malaperos.

### 8.4. Akuzativo

La akuzativo ne plu estos markita: la finaĵo -*n* malaperos. "Por eviti malkompreniĝon kaj konfuzon inter la nominativo kaj akuzativo, ni povas konsili[43] (ne devigi) al la komencantoj, ke ili metu la nominativon ĉiam antaŭ la verbo kaj la akuzativon post la verbo, sed fari el tio ĉi ian regulon ni tute ne bezonas [...]" (zamenhof 1989:606).

La akuzativo de direkto estos esprimata per *versu*: "mi iras versu domo" (zamenhof 1989:608–609) — sed li devus skribi: *mu/mi iren versu mue/mie domo* 'mi iras hejmen'.

### 8.5. Pluralo

La multenombro estos esprimata per -*i*: *kano, kani* 'hundo, hundoj'; *navo, navi* 'ŝipo, ŝipoj'.

### 8.6. Adjektivoj kaj adverboj

La adjektivoj ne plu havos deklinacion, "ĉar ĝi estas superflua balasto, kaj sufiĉas, se la deklinacio ekzistas ĉe la substantivoj."

La adjektivoj finiĝos per -*e*, same kiel la adverboj. La du vortklasoj do ne plu estos distingitaj per malsamaj gramatikaj finaĵoj. Ĉar *patro bone kantas* povus signifi 'bona patro kantas' kaj 'patro kantas bone', tial estos

[43]En la libroj kiujn mi citas emfazitaj vortoj estas ĝenerale presitaj kun interspaco, "per maldensaj literoj" laŭ Waringhien en Zamenhof (1948a:XII): "k o n s i l i". Mi indikas emfazon per substreko — kaj do revenas al la origina skribmaniero de Zamenhof almenaŭ en la leteroj en Zamenhof (1948a, 1948b).

rekomendinde diri *bone patro kantas* 'bona patro kantas' respektive *patro kantas bone* 'patro kantas bone'.[44]

"*Adverboj* apartaj ĉesas ekzisti" — sed tio ja ne estas vero. En la frazo *patro kanten bone*, la vorto *bone* sendube estas adverbo. Temas pri tio ke adjektivoj kaj adverboj estos markitaj per la sama vortklasdistingilo, kiu cetere estas -*e*, la malnova indikilo por adverboj. Tiel malaperas ankaŭ la diferenco inter participoj kaj konverboj.

## 8.7. Personaj pronomoj

La personaj pronomoj estos laŭ unua propono *mu, nu* 'mi, ni'; *tu, vu* 'ci, vi'; *lu* 'li, ĝi'; *elu* 'ŝi'; *su* 'si' kaj *loru* 'ili'. Krome li proponas *homi, iu* kiel malfokusigan[45] pronomon anstataŭ *oni*, kaj ke *ĝi* malaperu. (zamenhof 1989:607–608.)

Sed poste li ŝanĝas la proponon: *mu* fariĝos *mi*, *nu* fariĝos *nos*, *vu* fariĝos *vos* kaj *loru* fariĝos *ilu*, kaj la pronomo *oni* revenas sub la formo *on* 'oni' (zamenhof 1989:637). Vidu tabelon 18 sur paĝo 142.

## 8.8. Verboj

Pri la verbaj finaĵoj Zamenhof proponas la sekvantajn ŝanĝojn: -*i* ↦ -*a* (-*i* nun estas bezonata por la substantivoj); -*u* ↦ -*an*; -*as* ↦ -*en*; -*is* ↦ -*in*; -*os* ↦ -*on*; -*us* ↦ -*un*. (La litero *n* ja ne plu estos bezonata por la akuzativo.) "Sendube kelkaj legantoj faros la rimarkon, ke « an, en, in, on, un » jam ĉiuj estas okupitaj por vortoj aŭ sufiksoj; tamen tio ĉi nenion malhelpas, ĉar la okupiteco estas nur teoria kaj inter gramatikaj finiĝoj kaj memstaraj vortoj aŭ sufiksoj neniam povas naskiĝi ia konfuzo."[46]

Sekve de tiuj ŝanĝoj la literoj *in* estos uzataj por la finiĝo -*in* ĉe verboj en tempo estinta; due por la sufikso -*in*- por la virina sekso; kaj trie por la prepozicio *in* 'en'.

## 8.9. Participoj kaj konverboj

La ses participoj kaŭzas problemojn: Zamenhof proponas restigi nur du: la aktivan -*ente* kaj la pasivan -*ate*. Por precizigi oni povos aldoni *pasate* kaj *future*. Tial kredeble la participoj estu komprenataj kiel prezencaj. Vidu tabelon 16 sur paĝo 140.

[44] Sed atentu ke la verbaj finaĵoj ŝanĝiĝos: estos *bone patro kanten* — estas iom strange ke li ilustras la uzon de la nova adjektivo *bone* uzante la malnovan verboformon *kantas* anstataŭ la nova *kanten*.

[45] Tiu termino estas traduko de la angla *defocusing*, enkondukita de Wallace Chafe (1992) kaj uzita i.a. en la priskribo de pronomaj prefiksoj en la lingvo Caddo.

[46] Ni notu ke li ĉi tie distingas inter vorto, sufikso kaj finiĝo, kaj ne nur parolas pri vortoj.

### 8.10. Kunmetitaj vortoj

“Vortojn kunmetitajn mi proponas fari el plenaj vortoj, por eviti malbonsonecon kaj ofte ankaŭ nekompreneblecon; ekzemple vaporoŝipo (ne vaporŝipo)” (zamenhof 1989:609).[47]

Kaj krome: “entute mi proponas uzi vortojn kunmetitajn kiel eble plimalofte, ĉar ili ne bone respondas al la romana karaktero de nia lingvo”. Ni ja scias ke en la ĝermanaj fontolingvoj de esperanto (ĉefe la germana kaj la jida) la kunmetado estas ofta fenomeno.

### 8.11. “Tabelo de pronomoj”

Per tiu rubriko Zamenhof celas la tabelvortojn, kiujn li volas detrui: “Por forigi tiun ĉi objekton de konstanta disputado, mi proponas detrui la reciprokan aranĝon de la tabelo kaj rigardi la membrojn de la tabelo, kiel simplajn vortojn sen reciproka interrilato” (zamenhof 1989:610). La tabelo, tute latindevena, aspektos kiel en tabelo 17, paĝo 141, la tria linio en ĉiu ĉelo.

Ĉi tie estas loko memorigi pri eldiro de Zamenhof dek tri jarojn pli poste: “Vi scias, ke en 1894 mi mem volis forĵeti ĉiujn arbitre elpensitajn vortojn, sed poste mi konvinkiĝis, ke tio ĉi estas tre granda eraro. Al la lingvistoj ĉiu arbitre elpensita vorto en la komenco estos neagrabla, sed por la estontaj uzantoj de la lingvo certa nombro da tiaj arbitraj vortoj estas absolute necesa” (letero al Javal 1907-07-11; Zamenhof 1948a:274).

### 8.12. Vortprovizo

Multaj ŝanĝoj prononcaj kaj skribaj estos kompreneble necesaj pro la ŝanĝoj en la fonologia kaj skriba sistemoj. Sed ne nur:

> Por ke la karaktero de la tuta lingvo estu pli unuforma kaj ne simila al ia neharmonia miksaĵo, mi proponus (dank’ al la romana karaktero de nia lingvo) evitadi vortojn germanajn aŭ slavajn kaj preni, kiom ĝi estos ebla, nur el lingvoj romanaj (latina [la plej bone], itala, hispana k.t.p.).

Ni povas noti ĝeneralan movon de ĝermandevenaj vortoj al latiniddevenaj, ĉefe latindevenaj. Por ilustri tion mi menciu la jenajn ekzemplojn.[48], [49] La jidajn vortojn mi enmetis laŭ persona informo de Tsvi Sadan (2010-07-04 kaj 2010-07-30) aŭ Vilborg (1989, 1991, 1993, 1995, 2001).

Same kiel menciite en sekcio 6.10, la jidaj vortoj plej ofte apogas la germanajn, krom en kelkaj okazoj kie la jida vorto havas hebrean, aramean aŭ slavan originon. Pro la simileco ĝenerale ne eblas diri ĉu la germana aŭ

[47] Sed estos *vaporonavo*!

[48] En la listo de Zamenhof aperas nur radikoj. Por faciligi la legadon mi aldonis la malnovajn vortklasindikilojn laŭ la Fundamento kaj la novajn laŭ la propono.

[49] Por la mallongigoj de la lingvonomoj, vidu piednoton 18 sur paĝo 94.

la jida modelo estis uzita por esperanto. En la okazoj kie la germana kaj la jida havas tute similajn vortojn (kiel por *brusto* kaj *ringo*), aŭ kie la germana pli similas al la esperanta vorto ol la jida (kiel por *fadeno*), mi metis, same kiel jam en tabelo 1, la germanan vorton antaŭ la jida. Sed en kelkaj okazoj la responda jida vorto estas pli simila al la esperanta ol la germana (kiel por *fajli, hejmo, hejti* kaj *ŝinko*); tiam mi metis la jidan vorton unue. Pri la laste menciita vorto ni notu ke la germana havas duan *n*: *Schinken*, dum la jida (*ŝinke*) kaj pola (*szynka*) ne. Vilborg (2001:72) konstatas ke en esperanto okazis "apokopo de senakcenta *-en* [. . . ] tie ĉi eventuale inspirita de" la pola. Ni povus aldoni: kaj la jida.[50]

*Tabelo 7.* De ĝermandevenaj al latindevenaj vortoj 1894

| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* | *Propono* | *Ebla fonto* (la) |
|---|---|---|---|
| amboso | de Amboss, (yi kovadle) | inkudo | incus, incudis |
| bero | de Beere, en berry, (yi jagde) | bak | bacca |
| brusto | de Brust, yi brust | pekto | pectus |
| fadeno | de Faden, yi fodem | filuo | filum |
| fajli | yi fajln, de feilen | lima | limare |
| faldi | de falten, pl fałdować, en fold, (yi knejĉn) | plika | plicare |
| felo | yi fel, de Fell, en fell | kuto | cutis |
| fingro | de Finger, yi finger, en finger | digito | dígitus |
| fiŝo | de Fisch, yi fiŝ, en fish | pisko | piscis |
| forgesi | de vergessen, yi fargesn, en forget | obliva | oblivisci |
| fremda | de fremd, yi fremd | aliene | alienus |
| frosto | de Frost, yi frost, en frost | gelo | gelu |
| ĝis | de bis, yi biz, fr jusqu'à | ad | ad |
| ĝusta | fr juste, en just | eksakte | exactus |
| haŭto | de Haut, yi hojt | kuto | cutis |
| hejmo | yi hejm, (de Heim) | sue domo | domus |
| helpi | en help, de helfen, yi helfn | juva | [ad]iuvare |
| hundo | de Hund, yi hunt, en hound | kano | canis |
| inko | en ink, (fr encre) | atramento | atramentum |
| jaro | de Jahr, yi jor, en year | anuo | annus |
| knabo | de Knabe, (yi jingl) | pubro | *puber* 'pubera' |
| lasta | en last | ultime | últimus |

[50]Mi montris ke en la okazoj de *hejti, hejmo* kaj *ŝajni, fajfi, fajli* plej verŝajne la jida estis la fontolingvo (1992, 2008: sekcio 9).

| | | | |
|---|---|---|---|
| ledo | de Leder, yi leder | korio | córium |
| lipo | de Lippe, yi lip, en lip | labio | lábium |
| mevo | yi meve, de Möwe | laro | larus |
| monato | de Monat, (yi ĥojdeŝ) | menso | mensis |
| najbaro | en neighbour, de Nachbar, (yi ŝoĥn) | viceno | vicinus |
| nesto | de Nest, yi nest, en nest | nido | nidus |
| nur | de nur, yi nor | solu | solum |
| rajto | en right | juso | ius |
| rimeno | de Riemen, yi rimen, ru ремень | koregio | corrígia |
| ringo | de Ring, yi ring, en ring | anelo | ánulus |
| somero | de Sommer, yi zumer, en summer | estato | aestas, it estate |
| ŝipo | en ship, de Schiff, yi ŝif | navo | navis |
| ŝlosi | de *schloss* 'ŝlosis', *Schloss* 'seruro', yi ŝlisn | klavda | claudere |
| ŝranko | de Schrank, yi ŝank | armario | armarium |
| ŝteli | de stehlen, (yi ganvenen) | fura | furari |
| ŝuldi | de schuldigen, *Schuld* 'ŝuldo', yi ŝuldik zajn | deba | débitum, it debito |
| ŝviti | de schwitzen, yi ŝvicn | sudora | sudare |
| tago | de Tag, yi tog | dio | dies |
| trinki | de trinken, yi trinken | biba | bíbere |
| vakso | de Wachs, yi vaks, en wax | cero | cera |
| varma | de warm, en warm, yi varem | kalore | *călor* 'varmo' |
| verki | de werken, yi *verk* 'verko' | kompona | compónere |
| vorto | de Wort, yi vort | vokablo | vocábulum |
| vundi | de verwunden, *Wunde* 'vundo', yi farvundn, *vund* 'vundo', en wound | vulna | vulnerare |

*Tabelo 8.* De ĝermandevenaj al francdevenaj vortoj 1894

| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* | *Propono* | *Ebla fonto* (fr) |
|---|---|---|---|
| bedaŭri | de bedauern, yi badojern | regreta | regretter |
| blovi | en blow, yi blozn | sofla | souffler |
| dika | de dick, yi dik, en thick | grose | gros |

| | | | |
|---|---|---|---|
| flugi | de *flug* 'flugis', *Flug* 'flugo', yi *geflojgn* 'fluginta' | vola | voler, it volare |
| hajlo | en hail | grelo | grêle |
| kuko | de Kuchen, yi kuĥn, en cookey (cookie) | gato | gâteau |
| lako | yi lak, ru лакъ, de Lack | verniso | vernis |
| lerni | de lernen, yi lernen | aprenda | apprendre |
| melki | de melken, yi melkn | trara | traire |
| presi | de Presse, en press, fr presse, pl prasa | imprima | imprimer |
| suno | en sun | solelo | soleil |
| ŝafo | de Schaf, yi ŝof | brebo | *brebis* 'ŝafino' |
| ŝajni | yi ŝajnen, (de scheinen) | sembla | sembler |
| ŝarko | en shark | rekino | requin |
| ŝelo | en shell, yi ŝol, *ŝejln* 'senŝeligi' | ekorco | écorce |
| ŝinko | yi ŝinke, pl szynka, de Schinken | jambono | jambon |
| ŝraŭbo | de Schraube, yi ŝrojf | viso | vis |
| ŝtalo | de Stahl, yi ŝtol | aciero | acier |
| ŝultro | de Schulter, (yi plejce, aksl) | epolo | épaule |
| ŝuo | de Schuh, en shoe, yi ŝoĥ | suliero | soulier |
| varbi | de *warb* 'varbis', yi verbirn | engaga | engager |
| velki | de welken, yi velkn | fletra | se flétrir |
| veŝto | de Weste, (yi beged) | gileto | gilet |
| vintro | de Winter, yi vinter | hivero | hiver |

Ne malmultaj francdevenaj vortoj estos anstataŭigitaj per latindevenaj — ĉar la latindevenaj estas ja la plej bonaj:

*Tabelo 9.* De francdevenaj al latindevenaj vortoj 1894

| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* (fr) | *Propono* | *Ebla fonto* (la) |
|---|---|---|---|
| abelo | abeille | apo | apis |
| akuŝi | accoucher | obstetra | *óbstĕtrīx* 'akuŝistino' |
| kaŝi | cacher | okulta | occultare |
| laca | las | fatigate | fatigatus |
| larmo | larme | lakrimo | lácrima |
| manĝi | manger | eda | édere |
| mem | même | ipsu | ipse, ipsa, ipsum |

| | | | |
|---|---|---|---|
| mondo | monde | mundo | mundus |
| ombro | ombre | umbro | umbra |
| ondo | onde | undo | unda |
| oro | or | auro | aurum |
| pentri | *peint* ‘pentrita’, *peintre* ‘pentristo’ | pinga | píngere |
| ruĝa | rouge | rubre | ruber |
| saĝa | sage | sapiente | sápiens, sápientis |
| terni | éternuer | sternuta | sternutare |
| vojo | voie | vio | via |

*Tabelo 10.* De ĝermandevenaj al italdevenaj vortoj 1894

| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* | *Propono* | *Ebla fonto* (it) |
|---|---|---|---|
| birdo | en bird | ukcelo | uccello |
| flugi | de *flug* ‘flugis’, *Flug* ‘flugo’, yi *geflojgn* ‘fluginta’ | vola | volare, fr voler |
| jes | en yes | si | si |
| hejti | yi hejcn, (de *heiz* ‘varmega’) | fuoka | *fuoco* ‘fajro, varmego’ |
| kripla | en crippled | stropiate | storpiato |
| lando | de Land, yi land, en land | paeso | paese |
| rajdi | en ride, (yi rajtn, de reiten) | surkavala | cavalcare |
| sendi | de senden, en send, (yi ŝikn) | invia | inviare |
| somero | de Sommer, yi zumer, en summer | estato | estate, la aestas |
| ŝtono | en stone, yi ŝtejn, de Stein | pietro | pietra |
| ŝtrumpo | de Strumpf, yi ŝtrimp | kalzo | calza |
| ŝuldi | de schuldigen, *Schuld* ‘ŝuldo’, yi ŝuldik zajn | deba | debito, la débitum |

| *Tabelo 11.* De francdevenaj al italdevenaj vortoj 1894 | | | |
|---|---|---|---|
| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* (fr) | *Propono* | *Ebla fonto* (it) |
| aĉeti | acheter | kompra | comprare |
| buŝo | bouche | boko | bocca |
| ĉemizo | chemise | kamiso | camicia |
| ĉevalo | cheval | kavalo | cavallo |

| *Tabelo 12.* De slavdevenaj kaj jiddevenaj al latiniddevenaj vortoj 1894 | | | |
|---|---|---|---|
| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* | *Propono* | *Ebla fonto* |
| ĉu | pl czy, yi tsi | num | la num |
| gladi | ru гладить | repasa | fr repasser |
| klopodi | ru хлопотать, pl kłopotać się | hava peno | fr *peine* 'peno, klopodo' |
| kolbaso | ru колбаса, pl kiełbasa, (de Wurst, yi vurŝt) | salsico | it salsiccio |
| krom | ru кромѣ | hors | fr hors |
| kruta | ru крутой | ripide | it rípido |
| luti | pl lutować | salda | it saldare |
| pilko | yi pilke, pl piłka | balo | fr balle, de Ball, en ball |
| nepre | ru непремѣнно | absolute, nealie | la absolutus |
| vosto | ru хвостъ | kodo | it coda |

Li anstataŭigis kelkajn latindevenajn vortojn per italdevenaj aŭ francdevenaj; tio estas iom surpriza, ĉar li skribis ke plej bone estas preni latindevenajn vortojn:

| *Tabelo 13.* De latindevenaj al latiniddevenaj vortoj 1894 | | | |
|---|---|---|---|
| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* (la) | *Propono* | *Ebla fonto* |
| ardeo | ardĕa | herono | fr héron |
| aŭdi | audire | entenda | fr entendre |
| prujno | pruina | brino | it brina |

| *Tabelo 14.* De grekdevenaj al latiniddevenaj vortoj 1894 | | | |
|---|---|---|---|
| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* (grc) | *Propono* | *Ebla fonto* |
| kaj | *καί* | e | it e |
| pri | *περί* | de | fr de |

Ni notu ankoraŭ kelkajn ŝanĝojn: *tuj*, pri kiu Vilborg (2001:103) skribas: "Necerta etimologio. Multaj proponoj estis prezentitaj", estos anstaŭigita per *statim*, de la stătim. La vorto *vetero* estos anstaŭigita per *tiempo*, kie oni komparu la malnovan vorton kun de *Wetter*, yi *veter*, kaj la proponon kun es *tiempo*, fr *temps*, it *tempo*. La vorto *tempo* restas senŝanĝa. Krome *kurba* ↦ *kurve* (spite al la poloj). Specialaj estas *baki* ↦ *informa*, *knedi* ↦ *inpasta*, *pekli* ↦ *insala*, kiu ŝajnas esti priskriboj de la procedo.

Resume, tre forta tendenco al latinidigo de la vortprovizo. La titolo de mia artikolo "Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado?" (1992) fariĝos "Por kvo nu fuoken nue/nose domo sed semblen fifa de limado?" — la vorto *sed* restas.

Kiuj ĝermandevenaj vortoj restos? Mi trovis kelkajn:

| *Tabelo 15.* Kelkaj restantaj ĝermandevenaj vortoj 1894 | | |
|---|---|---|
| *Malnova vorto* | *Ebla fonto* | *Propono* |
| bedo | en bed, de Beet, yi bet | bedo |
| blinda | de blind, yi blind, en blind | blinde |
| flegi | yi flegn, de pflegen | flega |
| hoko | yi hok, en hook | hoko |
| kerno | de Kern, yi kern, en kernel | kerno |

Mi ĉi tie enmetis nur vortojn kun nekontestebla ĝermana origino. Aliaj vortoj kiuj restas en la reformo estas *felto* 'felto' (en *felt*, de *Filz*, yi *filc*), *halta* 'halti' (de *halten*, yi *haltn*, en *halt*), *krampo* 'krampo' (de *Krampe*, yi *kramp*, en *cramp*), *stango* 'stango' (de *Stange*, yi *ŝtang*). Iliaj originoj estas precipe ĝermanaj, sed ili havas apogon en aliaj lingvoj: fr *feutre*, fr *halte*, fr *crampon*, it *stanga*. Pro tio ne eblas enmeti ilin en la grupon de nure ĝermandevenaj vortoj.

Stranga estas *raŭpo* ↦ *bruko*: laŭ Vilborg (1995:105) *bruk-* estus preseraro por *eruk-*, latine *eruca*.

Pro la ŝanĝoj *ajn* ↦ *kunku*, *fajfi* ↦ *fifa*, *fajli* ↦ *lima* (la *limare*), *ŝajni* ↦ *sembla* (fr *sembler*), *salajro* ↦ *salario*, *semajno* ↦ *setimano* kaj *najbaro* ↦ *viceno* (la *vicinus*) kune kun *-aj* ↦ *-e* por la adjektivoj en pluralo foriros

preskaŭ ĉiuj vortoj kun *aj*. (Escepto estas *balai* ↦ *balaja*.) Same multaj vortoj finiĝantaj per *aŭ* malaperos: vidu tabelon 19 sur paĝo 142. Alia ekzemplo estas ke *taŭgi* fariĝos *esta bone*.

Speciala okazo estas tiu de *ŝargi, ŝarĝi* ↦ *carga*, kiu do kunfandas du verbojn kun malsamaj signifoj, kaj la prepozicio *de*, kiu ricevas pli vastan signifon: *de, pri* ↦ *de* (kaj *Dio* ↦ *Deo*).

Rimarkinda estas la propono ke oni anstataŭigu la sufikson *-uj-* per *-i-*. Supozeble tio signifas ke oni havos *pomio, cigario* [ʃigario] kaj *Turkio* por la ĝistiamaj *pomujo, cigarujo* kaj *Turkujo* — tamen mankas detala informo pri tio, kaj mankas ekzemploj.

Kaj fine: la saluta demando *Kiel vi fartas?* fariĝos *Kvale esten vue stato?* 'Kia estas via stato?' ... certe por komplezi al angloparolantoj.

## 8.13. Aliaj proponoj

Zamenhof ricevis multajn proponojn de la membroj de la Ligo, kaj kelkajn li aprobas sed tamen ne povas akcepti. Ni lernas ke estas granda diferenco inter aprobo kaj akcepto. Mi menciu du ekzemplojn.

### 8.13.1. Vira sufikso

Kelkaj proponis, inter ili s-ro Lojko, kiu vizitis lin en Grodno, ke oni enkonduku viran sufikson, simetrian al la virina *-ino*, ekzemple *fratiro* por vira *frato*; la lasta vorto do havos la pli vastan signifon de 'frato aŭ fratino'. "Kelkajn tagojn post la forveturo de s-ro Lojko mi jam decidis akcepti la viran sufikson en mian projekton." Sed poste li konkludis ke "la neoportuna teoria logiko devas cedi al la pli oportuna praktika kutimo de la popoloj — kaj la vira sufikso ne devas ekzisti." (zamenhof 1989:618–619.)

Iu sekse neŭtrala (ne-utra) persona pronomo ne estas menciita.

### 8.13.2. Akcentitaj finvokaloj

La dua ekzemplo estis la propono meti akcenton sur la vokaloj en la verbaj finaĵoj: anstataŭ *fáras, fáris, fáros, fárus* (kun neakcentita kaj do laŭ iuj malfacile kaptebla fina silabo) oni diru *fará, farí, faró, farú*. Li listigas ne malpli ol kvar oportunaĵojn de tiu propono:

1) la formoj de la verbo estus tre klare diferencigeblaj eĉ por orelo tute ne alkutimiĝinta;
2) la formoj de la verbo, renkontataj en la parolado sur ĉiu paŝo, perdus la finiĝon konsonantan kaj tiel preskaŭ ĉiuj vortoj en nia lingvo havus finiĝon per vokalo, kio altigus la bonsonecon de la lingvo;

3) ricevinte certan nombron da vortoj kun akcento en la fino, la lingvo, sen malfaciliĝo de la lernado, ricevus kelkan diversecon en la akcentado, kiu levus ankoraŭ ĝian bonsonecon;
4) por versofarantoj la granda nombro da vortoj kun akcentita finiĝo estus tre agrabla gajno. (zamenhof 1989:619−620; Zamenhof 1906:17)

Li skribas: “la akcentitaj formoj havis por mi jam de longa tempo grandan allogon kaj mi decidis akcepti ilin en la projekton”, sed tamen li finfine konkludas: “post multaj provoj kaj reprovoj mi fine devis forĵeti la akcentitajn formojn, kvankam mi persone forte ilin aprobas.” (zamenhof 1989:620).

Tiuj oportunaĵoj ja ekzistis en liaj lingvoj de 1878 kaj 1881: la lasta havis tri tiajn akcentitajn finvokalojn atestitajn — sed li aludas tion nur per la vortoj “jam de longa tempo”. Ni tamen notu ke la Lingvo universala de 1881 havis pli da vario, ĉar nur tri el la ses verboformoj havis akcenton je la fino.

Ni notu ke nenio estis dirita pri la volitivo. Se *farus* fariĝos *farú*, kion pri *faru*?

Lige al tiu propono ni povas fari tipografian observon: Zamenhof rimarkigas ke “akcentitaj vokaloj ekzistas en ĉiuj presejoj de la mondo (tiom pli ke estus ja tute egale, ĉu la presejo uzus _́ aŭ _̀ aŭ _̂ k.t.p.) [. . . ]” Tio ĵetas iom da lumo sur la problemon pri akuta aŭ malakuta supersigno en la lingvoj de 1878 kaj 1881.

## 8.14. Aliaj provoj

Waringhien (1989:49−54) mencias aliajn tekstojn, kiujn li ricevis en 1933 de Leono Zamenhof (1875−1934), kaj kiuj laŭ tiu ĉi originis el la jaro 1881. Sed laŭ la analizo de Waringhien ili devenas el la jaroj 1893−1894, kiam Zamenhof eksperimentis pri la reformpropono.

## 8.15. Kaj la rezulto?

Post tiom da laboro, kiu estis la rezulto de la voĉdonado? Post komplika proceduro ĝi estis:

> La plimulto da esperantistoj decidis, ke **la lingvo Esperanto devas tute sen ia ŝanĝo resti en sia ĝisnuna formo.** (zamenhof 1989:663)

## 8.16. Komentoj

### 8.16.1. La ĝermandevena komponanto de la vortprovizo

La reformpropono de 1894 estis profunda: forigo de kvin fonemoj, forigo de la artikolo, ŝanĝo de ĉiuj verbaj finaĵoj, forigo de la distingaj vortklasindikiloj por la vortklasoj de adjektivoj kaj adverboj. Krome ni vidis masivan movon

en la vortprovizo al pli da latindevenaj kaj latiniddevenaj vortoj, ĝis preskaŭ ĉioma elimino de ĉiuj ĝermandevenaj, slavdevenaj kaj grekdevenaj vortoj.

Bernard Golden (1985a) opiniis ke plej verŝajne la ekzisto de ĝermandevenaj vortoj en la lingvo de 1887 dependas de volo flanke de Zamenhof altiri parolantojn de ĝermanaj lingvoj. Kaj tie volapuko, kies vortprovizo ja estas grandparte ĝermandevena, laŭ li ludis rolon, ĉar, kiam Zamenhof laboris pri tiu fazo de sia lingvo de 1887, volapuko, kiun li estis studinta, rapide kreskis kaj disvastiĝis: li volis simple konkurenci kun volapuko. En 1894 tio ne plu necesus pro la tiama malfortiĝo de volapuko, kaj Zamenhof laŭ li revenis al la modelo de 1881, kiu laŭ lia eldiro estus pli latiniddevena.

Sed mia studo en sekcio 6.10 montras ke jam en la Lingvo universala 1881 grava malplimulto de la vortoj estis ĝermandevenaj, same kiel en la Lingvo internacia de 1887. Do laŭ mia opinio ne ekzistas iu bazo por aserti ke Zamenhof enmetis ĝermandevenajn vortojn en sian publikigitan verkon de 1887 pro la kaŭzo proponita de Golden (1985a). Ekzistis multaj ĝermandevenaj vortoj jam en Lingvo universala de 1881, kvankam, kiel ni povis vidi en la tabeloj en sekcio 6.10, ili ne estis la samaj kiel en 1887. Maksimume oni povas diri ke se Zamenhof sentis emon en 1887 latinidigi sian vortprovizon kiel li poste proponis en 1894, tiam la ekzisto de la ĝermandevenaj vortoj en volapuko bremsis tiun emon.

Ni devas ankaŭ kompari la opinion de Golden kun la eldiro de Zamenhof mem jam citita en sekcio 7.8.

### 8.16.2. Propono kontraŭvola

Estas klare ke Zamenhof faris tiun proponon ne pro iu propra deziro reformi la lingvon. Li skribis en *La Esperantisto* en 1893: "Sed la agitado por reformoj en la lastaj jaroj tiel fortiĝis, ke ni ne povas jam resti silentaj rigardantoj de ĝi kaj ni devas reguligi ĝin." Li provis reguligi la aferon, komparante ĝin al rivero: "[. . . ] ni ne devas pli peni digi la riveron, sed ni devas reguligi ĝian fluon, por ke ĝi alportu utilon anstataŭ malutilo." (Zamenhof 1989:586.) Sed: "Mi konfesas denove, ke, se la afero dependus nur de mi, mi retenus ankoraŭ ĉiujn parolojn pri reformoj, [. . . ]" (zamenhof 1989:587.)

Alia atesto pri lia sinteno estas esprimita en letero al Guminskij:

> Dank' al la parolado pri reformoj la nuna jaro estas efektive tute perdita por nia afero; tamen ni ne devas tion ĉi bedaŭri, ĉar la *fina rezultato* estos *tre bona*. La minaca fulmotondro de la reformoj purigis unu fojon por ĉiam la atmosferon plenigitan de nuboj, kaj nun ni havos jam dank' al Dio longan trankvilecon kaj povos energie labori. En la lastaj kelkaj jaroj multaj amikoj komencis postuladi reformojn; mi petegadis ilin konstante kaj senĉese, ke ili lasu tiun ĉi demandon, kiu alportos nenian utilon kaj nur tute ruinigos nian aferon; sed neniu volis min aŭdi. (Letero 1894-08-29 al [J.] Guminskij; zamenhof 1989:657)

Al la dirita aldoniĝas noto de Johannes Dietterle (1866–1942). Kiam li eldonis la verkojn de Zamenhof en 1929, la demando pri lingva reformo estis ankoraŭ tabua. Li raportis pri la rezultoj de voĉdonado okazinta en 1894 (Zamenhof 1983:197), sed ne menciis la reformproponon pri kiu temis la voĉdonado. Li skribas en piednoto: "Skribante ilin, en sia koro li certe esperis, ke oni ne akceptos ilin." Kaj iom poste:

> Li nepre ne deziris, ke oni represu ilin kaj esprimis sian deziron tre energie tiel, ke ĝi fariĝis ordono. Mi sentas tion mia devo, nepre respekti kaj obei ĝin kaj ne preni ilin en mian kolekton. Cetere ili prezentos intereson nur por filologoj. (Dietterle en Zamenhof 1983:190)

Nu, ni estu filologoj. Feliĉe ni povas konatiĝi kun la reformo kaj gramatike kaj leksike en zamenhof (1989) el kiu mi prenis la informon ĉi-supre menciitan kaj listigitan en tabelo 19 sur paĝo 142.

Restas la demando ĉu Zamenhof faris sian proponon tiel drasta ke li povis esti preskaŭ certa ke plimulto rifuzos ĝin.

#### 8.16.3. Akcentitaj finvokaloj

Pri la propono enkonduki akcentitajn finvokalojn en la verba konjugacio oni sentas sopiron al Lingwe uniwersala kaj Lingvo universala, kiuj havis ĝuste tiajn akcentitajn verbajn finaĵojn — kaj kiuj tiel bele taŭgis por poezio.

## 9. La Fundamento de Esperanto de 1905

### 9.1. Severe netuŝebla dokumento

La *Fundamento de Esperanto* estis publikigita printempe de 1905 kaj prezentita dum la unua kongreso de esperanto en Bulonjo ĉe maro 1905-08-05–13. Dum la kongreso ĝi estis oficialigita kiel la "sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto" laŭ la kvara artikolo en la *Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo*, nomata la *Deklaracio de Bulonjo* (Courtinat 1964:135, Enciklopedio de Esperanto 1979, Künzli 2008).

La *Fundamento de Esperanto* konsistas el kvar partoj, nome el la Antaŭparolo kaj la tri ĉefaj partoj "1.) La 16-regula *gramatiko* ; 2) la « *Universala Vortaro* » ; 3) la « *Ekzercaro* ». Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li [. . . ]" (Zamenhof 1905:VI, 1991c:44).

La gramatiko devenis de la Unua libro de 1887, la Universala Vortaro estis de 1893, kaj la Ekzercaro de 1894 (Waringhien 1989:85–86, Künzli 2008). Kaj la aŭtoro

> esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto. (Zamenhof 1905:VI, 1991c:44)

La iniciatoro de la lingvo daŭrigas: "Havante la karakteron de *fundamento*, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti *netuŝeblaj*" kaj sekvas la ofte citita frazo: "*La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj*" (Zamenhof 1905:VII, 1991c:45).

Pri la ideo krei netuŝeblan fundamenton ni povas legi ĉe Waringhien (1989:85) kaj en la artikolo de Tsvi Sadan (2010:16), publikigita en la libreto kun la prelegoj en Bjalistoko.

Sed tiu netuŝebleco ne malhelpos la lingvon evolui:

> Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi.* (Zamenhof 1905:IX, 1991c:47)

## 9.2. Fonemoj

La fonemoj en la Fundamento estas la samaj kiel en la Unua libro 1887; vidu sekcion 7.2.

## 9.3. Skribo

La skribo estas la sama kiel en la Unua libro 1887, kun la aldono ke presejoj kiuj ne havas la supersignitajn literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ* rajtas anstataŭigi ilin per *ch, gh, hh, jh, sh, u.*

## 9.4. Morfemoj kaj konstruelementoj

Ĉar ni bezonas paroli pri morfemoj kaj aliaj vortelementoj, mi enmetas kelkajn necesajn difinojn en tiun ĉi sekcion. Pri mia terminelekto vidu sekcion 7.4.

La terminon *morfemo*, same kiel ekzemple la terminojn *fonemo, grafemo* kaj *sintagmo*, enkondukis Jan Niecisław Baudouin de Courtenay (1845–1929) (Stankiewicz 1976:9). La termino *morfemo* aperis la unuan fojon en 1880 en lia *Подробная программа лекций … в 1877-1878 учебном году* 'Detala programo por la lekcioj … en la studjaro 1877-1878', paĝo 437, publikigita en 1880 (Mugdan 1984:86). Tamen la nocion li menciis jam iom pli frue en la sama verko:

> *Radikoj* en la plej vasta senco de la vorto kiel *morfologiaj* atomoj, unuoj. (Ĉi tie tradukita el la angla de Baudouin de Courtenay 1972:114)

Poste li difinis la terminon jene (*Versuch einer Theorie phonetischer Alternationen. Ein Capitel aus der Psychophonetik*, 1895):

> La *morfemo* = tiu parto de vorto kiu estas dotita de psikologia aŭtonomio kaj estas pro la sama kaŭzo ne plie dividebla. (Ĉi tie tradukita el la angla de Baudouin de Courtenay 1972:153)

Verŝajne tiu ĉi — nun tre grava — nocio ne tuj fariĝis vaste konata. Baudouin estis naskita en Radzymin proksime al Varsovio, kaj li laboris dum tiuj jaroj en Kazano. Kvankam Kazano kaj Varsovio ambaŭ estis en la rusa regno, ne estas klare kiom liaj verkoj estis konataj en Varsovio. Ryszard Rokicki (1987:91) skribas: "en la tempo de Zamenhof, la nocio 'morfemo' ne estis konata". Tamen ni konstatu ke Zamenhof havis ege bonan intuician komprenon pri la nocioj de morfemo kaj fonemo.

Laŭ la difino de Leonard Bloomfield (1926:155) morfemo estas minimuma formo, kun la klarigo: morfemo estas aperanta (sencohava) formo kiu ne estas analizebla en pli malgrandajn (sencohavajn) formojn. Antaŭ tio li difinis formon: *formo* estas la voĉaj trajtoj komunaj al samaj aŭ parte samaj parolagoj. Li traktis la nocion ankaŭ en sia libro *Language*, unue publikigita en 1933 (1962:161–169). Tie li esprimas la minimumecon iom alie: li diras ke *morfemo* (nomita ankaŭ *simpla formo*) estas lingva formo kiu ne havas partan fonetikan-semantikan similecon al iu alia formo (1962:161).

Gravas ĉi tie la postulo pri sencohavo: ĝi ne estas facile difinebla, sed klaras ke ĝi dependas de la konoj kiujn iu havas. Krome oni notu ke morfemo ne estas nur formo, sed kombinaĵo de formo kaj senco — tion ilustras ekzemplo el la angla, *writer* 'verkisto' kaj *brighter* 'pli hela', analizeblaj kiel *writ-er* kaj *bright-er*, kun du malsamaj morfemoj *er* kaj *er*: la unua estas *er* 'isto', la dua *er* 'pli'. Tiajn duoblaĵojn Zamenhof klopodis eviti. Ni menciu la vorton *teujo* 'tearbusto; tepoto' kun du morfemoj *uj* — almenaŭ estas plej facile kompreni la vorton tiel.

Poste la morfologio estis evoluigita en la 1940-aj jaroj.

Ni iom rigardu la registritajn terminojn en esperanto.

NPIV havas la vorton *morfemo* kun difino taŭga laŭ la ĝenerala lingvoscienco. Oni rajtas do diri ke NPIV akceptis la vorton laŭ la 15-a regulo. Sed NPIV metas kiel sinonimojn la du vortojn *monemo* kaj *vortelemento*. Ĉe la kapvorto *monemo* oni donas kiel difinon nur *morfemo*; same ĉe la kunmetita vorto *vortelemento*, kiu aperas sub la kapvorto *elemento*.

Pri *monemo* (france *monème*) mi pensas ke ĝi estas uzata nur de franclingvanoj (Henri Frei, André Martinet, Pierre Janton). Janton (1977:58) uzas en sia analizo de esperanto vorton *monème* por la nocio kiun oni ĝenerale nomas *morfemo*; li uzas la terminon *morphème* en pli malvasta senco, nome 'neleksika morfemo'. André Martinet preferis la terminon *monème* en sia konata verko (1960).

Sinonimeco inter *vortelemento* kaj *morfemo* malfaciligas priskribon de la vortfarada sistemo de la Fundamento. Vidu la analizon de la vorto *kunpreni* kontraste al *kompreni* en sekcio 9.5. Ambaŭ havas tri morfemojn, sed kiam temas pri la konstruelementoj en la senco de la Fundamento, la unua havas tri elementojn, la dua nur du. Se *vortelemento* estas sinimo de *morfemo* estas peze esprimi tion.

Szerdahely en sia artikolo (1976:7), same kiel Malovec (2000:26), diras ke *vortelemento* kaj *morfemo* estas samsignifaj, sed ke ili havas la sencon de "konstruelemento, konsistiga elemento de la vorto" laŭ la Fundamento (Szerdahelyi 1976:7). La difino estas bona, sed ili do faras la malon kompare al NPIV. La gramatiko de Wennergren (2010:13–17) ne listigas la vortojn *morfemo* aŭ *vortelemento* inter la gramatikaj terminoj.

Kiel jam konstatite en sekcio 7.4: en PAG (1985:§ 276) la aŭtoroj uzas la terminojn *vortelementoj, lingvoelementoj* kaj *neŝanĝeblaj lingvoelementoj* por tiuj konstruelementoj de la Fundamento. Same en PMEG de Wennergren la sekcio 37.1 havas la rubrikon "Vortelementoj kaj signofoj".

En PAG mi ne trovis la vorton *morfemo*; en PMEG ĝi laŭ ties serĉilo ne aperas. Do neniu kontraŭdiro tie.

Cetere ni notu kion PAG (§ 23, paĝo 53) diras pri la vorto *vorto*:

1. "*domo, aĵo, kuras* estas vortoj";
2. "oni povas eĉ diri, ke ankaŭ *o, as* ktp. estas vortoj";
3. "sed *-j* aŭ *-n* aŭ *es* (en *kies*) ne estas vortoj."

Sekve Kaloscay kaj Waringhien ne akceptas la Zamenhofan uzon de la vorto *vorto*, ĉar laŭ tiu ĉi la finaĵoj *j* kaj *n* (sen ligostreko) ja estas vortoj, kvankam ili ne aperas en nature parolata frazo. Limigon de kombineblo montras tre klare la ekzemplo de la kvar konstruelementoj *dom, j, n, o*. Ekzistas 4! = 24 permutaĵoj de ili (*domjno, domjon, domnjo, . . . , domojn, . . . , ondomj, onjdom*), sed nur unu estas vorto.

En artikolo pri la lingvosciencaj terminoj en PIV kaj PAG Michel Duc Goninaz skribis: "Bedaŭrinde, nek PIV, nek PAG, nek ambaŭ kune liveras plene kontentigan terminologion sur la terenoj de lingvoscienco kaj gramatiko." (Duc Goninaz 1984:75.) La situacio en NPIV estas iom pli bona, sed, kiel mi montris, ĝi tamen ne estas bona. Tio pensigas pri la eldiroj 1954-12-04 de Andreas Blinkenberg (1893–1982) ĉe la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo (Lapenna k.a. 1974:769–770).

## 9.5. Analizo laŭ morfemoj kaj laŭ konstruelementoj

Oni analizas lingvon (per kiu termino mi kiel kutime celas la parolan lingvon) en vortojn. Pro la ekzisto en esperanto de la vortklasindikiloj *-o* por substantivoj, *-a* por adjektivoj, *-i, -as, -is, -os, -us, -u* por verboj kaj *-e* por adverboj tiu analizo estas plej ofte ege simpla, eĉ banala kompare kun ekzemple la angla.[51]

[51] En la angla oni distingu inter *summer time* kun la adjektivo *summer* kaj *summertime* kun la substantivo *summer*. Ili estas analizeblaj kiel 'somera tempo' kaj 'somerotempo' respektive; la unua estas sinonimo de *daylight saving time* 'lumoŝpara tempo', la dua signifas 'somer(ec)a periodo'.

Tamen, eĉ en esperanto la analizo en vortojn ne ĉiam estas facila: komparu la du malsimilsignifajn frazojn *Mi ne povas pluiri* kaj *Mi ne povas plu iri.* Ĉu vi aŭdis diferencon? En mia pronoco estas ioma paŭzo post *plu* en la dua frazo. La unua enhavas la derivitan verbon *pluiri*, la dua la primitivan verbon *iri*, kiun modifas la adverbo *plu.*

Kaj plue oni analizas, en kiu ajn lingvo, la vortojn en morfemojn, la plej malgrandajn signifohavajn elementojn de lingvo. Mi eble substreku ke temas pri analizo de la ekzistanta parola lingvo sendepende de iu ajn skribaĵo, plej notinde sendepende de la Fundamento.

En esperanto unua analizo estas donita en la Fundamento. Ni ĉiuj konas tion: la vorto *esperanto* enhavas la tri konstruelementojn *esper*, *ant* kaj *o.*

Sed ofte oni povas iri plu. Ekzemple, la verbo *enkonduki* havas tri konstruelementojn: *en*, *konduk* kaj *i.* Sed el lingvistika vidpunkto estas klare ke oni povas iri plu: *kon* 'kun' kaj *duk* 'gvid', do *en-kon-duk-i* kun kvar morfemoj. Tio signifas ke *konduk* ne estas morfemo, ĉar ĝi ne estas minimuma. Analoge, la substantivo *konsonanto* havas nur du konstruelementojn, *konsonant* kaj *o*, sed lingvistike oni povas ĝin dividi en la kvar morfemojn *kon, son, ant, o*, kaj kompari ĝin kun vorto *kunsonanto*, io kio sonas nur kune kun vokalo. Kaj la verbon *konsisti*, kiu je la Fundamenta nivelo havas du elementojn, *konsist* kaj *i*, oni povas je la etimologia nivelo plu analizi: *kon* de la latina *com* 'kun' kaj *sist*, de la latina *sístere* 'starigi', kaŭzativo de *stare* 'stari'. Same *kompren* estas neanalizebla laŭ la Fundamento, sed etimologie ja konsistas el du morfemoj, *kom* kaj *pren.* Male, *kunpreni* laŭ la Fundamento estas analizebla kiel *kun-pren-i.*

Simile estas pri multaj sciencaj vortoj, ekzemple *zo-ologi-o*, *harmoni-o* (NPIV) laŭ la oficiala nivelo, kaj *zo-o-log-i-o*, *harmon-i-o* laŭ la lingvistika kaj etimologia, kie oni rekonas morfemon *i.* La multaj vortparoj kiel *astronomo, astronomio*; *diplomato, diplomatio*; *homologa, homologio*; *Tunizo, Tunizio* klare montras ke ekzistas morfemo *i*, kiun cetere NPIV akceptas.[52]

Ekzistas multaj ekzemploj de la uzo de la morfemo(j) *i*:

- landnomo formita el la nomo de la ĉefurbo, el nomo de rivero, montaro aŭ el alia nomo: *Alĝerio, Kebekio, Meksikio, Senegalio, Balkanio, Baltio, Kaŭkazio, Nordio, Vaŝingtonio*;
- landnomo formita el la nomo de loĝanto: *Baŝkirio, Ĉuvaŝio, Japanio, Koreio, Rusio, Vjetnamio*;
- nomo de scienco aŭ agado formita el la nomo de sciencisto aŭ aganto: *astronomio, biologio, ĥirurgio* (*kirurgio*), *ortopedio, strategio, topologio*;
- nomo de agado formita el la nomo de karakteriza aganto: *aristokratio, aŭtonomio, burokratio, demokratio, diplomatio, direktorio, ekonomio*;

[52] Pri la etimologio de la sufiksoj *-i-* kaj *-uj-* vidu Vilborg (2001:174, 163–164).

- nomoj de tekniko el la nomo de karakteriza instrumento aŭ uzata agado: *stetoskopio, mikroskopio, spektroskopio, sugestio*;
- nomo de matematika aŭ logika strukturo el la nomo de karakteriza eco aŭ procezo: *analogio, difeomorfio, fototropio, harmonio, holomorfio, homeomorfio, homologio, homomorfio, homotetio, homotopio, izometrio, izomorfio, meromorfio, progresio, toponimio.*

Oni devas do distingi almenaŭ tri specojn de analizo en vortelementojn:

- la Fundamentan en konstruelementojn (*en-konduk-i, konsonant-o, kompren-i, kun-pren-i* kaj *konsist-i*);
- la sinkronan lingvistikan en morfemojn (*en-kon-duk-i, kon-son-ant-o, kom-pren-i, kun-pren-i* kaj *konsist-i*);
- la (laŭdifine diakronan) etimologian en morfemojn (*en-kon-duk-i, kon-son-ant-o, kom-pren-i, kun-pren-i* kaj *kon-sist-i*).

La unua ne ĉiam donas morfemojn, la du sekvantaj jes, sed depende de la konoj — memoru la postulon de Bloomfield pri sencohavo: la senco de vortelemento dependas de ies konoj.

### 9.6. Konstruelementoj en la Fundamento

En la *Universala Vortaro* de la Fundamento aperas ĝenerale ne la vortoj sed vortelementoj kun signo ′ kiel marko por la nekompleteco de la elemento.[53] Ili estas sekvataj de tradukoj en la francan, anglan, germanan, rusan kaj polan, ekzemple

**flor′** fleurir | flourish | blühen | цвѣсти | kwitnąć,
**kankr′** écrevisse | crab[54] | Krebs | ракъ | rak,
**kaŝtan′** châtaigne | chestnut | Kastanie | каштанъ | kasztan,
**serĉ′** chercher | search | suchen | искать | szukać,

kie la tradukoj indikas ke temas pri substantiva signifo de la radikoj *kankr′* kaj *kaŝtan′*, kaj verbaj signifoj de la radikoj *flor′* kaj *serĉ′*, alivorte ke la primitivaj vortoj estas *kankro, kaŝtano, flori* kaj *serĉi.*

Mi emfazu ke la *Ekzercaro* estas unu el la samrangaj partoj de la Fundamento. En ĝi aperas post la modelaj frazoj vortlistoj kun la kompleta vorto, ekzemple en § 18

**serĉi** chercher | search | suchen | искать | szukać,

[53] Kiel mi notis en sekcio 7.4, tiaj markoj malestas en la vortaroj de la kvar unue publikigitaj versioj de la Unua libro.

[54] Devus esti *crayfish*, ne *crab.* Tiu erara traduko en la anglan kurioze ne estas menciita en la prianglaj notoj al la Fundamento (Zamenhof 1991c:250−263), kvankam tre multaj komentoj pri anglaj vortoj aperas tie.

kie nun la kompleta verbo *serĉi* estas la kapvorto, kaj la tradukoj ne estas bezonataj por indiki la vortklason. Simile ni havas en § 5

**floro** fleur | flower | Blume | цвѣтъ, цвѣтокъ | kwiat,

kio indikas ke la primitiva vorto estas la substantivo *floro*, do kontraŭdire al la *Universala Vortaro*.

Mi imagas ke se oni estus atentinta la prezenton de la vortoj en la *Ekzercaro* oni ne tiel multe estus okupinta sin per la teorio de la gramatika karaktero de la radikoj, sed estus traktinta esperanton kiel normalan lingvon, uzante la nociojn de vorto kaj morfemo. Ĉe la primitivaj vortoj la radiko havas substantivan karakteron se kaj nur se la vorto mem estas substantiva. Do la du manieroj esprimi la aferon estas ekvivalentaj.

Vorton kiu estas ĉe la komenco de la vortfarado mi nomas *primitiva*.[55] La termino signifas ke la vorto ne devenas de iu alia ene de la funkcianta esperanta vortfara sistemo (etimologie povas ja esti tute alie, sed ni nun rezonas nur ene de la aktiva lingvouzo). Ĉiu alia vorto originas ĉe iu primitiva vorto. Ekzemple *grando* kaj *landa* devenas de la primitivaj vortoj *granda* kaj *lando*.

La teorio pri la gramatika karaktero de la radikoj estis kreita de René de Saussure (1910, 1982). Ĝi estas priskribita ankaŭ en PAG (§§ 276–284) kaj en la Aktoj de la Akademio 1963–1967 (2007:47–59). Ĝi apartenas al la endogena esperantologio en la senco de Tonkin (2001).

Ekzistas multaj science altkvalitaj priskriboj de aglutinaj lingvoj, ekzemple el la tjurkaj kaj dravidaj lingvofamilioj, kaj estus facile almenaŭ parte uzi tiujn priskribojn ankaŭ por esperanto aglutina. Tio ja ne signifas sklave sekvi iun modelon, ĉar, kiel diras Rokicki (1987:103) "La lingvo esperanto tre similas al etnaj lingvoj laŭ siaj komunikaj valoroj; tio tamen ne nepre devas signifi, ke ĝia strukturo same similas la strukturon de etnaj lingvoj." Spite al tio, atento al pli novaj sciencaj priskriboj estas dezirinda.

Kiel priskriboj de lingvaj procezoj la du manieroj prezenti la vortfaradon, t.e. per primitivaj vortoj respektive per gramatika karaktero de la radikoj, estas kompreneble malsamaj, sed pri la unuopaj radikoj ili enhavas strikte identan informon: se radiko $X$ havas substantivan karakteron, tiam la vorto $Xo$ estas primitiva, kaj inverse se substantivo $Yo$ estas primitiva, tiam ĝia radiko $Y$ havas substantivan karakteron. Oni povas priskribi la perfinaĵan derivon de vortoj same fidele per ambaŭ metodoj. (Kiselman 1991:107.)

La vorto *korekta* havas laŭ NPIV du sencojn, el kiuj unu estas evitinda kaj ne aprobita de la Akademio de Esperanto (Aktoj de la Akademio II, 1968–1974:46), kvankam laŭ NPIV uzita de Zamenhof. Male, la Akademio deklaras ke *fals′* estas dukategoria (Aktoj de la Akademio II, 1968–1974:37);

[55] Tiu estas la termino de Kalocsay & Waringhien (1985: §88) kaj Waringhien (1989:61), dum Szerdahelyi (1976:4, 9) preferis la vorton *primara*. Oni povas diri ankaŭ *dekomenca*, *origina* aŭ *baza*.

alivorte ke la verbo *falsi* kaj la adjektivo *falsa* ambaŭ estas primitivaj. Sed laŭ la Fundamento kaj laŭ NPIV *falsi* estas klare la sola primitiva vorto el la du.

Sed tiaj esceptoj ne estas unikaj por esperanto. En la malnovtamula ekzistas du klare kaj formale distingitaj vortklasoj: la substantivoj kaj la verboj. Plej multaj trunkoj apartenas al unu kaj nur unu de tiuj du klasoj; tamen ekzistas esceptoj, kiel *col*, kiu povas esti verba trunko al la verbo 'paroli', sed ankaŭ substantiva trunko al la substantivo 'vorto'. (Steever 2008:54.) Aliaj esceptoj estas *uyar* 'alto; esti alta' kaj *cuṭar* 'brilo; brili' (Lehmann 1994:23).

## 9.7. Slava influo

Duc Goninaz (1985) faris studon pri la influo de la slavaj lingvoj al esperanto el leksikologia vidpunkto. Pro tio ke la "gepatra lingvo" de Zamenhof estis la rusa (letero 1901-03-08 al Th. Thorsteinsson; Zamenhof 1983:523), kaj ke tiu lingvo estis la administra lingvo de la cara imperio, estas eble surprize ke la frakcio de rusdevenaj vortoj en esperanto estas tre malalta. Duc Goninaz kalkulas ke nur 1 % de la morfemoj en la *Universala vortaro* estas el la slavaj lingvoj (en la okazo la rusa kaj la pola; Duc Goninaz 1985:77). Sed rimarkinde estas ke kelkaj el tiuj vortoj havas grandan ofton kaj "fariĝis ŝlosilvortoj en la ĉiutaga Esperanto. Tiaj estas la vortoj *ĉu, nepre, prava, klopodi, barakti, deĵori.*" (Duc Goninaz 1985:79).

Pli subtila fenomeno estas ke la semantika enhavo de kelkaj leksemoj kies origino ne estas slava koincidas kun tiuj de rusaj aŭ polaj vortoj (Duc Goninaz 1985:79–81).

Alia fenomeno de slava origino estas la uzo de *-ad-* por esprimi la aspekton imperfektivon. Duc Goninaz (1985:82) citas la zamenhofan frazon *Kiam mi venis al li, li finadis sian laboron*, kiu ankaŭ troveblas en NPIV, kaj kiu nuntempe estas esprimita per [. . . ], *li estis finanta sian laboron*, kaj kiu kompreneble enhavus la imperfekton **fines* en la tempo kiam la lingvo ankoraŭ havis la tenson imperfekton. Pri tiu uzo de *-ad-* vidu piednoton 10 sur paĝo 89.

## 9.8. Deino kreis kvar sesonojn

En la Fundamento aperas la vorto *Deino*, pli precize *De-í-no* (Zamenhof 1905, 1991c:§ 2), evidente kun la signifo 'Diino'. Ĝi kredeble estas restaĵo el 1881, kiam la Lingvo universala havis la vorton *Deo* 'Dio' (Waringhien 1989:37).

Ĉar tiu vorto estas Fundamenta, ĝin rajtis uzi Geraldo Mattos (2002) en pentateŭkeca rakonto pri Deino kiu volis krei ses sesonojn, $6 \times \frac{1}{6} = \frac{6}{6}$, de la jaro por ke ni havu tutan unuonon, $\frac{6}{6} = \frac{1}{1} = 1$, sed post la kreo de la kvara

rezignis — tial ni havas nur kvar sesonojn, $4 \times \frac{1}{6} = \frac{4}{6} < 1$, kiujn ŝi, por kaŝi la hontindan fakton, renomis *sezonoj*.

Neniu povos kritiki Geraldon pro la uzo de la vorto *Deino*; kp. Kiselman (2002). Cetere, en la reformpropono de 1894 Zamenhof revenis al *Deo*, kvankam li konservis la prepozicion *de* (zamenhof 1989:633) — sed tie li skribis *sesono* kaj por la jarparto *sezono* kaj por la frakcio *sesono*.

## 10. La propono pri neologismoj en esperanto de 1906

La propono de 1906 montras kaj similaĵojn kaj malsimilaĵojn kompare al tiu de 1894.

La Fundamento ja ekzistis en 1906, kio signifis ke ne povas okazi veraj ŝanĝoj en la lingvo, nur aldonoj de novaj formoj aŭ vortoj, kiuj eventuale post iom da tempo estos pli uzataj ol la malnovaj — tiuj ĉi tamen neniam perdos sian valoron. La Fundamento do forte limigis la eblajn novajn gramatikajn formojn. Zamenhof uzis ne la terminon *reformo*, sed *neologismo* en siaj leteroj. Temas do pri aldonoj al la vortprovizo kaj alternativaj gramatikaj formoj. La malnovaj vortoj kaj la malnovaj gramatikaĵoj restu.

Simileco estis ke Zamenhof en 1906 same kiel en 1894 tute ne deziris proponi ŝanĝojn. Ke li tamen prezentis novajn gramatikaĵojn kaj novajn vortojn klariĝas nur per tio ke li estis premata fari tion, ĉifoje precipe fare de Émile Javal (1839–1907). Tiu ĉi plej argumentis por elimino de la supersignoj kaj de la artefaritaj vortoj. Zamenhof nomis lin "La ĉefa postulanto de plibonigoj, la multemerita D-ro Javal" (letero al Émile Boirac (1851–1917) 1907-01-02; zamenhof 1980:10).

En 1906 aperis broŝuro (Zamenhof 1906) kiu enhavis artikolojn de Zamenhof el la gazeto *Esperantisto* de 1894, kiam li priparolis reformojn (vidu ĉapitron 8). La teksto ne estas kompostita sed kaligrafie manskribita. Kaj je la fino aperas ses citaĵoj en kiuj Zamenhof esprimas heziton aŭ indikas malfacilaĵojn. Temas unue pri la supersignoj. Due venas postulo de facileco: "nia lingvo devas [. . . ] enhavi en si nenion, kiu estus kontraŭ la kutimo de la nacioj kaj prezentus por ili malfacilaĵon aŭ fremdaĵon". Simile estas citita la cedo de "la neoportuna teoria logiko" al "la pli oportuna praktika kutimo de la popoloj", jam menciita en la kunteksto de la propono pri vira sufikso en subsekcio 8.13.1, paĝo 119. La citaĵoj konsistigas tre unuflankan, tendencan eltiraĵon el longaj rezonadoj.

La broŝuro estas anonime eldonita. Tamen laŭ la artikolo *Reformprojekto de Zamenhof* en Vikipedio eldonis ĝin Javal. Post la morto de Javal komence de 1907 Louis Couturat (1868–1914), por apogi sian laboron por novaj reformoj, grandkvante represigis la broŝuron, cetere sen permeso de la aŭtoro kaj kontraŭ ties volo. Evidentas ke la "kutimoj de la nacioj" kaj la

"praktika kutimo de la popoloj" por Javal kaj Couturat temis pri la popoloj franclingvaj.

Dum la tuta jaro 1906 okazis intensa korespondado inter Zamenhof kaj Javal, pri lingvaj plibonigoj same kiel pri homaranismo[56] — same antaŭ la dua kongreso en Ĝenevo 1906-08-28–09-01 kiel post ĝi. Fine de la jaro Javal estis tre malsana, kaj li mortis 1907-01-20.

## 11. La projekto pri neologismoj de 1906-01-18

Zamenhof laboris en du ŝtupoj: unue li sendis 1906-01-18 projekton pri neologismoj al Javal por ties privata konsidero; dek monatojn poste, 1906-11-22, li sendis al Javal leteron kiun tiu ĉi formale plusendu al la prezidanto de la Lingva Komitato, Émile Boirac. Ĉar la du leteroj ne tute samas en siaj proponoj, ni distingu ilin.

La sekvanta listigo pri la januara propono laŭas tiun en Zamenhof (1948a: 248−253), kie la redaktinto Waringhien ĉefe mencias tiujn erojn kiuj malsamas disde la novembra propono.

### 11.1. Alternativa pluralo

"Paralele kun la multenombro per la litero « j », oni povas ankaŭ uzi multenombron per akcento sur vokalo; ekzemple, paralele kun « bonaj patroj », « bonajn patrojn », oni povas ankaŭ uzi « bonâ patrô », « bonân patrôn »."

### 11.2. La "interrilata pronom-adverba tabelo" kaj la "pronomoj posedaj"

Paralele kun *kiu, tiu, kiam, ĉio, mia* k.t.p. oni povas uzi la formojn *ku, tu, kam, ĉo, ma* k.t.p., do sen *i*. Nur la sep vortoj *kie, kiun, ĉie, ĉiu, ial, iel* kaj *lia* ne povas esti uzataj en la nova formo — pro la evidenta kolizio kun la jam ekzistantaj vortoj *ke, kun,*[57] *ĉe, ĉu, al, el, la.* Sekve la tabelo kun 45 formoj aperos kun 39 novaj, paralelaj formoj kaj 6 malnovaj.

Sed mi dubas ke li vere volis proponi ke la tabelvortoj *iu, ia, io, ies, ie, iam, ial, iel, iom* havos la novan formon *u, a, o, es, e, am, ial, iel, om.* (La vorto *u* estas la nova formo por *estu*; vidu sekcion 11.4.) Klarigon oni povas trovi en pli frua diskuto pri simila reformo, nome en la revuo *La Esperantisto*, verŝajne el la jaro 1891. Tie li proponis ke la *i* estos anstataŭigita per apostrofo krom kiam ĝi estas en la komenco; do la vortoj estu

[56] Pri la korespondado rilata al religiaj demandoj vidu ekzemple mian artikolon (2010: ĉapitroj 5 kaj 6).

[57] Do *kiu* povas esti skribata *ku* dum *kiun* ne povas esti skribata *kun.*

*ia, ial, iam, ie, iel, io, ies, iom, iu*;
*k'a, k'al, k'am, k'e, k'el, k'es, k'o, k'om,* k.t.p.

"Kvankam la vortoj k'e, ĉ'e, ĉ'u, fariĝas tial similaj al la vortoj ke, ĉe, ĉu, kiuj havas jam aliajn signifojn, Z. konsideris ke tio ne malhelpas: en la skribado oni facile diferencigos per apostrofoj, en la elparolo per pli forta akcento." En la julia numero 1891 oni trovas la rezultojn de tiu ĉi enketo; pli ol duono da voĉoj estis kontraŭ ŝanĝo. (Courtinat 1964:46.)

Mi divenas ke Zamenhof pensis pri tiu ĉi propono el 1891 kiam li skribis en 1894, kaj simple forgesis mencii la vortojn *iu, ia, io* k.t.p.

### 11.3. La vortoj kiuj finiĝas per -*aŭ*

Paralele kun la vortoj *almenaŭ, adiaŭa* oni povas diri *almen'e, adi'a* k.t.p. Sed *aŭ* kaj *laŭ* devas ĉiam resti nur en sia malnova formo.

### 11.4. La verbo *esti*

Paralele kun la formoj de la vorto *esti* oni povas uzi nur la finaĵon: do oni povas diri nur *i, as, is* por *esti, estas, estis* k.t.p.

### 11.5. La vortprovizo

Zamenhof listigas sesdek vortojn por kiuj oni povas uzadi ankaŭ aliajn formojn. Tute ne temas (malkiel en 1894) pri forigo de ĝermandevenaj vortoj ĉi-foje. La ĉefa zorgo ŝajnas esti mallongeco kaj evito de falsaj analizoj, ekzemple *alumeto* ↦ *alumo, amuzi* ↦ *amusi, kolego* ↦ *kamarado, litero* ↦ *letro*: li volas evidente eviti ke povus temi pri ia *alum-eto*, pri *am-uzi*, *kol-ego* de ĝirafo aŭ *lit-ero.*

Aperas novaj prepozicioj *ab* por *de* speciale por la pasivo, kaj "《pre》 kaj 《hint》 por signifi prepozicion de loko (dum 《antaŭ》 kaj 《post》 signifos nur tempon)".

## 12. Korespondado kun Émile Javal dum 1906

Kiel dirite Zamenhof multe korespondis kun Javal dum la jaro 1906. Ŝajne tiu ĉi skribas ĉiam france — en Zamenhof (1948a) aperas pluraj leteroj de li tradukitaj en esperanton de Waringhien.

Javal povus eventuale iel oficialigi esperanton en Francio, kaj Zamenhof ŝajnas kredi je tiu eblo — almenaŭ li ne tuj neglektas ĝin. Li skribas:

> se Vi havas plenan certecon, ke tuj post la reformado la franca registaro enkondukos la lingvon oficiale en la lernejojn, tiam mi estas preta fari ĉiujn reformojn, kiujn Vi deziros; sed se Vi tiun ĉi certecon ne havas, tiam laŭ mia profunda konvinko ĉiuj paroloj pri reformoj estus nun tre danĝeraj. Ne sole pri reformoj,

> sed eĉ pri neologismoj nun estas ankoraŭ tro frue paroli. (Letero al Javal 1906-06-08, Zamenhof 1948a:269, zamenhof 1990:1759)

Simile li skribas unu monaton poste:

> [. . . ] se mi scios, ke la registaro en principo jam decidis akcepti la lingvon kaj oni atendas nur miajn plibonigojn, tiam mi por 8−10 monatoj forĵetos tute mian medicinan praktikon kaj mi dediĉos mian tutan tempon al la ellaborado kaj elprovado de la neologismoj. (Letero 1906-07-11 al Javal, Zamenhof 1948a:274, zamenhof 1990:1765)

Kaj Javal promesis eĉ donaci monon al Zamenhof se li konsentus fari "modifojn, kiujn li opinios necesaj"; temas ĉefe pri malaperigo de artefaritaj vortoj "kies eksceso pereigis Volapükon" (kaj certe pri la supersignoj). La citaĵo estas el traduko fare de Waringhien de franclingva letero 1906-09-07 de Javal (Zamenhof 1948a:290−291). La sumo ne estas menciita en tiu ĉi franclingva letero, sed "aliaj dokumentoj parolas pri sumo de 250 mil frankoj" (Waringhien en Zamenhof 1948a:291). La sumo de 250 mil frankoj estus sufiĉa por vivteni la familion de Zamenhof dum pluraj jaroj: li skribas ke ĝi "donos al mi la eblon forĵeti mian medicinan profesion, vivi tute senzorge en ia trankvila kaj sendanĝera urbo, fordoni min tute kaj ekluzive al Esperanto kaj fari por la lingvo ĉion, kion mi trovas necesa. La propono estis por mi eksterordinare alloga [. . . ]" (Nefermita letero 1908-04-15 al Komandanto Lemaire; Zamenhof 1948b;186).

En la libro de Courtinat oni povas legi: "Post la Ĝeneva kongreso por konfirmi sian promeson pri monhelpo Javal en la okazo se li baldaŭ mortus pere de Majoro Lemaire sendis al Zamenhof 250.000 orajn frankoj [tiel] por ke li faru la necesajn reformojn en la lingvo" (Courtinat 1964:185). Do laŭ Courtinat la transpago fakte okazis. Sed laŭ la nefermita letero jam menciita Zamenhof "absolute kaj senkondiĉe rifuzas" la proponon (Zamenhof 1948b:187).

Zamenhof revenis al Varsovio de Ĝenevo 1906-09-13 kaj tie atendis lin pli ol 500 leteroj (letero al Javal 1906-09-15, Zamenhof 1948a:291, zamenhof 1990:1798). Li planas veturi al Bruselo por renkontiĝo kun Javal unu monaton poste, 1906-10-15. Li jam en tiu ĉi letero hezitas akcepti la proponon de Javal, preferante vivi je sia kuracista praktiko, kaj rimarkigas ke la kredito estas ne por li sed por Lemaire kaj tial ne donas iun garantion al li. Kaj, kiel ni jam vidis, Zamenhof rifuzis la donacon.

Javal ne povis veni al Bruselo pro malsano, kaj Zamenhof tial veturis de Bruselo al Parizo, kien li alvenis la 17-an de oktobro 1906 kaj restis ĝis la 23-a (Waringhien en Zamenhof 1948a:293). Li foriris el Bruselo la 23-an kaj alvenis al Varsovio la 25-an (Zamenhof 1948a:294).

## 13. La propono pri neologismoj de 1906-11-22

Mi sekvas ĉi tie Zamenhof (1948a:314–318) kaj zamenhof (1990:1821–1825).

Zamenhof sendas al Javal leteron kun la dato de 1906-11-22 adresitan al Émile Boirac (1851–1917), prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato. Tiu letero enhavas lian definitivan proponon pri neologismoj. Mi menciu kelkajn.

### 13.1. Fonologio

La fonemo /ĥ/ malaperas (en nomoj kiuj ne apartenas al la lingvo ĝi estos skribata *kh*). En plej multaj vortoj ĝi estas anstataŭigita per /k/: *arĥitekturisto* fariĝos *arkitekto*. Specialaj okazoj estas *ĥolero* ↦ *holero* kaj *ĥoro* ↦ *koruso* (pro la jamaj *kolero, horo, koro*). Ĉiuj aliaj fonemoj restas.

### 13.2. Skribo

La literoj *ĉ, ĝ, ĵ, ŝ* estas anstataŭigitaj per digramoj *ch, gh, jh, sh.* Se *h* sekvas post *c, g, j, s* en la antaŭa skribo, oni disigu la du literojn per apostrofo: *ĉashundo* ↦ *chas'hundo*, *kvarchorloĝo* ↦ *kvarc'horlogho.*

La litero *ŭ* estos skribata *u*, sed oni klarigu ke la prononco de tiu ĉi post vokalo restas la sama kiel antaŭe.

La fonemo /j/ povas esti skribata per *y* (krom kredeble en nomoj).

### 13.3. Deklinacio

La adjektivoj ricevas la pluralan kaj akuzativan finaĵojn nur se ili staras sen substantivo: *ĉiujn miajn bonajn amatajn infanojn* ↦ *ĉiu mia bona amata infanoyn.*

### 13.4. La verbo *esti*

La verbo *esti* estos mallongigita: *esti, estas, estis, estos, estu, estanta* ↦ *i, as, is, os, u, anta.*[58]

### 13.5. La tabelvortoj

Zamenhof listigas ok ŝanĝojn: *kiel* ↦ *kom*; *tiel* ↦ *sik*; *kie* ↦ *ki*; *tie* ↦ *ti*; *kiu, kiun, kiuj, kiujn* ↦ *ku*; *kio, kion* ↦ *ko*; *tiu, tiun, tiuj, tiujn* ↦ *tu*; *tio, tion* ↦ *to.* Kredeble la ceteraj $45 - 8 = 37$ restos senŝanĝaj.

[58]Ni komparu tion kun lia respondo al Pierre Corret publikigita en *Lingvo Internacia* 1907: "Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo se 'as', 'is' k.t.p. signifus 'estas', 'estis'; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo 'esti', tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon ne havas" (Zamenhof 1983:445).

Krome: la vorteto *ĉi* por montri al io proksima eniras kombinaĵon: *tie ĉi* ↦ *sti*; *tio ĉi* ↦ *sto*; *tiu ĉi* ↦ *stu*: *Miaj bonaj amikoj estos tie ĉi morgaŭ* ↦ *Mia bona amikoy os sti morge.*

### 13.6. La sufikso *-ujo*

"Sufikso de landoj estas «i» anstataŭ «uj»": *Anglujo* ↦ *Anglio.*

Krome "la nomoj de kreskaĵoj estas farataj per la vortoj «arbo» aŭ «planto»": *pomujo* ↦ *pomarbo*; *rozujo* ↦ *rozoplanto.*

La tria uzo de la sufikso, tiu de *cigarujo*, ne estas menciita kaj kredeble restus.

### 13.7. Prepozicioj

La prepozicioj *antaŭ* kaj *post* estos duobligitaj: *vor* kaj *post* pri tempo kaj *davan* kaj *hint* pri loko.

La prepozicio *de* en pasivo estos anstataŭigita per *ab*: *li estas amata ab mi.*

### 13.8. La vortprovizo

Zamenhof listigas tridek kvin novajn vortojn en sia propono de novembro 1906. Estas mallonga listo kompare kun la januara provizora listo, kaj ege mallonga kompare kun tiu de 1894.

El tiuj tridek kvin novaj vortoj kvin estas enkondukitaj por eviti la prefikson *mal-*: por *mallonga, malpli, malbona, malsupren, maldiligenta* oni povos diri *breva, men, mava, sob, pigra.*

### 13.9. La sorto de la *-aŭ*-vortoj

"Tiaj objektoj, kiel ekz-e [...] la neŭtrala, sed difinita finiĝo «aŭ» [...] kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie" (la letero al Borovko 1895; Zamenhof 1948a:348). Ni vidis ke *-aŭ* estis ingenra finaĵo en 1881, sed en 1887 ĝi estis anstataŭigita per *-ino.* Kompense, en 1887, multaj vortoj (ĉefe adverboj kaj prepozicioj) finiĝis per *-aŭ.* Estas klare ke Zamenhof ŝatis la diftongon, kiu ja estas ofta en la germana.[59] Sed en la proponoj de 1894 kaj 1906 ĝi tute malaperis. Kial? En la letero al Boirac aperas ia klarigo: "ĉar ofte, akceptante post si vokalon, ĝi fariĝas malagrabla" (letero 1906-11-22 al Boirac, Zamenhof 1948a:313). Do *la morgaŭa tago* sonas malagrable, ĉu?

---

[59]En sanskrito *-au* estas finaĵo de dualo: *devaḥ, devau, devāḥ* 'dio, du dioj, pluraj dioj'. La formo *devau* aperas en duala nominativo, akuzativo kaj vokativo. Tio estas nur flanka informo.

En la propono de 1894 li ŝanĝis ekzemple *adiaŭ, ambaŭ, morgaŭ* al *adiu, ambi, dimanu.* En la novembra propono de 1906 li preferis alian, pli unuforman solvon, kaj li skribis: "La sono «aŭ» en la fino de vortoj estas forĵetata kaj anstataŭigata per la finiĝo de adverbo (aŭ de alia parto de parolo)": *adiaŭ* $\mapsto$ *adie, adiaŭa* $\mapsto$ *adia, morgaŭ* $\mapsto$ *morge, morgaŭa* $\mapsto$ *morga.*

## 13.10. Kaj la rezulto

Boirac respondas 1906-12-09. Li ne volas trakti la proponon: "[...] estus tre eble tre danĝera paŝo por nia afero, se ĝi estus oficiale komunikita en sia nuna formo, mi ne diras al la publiko, sed eĉ al la Lingva Komitato" (letero 1906-12-09 de Boirac, Zamenhof 1948a:323). Kaj li ne iras en la kaptilon de la ebla oficialigo kondiĉita per plibonigoj: "ĉu ne estus pli prudenta [tiel] atendi, ĝis oni petos de ni reformojn kaj oni montros al ni kiomajn kaj kielajn oni petas, anstataŭ iri renkonten [tiel] al postuloj, kiujn ni ne ankoraŭ konas kaj neniu povas antaŭkoni?" (letero 1906-12-09 de Boirac, Zamenhof 1948a:325). Kaj li kritikas la komplikaĵojn de du paralelaj lingvoj.

Jam la postan tagon Javal skribas al Zamenhof: "Mi estus kontenta, ĉe la elmetitaj kontraŭdiroj, se vi reprenus vian memuaron..." (letero 1906-12-10 de Javal, Zamenhof 1948a:329). Kaj Zamenhof kun granda plezuro faras tion: "Peza ŝtono defalis de mia brusto [...]" (letero al Javal 1906-12-14, Zamenhof 1948a:329, zamenhof 1990:1831). Fino de tiu ĉi propono pri neologismoj.

En gazetartikolo en *La Revuo* 1906/1907 Zamenhof parolas pri neologismoj kaj mencias sian vojaĝon al Bruselo kaj Parizo sed tute ne mencias la nomon de Javal, nek ke li fakte sendis la proponon al la Lingva Komitato pere de Javal:

> Tial post tre longa korespondado kaj priparolado (por kiu mi eĉ speciale veturis Parizon kaj Bruselon) mi fine decidis forĵeti mian projekton. Sekve mia projekto de neologismoj, pri kiuj multaj esperantistoj aŭdis sub la tute malĝusta nomo de 'reformoj', nun ne estos prezentita al la Lingva Komitato. (Zamenhof 1983:249)

Tamen la lukto por forigo de la supersignoj estis nur la komenco. Poste sekvis la Ido-konflikto. Sed Ido jam ne plu estas iu varianto de esperanto iniciatita de Zamenhof. Tamen ni iom pritraktu la reagon de Zamenhof dum la jaro 1907.

Dek tagojn antaŭ la morto de Javal Zamenhof skribis al li leteron kun la literumado *rebonigho, ghis, shian, ...*, tamen kun supersigno en *bedaŭrinde.* La letero estis nur privata komplezo al baldaŭa mortonto. Sed Javal ne estis kontenta: li skribigis per sia filo franclingvan noton ke la letero konservis *gh* kaj ne enkondukis *y* (por *j*). (Letero 1907-01-10 al Javal; zamenhof 1980:15.)

## 14. Cirkuleraj leteroj en 1907

En la jaro 1907 Zamenhof skribis cele al "la Grupoj Esperantistaj", precipe al la Lingva Komitato, tri cirkulerojn. Ĉiuj portas la daton 1907-12-20.

I. Unua Cirkulera Letero al la Grupoj Esperantistaj pri la Delegacio por elekto de internacia helpa lingvo (Zamenhof 1948b:105−106, zamenhof 1980:161−162, 1991b:2012−2013);
II. Dua Cirkulera Letero al la Grupoj Esperantistaj pri la Bulonja Deklaracio kaj pri la Lingva Komitato (Zamenhof 1948b:107−109, zamenhof 1980:163−165, 1991b:2014−2016); kaj
III. Tria Cirkulera Letero al la Grupoj Esperantistaj pri ŝanĝoj en Esperanto (Zamenhof 1948b:109−124, zamenhof 1980:165−181, 1991b:2016−2032).

La lasta enhavas kelkajn proponojn pri ŝanĝoj. Ni menciu kelkajn.

1. Li proponas ke la Lingva Komitato "ĝis la plena fortiĝo de Esperanto" rekomendu ke ĉiuj verkoj kaj gazetoj estu presataj per la litero *h*, do *ch* por *ĉ*, *gh* por *ĝ* k.t.p.; do ne nur en la presejoj kiuj ne havas la supersignitajn literojn.
3. Anstataŭ *hodiaŭ, hodiaŭa* oni povas uzi *hodie, hodia.*
5. Oni povas ellasi la pluralan finaĵon kaj la akuzativon finaĵon en adjektivoj kaj "adjektivaj pronomoj" senpere sekvataj de substantivoj: « via bona infanoj amas sia gepatrojn ».
6. "Por nomoj de landoj oni povas uzi sufikson « i » anstataŭ « uj »."
7. Inter aliaj "Estas rekomendataj la sekvantaj novaj sufiksoj kaj vortoj:

   A. *aĉ* (sufikso de malestimo).
   B. *oz* (sufikso de multehavado); ekz-e « tero ŝtonoza »."

Tiuj du ja nun havas vivon en esperanto; la kvin sekvantaj, nome *jer, kum, anter, sob, par*, ne.

Laŭ la oka punkto estas permesate uzi novajn vortojn anstataŭ la ekzistantaj malnovaj:

A. *speri* "(« esperi »), por eviti en la participo konfuzon kun la nomo de nia lingvo."
B. *neblo* (« nebulo »). Kiu analizus *neb-ul-o*?
C. *poski* (« postuli »). Ĉu pro la analizo *post-ul-o*, kiun oni nun evitas uzante *posteulo*?
D. *rabaso* (« rabato »). Efektive *rab-at-o* povus esti komprenata kiel persono kiun oni prirabas, do pli precize *prirabato.*
E. *stati* (« farti »). Certe nur pro la angla *to fart* 'furzi'.

F. *reglo* («regulo»). Ĉu la analizo *reg-ul-o* starigas problemon?
G. *sukro* («sukero»). Nu, suko kaj pluvo povas havi siajn erojn.
H. *volunte* («volonte»). Jes, la verbo *volas* ja havas sian konverbon *vol-ont-e*.
I. *et* («kaj»). Kiuj estis kontraŭ la grekdevena *kaj*? Ĉu pro la franca alergio kontraŭ *j*?
J. *an* («ajn»). Ĉu pro la franca prononco de *j*?

Estas malfacile kompreni ke iu povus imagi ke tiaj alternativaj novaj vortoj faciligus la akcepton de esperanto ĉe la franca registaro — aŭ ĉe iu ajn.

Kvankam Zamenhof en la tria cirkulera letero direktas sin al la komitatanoj, ne estas klare ke la letero fakte atingis la komitaton. Nome, kvar tagojn poste li skribas al la generalo Hippolyte Sebert (1839–1930; lian nomon Waringhien skribas Sébert):

> Se Vi trovas, ke mia cirkulero N° 2 povas maltrankviligi la esperantistojn, tiam mi petas Vin — se ili ne estas ankoraŭ dissenditaj — volu nun dissendi al la esperantistoj nur la cirkuleron N° 1, la cirkuleron N° 2 kune kun N° 3 ni sendos *poste*, kiam ni havos definitivan respondon de la Delegacianoj. (Letero 1907-12-24 al Sebert; Zamenhof 1948b:126, zamenhof 1980:186)

Do Zamenhof lasis gravan decidon dependi de la bontrovo de Sebert, sed li ja ne sciis ĉu Sebert jam estis dissendinta ĉiujn cirkulerajn leterojn. Nebezone diri ke la tuto montras necertecon pri la taktiko.

## 15. Letero pri propono en 1908

En decembro 1908 Zamenhof skribas al Sebert:

> Tial mi nun venis al la konvinko, ke estas absolute necese proponi al la Akademio, ke ĝi unu fojon por ĉiam atente esploru la tutan lingvon, enkonduku per unu fojo ĉiujn plibonigojn, kiuj per voĉdonado montriĝos efektive necesaj, kaj poste deklaru, ke la lingvo por ĉiam fariĝis definitiva, dependos de nun sole de la *vivo* kaj nenia institucio havos la rajton fari iajn arbitrajn plibonigojn.
>
> [...]
>
> Mia projekto [kies verkadon mi komencis jam de longe] estos preta post 5–6 tagoj [...] (Letero al Sebert 1908-12-26; Zamenhof 1948b:244, zamenhof 1980: 244–245)

Waringhien aldonas:

> *Tiun projekton de Zamenhof mi bedaŭrinde ne retrovis. Sed, el la antaŭaj leteroj, oni povas supozi kun multe da verŝajno, ke ĝi ne tre diferencas de « Cirkulero n° 3 » (Kp n° 340), kiu siaflanke estis simila al la unua projekto prezentita al Javal (Kp n° 194).* (Waringhien en Zamenhof 1948b:244–245)

Tio signifas ke ni ne konas tiun definitivan proponon de Zamenhof, sed ke ĝi laŭ Waringhien ne tre diferencas de la prononoj faritaj en 1906 (vidu ĉapitron 13) kaj 1907 (vidu ĉapitron 14).

## 16. Finaj komentoj

Komparo de la kvin versioj de la lingvo de Zamenhof kiujn ni studis, do tiuj el 1878, 1881, 1887, 1894 kaj 1906, donas fascinan superrigardon de la pensado de la aŭtoro pri la kreado de universala, internacia, tutmonda, ... lingvo. Ni vidas movon inter pluraj polusoj, alivorte ian streĉitecon:

- miksite latiniddevena, ĝermandevena kaj slavdevena vortprovizo (1881, 1887) kontraste al pure latiniddevena (1878, 1894);
- altgrada gramatika precizeco (1881, 1887) kontraste al simpleco por faciligi la lernadon (1894).
- regulaj funkcivortoj sisteme inventitaj (1881, 1887) kontraste al malregulaj funkcivortoj pruntitaj el latino (1894, 1906);

Por mencii mallongege kelkajn trajtojn de la versioj mi diru tiel:

1878: Aglutina lingvo. Vortklasindikiloj. Latindevena vortprovizo.

1881: Daŭre aglutina. La vortprovizo estas plejparte latiniddevena, sed kun konsiderinda malplimulto de ĝermandevenaj vortoj kaj kun kelkaj slavdevenaj kaj hebredevenaj vortoj. Mallongaj prepozicoj kaj adverboj, el kiuj multaj ŝajnas esti arbitraj. Tabelvortoj sisteme konstruitaj.

1887: Aglutina. Vortprovizo plejparte latiniddevena, kun konsiderinda malplimulto de ĝermandevenaj kaj slavdevenaj vortoj. Prepozicioj pli naturaj. Tabelvortoj sisteme konstruitaj.

1894: Reformpropono pro premo. Ĉioma latinidigo. Detruo de la tabelo — malkresko de la aglutineco.

1906: Propono pri neologismoj pro premo. Nebulaj esperoj pri oficialigo en Francio kaj enkonduko en la tieajn lernejojn estis la allogaĵo por la propono pri neologismoj kaj forigo de la supersignoj. Sed tiaj esperoj vidiĝas kiel tre malverŝajna okazaĵo — kaj havi antaŭan certecon pri tia oficialigo ja estus neeble. La skribo de la fonemo /j/ per *y* estis obsedaĵo de la francoj ... kaj ne nur tiam.

Konklude, unue: el la versioj de 1878 kaj 1881 ni vidis kiel zorgege Zamenhof eksperimentis kaj elprovis sian lingvon. Kaj due: kvankam la proponoj de 1894 kaj 1906 estis faritaj pro ekstera premo, ili tamen iel montras kiuj estis la malfacilaĵoj — ĉu laŭsperte por la lernantoj, ĉu pro etnolingvaj antaŭjuĝoj.

## 17. Diakronaj tabeloj

| *Tabelo 16.* La verbaj finaĵoj en 1878, 1881, 1887 kaj en la propono de 1894 | | | | |
|---|---|---|---|---|
| | *Lingwe uniwersala* 1878 | *Lingvo universala* 1881 | *Lingvo internacia* 1887 | *Reformpropono* 1894 |
| *infinitivo* | -are | -i | -i | -a |
| *prezenco* | -á | -é | -as | -en |
| *imperfekto* | | -á | [60] | [60] |
| *preterito* | | -u | -is | -in |
| *futuro* | | -uj | -os | -on |
| *volitivo* | -ó | -ó | -u | -an |
| *kondicionalo* | | -as | -us | -un |
| *imperfekta*[61] *aktiva participo* | | -enta | -anta | -ente |
| *perfekta*[61] *aktiva participo* | | -aga | -inta | |
| *futura aktiva participo* | | | -onta | |
| *imperfekta*[61] *pasiva participo* | | -ita | -ata | -ate[62] |
| *perfekta*[61] *pasiva participo* | | -assa | -ita | -ate[62] |
| *futura pasiva participo* | | | -ota | |

[60] En la Unua libro de 1887 la imperfekto ne estis esprimita per aparta finaĵo (*-es* malaperis antaŭ la publikigo), sed en siaj verkoj Zamenhof kutime esprimas imperfektivon per *-adis*. Vidu pri tio la sekcion 9.7, paĝon 129, same kiel rimarkigon en piednoto 10, paĝo 89, pri la uzo de *-adis* ĉe Waringhien (1989). En la reformpropono de 1894 *-adis* respondis al *-adin*.

[61] Waringhien (1989:42) nomas la participojn *prezenca* ka *preterita*; ĉi tie mi sekvas Cash (1992:9).

[62] Ne estas tute klare kie oni devas meti *-ate*. Geraldo Mattos (persona informo 2010-07-23) proponas ke ĝi respondas al *-ata* por statverboj kaj al *-ita* por agverboj: *amate* 'amata', *fermate* 'fermita'.

| *Tabelo 17* | | *Individeco*<br>-u | *Kvalito*<br>-a | *Neŭtraĵo*<br>-o | *Posedo*<br>-es | *Loko*<br>-e | *Tempo*<br>-am | *Kaŭzo*<br>-al | *Maniero*<br>-el | *Kvanto*<br>-om |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *Nedifina* | 1 | | | | | | kan | | | kom |
| i- | 2 | iu | ia | io | ies | ie | iam | ial | iel | iom |
| | 3 | alikvu | alikve | alikvo | de alikvu | in alikve loko | alikvam | por alikvo | in alikve maniero | alikvanto |
| | 4 | | | | | | | ial | iel | |
| *Montra* | 1 | fu | fa | fo | | fi | fan | fej | fe | |
| ti- | 2 | tiu | tia | tio | ties | tie | tiam | tial | tiel | tiom |
| | 3 | is | tale | id | | ibu | tum | por ho | sik | tantu |
| | 4 | tu | | | | | | | | |
| | 5 | tu | | to | | ti | | | sik | |
| *Demanda-* | 1 | kvu, ku | kva | kvo, ko | | | kvan, kan | | kve, ke | |
| *Rilata* | 2 | kiu | kia | kio | kies | kie | kiam | kial | kiel | kiom |
| ki- | 3 | kvu | kvale | kvo | de kvu | ubu | kvandu | por kvo | kom | kvantu |
| | 4 | ku (sed kiun) | | ko | | kie | kam | | | |
| | 5 | ku | | ko | | ki | | | kom | |
| *Kolektiva* | 1 | ćiu | | ćio | | ćii | ćian | | | |
| ĉi- | 2 | ĉiu | ĉia | ĉio | ĉies | ĉie | ĉiam | ĉial | ĉiel | ĉiom |
| | 3 | omnu | omne | omno | | partutu | semper | | omnemaniere | |
| | 4 | ĉiu | | ĉo | | ĉie | | | | |
| *Negativa* | 1 | fiu | | fio | | | fian | | | |
| neni- | 2 | neniu | nenia | nenio | nenies | nenie | neniam | nenial | neniel | neniom |
| | 3 | nemo | nule | nulo | de nemo | nuskvam | nunkvam | | nulemaniere | |

*Tabelo 17.* (vidu paĝon 141).
1. La 21 atestitaj tabelvortoj en Lingvo universala de 1881;
2. La $5 \times 9 = 45$ tabelvortoj en Lingvo internacia de 1888;
3. La $5 \times 9 - 6 = 39$ tabelvortoj listigitaj en la reformpropono de 1894;
4. La 10 alternativaj tabelvortoj plus *kiun* menciitaj en la propon-projekto de 1906-01-18;
5. La 8 alternativaj tabelvortoj menciitaj en la propono de 1906-11-22.

*Tabelo 18.* La personaj pronomoj en 1881, 1887 kaj en la propono de 1894

| | *Lingvo universala* 1881 | | *Lingvo internacia* 1887 | | *Reformpropono* 1894 | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| unua persono | mo | no | mi | ni | mi / mu | nu / nos |
| dua persono | to | vo | ci | vi | tu | vu / vos |
| tria persono | ro, ŝo | po | li, ŝi, ĝi | ili | li, elu | loru / ilu |
| refleksiva pronomo | so | | si | | su | |
| malfokusiga pronomo | o | | oni | | homi, iu / on | |

*Tabelo 19.* Vortoj finiĝantaj per *-aŭ* en esperanto kaj kelkaj aliaj vortoj, kun la respondaj vortoj en la Lingvo universala de 1881, en la reformpropono de 1894 kaj en la projekto de propono de 1906-01-18 (en krampoj) kaj la definitiva propono de 1906-11-22.

| *Lingvo universala 1881* | *Lingvo internacia 1887* | *Reformpropono* 1894 | *Propono* (1906-01), 1906-11 |
|---|---|---|---|
| | adiaŭ | adiu | adie |
| paŝ | almenaŭ | almenu | almene |
| baj | (ambaŭ) | ambi | amboy |
| os | ankaŭ | anku | anke |
| es | ankoraŭ | ankoru | ankore |
| | anstataŭ | inloku | (lo), stete |
| vi | antaŭ [loko] | antu | (pre), davan |
| vi | antaŭ [tempo] | antu | (vor), vor |
| pin | antaŭ ol | | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| kaŭ | apenaŭ | apenu | apene |
| aŭ | aŭ | u | |
| | baldaŭ | prestu | balde |
| | ĉirkaŭ | cirku | (ĉir), ĉirke |
| de | de [pasivo] | de | ab |
| jur | hieraŭ | hieru | hiere |
| | hodiaŭ | hodiu | hodie |
| blo | kontraŭ | kontru | kontre |
| vel | (kvazaŭ) | kvasu | kvaze |
| lau | laŭ | sekondu | |
| | malgraŭ | malgru | malgre |
| | morgaŭ | dimanu | morge |
| nau | naŭ | novu | |
| da | per | per | per |
| plej | plej | maksu | |
| pli | pli | plu | |
| bi | post [loko] | postu | hint |
| bej | post [tempo] | postu | post |
| | preskaŭ | presku | preske |
| pri | pri | de | |
| un | unu | un | |
| | unuj | uni | |

La fontoj por la praesperantaj vortoj (1881) estas Waringhien (1989:23–37) kaj Cash (1992).

La fontoj por la esperantaj vortoj (1887) estas la ruslingva, pollingva, franclingva kaj germanlingva versioj de la Unua libro (Zamenhof 1991a) kun du esceptoj: en la vortlistoj de tiuj ĉi versioj de la Unua libro mankas *ambaŭ* kaj *kvazaŭ.* Ilin mi enmetis laŭ la Fundamento. En ĉiuj aliaj okazoj la vortlisto de 1887 kaj la Fundamento de 1905 (Zamenhof 1991c) donas identajn formojn de la listigitaj vortoj.

La fonto por la vortoj el 1894 estas zamenhof (1989:632–634, 639–645).

La fonto por la vortoj el 1906-01 kaj 1906-11 estas Zamenhof (1948a:244–253) respektive (1948a:299–318).

Ni vidas ke pri la vortoj *adiaŭ, almenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, antaŭ, apenaŭ, aŭ, ĉirkaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, kontraŭ, malgraŭ* kaj *preskaŭ* la propono de 1894 konsistas el anstataŭigo de *aŭ* per *u.* Por *anstataŭ, baldaŭ, kvazaŭ, laŭ, morgaŭ, naŭ* temas pri la sama anstataŭigo, sed krome okazas iu alia ŝanĝo.

## Dankoj

Mi dankas al Gonçalo Neves pro tre valora helpo pri pluraj fontoj, precipe pri artikoloj de Bernard Golden kaj gravaj rimarkigoj; same al Tsvi Sadan pro tre valora helpo pri jidaj kaj hebreaj vortoj; al Bo Isaksson pro helpo pri ŝemidaj vortoj; kaj al Ove Strid pri komentoj pri klasikgrekaj vortoj. Mi estas danka al Geraldo Mattos, Marc Bavant, Sergio Pokrovskij, Wim Jansen kaj Vilmos Benczik pro gravaj komentoj kaj korektoj al pli fruaj versioj de tiu ĉi teksto. Fine mi estas danka al José Antonio Vergara pro gravaj komentoj kaj korektoj, kaj por la disponigo de la broŝuro Zamenhof (1906) en originalo.

## Referencoj

Adam, Z. (Pseŭdonimo de Adam Zakrzewski, 1856–1921) (1913). *Historio de Esperanto 1887–1912.* Varsovio: Librejo Gebethner kaj Wolff. (Represita 1979. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio.)

*Aktoj de la Akademio 1963–1967* (2007). Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, N° 9. Roterdamo: Akademio de Esperanto.

*Aktoj de la Akademio II, 1968–1974* (2007). Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, N° 10. Roterdamo: Akademio de Esperanto.

Andersen, H. C. (1837). *Den lille Havfrue.* Eventyr, fortalte for Børn I:3, 87–106. Arkiv for Dansk Litteratur. [La dana originalo.] Kaptita 2010-11-22 ĉe `www.adl.dk/adl_pub/forfatter/e_forfatter/e_forfatter.xsql?ff_id=22&nnoc=adl_pub`

Andersen, H. C. (≈ 1900). *Die kleine Seejungfrau.* Tradukita el la dana en la germanan de Julius Reuscher. Lepsiko: Abel und Müller, 31-a eldono. Kaptita 2010-11-22 ĉe `www.zeno.org/Literatur/M/Andersen, +Hans+Christian/Märchensammlung/Märchen/Die+kleine+Seejungfrau`

Andronov, Michail S[ergeeviĉ] (1989). *A Grammar of Modern and Classical Tamil.* Dua eldono. Madras: New Century Book House. 376 pp.

Barandovská-Frank, Věra (2009). Praesperanto — la planlingva Ossian. **En:** Koutny, Ilona (red., 2009) *Abunda fonto: Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi*, pp. 65–76. Poznań: ProDruk & Steleto.

Barandovská-Frank, Věra (2010). *Latinidaj planlingvoj.* Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), San Marino. Berlin; Paderborn: Institut für Kibernetik GmbH. 48 pp.

Baudouin de Courtenay, Jan (1972). *A Baudouin de Courtenay Anthology: The Beginnings of Structural Linguistics.* Translated and edited with an introduction by Edward Stankiewicz. Bloomington, IN; Londono: Indiana University Press.

Bavant, Marc (2007). *Arĥaikaj Esperantoj, la vera kaj la fantaziaj.* Semestra laboraĵo. Poznań: Interlingvistikaj studoj. Manuskripto, 16 pp.

Benczik, Vilmos (2011). La esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 37–59.

Bergen, Benjamin (2001). Nativization processes in L1 Esperanto. *Journal of Child Language* **28**(3), 575–595.

Bloomfield, Leonard (1926). A set of postulates for a science of language. *Language* **2**, 153–164.

Bloomfield, Leonard (1962). *Language.* Londono: Ruskin House, George Allen & Unwin Ltd. (Unua eldono 1933 en Nov-Jorko: Holt, Rinehart & Winston.)

Braune, Wilhelm (1930). *Abriss der althochdeutschen grammatik* [tiel]. Halle (Saale): Max Niemeyer Verlag.

Cash, Rikardo (1992). *Praesperanto. Lingvo universala.* La Kancerklinikoteko. ISSN 0398-5822.

Chafe, Wallace (1992). Uses of the defocusing pronominal prefixes in Caddo. *Anthropological Linguistics* **32**, 57–68.

Courtinat, Léon (1964). *Historio de Esperanto (Movado kaj Literaturo); (1887–1960).* Presita ĉe Imprimérie Moderne, Agen.

DeFrancis, John (1986). *The Chinese Language. Facts and Fantasy.* Honoluluo: University of Hawaii Press.

Д[ръ] Эсперанто [Dr″ Èsperanto; pseŭdonimo de Д[ръ] Л. Заменгофъ] (1887a). *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ.* Varsovio: Kelter. 42 pp + faldfolio.

Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Dr. L. Zamenhof] (1887b). *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny.* Warsaw: Kelter.

Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Docteur L. Samenhof] (1887c). *Langue internationale. Préface et Manuel complet.* Warsaw: Kelter. 48 pp + faldfolio.

Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de D[r.] L. Samenhof] (1887d). *Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch.* Warsaw: Kelter.

Duc Goninaz, Michel (1984). Lingvosciencaj kaj gramatikaj difinoj de Plena Ilustrita Vortaro. **En:** Rokicki, Ryszard (red., 1984), *Scienca Interlingvistika Simpozio*, 71–75. Varsovio.

Duc Goninaz, Michel (1985). Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto. **En:** Oljanov (red., 1985:77–84).

*Enciklopedio de Esperanto* (1979). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. (Represo de la unua eldono, 1933, 1934. Redaktis L. Kökény; V. Bleier; ĉefredaktoro I. Ŝirjaev.)

*Esperanto 1894.* `https://sites.google.com/site/esperanto1894/` Retpaĝaro prezentanta la reformproponon el 1894. Ligo kontrolita 2011-01-08.

Fiedler, Sabine; Liu, Haitao (red., 2001). *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlingvistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag.* Dobřichovice (Prague): Kava-Pech, 736 pp. ISBN 80-85853-53-1.

Gacond, Claude (1979). Al doktoro Esperanto, por influi lin gramatike. *Literatura Foiro* **54**, 4–6.

Golden, Bernard (1978). La 100-jara datreveno de Lingwe Uniwersala. *Heroldo de Esperanto*, N-ro 17 (1641), 1978-12-16, pp. 1, 3.

Golden, Bernard (1979). Ĉu Doktoro Esperanto estis *volapükel*? *Literatura Foiro* **54**, 14–18.

Golden, Bernard (1980). *The Influence of Volapük on Esperanto as Indicated by Lexical Data.* Linguistische Berichte Nr. 61. Wiesbaden. 26 pp.

Golden, Bernard (1983). Vortoj de hebrea deveno en pra-Esperanto. *Israela Esperantisto* **83**, 4–6, marto.

Golden, Bernard (1985a). Influo de Volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto. **En:** Haupenthal, Reinhard (red., 1985). *Li kaj Ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*, pp. 401–414. Antverpeno; La Laguna.

Golden, Bernard (1985b). La deveno de la Esperanta sufikso "-ul". **En:** Oljanov (red., 1985:97–102).

Golden, Bernard (1985c). La etimologio de la sufikso -il. **En:** Oljanov (red., 1985:103–108).

Golden, Bernard (1985d). La etimologio de la prepozicio "al". **En:** Oljanov (red., 1985:112–117).

Günkel, Claus (1996). Adiaŭ, naŭ ĵaŭdaj fraŭlinoj. *Literatura Foiro* **162**, 185–190.

Haspelmath, Martin (1995). The converb as a cross-linguistically valid category. **En:** Haspelmath & König (red., 1995), pp. 1–55.

Haspelmath, Martin; König, Ekkehard (red., 1995). *Converbs in Cross-Linguistic Perspective. Structure and Meaning of Adverbial Verb Forms — Adverbial Participles, Gerunds.* Berlino; Nov-Jorko: Mouton de Gruyter.

Holzhaus, Adolf (1975). *Zamenhof: Leteroj.* Helsinko: Fondumo Esperanto.

Janton, Pierre (1977). *L'espéranto.* Presses Universitaire de France.

Kalocsay, K.; Waringhien, G. (1985). *Plena analiza gramatiko de Esperanto* [PAG]. Kvina korektita eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Kvara, tralaborita, eldono aperis en 1980.)

Kerckhoffs, Aug[uste] (1887). *Dictionnaire Volapük-Français et Français-Volapük précédé d'une grammaire complète de la langue.* (Du volumoj.) Parizo: Librairie H. Le Soudier.

Kerkhoffs, Aug. [Kerckhoffs, Auguste] (1887). *Internationellt handelsspråk. Fullständig lärokurs i Volapük. Språklära, ordbildningslära samt skrif- och läsövningar* [*Internacia komerca lingvo. Kompleta lernolibro de volapuko. Lingvoinstruo, vortfaroinstruo kaj skrib- kaj legekzercoj*]. Stokholmo: Albert Bonniers Förlag.

Kiselman, Christer (1991). Vortkreaj procezoj de Esperanto. *Scienca Revuo* **42**, 95–109.

Kiselman, Christer (1992). Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? *Literatura Foiro* **138**, 213–216.

Kiselman, Christer (2001). La sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj. **En:** Fiedler & Liu (red., 2001:40–56).

Kiselman, Christer (2002). El akademiaj babiladoj en la reto. [Devus esti: Fundamentaj vortoj en la *Akademia Vortaro.*] *Fonto* **260**, 34.

Kiselman, Christer (2008). Esperanto: its origins and early history. **En:** Andrzej Pelczar (red., 2008), *Prace Komisji Spraw Europejskich PAU*, vol. II, pp. 39–56. Krakovo: Polska Akademia Umiejętności, 79 pp.

Kiselman, Christer (2010). La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. **En:** Kiselman (red., 2010:41–63).

Kiselman, Christer (red., 2010). *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono.* Roterdamo: Universala Asocio de Esperanto.

Künzli, Andreas (2008). Fundamento de Esperanto. *La Ondo de Esperanto*, n-ro. 4, 21.

Lapenna, Ivo; Lins, Ulrich; Carlevaro, Tazio (1974). *Esperanto en perspektivo: Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo.* Londono; Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio; Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

Lehmann, Thomas (1993). *A Grammar of Modern Tamil.* Pondicherry Institute of Linguistics and Culture.

Lehmann, Thomas (1994). *Grammatik des Alttamil unter besonderer Berücksichtigung der Caṅkam-Texte des Dichter Kapilar.* Stuttgart: Franz Steiner Verlag. xiv + 187 pp.

Lindstedt, Jouko (2006). Native Esperanto as a test case for natural language. **En:** Suominen, Mickael et al. (red., 2006). *A Man of Measure: Festschrift in Honour of Fred Karlsson on his 60th Birthday*, pp. 47–55. Turku: The Linguistic Association of Finland. Speciala suplemento al *SKY Journal of Linguistics*, volumo 19.

Liu, Haitao (2011). Quantitive analysis of Zamenhof's *Esenco kaj estonteco*. *Language Problems & Language Planning* **35**(1), 57–81.

Malovec, Miroslav (2000). *Gramatiko de Esperanto.* Dua eldono. Dobřichovice (Prago): Kava-Pech.

Martinet, André (1960). *Éléments de linguistique générale.* Parizo: Armand Colin. (Unua eldono; multaj postaj eldonoj sekvis.)

Mattos, Geraldo (1987). *La deveno de Esperanto.* Chapecó, SC: Fonto. 107 pp.

Mattos, Geraldo (1998). La polapüka Esperanto. **En:** *Menade bal püki bal. Festschrift zum 50. Geburtstag von Reinhard Haupenthal; Festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal 1995-02-17*, pp. 193–214. Saarbrücken: Edition Iltis.

Mattos, Geraldo (2002). Transformo. *Fonto* **257**, 3–12.

Maurer, Walter Harding (1995). *The Sanskrit Language: An Introductory Grammar and Reader.* Volumo 1, Lessons 1–32, pp. 1–551; volumo 2, Appendices, Glossary and Lexicon, pp. 553–830. Surrey: Curzon Press.

Mine Yositaka (2008). Miyazawa Kenzi, kiu provis verki Esperante. **En:** Syozi Keiko (red., 2008). *Japana Esearo*, pp. 61–65. Tokio: Libroteko Tokio.

Miner, Ken (2010). La neebleco de priesperanta lingvoscienco. **En:** Blanke, Detlev; Lins, Ulrich (red., 2010). *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*, pp. 259–270. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Mugdan, Joachim (1984). *Jan Baudouin de Courtenay (1845–1929): Leben und Werk.* Munkeno: Wilhelm Fink Verlag.

Murgin, Canko (1985). La sufikso -il- estas slavdevena. **En:** Oljanov (red., 1985:109–111).

*La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (2002) [NPIV]. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Oljanov, Violin (red., 1985). *Interlingvistiko; Esperantologio.* Sofio: Bulgara Esperantista Asocio. 252 pp.

Pinker, Steven (1995). *The Language Instinct.* Nov-Jorko: HarperPerennial.

*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (1977) [PIV]. Dua eldono per "offset". Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Privat, Edmond (1982). *Historio de la lingvo Esperanto. Unua parto. Deveno kaj komenco. 1887–1900.* Hago: Internacia Esperanto-Instituto.

Privat, Edmond (2007). *Vivo de Zamenhof.* Sesa eldono; redaktis Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Reformprojekto de Zamenhof. *Vikipedio.* `eo.wikipedia.org/`. Ligo kontrolita 2011-01-09.

Rokicki, Ryszard (1987). La leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la esperantan morfemaron. **En:** Duc Goninaz, Michel (red., 1987). *Studoj pri la internacia lingvo. Etudes sur la langue internationale. Studies on international Language*, pp. 91–108. Gent: AIMAV.

Sadan, Tsvi (2008). "International" forms of Biblical Hebrew personal names: Their adoption and adaptation in the international planned language Esperanto. *Language Problems & Language Planning* **32**, N-ro 3, 254–268.

Sadan, Tsvi (2010). Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto. **En:** Kiselman (red., 2010:9–18).

de Saussure, René (1982). *Resumo de la teorio de Antido.* Saarbrücken: Artur E. Iltis. (Represo de eldono de 1910.)

Schiller, Frederiko (1908). *La Rabistoj. Dramo en kvin aktoj.* El germana lingvo tradukis D$^{ro}$ L. L. Zamenhof. Parizo: Hachette.

Schleyer, Johann Martin (1882). *Volapük (Weltsprache). Grammatik der Universalsprache für alle gebildete Erdbewoner.* Dua eldono. Überlingen am Bodensee. In Kommission der Buchdrukerei von August Feyel. VIII + 135 pp.

Stankiewicz, Edward (1976). *Baudouin de Courtenay and the Foundations of Structural Linguistics.* Lisse: The Peter de Ridder Press.

Steever, Sanford B. (2008). Old Tamil. **En:** Woodard, Roger D. (red., 2008). *The Ancient Languages of Asia and the Americas*, 50–75. Cambridge: Cambridge University Press.

Szerdahelyi, István (1976). *Vorto kaj vortelemento en Esperanto.* Studoj de Kultura Centro Esperantista. Kuopio: Literatura Foiro. 14 pp.

Šilas, Vytautas (2010). Zamenhof kaj Litovio. Nia judo. **En:** Kiselman (red., 2010:19–32).

Tonkin, Humphrey (2001). *Esperantologio eksogena kaj endogena.* **En:** Fiedler & Liu (red., 2001:307–325).

Trunte, Hartmut (1975). Esperanto — ĉu eŭropa lingvo? *Kontakto* **48**, 15–22.

Utas, Bo (2009). Iranian languages as gardens. *Iranian Journal of Applied Language Studies* **1**, no. 1, 142–160.

Vilborg, Ebbe (1989). *Etimologia vortaro de Esperanto.* Volumo 1: A–D. Malmö: Eldona Societo Esperanto.

Vilborg, Ebbe (1991). *Etimologia vortaro de Esperanto.* Volumo 2: E–Ĵ. Malmö: Eldona Societo Esperanto.

Vilborg, Ebbe (1993). *Etimologia vortaro de Esperanto.* Volumo 3: K–M. Malmö: Eldona Societo Esperanto.

Vilborg, Ebbe (1995). *Etimologia vortaro de Esperanto.* Volumo 4: N–R. Malmö: Eldona Societo Esperanto.

Vilborg, Ebbe (2001). *Etimologia vortaro de Esperanto.* Volumo 5: S–Z. Stokholmo: Eldona Societo Esperanto.

Waringhien, Gaston (1989). *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj.* Dua eldono kun apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1959, La Laguna: J. Régulo.)

Weinreich, Max (1980). *History of the Yiddish Language.* Tradukita de Shlomo Noble kun la helpo de Joshua A. Fishman. Chicago; Londono: The University of Chicago Press.

Wells, J[ohn] C. (1978). *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio; Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

Wennergren, Bertilo. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, PMEG. Rete havigebla ĉe `http://bertilow.com/pmeg/index.html`. Ligo kontrolita 2011-04-02.

Wennergren, Bertilo (2010). *Detala Gramatiko de Esperanto.* lernu!

Zamenhof, L. L. (1905). *Fundamento de Esperanto.*

Zamenhof, L. L. (1906). *Pri reformoj en Esperanto. Kopiaĵo de artikoloj publikigitaj de D° Zamenhof en la Nurnberga gazeto "Esperantisto" dum la unua duonjaro 1894.* Parizo: Centra Oficejo. 39 pp. [Eldonita de Émile Javal.]

Zamenhof, L. L. (1927). *Lingvaj respondoj* (*Plena kolekto*). Parizo: Esperantista Centra Librejo.

Zamenhof, L. L. (1939). *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Deksesa eldono. Parizo: Esperantista Centra Librejo.

Zamenhof, L.-L. (1948a). *Leteroj de L.-L. Zamenhof.* Prezentado k[aj] komentado de Prof. G. Waringhien. I, 1901–1906. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Zamenhof, L.-L. (1948b). *Leteroj de L.-L. Zamenhof.* Prezentado k[aj] komentado de Prof. G. Waringhien. II, 1907–1914. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Zamenhof, L. L. (1962). *Lingvaj respondoj: Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto*. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.

zamenhof l. l. (1980). *iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof. kajero 8. por kaj kontraŭ reformoj.* Kioto: eldonejo ludovikito.

Zamenhof, L. L. (1983). *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj.* Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Fotorepreso de la eldono publikigita de Ferdinad Hirt & Sohn en Lepsiko en 1929.)

zamenhof l. l. (1985). *postrikolto de ludovikaĵoj. iom reviziita plena verkaro de l. l. zamenhof.* Kioto: eldonejo ludovikito.

zamenhof l. l. (1989). *iom reviziita plena verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 1. unua etapo de esperanto. 1878–1895.* Kioto: eldonejo ludovikito.

zamenhof l. l. (1990). *iom reviziita plena verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 2. ĝis la homaranismo. 1896–1906.* Kioto: eldonejo ludovikito.

zamenhof l. l. (1991a). *eble neniam kompletigotaj necesaj aldonoj al la pvz. kolekto 1. ludovikologia dokumentaro I. unuaj libroj.* Kioto: eldonejo ludovikito.

zamenhof l. l. (1991b). *iom reviziita plena verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 3. destino de ludovika dinastio. 1907–1917.* Kioto: eldonejo ludovikito.

Zamenhof, L. L. (1991c). *Fundamento de Esperanto*. Deka eldono. Pizo: Edistudio.

Zhao, Shouhui; Liu, Yongbing (2010). Chinese education in Singapore: Constraints of bilingual policy from the perspective of status and prestige planning. *Language Problems & Language Planning* **34**, 3, 236–258.

Christer Kiselman estas matematikisto kaj laboris pri partaj diferencialaj ekvacioj, kompleksa analitiko kaj geometrio en pluraj variabloj, kaj analitiko en spacoj kun nefinia dimensio. Nuntempe li ĉefe esploras pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado. Li verkis pri la gramatiko de esperanto, pri la frua historio de la lingvo kaj pri la religiaj ideoj de Zamenhof. Li membras en la Akademio de Esperanto ekde 1989.

*Adreso de la aŭtoro:* Upsala universitato, Matematika instituto,
Poŝtkeŝto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedujo
*Retpoŝtaj adresoj:* `kiselman@math.uu.se`, `christer@kiselman.eu`
*URL:* `www.math.uu.se/~kiselman`

**Korektoj al EES 4**

Bedaŭrinde aperis kelkaj eraroj en la kajero 4 de *Esperantologio / Esperanto Studies*. Ĉi tie mi listigas ilin. Mi dankas al Reinhard Haupenthal kaj Ingrid Maier, kiuj signalis al mi plej multajn el ili.

Paĝo 49, la piednoto: Белостокъ devas esti: БѢлостокъ.

Paĝo 62, la dekunua linio de malsupre, ne kalkulante la piednotojn: patran nomo devas esti: patra nomo.

Paĝo 63, piednoto numero 14: Маркович devas esti: Марковичъ.

Paĝo 64, linioj 9 kaj 10: dek tri foje devas esti: dektrifoje.

Paĝo 66, punkto 4, kvina linio: unu foje devas esti: unufoje.

Paĝo 67, piednoto numero 23: оседлости devas esti: осѢдлости; osedlosti devas esti: osědlosti.

Paĝo 68, kvina linio: konsistis devas esti: konsistigis.

Paĝo 68, piednoto numero 26: Белостокъ devas esti: БѢлостокъ.

Paĝo 70, unua linio: Porokazan prisilenton devas esti: Porokaza prisilento.

Paĝo 71, la dekunua linio: eksplicigi devas esti: eksplici. La dekunua linio de malsupre, ne kalkulante la piednotojn: ŝatis gin devas esti: ŝatis ĝin.

Paĝo 76, oka linio: oni akordiĝis devas esti: oni akordigis. La naŭa linio de malsupre, ne kalkulante la piednoton: konsistantaj devas esti: konsistigantaj. La sesa linio de malsupre, ne kalkulante la piednoton: Белостокъ devas esti: БѢлостокъ.

Paĝo 77, la dua linio en la sekcio 11: celante apogi devas esti: celanta apogi. La kvina linio en la sekcio 11: ŝatanta argumento devas esti: ŝatata argumento. Piednoto numero 35: en la rusa lingvo Белостокъ aŭ Белосток devas esti: en la rusa lingvo БѢлостокъ aŭ, laŭ la nuna ortografio, Белосток.

Paĝo 79, la dektria linio: amaso de artikoloj devas esti: amaso da artikoloj.

Paĝo 80, oka linio: falsajn referencnomon devas esti: falsajn referencnomojn.

Paĝo 81, la dektria linio de supre: Людовигович devas esti: Людовиговичъ. La kvina linio de malsupre, ne kalkulante la piednotojn: tombstono devas esti: tombŝtono. Piednoto 38: amuzigaj devas esti: amuzaj.

Paĝo 83, unua linio de sekcio 15: realiĝis devas esti: realigis.

Paĝo 86, naŭa linio de malsupre, ne kalkulante la piednotojn: falsaĵon plu devas esti: falsaĵo plu.

Paĝo 89, listo de enciklopedioj: 2. cs1: Malá Československá Encíclopedie devas esti: 2. cs1: Malá Československá Encíklopedie. 4. de2: Der Grosse devas esti: 4. de2: Der Große. Same ĉe 5. de3 kaj 6. de4.

Paĝo 91, numero 50: Encyclopedie devas esti: Encyclopédie. Numeroj 86 kaj 87: Bolšaja sovjetskaja enciklopedija devas esti: Bol′šaja sovetskaja ènciklopedija. Numero 88: Sovjetskij enciklopedičeskij slovar devas esti: Sovetskij enciklopedičeskij slovar′.